

IMPERIESTRO KAJ GALILEANO

MOND-HISTORIA
TEATRAĴO

DE HENRIK IBSEN


TRADUKITA DE
H. J. BULTHUIS, L.K.

REKOMENDITA DE
„ESP. LITERATURA ASOCIO“




ZUTPHEN - W. J. THIEME & CIE - MCMXXX

f 3.50, geb. f 3.90



7112

UNIVERSITY OF CALIFORNIA



963265

IMPERIESTRO KAJ GALILEANO



Van geboden door de vertaler:

H. O. Milt huus.

Hiervan zijn gedrukt 12 genummerde exemplaren
op Oud-Hollandsch papier.

IMPERIESTRO KAJ GALILEANO

MOND-HISTORIA TEATRAĴO

DE

HENRIK IBSEN

TRADUKITA DE

H. J. BULTHUIS, L. K.

REKOMENDITA DE „ESP. LITERATURA ASOCIO“



ZUTPHEN — W. J. THIEME & CIE — MCMXXX

IMPERIESTRO KAI
GALILEANO

MOND-HISTORIA TEATRO

HENRIK IBSEN

WAGNERA DE

H. J. BULLIUS, F. K.

WAGNERA DE DE LEEUWENDE WAGNERA



WAGNERA DE DE LEEUWENDE WAGNERA

ANTAŬPAROLO.

Aperigante ĉi tiun verkon, mi devas esprimi mian koran dankon:
al Lia Ministra Moŝto SIGURD IBSEN, kiu afable permesis al
mi traduki unu el la plej belaj dramoj de lia altsatata patro,

al fraŭlino J. ZSCHEPANK, kiu kiel prezidantino de „Esperant-
ista Literatura Asocio” rekomendis la tradukon, kaj fine,

al sinjoro C. H. HVORSLEV en Aarhus, Danujo, kiu tiel zorge
tralegis kaj revizis mian manuskripton antaŭ ol mi metis ĝin en
la manojn de la presisto.

Imperiestro kaj Galileano eniru la mondon kaj plaĉu al la esperant-
istaro!

La tradukinto:

H. J. BULTHUIS.

Den Haag, Januaro 1930.

DECLARATION

I, the undersigned, do hereby certify that the above is a true and correct copy of the original as the same appears in the records of the office of the Secretary of the State of New York.

In witness whereof, I have hereunto set my hand and the seal of the said office, at Albany, this _____ day of _____, 19____.


Secretary of the State



For the Secretary of the State

ENHAVO.

- I. Apostatiĝo de Cezaro, teatraĵo en kvin aktoj 1
- II. Imperiestro Juliano, teatraĵo en kvin aktoj 123
-



I.

APOSTATIĜO DE CEZARO,
TEATRAĜO EN KVIN AKTOJ.

THE UNIVERSITY OF CHICAGO
LIBRARY

UNIVERSITY OF CHICAGO PRESS

AKTOROJ DE LA AKTOJ I—V

Imperiestro Konstantios.
Imperiestrino Eŭsebia.
Princino Helena, fratino de la imperiestro.
Princo Galos, kuzo de la imperiestro.
Princo Juliano, pli juna duonfrato de Galos.
Memnon, Etiopo, favorata sklavo de la imperiestro.
La orajisto Potamon.
La kolorigisto Fokion.
La hartondisto Eŭnapios.
Fruktovendisto.
Kondukisto de la gardistoj.
Soldato.
Pudrita virino.
Podagrulo.
Blinda almozulo.
Agaton, la filo de vinkulturisto el Kapadocio.
La filozofo Libanios.
Gregoro de Nazianz
Basilios de Cezarea
Salust de Perusia
La teologiisto Hekebolios
La mistikisto Maksimos
La dominspektoro Eŭterios
La kvestoro Leontes
La sklavino Mira
La tribuno ¹⁾ Decentius

¹⁾ norvege: *Tribun (en) = (den) Tribun.*
holande *tribuun.*
france *tribun.*
germane *Tribun.*
angle *tribune.*

La ĉevalestro Sintula
 La armekondukistoj Florentius kaj Severus.
 La kuracisto Oribaces
 La subkondukisto Laipso
 La subkondukisto Varo
 La standardportisto Maŭros

Soldatoj, preĝejon irantoj, idolanaj rigardantoj, korteganoj, pastroj, lernantoj de la saĝec-lernejoj, dancistinoj, oficistoj, sekvantaro de la kvestoro, gaŭlaj soldatoj, spirit-aperafoj kaj voĉoj.

(La unua akto okazas en Konstantinopolo, la dua en Ateno, la tria en Efeso, la kvara ĉe Lutecia en Gaŭlujo kaj la kvina en Viena, samprovinco.

La tempo: de 351—361 post la naskiĝo de Kristo.)

esperante	tribuno	(laŭ la vortaro de P. Christaller).
..	tribuno	(laŭ E. Boirac).
..	demagogo	(laŭ Grosjean-Maupin).
..	tribuno	(laŭ Th. Cart).
..	tribunestro	(laŭ Lambert: Julio Cezaro).
	popolgvidanto	laŭ H. C. Mees (Ned.-Esp. Wordenboek).

Laŭ Kabe (vortaro) *tribuno* = levita horizontala ebena el tabuloj por la oratoroj.
 Laŭ Boirac (vortaro) *tribuno* signifas ankaŭ: podio, katedro.

AKTO UNUA

(Pasko-vespero en Konstantinopolo. La scenejo prezentas malfermitan parkon kun arboj, arbetoj kaj reversitaj statuoj apud la imperiestra palaco. Sur la fundo, tre lumigita staras la kortega preĝejo. Dekstre troviĝas marmora balustrado de hiu malsupren-kondukas ŝtuparo ĝis la akvo. Inter pinioj kaj cipresoj oni havas vidon sur la Bosforo kaj sur la asia marbordo.)

(Diservo. Imperiestraj korpogardistoj staras sur la preĝej-ŝtuparo. Grandaj aroj da piuloj eniras la preĝejon. Almozuloj, kripluloj kaj blinduloj staras ĉe la enirejo. Idolanaj rigardantoj, fruktovendistoj kaj akvovendistoj plenigas la placon.)

Himno *(interne de la preĝejo)*

Eterne ni gloru
La Krucon de Kristo!
Serpento jam kuŝas
En profundegajo.
Safido triumfis;
Sur ter' estas sankte!

Orajisto Potamon *(kun papera lanterno, venas de maldekstre, frapetas sur la ŝultron de soldato kaj demandas)*: Pŝ, bona amiko, — kiam venos la imperiestro?

La soldato. Mi ne scias.

Kolorigisto Fokion *(turnas la kapon en la interpuŝado)*. La imperiestro...? La imperiestro venos iom antaŭ meznokto. Tuj antaŭ ĝi. Mi eksciis tion de Memnon mem.

Hartondisto Eŭnapios *(venas rapide kaj flanken puŝas la fruktovendiston)*. Flanken, idolano!

La fruktovendisto. Kviete, sinjoro!

Orajisto Potamon. La porko gruntas!

Hartondisto Eŭnapios. Hundo, hundo!

Kolorigisto Fokion. Gruntas kontraŭ bone vestita kristano; —
kontraŭ samreligiano de l'imperiestro!

Hartondisto Eŭnapios (*puŝegas teren la frukto-vendiston*). En la
koto kuŝu!

Orajisto Potamon. Ĝuste! Ruliĝu kaj malpuriĝu tie, kiel viaj
dioj!

Kolorigisto Fokion. (*batas lin per sia bastono*) Ricevu tion, —
kaj tion, — kaj tion!

Hartondisto Eŭnapios (*piedpuŝas lin*). Kaj tion; kaj tion! Mi
moligos vian malbenindan haŭton. (*La frukto-vendisto forkuras.*)

Kolorigisto Fokion. (*kun videbla intenco ke lin aŭdos la konkististo de la korpogardistoj.*) Mi kore dezirus, ke iu sciigu nian
amatan imperiestron pri ĉi tiu sceno. La imperiestro antaŭ
nelonge esprimis sian malkontentecon pri tio, ke ni kristanaj
burĝoj interrilatas kun la idolanoj, ĝuste kvazaŭ inter ni nenia
diferenco — — —

Orajisto Potamon. Vi aludas al tiu afiŝo sur la placo? Tiun mi
ankaŭ legis. Kaj mi kredas, ke same kiel troviĝas en la mondo
oro malfalsa kaj falsa — — —

Hartondisto Eŭnapios. Oni ne mezuru ĉiujn per la sama me-
zurilo, jen mia opinio. Dank' al Dio, troviĝas sufiĉe da fer-
voraj animoj inter ni.

Kolorigisto Fokion. Ni ne estas ankoraŭ sufiĉe fervoraj, kara
frato! Jam vidu, kiel insulte kondukas tiu mokanto. Aŭ ĉu
vi kredas, ke multaj el tiuj kanajloj portas sur la brako la signon
de la kruco kaj de l'fiŝo?

Orajisto Potamon. Ne, — pripensu do, eĉ antaŭ la kortega
kapelo ili svarmas.

Kolorigisto Fokion. — en tia plej sankta nokto — —

Hartondisto Eŭnapios. — ili baras la vojon al la puraj membroj
de la preĝejo — —

Pudrita virino. (*en la interpremo*) Ĉu la donatistoj estas puraj?

Kolorigisto Fokion. Kion? Donatistoj! Ĉu vi estas donatisto?
Hartondisto Eŭnapios. Kio alie? Ĉu ankaŭ vi ne estas donatisto?

Kolorigisto Fokion. Mi? Mi? La fulmo frapu vian langon!
Oraĵisto Potamon. (*faras la signon de la kruco*) Vin kovru pesto kaj ulceroj! —

Kolorigisto Fokion. Donatisto! Vi putraĵo; vi putrinta arbo!
Oraĵisto Potamon. Ĝuste! Ĝuste!

Kolorigisto Fokion. Vi rabotaĵo sur la fajrejo de Satano!
Oraĵisto Potamon. Ĝuste! Insultu lin, insultu lin, kara frato!
Kolorigisto Fokion. (*flanken puŝas la oraĵiston.*) Ne movu la buŝon! For de mi. Nun mi konas vin; — vi estas la maniĥano Potamon —

Hartondisto Eŭnapios. Maniĥano? Malodoranta herezulo! Fi! Fi!

Oraĵisto Potamon. (*lumigas lin per sia papera lanterno*) Oj! Oj!
Tio ja estas la kolorigisto Fokion el Antioĥia! La kainitano!

Hartondisto Eŭnapios. Ve al mi, kiu venis en societon de mensogistoj!

Kolorigisto Fokion. Ve al mi, kiu helpis diablidon!

Hartondisto Eŭnapios. (*donas al li vangofrapon*) Ricevu tion kiel rekompenco por via helpo!

Kolorigisto Fokion. (*rebatas*) Ho, vi malpia hundaĉo!

Oraĵisto Potamon. Malbenindaj, malbenindaj vi estu ambaŭ!
(*ĝenerala interbatado, ridado kaj mokado inter la rigardantoj.*)

Kondukisto de la korpogardistoj. (*vokas al la soldatoj*) La imperiestro venas!

(*La batalantoj disiĝas kaj iras kun la ceteraj piuloj en la preĝejon.*)

Himno (*de la ĉefaltaro*) Serpento jam kuŝas
En profundegaĵo.
Safido triumfis.
Sur ter' estas sankte!

(La kortegano venas procesie de maldekstre. Pastroj kun incensuoj iras fronte; post ili kunirantoj kaj torĉoportistoj, korteganoj kaj korpogardistoj. En la mezo iras imperiestro Konstantios, viro 34-jara kun impona aspekto, senbarba kaj kun brunaj bukaj haroj; liaj okuloj havas malhelan kaj malkonfideman esprimon; lia irado kaj tuta lia sintenado montras maltrankvilecon kaj malfortecon. Ĉe lia maldekstra flanko iras la imperiestrino Eŭsebia, pala kaj delikata virino de sama aĝo kiel la imperiestro. Tuj post la geimperiestroj sekvas princo Juliano, ankoraŭ ne plenkreskinta junulo 19-jara. Li havas nigrajn harojn kaj barbon ekkreskantan, vivajn brunajn okulojn ofte supren rigardantajn; la kortegaj vestoj vestas al li malgracie; liaj movadoj estas mallertaj, strangaj kaj subitaj. La fratino de la imperiestro, princino Helena, gracia 25-jara belulino postsekvas, akompanata de fraŭlinoj kaj de pli aĝaj virinoj. Korteganoj kaj kunirantoj malfermas la procesion. La sklavo de la imperiestro, Memnon, fortega, belege vestita Etiopo, estas inter la sekvantaro.)

Imperiestro Konstantios (*haltas, turnas sin al princo Juliano kaj demandas akre*): Kie estas Galos?

Princo Juliano. (*paligas*) Galos? Kion vi volas kun Galos?

Imperiestro Konstantios. Jen mi senmaskigis vin!

Princo Juliano. Sinjoro —!

Imperiestrino Eŭsebia. (*kaptante la manon de la imperiestro*) Venu; venu!

Imperiestro Konstantios. La konscienco ekkriis. Pri kio vi cerbumas?

Princo Juliano. Ni?

Imperiestro Konstantios. Vi kaj li.

Imperiestrino Eŭsebia. Ho venu; venu, Konstantios!

Imperiestro Konstantios. Tia nigra faro! Kiun respondon donis la orakolo?

Princo Juliano. La orakolo? Je mia sankta Savinto —

Imperiestro Konstantios. Se iu mensogis al vi, li punsuferos pro tio sur la eŝafodo. (*tirkondukas la princon flanken.*) Ho, ni tenu kune, Juliano! Kara parenco!

Princo Juliano. Ĉio kuŝas en viaj manoj, amata sinjoro!

Imperiestro Konstantios. Miaj manoj —!

Princo Juliano. Ho, etendu ilin favore — super ni!

Imperiestro Konstantios. Miaj manoj? Kion vi pensas pri miaj manoj?

Princo Juliano. (*ekkaptas liajn manojn kaj kisas ilin*) La manoj de la imperiestro estas blankaj kaj malvarmetaj.

Imperiestro Konstantios. Kiel estus ili alie? Kion vi pensis? Jen mi senmaskigis vin refoje!

Princo Juliano. (*kisas ilin denove*) Ili estas kiel rozfolioj tie ĉi en la nokto de lunlumo.

Imperiestro Konstantios. Jes, jes, jes Juliano!

Imperiestrino Eŭsebia. Antaŭen; estas tempo.

Imperiestro Konstantios. Por eniri antaŭ la vizaĝo de la Sinjoro! Mi, mi! Ho, preĝu por mi, Juliano! Ili volas oferi al mi la sanktan vinon. Mi vidas ĝin! Ĝi radias kiel serpentokuloj en la ora kaliko — (*ekkras*) sangaj okuloj — ho, Jesuo Kristo, preĝu por mi!

Imperiestrino Eŭsebia. La imperiestro estas malsana —!

Princino Helena. Kie estas Cezarios, la kuracisto de la imperiestro? — venigu lin!

Imperiestrino Eŭsebia. (*faras signon per la mano.*) Memnon, bona Memnon!

(*Ŝi parolas mallaiŭte kun la sklavo*)

Princo Juliano. (*mallaŭte*) Sinjoro, estu kompatema kaj irigu min malproksimen.

Imperiestro Konstantios. Kien vi iros plej volonte?

Princo Juliano. Al Egiptujo. Plej volonte tien, se plaĉos al vi, tiom multaj ja iras tien, — en la grandan solecon.

Imperiestro Konstantios. En la solecon? En la soleco oni cerbumas. Mi malpermesas al vi cerbumi.

Princo Juliano. Mi ne cerbumos, se vi volas nur permesi al mi. — Ĉi tie mia korpremo ĉiutage pligrandiĝas. Malbonaj pensoj ĉirkaŭ mi amasiĝas. Dum naŭ tagoj mi portis tiun ĉi har-ĉemizon kaj ĝi ne protektis min; dum naŭ noktoj mi skurĝis min per la pentofar-vipo, sed ĝi ne forpelis la malbonajn pensojn.

Imperiestro Konstantios. Ni devas esti persistaj, Juliano! La diablo estas tre laborema en ni ĉiuj. Parolu kun Hekebolos —

Memnon. *(al la imperiestro)* Nun estas la tempo por — —

Imperiestro Konstantios. Ne, ne, mi ne volas — —

Memnon *(ekkaptas lian man-artikon)* Venu, plej indulga imperiestro; — venu, mi diras.

Imperiestro Konstantios. *(Ekstaras rekte, dirante kun soleno.)*
Ni eniru la domon de la Sinjoro!

Memnon. *(mallaŭte)* Kaj poste tio alia — —

Imperiestro Konstantios. *(al Juliano)* Galos aperos antaŭ mi.

Princo Juliano. *(post la dorso de la imperiestro, kunplektas la manojn petante al la imperiestrino.)*

Imperiestrino Eŭsebia. *(rapide kaj mallaŭte)* Ne timu!

Imperiestro Konstantios. Restu ekstere. Ne eniru la preĝejon kun tiaj pensoj. Kiam vi preĝos antaŭ la altaro, tiam tio okazos por malsupren petegi malbonon sur min. — Ho, ne ŝarĝu tian ŝuldon sur vin, mia amata parenco!

(La procesio eniras la preĝejon. Sur la ŝtuparo svarmas almozuloj, kripluloj kaj blinduloj ĉirkaŭ la imperiestro.)

Podagrulo. Ho, plej potenca reganto de la mondo, permesu al mi, ke mi tuŝu la baskon de via mantelo, por ke mi resaniĝu.

Blindulo. Preĝu por mi, ho sanktoleito de la Sinjoro, por ke mi reakiru mian vid-kapablon.

Imperiestro Konstantios. Estu konsolita, mia filo! — Memnon, disjetu argent-monerojn inter ilin. Internen, internen!

(La korteganaro eniras la preĝejon, kies porde fermiĝas; la homamaso disiras poste; nur la princo Juliano postrestas en unu el la aleoj.)

Princo Juliano. *(rigardante la preĝejon.)* Kion li volas kun Galos? En ĉi tiu sankta nokto li ne povas pensi pri —! Ho, se mi scius — — *(li turnas sin kaj interrompiĝas kun la foriranta blindulo)* Rigardu antaŭ vin, amiko!

La blindulo. Mi estas blinda, sinjoro!

Princo Juliano. Ankoraŭ? Ĉu vi eĉ ne povas vidi tiujn brilantajn stelojn? Fi al vi, ho nekonfidemulo. Ĉu la sanktoleito de Dio ne promesis preĝi por vi?

La blindulo. Kiu vi estas, kiu mokas blindan fraton?

Princo Juliano. Frato en nekonfidemo kaj nekredemo. *(Li volas foriri laŭ la maldekstra vojo.)*

Voĉo. *(flustrante, post li, en la arbaretaĵo)* Juliano, Juliano!

Princo Juliano. *(kun ekkrio)* Ha!

Voĉo. *(pri proksime)* Juliano!

Princo Juliano. Haltu, haltu; — mi estas armita! Estu singarda.

Juna viro. *(malriĉe vestita kaj kun promen-bastono, ekaperas inter la arboj)* Ŝt! Trankviliĝu, — — estas mi! —

Princo Juliano. Restu kie vi estas! Ne alproksimiĝu, homo!

La juna viro. Ho, ĉu vi ne memoras Agaton'on?

Princo Juliano. Agaton! Kion vi diras? Agaton ja estis knabo —

Agaton. Antaŭ ses jaroj. — Mi rekonis vin tuj. *(alproksimiĝas)*

Princo Juliano. Agaton; — jes, je la sankta kruco, mi kredas ke estas vi!

Agaton. Rigardu min, rigardu fikse —

Princo Juliano. *(ĉirkaŭbrakas kaj kisas lin)* Junec-amiko! Vi plej kara el ĉiuj! Kaj vi estas tie ĉi? Kia mirindaĵo! Vi vojaĝis la longan vojon trans la montojn, kaj poste trans la maron, — la tutan longan vojon de Kapadocio!

Agaton. Antaŭ du tagoj mi venis per ŝipo de Efeso. Ho, kiel vane mi serĉis vin dum tiuj du tagoj. La gardisto ne volis enlasi min tra la kastelpordego — —

Princo Juliano. Ĉu vi menciis mian nomon al iu? aŭ, ke vi serĉis min?

Agaton. Ne, ion tian mi ne kuraĝis, ĉar — —

Princo Juliano. En tio vi pravas; neniam oni sciigu pli multe ol estas necese. — Tien, Agaton; en la plenan lunlumon, por ke mi povu vidi vin. — Vi; vi! Kiel vi kreskis, Agaton; — kiel forta vi aspektas.

Agaton. Kaj vi estas pli pala.

Princo Juliano. Mi ne povas elteni la aeron en la palaco. Mi kredas, ke estas malsanige tie ĉi. — Ne estas tie ĉi kiel en Makelon. Makelon situas alte. Nenia alia urbo situas tiel alte en la tuta Kapadocio. Ha, kiel freŝe blovas tie la ventoj de neĝo! Ĉu vi estas laca, Agaton?

Agaton. Ho, tute ne.

Princo Juliano. Ni sidiĝu. Estas tie ĉi tiel kviete kaj solece. Unu tute proksime ĉe alia, jen tiel! (*Li sidigas lin sur benko apud la balustrado*) — „Ĉu io bona povas veni de Kapadocio“, oni diras. Jes, — amikoj povas veni. Ĉu troviĝas io pli bona? (*li rigardas lin longe.*) Nekompreneble, ke mi ne tuj rekonis vin. Ho vi, mia amata propraĵo, ĉu ne estas nun kiel en la jaroj de nia juneco —?

Agaton. (*kuŝiĝas antaŭ li*) Mi kuŝu antaŭ viaj piedoj, tute same kiel tiam.

Princo Juliano. Ne, ne, ne —!

Agaton. Ho, lasu min tiel kuŝi!

Princo Juliano. Ve, Agaton, estas peko kaj mokaĵo genufleksi antaŭ mi. Vi sciŭ kiel pekoŝarĝita mi fariĝis. Hekebolios, mia kara instruisto havas multan ĉagrenon pro mi. Li povus rakonti al vi — —

Kiel densaj kaj brilantaj fariĝis viaj haroj. Kaj kiel bukklaj ili estas. — Sed pri Mardonios, — kiel li fartas? Li sendube tute griziĝis?

Agaton. Li tute griziĝis.

Princo Juliano. Kiel Mardonios kapablis klarigi Homeron! Mi kredas ke mia maljuna Mardonios ne havas sian egalulon pri tio. — Heroojn kontraŭ herooj en batalo; — kaj furiozantajn diojn super ili. Tion mi vidis per la okuloj.

Agaton. Tiam via animo aspiris, ke vi fariĝos granda kaj feliĉa militisto.

Princo Juliano. Tiuj ses jaroj en Kapodocio estis ĝojplenaj. Ĉu la jaroj estis tiam pli longaj ol nun? Tio ŝajnas al mi kiam mi memorigas al mi ĉion, kiĉn ili enhavas. — Jes, tio estis feliĉaj jaroj. Ni ĉe niaj libroj kaj Galos sur sia persa ĉevalo. Kvazaŭ ombro de nuboj li rapidis trans la ebenaĵon. — Ho, sed pri io vi devas paroli al mi. La preĝejo —?

Agaton. La preĝejo? Super la tombo de la sankta Mamas?

Princo Juliano. (*ridetas*) Kiun Galos kaj mi konstruis. Galos finkonstruis sian flankaĵon; sed mi —; mi neniam bone prosperis en tio. — Kio okazis al ĝi de post tiu tempo?

Agaton. Ne estis efektivegeble. La loĝantoj diris ke ĝi estas nekonstruebla en tiu maniero.

Princo Juliano. (*enpensiĝante*) Jes; jes, certe. Mi agis maljuste al ili, opiniante ke ili estas nesciantaj. Nun mi scias, kial ĝi ne sukcesis. Mi diros al vi la kaŭzon, Agaton; — Mamas estas falsa sanktulo.

Agaton. Ĉu la sanktulo estis falsa?

Princo Juliano. Tiu Mamas neniam estis martiro. La tuta legendo pri li estis stranga eraro. Hekebolios malkovris per grandega lerteco la veran interrilaton, kaj mi mem kompilis antaŭ nelonge malgrandan skribaĵon pri tiu afero, skribaĵon, mia Agaton, kiu laŭdire kaj nekompreneble, iuj saĝec-amikoj preparolis kun laŭdo en la instruejoj. — La Sinjoro konservu mian koron pura pri ĉiu vantaĵo! La malica tentisto havas sennombrajn sekretajn vojojn; oni neniam povas scii — ke Galos sukcesis kaj ne mi! Ve, mia Agaton, kiam mi pensas pri tiu preĝejkonstruado, mi vidas la altaron de Kain —

Agaton. Juliano!

Princo Juliano. Dio sin montras indiferenta al mi, Agaton!

Agaton. Ho, ne parolu tiel! Ĉu Dio ne estis forta en vi, kiam vi elkondukis min el la mallumo de la idolaneco, kaj donis al mi la lumon por ĉiuj tempoj; — vi, tiam ankoraŭ infano!

Princo Juliano. Jes, tio estas al mi kiel sonĝo.

Agaton. Kaj tamen vero tiel ĉarmega —

Princo Juliano. (*seriozo*) Tiel estu nun! — De kie mi prenis la fajron de la vorto? Estis himnoj en la aero, — ŝtuparo inter ĉielo kaj tero — (*fikse rigardas supren*) Ĉu vi ĝin vidis?

Agaton. Kion?

Princo Juliano. Stelon, kiu falis; jen tie, post tiuj du cipresoj. (*li silentas momenton, poste per tute alia voĉtono:*) — Ĉu mi rakontis al vi, kion sonĝis mia patrino en la nokto antaŭ mia naskiĝo?

Agaton. Mi ne memoras tion.

Princo Juliano. Ne, ne, estas vere, mi eksciis tion poste.

Agaton. Kion ŝi sonĝis?

Princo Juliano. Mia patrino sonĝis ke ŝi naskas Aĥil'on.

Agaton. (*vive*) Ĉu vi kredas ankoraŭ tiel forte je sonĝoj?

Princo Juliano. Kial vi demandas?

Agaton. Vi ekaŭdos; ĉar tio havas rilaton kun tio, kio pelis min trans la maron —

Princo Juliano. Ĉu vi havas specialan komision tie ĉi? Mi tute ne pripensis, demandi vin pri tio —

Agaton. Strangan komision; kaj ĝuste tial mi hezitis en dubo kaj maltrankvileco. Estas tiel multe, kion mi dezirus scii antaŭe — pri la vivado en la urbo — pri vi mem — pri la imperiestro —

Princo Juliano. (*rigardas lin fikse*) Diru la veron, Agaton; — kun kiu vi parolis antaŭ kiam vi renkontis min?

Agaton. Kun neniu.

Princo Juliano. Kiam vi alvenis?

Agaton. Tion mi jam diris al vi, — antaŭ du tagoj.

Princo Juliano. Kaj tuj vi volas scii —? Kion vi volas scii pri la imperiestro? Ĉu iu petis vin —? (*ĉirkaŭbrakas lin*) Ho, pardonu min, Agaton, amiko!

Agaton. Kiel? Kion?

Princo Juliano. (*ekstaras kaj aŭskultas*) Ŝt! — Ne, estis nenio; estis nur birdo en la arbaretajoj. — Mi estas tre feliĉa tie ĉi. Kial vi ne kredas tion? Kial mi ne estus feliĉa? Ĉu mi ne havas tie ĉi kunigita tutan mian parencaron? Jes, mi volis diri — ĉiujn, kiujn protektis la indulga Savinto.

Agaton. Kaj la imperiestro ja anstataŭas vian patron?

Princo Juliano. La imperiestro estas plej saĝa kaj bona.

Agaton. (*kiu ankaŭ ekstaris*) Juliano, ĉu la famo estas vera, ke iam vi estos la posteulo de la imperiestro?

Princo Juliano. (*rapide*) Ne parolu pri danĝeraj aferoj. Mi ne scias, kion rakontas malsaĝaj famoj. — Kial vi tiel min eldemandas? Neniun vorton vi ekaŭdos antaŭ ol vi diras al mi, kion vi volas en Konstantinopolo.

Agaton. Mi venas en la nomo de Dio la Sinjoro.

Princo Juliano. Se vi amas vian Savinton kaj vian feliĉon, tiam reiru hejmen (*aŭskultas trans la balustradon.*) Parolu mallaŭte; tie albordiĝas boato. — (*li tirkondukas lin al la alia flanko*) Kion vi volas tie ĉi? Kisi la spliton de la sankta kruco? Reiru hejmen, diris mi! Ĉu vi scias, kio fariĝis Konstantinopolo dum la lastaj kvin monatoj? Babilono pri mokado. — Ĉu vi ne ekaŭdis tion, — ĉu vi ne scias, ke Libanios estas tie ĉi?

Agaton. Ho ve, Juliano, mi ne konas Libanioso'n.

Princo Juliano. Vi soleca Kapadociano! Feliĉa loko, kie liaj instruoj kaj voĉo ne estas aŭdataj.

Agaton. Ha, li estas unu el tiaj idolanaj herezuloj —?

Princo Juliano. La plej danĝera el ĉiuj.

Agaton. Tamen ne pli danĝera ol Edesios en Pergamo?

Princo Juliano. Nu, do; — Kiu nun pensas ankoraŭ pri Edesios en Pergamo? Edesios estas kaduka —

Agaton. Ĉu li estas eĉ pli danĝera ol tiu enigmo-plena Maksimos?

Princo Juliano. Maksimos! Ne parolu pri tiu jonglisto. Kiu scias ion fidindan pri tiu Maksimos?

Agaton. Li diras ke li dormis tri jarojn en kaverno transe de Jordano.

Princo Juliano. Hekebolios konsideras lin kiel trompanton, kaj en tio li certe ne grave malpravas —

Ne, ne Agaton, — Libanios estas la plej danĝera. Nia peka tero ĝemploras sub li, kiel sub skurĝo. Aŭguroj antaŭiris lian venadon. Pest-simila epidemio mortigis la homojn sen diferenco kaj amase en la urbo. Kaj poste en la monato Novembro, fajro-pluvis ĉiunokte. Ne dubu pri tio, Agaton! Mi mem vidis stelojn, kiuj liberigis de sia cirklo, malsupren-iris teren kaj estingigis survoje. — Post tiu tempo li instruis tie ĉi kiel saĝec-amiko, kiel oratoro. Ĉiuj nomas lin la reĝo de la oratorinstruistoj. Jes, ili devas tion. Mi diras al vi, li estas timinda. Junuloj kaj viroj arigis ĉirkaŭ li, li kaptis iliajn animojn kaj ili devas sekvi lin; la abnegacio fluas sorĉige de liaj lipoj, kiel la poemoj kaj kantoj de la trojanoj kaj grekoj —

Agaton. (*ektimigita*) Ho, vi ankaŭ vizitis lin, Juliano!

Princo Juliano. (*malantaŭen paŝante*) Mi! — Dio protektu min kontraŭ io tia! Se iaj famoj atingus viajn orelojn, tiam ne kredu ilin. Ne estas vere, ke mi serĉis Libanios'on nokte aŭ alivestita. Lia proksimeco estus al mi teruriga. Krom tio, la imperiestro malpermesis tion, kaj Hekebolios ankoraŭ pli insiste. Ĉiuj kredantoj, kiuj interrilatas kun tiu sagaca viro, apostatiĝas kaj fariĝas mokantoj. Kaj ne nur tiuj. Liaj vortoj iras de buŝo al buŝo kaj eĉ en la imperiestran palacon. Lia ridanta mokado, liaj nekontraŭdireblaj motivoj, liaj mokpoemoj enbatiĝas en miajn preĝojn; — ĉio tio kune estas por mi kiel tiuj monstroj en birdoformo, kiuj iam malpurigis la nutraĵojn de pia vagadanta heroo. Multfoje mi sentas kun teruro, ke la manĝaĵo de la kredo kaj de la vorto naŭzas al mi — (*kun eksplodanta senbrideco.*) Se mi havus la potencon de la imperiestro, mi sendus al vi la kapon de Libanios sur arĝenta telero!

Agaton. Sed kiel estas eble, ke la imperiestro toleras tion? Kiel nia pia, kredanta imperiestro povas —?

Princo Juliano. La imperiestro? Laŭdataj estu la kredo kaj la pieco de la imperiestro! Sed la imperiestro pensas pri nenio krom pri la malfeliĉa persa milito. Ĝi plenigas lian tutan animon. Neniu atentis la militon, kiu okazas tie ĉi kontraŭ la reĝo de Golgota. Ve, mia Agaton, nun ne estas kiel antaŭ

du jaroj. Tiam la du fratoj de la mistikisto Maksimos devis pentofari per la vivo pro sia falsa dogmaro. Vi ne scias, kiajn potencajn helpantojn havas Libanios. Kelkaj nesignifaj saĝec-instruistoj estas pelataj eksterurben. Lin neniu kuraĝas ektuŝi. Mi petegis ne nur Hekebolios'on, sed ankaŭ la imperiestron, okazigi lian ekzilon. Sed ne, ne! — Kion helpas, ke aliaj estas ekzilataj? Tiu unu homo venenas la aeron por ni ĉiuj. Ho, mia Savinto, ke mi povus forkuri de tiu idolana abomenaĵo! Vivi tie ĉi estas vivi en la kaverno de la leono —

Agaton. (*vive*) Juliano, — kion vi diris!

Princo Juliano. Jes, jes; nur miraklo povas liberigi nin.

Agaton. Ho, aŭdu! Tiu miraklo okazis!

Princo Juliano. Kion vi volis diri?

Agaton. Vi ekaŭdos, Juliano; ĉar nun mi ne povas plu dubi, ke estas vi, kiun tio rilatas. Tio, kio pelis min al Konstantinopolo, estis vizio —

Princo Juliano. Vizio, diras vi!

Agaton. Sankta manifestado —

Princo Juliano. Ho, en la nomo de la Dia favoro, parolu! Ŝt! ne parolu. Atentu; jen iu venas. Restu staranta tie ĉi; tute indiferece; ŝajnu kvazaŭ vi vidas nenion.

(Ili ambaŭ restas starantaj ĉe la balustrado)

(Altkreska bela viro mezaĝa, vestita laŭ la modo de la filozofoj per mallonga mantelo, venas de maldekstre tra la alco. Aro da junuloj akompanas lin, ĉiuj en vestoj supren-falditaj, kun hedero-girlandoj sur la haroj kaj portantaj librojn, paperojn kaj pergamen-rulaĵojn. Ridado kaj laŭta interparolado aŭdiĝas inter la venantoj).

Filozofo. Ne perdu ion en la akvon, mia ĝoja Gregoro! Pripensu, ke tio, kion vi portas, valoras pli multe ol oro.

Princo Juliano. (*staranta apud li*). Pardonon, — ĉu troviĝas ia materia bonaĵo, kio valoras pli multe ol oro?

Filozofo. Ĉu vi povas reaĉeti per oro la fruktojn de via vivo?

Princo Juliano. Vere; vere. Sed se tio estus, vi ne fidu la perfidan akvon.

Filozofo. Homa favoro estas ankoraŭ pli perfida.

- Princo Juliano. Tiu vorto estas filozofa. Kaj kien vi ŝipiros kun viaj trezoroj?
- Filozofa. Al Ateno (*li volas preterpasi lin*).
- Princo Juliano. (*kun retenata ridado*). Al Ateno? Ho, riĉa sinjoro, tiam vi ja ne posedas vian propran riĉaĵon.
- Filozofa. (*ekhaltas*). Kial?
- Princo Juliano. Ĉu estas agado de saĝulo porti strigojn al Ateno?
- Filozofa. Miaj strigoj ne povas elteni la preĝej-lumon en la imperiestra urbo. (*al unu el la junuloj*). Donu al mi la manon, Salusto (*li volas malsupreniri*).
- Lernanto Salusto. (*malsupren-irinte la duonon de la ŝtuparo, mallaŭte*.) Je la dioj, jen lil!
- Filozofa. Li?
- Lernanto Salusto. Vere! Mi lin konas! — Mi vidis lin promeni kun Hekebolos.
- Filozofa. Ha! (*li rigardas Julianon kun kaŝita atento, poste li alproksimiĝas al li je unu paŝo kaj diras*). Vi ĵus ridetis; pro kio vi ridetis?
- Princo Juliano. Kiam vi plendis pri la preĝej-lumo, tiam mi pensis, ĉu ne estas la reĝo-lumo en la lernejo, kiu brilis al vi tro forte en la okulojn.
- Filozofa. Envio ne trovas lokon sub la mallonga mantelo.
- Princo Juliano. Kio ne trovas lokon, tio elstaras el ĝi.
- Filozofa. Vi havas pintan langon, alta galileano!
- Princo Juliano. Kial galileano? Kio estas mia galileana signo?
- Filozofa. La kortega vestaĵo.
- Princo Juliano. Interne mi estas saĝec-amiko; ĉar mi portas tre maldelikatan ĉemizon. — Sed diru al mi, kion vi serĉas en Ateno?
- Filozofa. Kion serĉis Pontio Pilato?
- Princo Juliano. Sensencaĵo! Ĉu tie ĉi ne estus la vero, kie Libanios estas?
- Filozofa. (*rigardas lin fikse*). Hm! — Libanios, jes, Libanios baldaŭ eksilentos, la batalo lacigis Libanios'on, sinjoro!

Princo Juliano. Ĉu li lacigis? — la nevundebla, la ĉiam-venkanta?

Filozofo. Li lacigis ne trovante sian egalulon.

Princo Juliano. Nun vi ŝercas, ho fremdulo! Kiel Libanios povus pensi trovi sian egalulon?

Filozofo. Lia egalulo troviĝas.

Princo Juliano. Kiu? Kie? Nomu lin!

Filozofo. Tio povus esti danĝera.

Princo Juliano. Kial?

Filozofo. Ĉu vi ne estas kortegano?

Princo Juliano. Kaj se mi estus?

Filozofo. (*pli mallaŭte*). Ĉu vi mem havas la trokuraĝon laŭdi la posteulon de la imperiestro?

Princo Juliano. (*ektimigita*). Ah!

Filozofo (*pli rapide*). Se vi perfidas min, tiam mi neos ĉion!

Princo Juliano. Mi perfidos neniun. Vere, mi ne perfidos! — La posteulo de la imperiestro, diris vi? Mi ne scias, kiun vi celas; — la imperiestro elektis neniun. — Sed pro kio tiu ŝerco? Kial vi parolis pri la egalulo de Libanios?

Filozofo. Jes aŭ ne, — ĉu en la kortego de la imperiestro vivas junulo, kiun oni perforte kaj ordone, per petegoj kaj konvinkoj retenas de la instruejlumo?

Princo Juliano (*pli rapide*). Io tio okazas por konservi lian kredon pura.

Filozofo (*videtas*). Ĉu tiu junulo havas tian malfortan kredon pri sia kredo? Kion li scias pri sia kredo? Kion scias militisto pri sia ŝildo, antaŭ ol ĝi lin ŝirmis?

Princo Juliano. Vere, vere; — sed estas karaj parencoj kaj instruistoj, —

Filozofo. Frazajoj, sinjoro. Tion mi volas diri al vi. Estas pro la imperiestro, ke lia juna parenco estas retenata de saĝec-amikoj. La imperiestro ne havas la dian donacon de la parolo. Krom tio, la imperiestro estas granda; sed li ne eltenas, ke lia posteulo lumas trans la imperion —

Princo Juliano (*konfuzite*). Kaj vi kuraĝas —!

Filozofo. Jes, jes, vi koleras en la nomo de via reganto, sed —

Princo Juliano. Neniel; kontraŭe —; jes, mi opinias — — Aŭdu, mi tre amikiĝis kun tiu juna princo. Estus al mi agrable ekscii — (*li turnas sin*). Iru pli multe flanken, Agaton; mi devas paroli kun tiu viro. (*Malproksimiĝas helkajn paŝojn kun la fremdulo*). Vi diris, — — lumi? Lumi trans la imperion? Kion vi scias, kaj kion vi ĉiuj scias pri la princo Juliano?

Filozofo. Ĉu Sirios povas esti kaŝata de nuboj? Ĉu la blovanta vento ne faras ŝirajon tie aŭ tie ĉi en la nuboj, tiel ke —

Princo Juliano. Parolu malkaŝe; mi petas vin.

Filozofo. La palaco kaj la preĝejo estas kiel duobla kaĝo, kie la princo estas malliberigita. La kaĝo ne estas sufiĉe densa. Kelkfoje li eldiras strangan vorton; — la korteganoj — pardonu min, sinjoro — la korteganoj portas ĝin eksteren kaj ĝi estiĝas moko; la profunda signifo ne penetras en la menson de tiuj sinjoroj — pardonu min, sinjoro, — ĉar la plej multaj el ili ĝin ne komprenas.

Princo Juliano. Neniu. Senhezite diru: neniu.

Filozofo. Vi tamen tion povas. Kaj ĉiaokaze, ni — — Jes, li povas lumi trans la imperion! Ĉu ne diras famo el lia infana aĝo en Kapadocio, ke li, en diskutado kontraŭ sia frato Galos, prenis la partion de la dioj, kaj defendis ilin kontraŭ la galileano?

Princo Juliano. Tio estis ŝerco, retorika ekzercado —

Filozofo. Kion Mardonios ne notis pri li! Kaj poste Hekebolos! Kia arto jam kuŝis en la parolado de la knabo, — kia belelego en la ludo de la pensoj!

Princo Juliano. Kaj tion vi opinias?

Filozofo. Jes, li povas estiĝi nia kontraŭulo, kiun ni devus ne nur timi, sed ankaŭ estimi. Kio do mankas al li por atingi tian estimplanan altecon? Ĉu mankas al li tiu sama lernejo, kiun finstudadis Paŭlo kaj eĉ tiel, ke ĝi ne kaŭzis al li malutilon, tiel ke li poste povis kuniĝi al la galileanoj, pli brila ol ĉiuj aliaj predikantoj kune, ĉar li posedis intelekton kaj elokventecon!
 olus. Hekebolos timis la kredon de sia lernanto. Kaj mi tre bone scias, ke tio devenas de li. Sed ĉu li forgesas, tiu eksterordinara konsciencia viro, ke li mem en sia juneco trinkis el la fontoj, — kaj ĉu li nun volas ŝtopfermi por siaj lernantoj? Ĉu li ne lernis

ĉe ni uzi la armilon de la parolo, kiun li nun svingas al ni kun tia alte laŭdinda lerteco?

Princo Juliano. Ho, vere, nekontraŭ-direble vere!

Filozofa. Kaj kiajn talentojn do havas tiu Hekebolios en komparo kun la talentoj, kiuj tiel mirinde manifestiĝas en tiu princa infano, kiu laŭdire en Kapadocio, anoncis sur la tomboj de martire ekzekutitaj galileanoj, kredon, kiun mi tamen opinias herezo, kaj kiu pro tio ne trovos multajn anojn, sed kiun li tamen anoncas kun tia entuziasmo, ke — se mi volus kredi tre disvastiĝintan famon — multaj infanoj samaĝaj kiel li sin donas al li, kaj sekvas lin kiel lernantoj! Ho, Hekebolios estas kiel vi aliaj — pli egoista ol fervora; tial Libanios atendis vane.

Princo Juliano (*ekkaptas lian brakon*). Kion diris Libanios? Je Dio — mi prijuras vin, sciigu al mi!

Filozofa. Li diris ĉion, kion ni ĵus aŭdis. Kaj li diris pli multe ol tio. Li diris: rigardu tiun reĝan galileanon; li estas la Aĥilo de la spirito.

Princo Juliano. Aĥilo! (*pli mallaŭte*) La sonĝo de mia patrino!

Filozofa. Jen en la publika lernosalono estas la kampo; lumo kaj ĝojo ripozas super la batalo kaj super la batalantoj. La vortsagoj siblas; la akra glavo de la intelekto fulmas en la batalo; la feliĉegaj dioj sidas ridetante en la nubo —

Princo Juliano. Ho, iru for de mi kun via idolana kulto.

Filozofa. La idolanoj iras returnen al sia tendaro, brakon je brako, sen malamo, kun ardantaj vangoj, kun la ŝveliĝanta sango en la vejnoj, kun la kaptajo de la ekkono kaj kun foliaro ĉirkaŭ la frunto. Ha, kie estas Aĥilo? Mi ne vidas lin! Aĥilo koleras —

Princo Juliano. Aĥilo estas malfeliĉa! — Sed ĉu mi povas kredi tion! Ho, diru min —; kapturino ekkaptas min —; ĉion tion diris Libanios?

Filozofa. Kial Libanios venis en Konstaninopolon? Ĉu li venis pro alia kaŭzo, krom por serĉi la honorindan amikecon de iu junulo?

Princo Juliano (*kun streĉita atento*). Parolu la veron! Ne, ne, tio ne povas esti vera. Kiel tio povus harmonii kun la moko — —? Oni ne mokinsultas tiun, kies amikecon oni serĉas.

Filozofo. Galileanaj intrigoj, por masoni muron de malamo kaj kolero inter la du batalantoj.

Princo Juliano. Ĉu vi tamen ne volas nei, ke estis Libanios —? Filozofo. Ion tian mi neas plej fortege.

Princo Juliano. La mokpoemoj ne devenis de li?

Filozofo. Eĉ ne unu. Ili ĉiuj naskiĝis en la imperiestra palaco kaj disvastiĝis sub lia nomo.

Princo Juliano. Ha, kion vi diras —?

Filozofo. Mi garantias tion, antaŭ ĉiu ajn. Vi havas akran langon; — kiu scias ĉu vi mem —

Princo Juliano. Mi —! Sed ĉu mi povas kredi tion? Libanios ne estus skribinta ilin? Neniun el ili?

Filozofo. Ne, ne.

Princo Juliano. Eĉ ne la hontindan poemon pri Atlaso kun la oblikvaj ŝultroj?

Filozofo. Ne, ne, diras mi.

Princo Juliano. Nek ankaŭ tiun malsaĝan kaj plej hontindan poemon pri la simio en korteg-vestoj?

Filozofo. Ha, ha! tiu poemo estas verkita en la preĝejo kaj ne en la instru-salono. Ĉu vi ne kredas tion? Mi diras al vi, estas Hekebolios, kiu —

Princo Juliano. Hekebolios!

Filozofo. Jes, Hekebolios mem, kiu, por disigi sian amikon kaj sian lernanton —

Princo Juliano (*kun tordantaj manoj*). Ho, se tio estus!

Filozofo. Se tiu blindigita kaj trompita junulo estus fidinta nin, filozofojn, tiam li ne estus kondukinta tiel severe kontraŭ ni.

Princo Juliano. Pri kio vi parolas?

Filozofo. Estas nun tro malfrue. Adiaŭ, sinjoro (*estas forironta*).

Princo Juliano. (*Ekkaptas lian manon.*) Amiko kaj frato — kiu vi estas?

Filozofo. Viro, kiu funebras, ĉar li vidas perej la dio-naskiĝinton.

Princo Juliano. Kion vi nomas la dio-naskiĝinto?

Filozofo. La nekreiton en la ŝanĝiganto.

Princo Juliano. Same malklare por mi.

Filozofo. Ekzistas tuta kaj belega mondo, por kiu vi, galileanoj estas blindaj. En ĝi estas festo inter statukolonoj sub templo-kantadoj kun plenaj ŝaŭmantaj pokaloj kaj kun rozoj sur la haroj. Kapturnigantaj pontoj sin etendas inter animo kaj animo, rekte ĝis la plej malproksimaj lumoj en la spaco. — Mi lin konas, kiu povus esti estro en tiu granda, sunplena regno.

Princo Juliano (*kun timo*). Jes, kun perdo de la feliĉego.

Filozofo. Kio estas feliĉego? La rekuniĝo kun la deveno.

Princo Juliano. Jes, en la konscio de la vivo; rekuniĝo por mi kun mi mem!

Filozofo. Rekuniĝo, kiel tiu de la pluvero kun la akvo, kiel tiu de la velkinta foliaro kun la tero, kiu ĝin maturigis.

Princo Juliano. Ho, se mi posedus konon! Se mi posedus armilojn por levi ilin kontraŭ vi!

Filozofo. Iru por preni armilojn, juna viro! La instrualono estas batalsalono de la pensoj kaj kapabloj —

Princo Juliano (*paŝas malantaŭen*). Ha!

Filozofo. Rigardu tiujn ĝojajn junulojn tie sube. Galileanoj estas inter ili. Eraroj en la diaj aferoj ne kaŭzas malkonkordon inter ni — Adiaŭ! Vi galileanoj ekzilis la veron. Rigardu mem kiel mi elportas la baton de la sorto. Rigardu nin kun foliaro ĉirkaŭ la levita frunto. Tiel ni iras antaŭen — dum ni plimallongigas la nokton per kantado kaj atendas Helios'on.

(Li malsupren-iras la ŝtuparon, kie la lernantoj atendis lin, poste oni aŭdas forremi la boaton kun ili).

Princo Juliano. (*Rigardas longe la akvon*). Kiu estis tiu nekomprenebla viro?

Agaton (*alproksimiĝas*). Aŭdu min, Juliano —!

Princo Juliano (*emociita*). Li komprenis min! Kaj Libanios mem, la granda nekomparebla Libanios! — Imagu, Agaton. Libanios estas dirinta — ho, kiel akraj ŝajnas esti tiuj idolanaj okuloj!

Agaton. Tio estis laboro de tentanto, kredu al mi!

Princo Juliano (*ne atentante lin*). Mi ne eltenos pli longe inter ĉi tiuj homoj. De ili do venis tiuj abomenaj mokokantoj! Ĉi tie mi estas mokegata; oni ridas post mia dorso; ĉi tie neniu kredas tion, kion mi portas en mi. Oni spionadas min; oni grimacridas pro miaj konduto kaj parolo; Hekebolios mem — Ho, mi tion sentas, — Kristo malproksimiĝas de mi; ĉi tie mi estiĝas malbona.

Agaton. Ho, vi ne scias tion — precipe *vi* estas tre multe sub lia favoro.

Princo Juliano. (*Iras tien kaj returne ĉe la balustrado.*) Mi estas tiu, kontraŭ kiu Libanios volos batali. Kia stranga deziro! Libanios konsideras min sia egalulo. Estas mi, kiun li atendas —

Agaton. Aŭskultu kaj obeu; Kristo atendas vin!

Princo Juliano. Amiko, kion vi volas diri?

Agaton. La vizio, kiu pelis min al Konstantinopolo —

Princo Juliano. Jes, jes, la vizio; ĝin mi preskaŭ forgesis. Manifestaĵo, kiel vi diris? Ho, rakontu, rakontu!

Agaton. Estis tie en Kapadocio antaŭ monato aŭ iom pli frue, ke la famo disvastiĝis, ke la idolanoj refoje komencis okazigi sekretajn kunvenojn nokte en la templo de Kibeles —

Princo Juliano. La trokuraĝuloj! Tio ja estis severe malpermesata.

Agaton. Ĉiuj kredantoj tial kolere protestis. La estraro igis malkonstrui la templon kaj ni dispecigis la indignindajn idolstatuojn. Jes, la fervoraj inter ni estis instigataj de la spirito de la Sinjoro agi eĉ pli energie. Sub psalmokantado kaj kun sanktaj flagoj ĉe la fronto ni trairis la urbon kaj atakis la malpiulojn kiel venĝo-angelo; ni forprenis de ili la multekostaĵojn; multaj domoj estis ekbruligataj; multaj idolanoj pereis en la flamoj; ni mortigis multajn forkurantojn sur la stratoj. Ho, estis granda tempo je honoro de Dio.

Princo Juliano. Kaj poste? — La vizio, Agaton!

Agaton. Tri tutajn tagojn kaj noktojn la kolero de la Sinjoro estis forta en ni. Sed vidu, tiam la malforteco de la karno ne povis plu konkuri kun la fervoro de la spirito, kaj ni ĉesigis la persekutadon. — Mi kuŝis sur mia lito. Mi povis nek maldormi, nek dormi. Estis al mi, kvazaŭ mia interno estis malplena kaj

kvazaŭ la spirito estis forlasinta min. Mi kuŝis febrevarmega; mi elŝiris miajn harojn, mi ne scias plu, kiel estis. — Jen, subite mi vidis antaŭ mi sur la muro blanke-radiantan lumon, kaj en la lumbrilo staris viro, vestita ĝis la piedoj per mantelo. Radioj eliris el lia kapo; li tenis bastonegon sur la brako kaj milde fiksis siajn okulojn sur min.

Princo Juliano. Tion vi vidis!

Agaton. Mi vidis tion. Kaj tiam li parolis kaj diris: ekstaru, Agaton; serĉu lin, kiu heredos la regnon; ordonu lin, ke li iru en la kavernon kaj batalu kontraŭ la leonoj —

Princo Juliano. Batali kontraŭ la leonoj? Strange, strange! Se estus vere — —! La renkonto kun tiu saĝulo — Manifestado — sciigo al mi — mi estus la viro elektota?

Agaton. Vi certe estos.

Princo Juliano. Batali kontraŭ leonoj? — Jes, mi tion vidas; tiel estas, Agaton! Estas la volo de Dio, ke mi vizitu Libanios'on.

Agaton. Ne, ne, aŭskultu min ĝis la fino.

Princo Juliano — por ruze-ŝteli de li liajn arton kaj sciencan, venki la nekredantojn per iliaj propraj armiloj, kiel Paŭlo — batali kiel Paŭlo — venki kiel Paŭlo en la dia afero!

Agaton. Ne, ne, tia ne estas la celo.

Princo Juliano. Ĉu vi povas dubi? Libanios, — ĉu li ne estas potenca kiel la leono de la montaro, kaj ĉu la instru-salono ne estas —?

Agaton. Mi diras vin, ke ne estas tiel; ĉar la aperaĵo diris plue: Proklamu la elektiton, li forŝutos de siaj piedoj la polvon de la imperia urbo kaj neniam plu trairos tra ĝia pordego.

Princo Juliano. Ĉu vi estas certa pri tio, Agaton?

Agaton. Jes, kiel pri mi mem.

Princo Juliano. Sekve ne tie ĉi. Mi batalos kontraŭ la leonoj? Kie, kie? Kie mi trovos klarecon en ĉi tiu afero!

(La princo Galos, forta viro dudgek-kvar-jara, kun blondaj krispaj haroj kaj en kompleta armaĵo, venas tra la aleo, maldekstre.)

Princo Juliano (*iras renkonte al li*). Galos!

Princo Galos. Kio estas? (*fingre montras Agaton.*) Kiu estas tiu viro?

Princo Juliano. Agaton.

Princo Galos. Kia Agaton? Vi havas interrilaton kun tiom da tiaj personoj —. Ha, je Dio, tio ja estas la kapadociano! Vi estiĝis tute plenkreska.

Princo Juliano. Ĉu vi scias, ke la imperiestro informiĝis pri vi?

Princo Galos. (*streĉita*) Nun? En ĉi tiu nokto?

Princo Juliano. Jes, jes, li volas paroli kun vi. Li ŝajnas esti kolerega.

Princo Galos. Kiel vi scias tion? Kion li diris?

Princo Juliano. Mi ne komprenis. Li volis scii, kion respondis la orakolo.

Princo Galos. Ha!

Princo Juliano. Ne kaŝu ion por mi. Kion ĝi signifas?

Princo Galos. Morto aŭ ekzilado!

Agaton. Sankta Savinto!

Princo Juliano. Mi antaŭsentis tion! Tamen, la imperiestrino estis kvieta. Ho, parolu, parolu!

Princo Galos. Kion mi diros? Ĉu mi scias pli multe ol vi? Se la imperiestro parolis pri la orakolo, iu kuriero nepre estas kaptita, aŭ iu perfidis min —

Princo Juliano. Kuriero? — Galos, kion vi riskis!

Princo Galos. Ho, ĉu mi povus pli longe pasigi ĉi tiun vivon en malcerteco kaj timo? Li agu kun mi kiel li volas. Ĉio alia estas pli bona ol tio ĉi.

Princo Juliano (*mallaŭte, kondukante lin flanken*). Singarde, Galos! Kio okazis rilate al la kuriero?

Princo Galos. Mi faris demandon al la Orsis-pastroj en Abido —

Princo Juliano. Ha, la orakolo! Kaj io tiel idolana —

Princo Galos. La idolanojn oni ne konsiderus tiel gravaj; sed — jes, vi sciu tion — mi demandis pri la rezulto de la persa milito —

Princo Juliano. Kia malsaĝaĵo! — Galos — via vizaĝo diras al mi, ke vi demandis ankoraŭ pli multe —

Princo Galos. Haltu! Mi ne demandis —

Princo Juliano. Jes, jes, vi demandis pri la vivo aŭ morto de potenca viro!

Princo Galos. Kaj se jes? Kio estas al mi pli kara ol tio?

Princo Juliano (*falas en liajn brakojn*). Eksilentu, vi furiozulo!

Princo Galos. For de mi! Rampu antaŭ li, kiel hundo; mi ne intencas elporti tion pli longe. Mi volas ekkrii tion sur ĉiuj foirejoj (*vokas al si Agaton*). Ĉu vi vidis lin, Kapadociano? Ĉu vi vidis la murdinton?

Princo Juliano. Galos! Frato!

Agaton. La murdinton!

Princo Galos. La murdinton en la ruĝa mantelo, la murdinton de mia patro, de mia duonpatrino, de mia plej maljuna frato —

Princo Juliano. Ho, vi krias la pereon sur nin!

Princo Galos. Dek unu kapoj en unu nokto; dek unu kadavroj; tuta mia familio. — Ve, sed vi povas kredi, ke la konscienco turmentas lin, ĝi rampas tra liaj ostoj kiel serpent-veneno.

Princo Juliano. Ne aŭskultu lin! For, for!

Princo Galos. (*kaptas la ŝultron de Juliano*) Restu staranta — vi aspektas tiel pala kaj konsternita; ĉu eble estas vi, kiu perfidis min?

Princo Juliano. Mi? Via propra frato —!

Princo Galos. Sensencaĵo! La frateco protektas nenium en nia familio. Se vi sekrete spionadis miajn vojojn, tiam diru tion, kiu alie farus tion? Ĉu vi kredas, ke mi scias, kion oni flustras tie ĉi? La imperiestro pripensas elekti vin sia posteulo.

Princo Juliano. Neniam! Mi prijuras vin, kara Galos, neniam okazos tio! Mi ne volas. Iu pli forta elektis min —. Ho, kreu min, Galos; mia vojo estas aŭgurita. Tien mi ne iras, diras mi. Ho, Estro de la armeoj, — mi sur la imperiestra trono; — ne, ne, ne!

Princo Galos. Ha — ha; bone ludite, jonglisto!

Princo Juliano. Jes, vi povas moki, vi, kiu ne scias, kio okazis. Mi mem apenaŭ scias tion. Ho, Agaton — se tiu ĉi kapo devus esti sankt-oleata! Ĉu tio ne estus apostatigo, — mortpeko?

Ĉu la sankta oleo de la Sinjoro ne brulvundus min kiel gutanta plumbo!

Princo Galos. Tiam mia alta kuzo devus esti pli senhara ol Julio Cezaro.

Princo Juliano. Ne peku. — Donu al la imperiestro tion, kio apartenas al la imperiestro.

Princo Galos. La sango de mia patro — de via patro kaj de via patrino —!

Princo Juliano. Ho, kion vi scias pri tiuj terurajoj? Tiam ni ja estis nur malgrandaj, plejparte la soldatoj estis kulpaj; ili estis ribelantoj —, malbonaj konsilantoj —

Princo Galos (*ridas*). La posteulo sin ekzercas!

Princo Juliano. (*plorante*) Ho Galos, mi dezirus morti anstataŭ vi, aŭ esti ekzilata. Tie ĉi mi perdas mian animon. Mi devus pardoni — kaj tion mi ne povas. La malbono kreskas en mi, malamo kaj venĝo flustras —

Princo Galos (*rapide, rigardas la preĝejon*). Jen li venas!

Princo Juliano. Estu kvieta, kara frato! Ah, Hekebolios!

(Intertempe estis malfermita la preĝej-pordo. La popolamaso eliras; unuj foriras, aliaj restas starantaj eksterpreĝeje por vidi la korteganaron preteriri. Inter la venantoj estas la scienculo Hekebolios; li portas pastrajn vestojn).

Teologiisto Hekebolios. (*dum li volas preteriri maldekstren*) Ĉu tio estas vi, mia frato Juliano? Ve, mi refoje travivis mal-feliĉan horon pro vi.

Princo Juliano. Bedaŭrinde; tio okazas al vi tro ofte.

Teologiisto Hekebolios. Kristo koleras kontraŭ vi, mia filo! Li koleras pro via obstineco, viaj senamaj opinioj, pro tuta tiu monda vanteco.

Princo Juliano. Tion mi scias, mia Hekebolios! Vi ja tion diris al mi tiel ofte.

Teologiisto Hekebolios. Mi ĵus preĝis por via pliboniĝo —. Ho, estis kvazaŭ nia alie tiel indulga Savinto sin deturnis de mi kaj rifuzis aŭskulti min; li toleris ke bagatelaĵo kaj distriĝo glitis en miajn pensojn —.

Princo Juliano. Vi preĝis pro mi? Ho, plena Hekebolios — vi eĉ preĝas pro ni, malsaĝaj bestoj, — nome, se ni iras en kortegvestoj!

Teologiisto Hekebolios. Kion vi diris, mia filo?

Princo Juliano. Hekebolios, kiel vi povis verki tiun senhontan poemon?

Teologiisto Hekebolios. Mi!? Mi ĵuras al vi je ĉio, kio estas sankta —!

Princo Juliano. Staras skribite en viaj okuloj, ke vi mensogas! Mi scias kun certeco, ke vi verkis ĝin. Kiel vi povis verki ĝin, mi demandas, — kaj eĉ en la nomo de Libanios?

Teologiisto Hekebolios. Nu, jes, mia kore amata, se vi sciis —

Princo Juliano. Ah, Hekebolios! Trompajo kaj mensogo kaj falsajo —

Teologiisto Hekebolios. Vidu, mia amato, tiel mi amas vin. Ĉion mi povos fari por la animo de la viro, kiun iam sanktoleosis nia sinjoro. Se mi mensogis kaj trompis pro zorgemo al vi, tiam sciu, ke indulga Dio rigardos kun plezuro mian faron kaj ke Li tendis sur ĝi sian justan manon.

Princo Juliano. Mi malsaĝulo! Lasu al mi premi ĉi tiun ĵurrompan manon —!

Teologiisto Hekebolios. La imperiestro!

(Imperiestro Konstantios Ĥun sia tuta sekvantaro venas el la preĝejo. Agaton Ĥam antaŭe retiriĝis dekstren en la arbetojn).

Imperiestro Konstantios. Ho, ĉi tiu feliĉega, ĉiela paco super mi! Imperiestrino Eŭsebia. Vi sentas vin plifortiginta, Konstantios?

Imperiestro Konstantios. Jes, jes! Mi vidis la kolombon vivantan ŝvebpendi super mi. Ĝi kunprenis kun si ĉiun kulpŝarĝon. — Nun mi kuraĝas riski multon, Memnon!

Memnon *(mallaŭte)*. Kuraĝu rapide, sinjoro!

Imperiestro Konstantios. Jen ili staras ambaŭ. *(Li iras renkonte al ili)*.

Princo Galos *(senkonscie kaptas sian glavon kaj vokas kun timo)*. Ne faru al mi malbonon!

Imperiestro Konstantios (*kun etenditaj brakoj*). Galos! Frato!
(Li ĉirkaŭbrakas kaj kisas lin) — Vidu, en la lumo de la steloj
 de l'paskonokto mi elektis tiun, kiu staras plej proksime ĉe
 mia koro. — klinu vin ĉiujn teren. Salutu lin, la Cezaron Galos!
*(Ĝenerala mirego en la sekvantaro; oni aŭdas senkonsciajn
 ekkriojn).*

Imperiestrino Eŭsebia (*kun ekkrio*). Konstantios!

Princo Galos (*konfuzita*). Cezaro!

Princo Juliano. Ah! (*Li kvazaŭ ĝojante estas kaptonta la manojn
 de la imperiestro*).

Imperiestro Konstantios. (*defendiĝ-repuŝante lin*) Ne alproksim-
 iĝu. Kion vi volas? Ĉu Galos ne estas la pli aĝa? Kiajn esperojn
 vi faris al vi? En via blindiĝinta fiereco kiajn famojn vi —?
 For, for!

Princo Galos. Mi — mi Cezaro!

Imperiestro Konstantios. Mia heredonto kaj posteulo. En tri
 tagoj vi iros al la armeo en Azio. La militon kontraŭ la persoj
 vi ja sincere prenis al la koro —

Princo Galos. Ho, mia plej indulga sinjoro —!

Imperiestro Konstantios. Danku min per agoj, amata Galos!
 La reĝo Sapores staras okcidente de l'Eŭfrato. Mi ja scias,
 kiel vi maltrankviliĝas pri mia vivo; ĝi estu sekve via tasko,
 venkobati lin. (*Li turnas sin, kaptas ambaŭmane la kapon de
 Juliano kaj kisas lin.*) Kaj vi, Juliano, pia amiko kaj frato —
 tiel devis esti mia decido.

Princo Juliano. La volo de la imperiestro estu benata!

Imperiestro Konstantios. Nenian benon! Sed aŭskultu. — Mi
 pensis ankaŭ pri vi: Sciu, Juliano, ke vi povas nun libere spiri
 en Konstantinopolo —.

Princo Juliano. Jes, glorata estu Kristo kaj la imperiestro!

Imperiestro Konstantios. Vi do jam scias? Kiu diris tion al vi?

Princo Juliano. Kion, sinjoro?

Imperiestro Konstantios. Ke Libanios estas ekzilita.

Princo Juliano. Libanios ekzilita!

Imperiestro Konstantios. Mi ekzilis lin al Ateno.

Princo Juliano. Ah!

Imperiestro Konstantios. Jen, malsupre kuŝas la ŝipo; li velveturos ĉi tiun nokton.

Princo Juliano (*mallaŭte*). Li mem; li mem!

Imperiestro Konstantios. Vi ja longe deziris tion. Mi ne pli frue povis kontentigi vin; sed nun —; tio estu por vi malgranda kompenso, mia Juliano. —

Princo Juliano. (*ekkaptas rapide lian manon*) Konsentu al mi ankoraŭ unu favoron!

Imperiestro Konstantios. Postulu ĉion, kion vi volas.

Princo Juliano. Konsentu ke mi forvojaĝos al Pergamo. Vi scias, la maljuna Edesios instruas tie.

Imperiestro Konstantios. Tre stranga deziro. Vi inter la idolanoj —?

Princo Juliano. Edesios ne estas danĝera, li estas tre meditema viro kaj krom tio aĝ-kaduka. —

Imperiestro Konstantios. Kaj kion vi volas de li, frato?

Princo Juliano. Mi volas lerni lukti kontraŭ leonoj.

Imperiestro Konstantios. Mi komprenas viajn piajn pensojn. Kaj vi ne timas —; kaj sentas vin sufiĉe forta —?

Princo Juliano. Dio, la Sinjoro vokis min per laŭta voĉo. Kiel Danielo, mi iras kviete kaj ĝoje en la kavernon de leonoj.

Imperiestro Konstantios. Juliano!

Princo Juliano. En tiu ĉi nokto vi mem estiĝis lia laborilo, ne sciante tion. Ho, lasu min iri kaj purigi la mondon.

Princo Galos. (*mallaŭte al la imperiestro*) Komplezu al li, sinjoro, tio malebligos al li pripensi pli grandajn aferojn.

Imperiestrino Eŭsebia. Mi petas vin, Konstantios. — Ne kontraŭstaru tiun premantan sopiron.

Teologiisto Hekebolios. (*mallaŭte*) Alta imperiestro, lasu lin forvojaĝi al Pergamo. Mi malesperas pri tio fleksi lin tie ĉi, — kaj nun ĝi ne estas tiel grava —

Imperiestro Konstantios. Kiel mi povus rifuzi al vi ion en tiu ĉi horo? Iru kun Dio, Juliano!

Princo Juliano. (*hisas liajn manojn*) Ho, dankon — dankon!

Imperiestro Konstantios. Kaj nun al la ĝoj-maĝo! Mia kapuana kuiristo eltrovis kelkajn novajn fast-maĝojn. Karporojn en kios-vino — Antaŭen — vi kiel la plej proksima post mi, Cezaro Galos!

(La procesio ekmoviĝas antaŭen).

Princo Galos. *(mallaŭte)* Helena, kia mirinda ŝanĝo!

Princino Helena. Ho Galos, nun tagiĝas super nia espero!

Princo Galos. Mi apenaŭ povas tion kredi! Sed al kiu mi dankas tion?

Princino Helena. Eksilentu!

Princo Galos. Al vi, mia amata? Aŭ al kiu — al kiu?

Princino Helena. Al la sparta hundo de Memnon.

Princo Galos. Kiun vi celas?

Princino Helena. La hundo de Memnon. Juliano piedbatis ĝin, jen kio postulas venĝon.

Imperiestro Konstantios. Kial tiel silenta, Eŭsebia?

Imperiestrino Eŭsebia. *(mallaŭte, plorante)* Ho, Konstantios, — ke vi povus tiel elekti!

Imperiestro Konstantios. Dek unu ombroj postulas tion.

Imperiestrino Eŭsebia. Ve al ni! tio ne forpelas la ombrojn.

Imperiestro Konstantios. *(vokas)* Flutistoj! Kial la friponoj ne ludas? Ludu, ludu!

(Ĉiuj kun escepto de princo Juliano, iras eksteren maldekstren. Agaton venas el inter la arboj).

Princo Juliano. Galos lia posteulo; kaj mi; — libera, libera, libera!

Agaton. Mirinde sin manifestis la volo de la Sinjoro.

Princo Juliano. Ĉu vi tion aŭdis, kio tie ĉi okazis?

Agaton. Jes, ĉion.

Princo Juliano. Kaj morgaŭ, mia Agaton, morgaŭ mi iros Atenon!

Agaton. Atenon? Vi ja iros al Pergamo.

Princo Juliano. Ŝt! Vi ne komprenas tion — ni devas esti ruzaj kiel la serpentoj. Unue al Pergamo — kaj poste al Ateno.

Agaton. Vivu feliĉe, mia amiko kaj sinjoro!

Princo Juliano. Ĉu vi volas sekvi min, Agaton?

Agaton. Mi ne povas. Mi devas iri hejmen; mi havas malgrandan fratr, pri kiu mi devas zorgi.

Princo Juliano. (*ĉe la balustrado*) Jen ili suprentiras la ankron. Dio protektu vin, ho venkonto de leono, Afilo sekvas vin en la kil-akvo. (*vokas per mallaŭta voĉo*) Ah!

Agaton. Kio estas tio?

Princo Juliano. Jen stelo falis.

AKTO DUA.

(En Ateno. Malfermita placo ĉirkaŭita de kolonaro. Sur la placo staras statuoj kaj spruĉfontano. Sur la maldekstran angulon kondukas mallarĝa strato. Estas je sunsubiro.)

(Basilios de Cezarea, delikata juna viro, sidas legante sur soklo. Gregoro de Nazianz kaj aliaj allernejanaj promenas en apartigitaj aroj tien kaj reen en la kolonaro. Pli granda aro iras bruetante sur la placo dekstren. En la malproksimo aŭdiĝas bruado.)

Basilios de Cezarea. *(levas la okulojn el la libro)* Kion signifas tiuj sovaĝaj ekkrioj?

Gregoro de Nazianz. Albordiĝas ŝipo el Efeso.

Basilios de Cezarea. Kun novaj lernantoj?

Gregoro de Nazianz. Jes.

Basilios de Cezarea. *(ekstaras)* Tiam ni havos plenbruan nokton. Venu, Gregoro; ni ne rigardu ĉiun tian fiaĵon.

Gregoro de Nazianz. *(fingre montras maldekstren)* Rigardu tien. Ĉu tio estas pli amuza vidaĵo?

Basilios de Cezarea. Princo Juliano —; kun rozoj sur la haroj, kun ardanta vizaĝo. —

Gregoro de Nazianz. Jes, kaj post li tiu aro ŝanceliĝanta kaj ebri-okula! Aŭdu, kiel balbutas la vin-pezaĵ langoj! La tutan tagon ili sidis en la drinkejo de Lukon.

Basilios de Cezarea. Kaj multaj el ili estas niaj propraj, Gregoro; estas kristanaj junuloj. —

Gregoro de Nazianz. Tiel ili sin nomas. Ĉu Lampon sin ne nomis kristano, — li, kiu malhonorigis la filinon de la oleo-komercisto Zenon? Kaj Hilarion de Agrigento, kaj la du aliaj, kiuj faris ion tian, kion mi ne kuraĝas eldiri. —

Princo Juliano. (*maldekstre, vokante*) Oj, rigardu, rigardu, — Kastor kaj Poluks de Kapadocio!

Basilios de Cezarea. Li ekvidis nin. Mi volas foriri, mi ne eltenos vidi lin tiel.

Gregoro de Nazianz. Mi restas; li bezonas amikon.

(Basilios foriras dekstren. En la sama momento princo Juliano kaj aro da junuloj venas de mallarĝa strato. Li havas malordiĝintajn harojn kaj estas vestita per mallonga mantelo same kiel la aliaj. Inter la lernantoj estas Salusto de Perusia.)

Multaj el la aro. Vivu la atena lumo! Vivu la amantoj de saĝeco kaj elokventeco!

Princo Juliano. Ĉiu flataĵo estas senfrukta. Eĉ ne unu verson plu vi ekhavos hodiaŭ.

Salusto de Perusia. Se nia kondukisto eksilentas, ni sentas en ni malplenaĵon, kiel matene post dumnokta festo.

Princo Juliano. Se ni devas fari ion, ĝi estu io nova. Mi proponas proces-ludon.

La tuta aro. Jes, jes, jes; princo Juliano sur la juĝoseĝon!

Princo Juliano. For la princon, ho amikoj. —

Salusto de Perusia. Supreniru kaj eksidu, ho nekompareblulo!

Princo Juliano. Ĉu mi trokuraĝus —? Jen staras la viro. Kiu estas pli klera leĝo-scienculo ol Gregoro de Nazianz?

Salusto de Perusia. Tio estas vera!

Princo Juliano. Supreniru la juĝoseĝon! mia saĝa Gregoro, mi estas la akuzito.

Gregoro de Nazianz. Mi petas vin, amiko, lasu min ekster la ludo.

Princo Juliano. Supreniru la juĝoseĝon, mi diras! (*al la aliaj.*) Pri kio mi estas kulpa?

Kelkaj voĉoj. Jes, kio estos via kulpo? Elektu mem!
Salusto de Perusia. Ĝi estu io galilea, kiel ni malpiuloj ĝin nomas.

Princo Juliano. Bone, io galilea. Jen mi ĝin eltrovis. Mi rifuzis pagi imposton al la imperiestro. —

Multaj voĉoj. Ha — ha; ne malbone eltrovite. Bonege!

Princo Juliano. Jen mi estas kondukata antaŭ la juĝoseĝon; — oni dorsdirekte puŝas min antaŭen; kaj kun ligitaj manoj. —

Salusto de Perusia. (*al Gregoro*) Blinda juĝisto — mi volas diri blinda, ĉar la justeco estas blinda — rigardu tiun trokuraĝan viron; li rifuzis pagi la imposton al la imperiestro.

Princo Juliano. Konsentu ke mi jetu unu vorton sur la pezilon de la konsidero. Mi estas greka burĝo. Kiom ŝuldas greka burĝo al la imperiestro?

Gregoro de Nazianz. Tiom, kiom postulas la imperiestro.

Princo Juliano. Bone; sed kiom — jes, respondu min kvazaŭ la imperiestro mem ĉeestus en la juĝejo — kiom la imperiestro povas rajte postuli?

Gregoro de Nazianz. Ĉion.

Princo Juliano. Tio estis vere respondita, kvazaŭ la imperiestro mem ĉeestus. Sed jen estas malfacilaĵo; ĉar staras skribite: „Donu tion al la imperiestro, kio apartenas al la imperiestro — kaj tion al Dio, kio apartenas al Dio”.

Gregoro de Nazianz. Nu?

Princo Juliano. Sekve diru al mi, ho altaŝa juĝisto, kiom de mi apartenas al Dio?

Gregoro de Nazianz. Ĉio.

Princo Juliano. Kaj kiom de la proprajo de Dio mi rajtas doni al la imperiestro?

Gregoro de Nazianz. Karaj amikoj, ni ĉesigu tiun ĉi ludon. Lernantoj. (*ĝojkriante kaj ridante*) Ne, ne; respondu lin.

Princo Juliano. Kiom de la proprajo de Dio la imperiestro darfis postuli?

Gregoro de Nazianz. Mi ne respondas. Tio estas maldeca kontraŭ Dio kaj la imperiestro. Lasu min foriri!

Multaj voĉoj. Ĉirkaŭ lin!

Princo Juliano. Tenu lin firme! Ho! vi plej netaŭga juĝisto, vi fuŝis la aferon de la imperiestro, kaj nun vi volas forŝteliĝi? Vi volas forkuri? Kien, kien? Al la Skitoj? Venu antaŭ min! Respondu al mi, ho estontaj servantoj de la imperiestro kaj de la saĝeco, — ĉu li ne volas senigi sin de la imperiestra potenco?

Lernantoj. Jes, jes!

Princo Juliano. Kaj kiun punon vi postulas pro tia krimo?

Voĉoj. La morton! La morton en vinbarelo!

Princo Juliano. Ni pripensu tion. Ni respondu kvazaŭ la imperiestro ĉeestus mem. Kie estas la limo de la imperiestra potenco?

Kelkaj en la aro. La imperiestra potenco estas senlima.

Princo Juliano. Tion mi ankaŭ opinias. Sed ĉu ne estas freneze, retiri sin de la senlimeco?

La lernantoj. Jes, jes; la kapadociano estas frezeza!

Princo Juliano. Kaj kio do estas frenezeco? Kion opinias niaj prapatroj pri tiu stato? Kion instruis pri tio la egiptaj pastroj? Kaj kion diras la mistikisto Maksimos kaj la aliaj saĝec-amikoj en la orientaj landoj? Ili diras, ke la ĉielaj misteroj manifestiĝas en la frenezulo. Nia Gregoro, — dum li kontraŭ-staras la imperiestron — estas sekve en tuja interrilato kun la ĉielo. — Elverŝu vinon por la kapadociano, ekkantu kantojn por laŭdian Gregoron; — honor-kolonon por Gregoro de Nazianz!

La lernantoj. (*ĝojkriante kaj ridante*) Laŭdata estu la kapadociano! Laŭdata estu la juĝisto de Kapadocio!

(*Filozofo Libanios, ĉirkaŭita de lernantoj, venas trans la placon.*)

Filozofo Libanios. Oj, rigardu — mi kredas ke mia frato Juliano proklamas la saĝecon sur publika placo!

Princo Juliano. Diru „la malsaĝecon“, mia kara, la saĝeco ja elmigris.

Filozofo Libanios. Ĉu la saĝeco elmigris?

Princo Juliano. Aŭ estas elmigronta; ĉar, ĉu ne vere, ankaŭ vi intencas foriri al Pireo?

Filozofo Libanios. Mi, mia frato, kion mi estus faronta en Pireo?

Princo Juliano. Nia Libanios sekve estas la sola instruisto, kiu ne scias, ke ĵus albordigis ŝipo el Efeso?

Filozofa Libanios. Oj, mia amiko, kion al mi interesas tiu ŝipo?

Princo Juliano. Ĝi estas ĝis la rando ŝargita de novaj lernantoj.

Filozofa Libanios. (*sarkasme*) Ĝi ja venas de Efeso!

Princo Juliano. Ĉu la oro ne egale valoras, indiferece de kie ĝi venas?

Filozofa Libanios. Oro? Ha, ha, la orajn Maksimos konservas por si mem; ilin li ne ellasas. Kiaj estas ordinare la lernantoj, venantaj de Efeso? Filoj de butikistoj, unue-naskiĝintaj de metiistoj. — Oron, vi diras, mia Juliano? Mi diras, manko de oro. Sed tiun mankon de oro mi volas utiligi por stampi el ĝi gravajn orajn monerojn por vi, ho junuloj! Aŭ, ĉu utila instruo por la vivo ne estas — se ĝi estas prezentata en genia kaj alloga formo — komparebla kun plenvalora monero el oro? — Sekve aŭdu, se plaĉas al vi. Ĉu oni diris tie ĉi, ke iuj viroj rapidis al Pireo? Kiuj ili estas, tiuj rapidemaj? Mi tute ne volas eldiri la nomojn; ili mem nomas sin saĝec-amikoj kaj filozofoj. Rapidu nun image al Pireo. Kio okazas tie en tiu ĉi momento, dum mi staras tie ĉi en via bonvole aŭskultanta aro? Tiuj viroj, kiuj mem certigas ami kaj proklami la saĝecon, ili ariĝas kune sur la albordega ponto; ili sin mordas kaj batas reciproke, disputas, forgesas ĉiun konvenon kaj flankenigas ĉiujn morojn. Kaj kial? Por esti la unuaj ĉe la rembenkoj — por ĉirkaŭbraki la plej bele vestitajn junulojn, por konduki kaj akcepti ilin en siaj domoj, esperante havi de ili poste ĉiajn profitojn. — Kia honto, kia vekiĝo en malpleneco, same kiel post ebrieco, kiam veriĝas post mallonga tempo, — ha, ha, ha! — ke tiuj junuloj kunportis apenaŭ sufiĉe por pagi la albordegfestenojn! — Lernu el tio, ho junuloj, kiel maldeca tio estas por saĝec-amikoj, kaj kiel malmulte valoras aspiri propraĵojn, kuŝantajn ekster la vero.

Princo Juliano. Ho, mia Libanios, kiam mi kun fermitaj okuloj aŭskultas vin, mi profundigas en dolĉan songon, kaj imagas, ke Diogeno renaskiĝis inter ni.

Filozofa Libanios. Via buŝo estas prince malŝparema, mia plej kara!

Princo Juliano. Neniel. Kaj spite tio, mi preskaŭ interrompis vian paroladon; ĉar tiun ĉi fojon unu el viaj kolegoj apenaŭ sentos sin trompita en tiu ĉi okazo.

Filozofa Libanios. Mia amiko ŝercas.

Princo Juliano. Via amiko certigas vin, ke la du filoj de la guberniestro estas surŝipe.

Filozofa Libanios. (*ekkaptas lian brakon*) Kion vi diras?

Princo Juliano. La imitanto de Diogeno, kiu havos ilin kiel instruisto, ne bezonos pro malriĉeco trinki el la konkava mano.

Filozofa Libanios. La filoj de la guberniestro Milon! Tiu nobla Milon, kiu sendis al la imperiestro sep persajn ĉevalojn kun selajo, perle borderita —.

Princo Juliano. Multaj opiniis, ke tiu donaco de Milon estis tro malgranda.

Filozofa Libanios. Tre vere. Milon devus sendi poemon; aŭ li devus sendi lerte redaktitan paroladon aŭ leteron. Milon estas riĉe provizita viro, la tuta familio de Milon estas riĉe provizita.

Princo Juliano. Plej riĉe la du junuloj.

Filozofa Libanios. Tion mi volas kredi. La dioj donu, pro la riĉa kaj malavara patro, ke ili trovu restadejon inter bonaj homoj! Vi sekve pravis, Juliano; la ŝipo vere portis oron el Efeso. Ĉar ĉu la spirit-donacoj ne estas la vera oro? Sed mi eksentas min malkvieta; la bonstato de tiuj junuloj estas vere grava afero; multe dependas de tio, sub kies influon ili unue venos. Miaj junaj amikoj, se vi samopiniis kiel mi, ni donos al tiuj fremduloj kondukantan manon, ni helpu ilin por fari la plej utilan elekton pri instruisto kaj loĝejo. —

Saluto de Perusia. Mi kunhelpos!

Lernantoj. Al Pireo, al Pireo!

Saluto de Perusia. Ni interbatalos kiel sovaĝaj porkoj pro la filoj de Milon!

(*Ili ĉiuj iras kun Libanios dekstren; nur Juliano kaj Gregoro de Nazianz restas en la kolonaro*).

Princo Juliano. (*okule sekvas ilin*) Rigardu, kiel ili rapidas, kvazaŭ aro da faŭnoj. Kiel ili lekas al si la buŝon pensante pri la plezuro pro la festeno, okazonta tiun ĉi nokton. (*sinturnas al Gregoro de Nazianz*) Se ili suprensendus en tiu ĉi horo preĝon al Dio, ĝi okazus por ke Li malplenigu iliajn stomakojn por la matenmanaĝo.

Gregoro de Nazianz. Juliano. —

Princo Juliano. Vi min rigardu, mi estas sobra.

Gregoro de Nazianz. Tion mi scias. Vi estas modera pri ĉio. Tamen vi partoprenas tiun viv-manieron.

Princo Juliano. Kial ne? Ĉu vi, aŭ mi scias, kiam la fulmotondro trafos? Kial do ne viv-ĝui helan, sunriĉan tagon? Ĉu vi forgesas, ke mi pasigaĉis mian infanecon kaj miajn unuajn junec-jarojn en orumita sklaveco? Fariĝis al mi kutimo, jes, mi povas diri: io necesa, senti super mi ion teruran. Kaj nun? Tiu tomba silento de la imperiestro; — tiu spiona silento! Mi forlasis Pergamo sen konsento de la imperiestro; la imperiestro diras nenion pri tio. Propra-iniciate mi vojaĝis el Nikomedia; tie mi vivis kaj lernis de Nikokles kaj de aliaj; la imperiestro ne kontraŭstaris. Mi venis en Atenon, serĉis Libanios'on, kiun la imperiestro malpermesis al mi vidi; — la imperiestro silentis ĝis hodiaŭ. Kiel mi devas klarigi tion?

Gregoro de Nazianz. Klarigu tion en amo, Juliano!

Princo Juliano. Ho, vi ne scias — ! Mi malamas tiun potencon ekster mi, estas terure, kiam ĝi agas, — kaj pli terure kiam ĝi ripozas.

Gregoro de Nazianz. Estu honesta, mia amiko, kaj diru al mi, ĉu estas nur tio, kio kondukis vin sur ĉiujn strangajn vojojn.

Princo Juliano. Kion vi opinias per „strangaj vojoj“?

Gregoro de Nazianz. Ĉu tio estas vera, kion la famo diras — ke vi pasigas viajn noktojn, esplorante la idolanajn misteraĵojn en Eleŭziso?

Princo Juliano. Kaj se estus vere — ! Mi povas certigi al vi, ke nur malmulte da profito estas trovebla en la rondo de viaj enigmaj revantoj. Ni ne plu parolu pri tio.

Gregoro de Nazianz. Sekve estas vere! Ho, Juliano, kiel vi povas serĉi tian hontindan societeton!

Princo Juliano. Mi volas ĝui la vivon, Gregoro — kaj tio estas neebla en tiuj ĉi saĝec-lernejoj. Tiu Libanios! Neniam mi pardonos al li, ke mi lin tiel amis! Kiel pro ĝojo tremante kaj humile mi iris renkonte al tiu viro; kiam mi alvenis, mi klinis min antaŭ li, kisis lin kaj nomis lin mia granda frato.

Gregoro de Nazianz. Jes, ĉiuj kristanoj opiniis, ke vi ekscesis.

Princo Juliano. Kaj tamen mi venis tien ĉi kun solena emo en la koro. Image mi vidis teruran fortegan batalon inter ni ambaŭ, — la vero de la mondo, kiu devus batali kontraŭ la vero de Dio. — Kio naskiĝis el tio? Libanios neniam deziris serioze tiun batalon. Li eĉ neniam deziris ian batalon; — li volas nur tion, kio koncernas al li mem. Mi diras vin, Gregoro, — Libanios ne estas granda homo.

Gregoro de Nazianz. Tamen la tuta lumigita Grekujo diras, ke li estas tia.

Princo Juliano. Spite tio, li ne estas granda viro, mi diras al vi. Nur unu fojon mi vidis Libanios'on granda; tio okazis dum tiu punkto en Konstantinopolo. Tiam li estis granda, ĉar li suferis grandan maljustaĵon kaj ĉar nobla kolero regis lin. Sed tie ĉi! Ho, pri kio mi do estis atestanto tie ĉi! Libanios estas granda scienculo, sed granda homo li tute ne estas. Libanios estas avara; li estas vanta; la envio konsumas lin. Aŭ ĉu vi kredas ke li povis toleri, ke mi estis estinta tiel feliĉa, — sendube per la indulgo de miaj amikoj — akiri gloron? Se vi venos al Libanios, li povos kalkuli al vi la ecojn kaj signojn de ĉiuj virtoj. Li havas ilin abunde same kiel li havas la librojn en sia librejo. Sed ĉu li praktikas tiujn virtojn? Ĉu lia vivo estas konforma al lia instruado? Li estus imitanto de Sokrato kaj Platono, — ha — ha! Ĉu li ne flatis la imperiestron antaŭ ol li estis ekzilita? Ĉu li ne flatis min dum nia renkontiĝo en Konstantinopolo, tiu renkontiĝo, kiun li poste plej malsukcese klopodis fari ridinda! Kaj kio mi nun estas al li? Nun li skribas leterojn al Galos, al Cezaro Galos, al la heredonto de la imperiestro, kaj gratulas lin pro liaj sukcesoj kontraŭ la persoj, kvankam tiuj sukcesoj estas sufiĉe mizeraj, kaj kvankam Cezaro Galos nek sin distingas

per instruiteco nek per neordinara elokventeco. — Kaj tiun Libanios'on la grekoj obstine nomas la reĝo de la saĝecamantoj! Ho, mi ne volas nei, ke tio kolerigas min. Mi vere kredis, ke la grekoj povus fari pli bonan elekton, se ili direktus iom pli multe la rigardojn al la estimantoj de la saĝeco kaj elokventeco, kiuj dum la lastaj jaroj —

Basilios de Cezarea (*venas de dekstre.*) Leteroj, leteroj el Kapadocio!

Gregoro de Nazianz. Ankaŭ al mi?

Basilios de Cezarea. Rigardu; de via patrino.

Gregoro de Nazianz. Mia pia patrino! (*li malfermas la paperon kaj legas.*)

Princo Juliano (*al Basilios de Cezarea.*) Ĉu estas via fratino, kiu skribis?

Basilios de Cezarea. (*kiu alproksimiĝis kun sia malfermita letero.*) Jes, tio estas Makrina. Ŝi sciigas malĝojigajn kaj strangajn okazintaĵojn.

Princo Juliano. Kiujn, kiujn?

Basilios de Cezarea. Unue pri via majesta frato Galos. Li praktikas severan regadon en Antioĥia.

Princo Juliano. Jes, Galos estas senkompatema. — Ĉu Makrina skribis: „severa regado“?

Basilios de Cezarea (*rigardas lin.*) Makrina skribis: „sanga“ —

Princo Juliano. Ha, tion mi jam pensis! Kial la imperiestro donis al li kiel edzinon tiun malpian vidvinon, tiun Konstantina'n!

Gregoro de Nazianz (*legante.*) Ho, kia neaŭdita honto!

Princo Juliano. Kio ĝi estas, amiko?

Gregoro de Nazianz (*al Basilios de Cezarea.*) Ĉu Makrina skribis nenion pri la okazintaĵoj en Antioĥia?

Basilios de Cezarea. Nenion precizan. Kio estas tio? Vi paliĝis —

Gregoro de Nazianz. Vi konis la noblan Klematios'on el Aleksandrio, ĉu ne?

Basilios de Cezarea. Jes, jes, kio okazis al li?

Gregoro de Nazianz. Li estas murdita, Basilios!

Basilios de Cezarea. Mi nomas tion murdita. — Oni ekzekutis lin ekster leĝo kaj juĝdecido.

Princo Juliano. Kiu? Kiu ekzekutis lin?

Gregoro de Nazianz. Jes, kiu? Kiel mi povas diri tion? Mia patrino rakontas la okazintaĵon jenmaniere: La bopatrino de Klematios estis kaptita de malpura amo al la edzo de sia filino; sed, ĉar ŝi ne povis alproksimiĝi al li, ŝi akirigis al si enirejon en la palacon tra postpordo —.

Princo Juliano. En kiun palacon?

Gregoro de Nazianz. Mia patrino skribis nur pri la palaco.

Princo Juliano. Nu? Kaj poste —?

Gregoro de Nazianz. Oni scias nur, ke ŝi donacis tie tre multekostan ornamaĵon al eminenta kaj potenca virino por efiki kondamnon al morto —

Princo Juliano. Ha, sed ŝi ne akiris ĝin.

Gregoro de Nazianz. Ŝi akiris ĝin, Juliano!

Princo Juliano. Ho, Jesuo!

Basilios de Cezarea. Terure! Kaj Klematios —?

Gregoro de Nazianz. La kondamno al morto estis sendita al la guberniestro. Tiu malenergia viro ne kuraĝis kontraŭstari la altan ordonon. Klematios estis kaptata kaj ekzekutata la sekvantan matenon, ne povante, kiel skribis mia patrino, malfermi la buŝon por defendi sin.

Princo Juliano (*mallaŭte kaj pala*). Forbruligu tiujn danĝerajn leterojn, ili povus alporti malfeliĉon al ni ĉiuj.

Basilios de Cezarea. Tia publika perforto en la mezo de granda urbo! Kie ni estas; kie ni estas?

Princo Juliano. Jes, tion vi povas demandi! Kristana murdisto, kristana adultulino, kristana —

Gregoro de Nazianz. Plendoj ne helpas en tiu ĉi afero. Kion vi intencas fari?

Princo Juliano. Mi? Mi ne volas plu iri al Eleŭziso; mi volas rompi ĉiun interrilaton kun la idolanoj, kaj mi dankas la Sinjoron, mian Dion, ke li forprenis de mi la tenton de povo.

Gregoro de Nazianz. Bone; sed poste?

Princo Juliano. Mi ne komprenas vin —

Gregoro de Nazianz. Aŭskultu do. Ne kredu ke tiu murdo kontraŭ Klematios estos sufiĉa. Tiu neaŭdita hontaĵo trafis Antiohia'n kiel pesto. Ĉio malbona vekiga kaj elrampas el sia kaŝejo. Mia patrino skribis, ke tio estas kvazaŭ malodoranta abismo, kiu malfermiĝis. Edzinoj denuncas siajn edzojn, filoj denuncas siajn gepatrojn, pastroj siajn proprajn sam-eklezianojn.

Princo Juliano. Tio disvastiĝos ĉirkaŭen. Abomeaĵoj pereigos nin ĉiujn. — Ho, Gregoro, se mi povu forkuri al la limo de la mondo —!

Gregoro de Nazianz. Via loko estas sur la umbiliko de la mondo, princo Juliano!

Princo Juliano. Kion vi postulas?

Gregoro de Nazianz. Vi estas la frato de tiu sangavida Cezaro. Paŝu antaŭ lin, — li ja sin nomas Kristano. Ĵetu lian krimon al li sur la vizaĝon; batu lin teren per timego kaj pento.

Princo Juliano (*paŝas malantaŭen*). Frenezulo, kion vi pensas?

Gregoro de Nazianz. Ĉu vi amas vian fraton? Ĉu vi volas savi lin?

Princo Juliano. Mi amis Galos'on pli ol iu-ajn alian.

Gregoro de Nazianz. Antaŭe?

Princo Juliano. Tiel longe, ke li estis mia frato. Sed nun ĉu li ne estas Cezaro? Gregoro, — Basilios, — ho vi karaj amikoj, mi tremas pro mia vivo, mi spiras en timo pro Cezaro Galos. Ĉu mi pensu viziti lin, mi, kies nura ĉeesto estas danĝero por li!

Gregoro de Nazianz. Kial vi venis en Atenon? Kun granda bruo vi proklamis tra la lando: princo Juliano vojaĝas de Konstantinopolo por batali kontraŭ la falsa saĝeco — por restarigi la kristanan veron kontraŭ la malvero idolana. Kion vi efikis tiamaniere?

Princo Juliano. Ho, ne tie ĉi la batalo okazus.

Gregoro de Nazianz. Ne, ne estis tie ĉi, ne per frazoj kontraŭ frazoj, ne per libro kontraŭ libro, ne per batalantaj ludoj de vortoj en la lernejoj. Ne, Juliano, estas en la vivado, ke vi devas agi ĉiam riskante vian vivon.

Princo Juliano. Mi komprenas — mi komprenas!

Gregoro de Nazianz. Jes, kiel Libanios komprenas tion! Lin vi mokis. Li sciis la ecojn kaj signojn de ĉiuj virtoj; sed la instruado estis por li nur instruado. Kiom de vi apartenas al Dio? Kiom povas rajte postuli la imperiestro?

Princo Juliano. Vi mem diris ke estas mokaĵo —

Gregoro de Nazianz. Kontraŭ kiu? Kontraŭ Dio aŭ kontraŭ la imperiestro?

Princo Juliano. Nu, bone; ĉu ni iros kune?

Gregoro de Nazianz (*geste rifuzas*). Mi havas mian etan aron; mi havas mian familianojn por protekti. Pli malproksimen etendiĝas nek mia povo nek miaj kapabloj.

Princo Juliano (*estas respondonta; subite li aŭskultas dekstren kaj ekkrias*): Al la bakanalo!

Basilios de Cezarea. Juliano!

Princo Juliano. Al la bakanalo, ho amikoj!

(Gregoro de Nazianz rigardas lin dum momento; poste li foriras tra la kolonaro maldekstren. Grandaj aroj da studentoj kun la nove venintaj inter si, rapidas bruante kaj kriante sur la placon.)

Basilios de Cezarea. (*pli proksime.*) Juliano, ĉu vi volas aŭskulti min?

Princo Juliano. Rigardu, rigardu! Ili kondukis siajn novajn amikojn al la bano, ili oleoŝmiras iliajn harojn. Rigardu, kiel ili ŝvingas la bastonojn; kiel ili krias kaj piedfrapas la pontŝtonojn. Kion vi diras, Periklo? Ŝajnas al mi, ke mi ekvidas vian koleran ombron —

Basilios de Cezarea. Venu, venu!

Princo Juliano. Ha, rigardu tiun, kiun ili nuda antaŭen pelas inter si. Jen venas dancistoj. Ha, ĉu vi vidas kiel —!

Basilios de Cezarea. Fi, fi; — deturnu viajn okulojn!

(Ekvesperiĝas. La tuta aro eksidas sur la placo apud la ŝprucfontano. Vino kaj fruktoj estas alportataj. Pudirataj knabinoj dancas ĉe torĉlumo.)

Princo Juliano (*post mallonga silento*). Diru al mi, Basilios, kial la idolana peko estis tiel bela?

Basilios de Cezarea. Vi eraras, amiko; oni bele parolis kaj verkis versojn pri la idolana peko; sed ĝi ne estis bela.

Princo Juliano. Ho, kion vi diras? Ĉu Alcibiado ne estis bela, kiam li vin-ebria, kiel juna dio rapidis nokte tra la stratoj de Ateno? Ĉu li ne estis bela en sia fiereco, kiam li mokinsultis Hermes'on kaj frapis sur la pordojn de la burĝoj, — kiam li vokis al si iliajn edzinojn kaj filinojn, dum la virinoj interne tremis kaj ĝemante kaj en senspira silentado arde deziris nenion alian krom —

Basilios de Cezarea. Ho, mi petegas vin, aŭskultu min.

Princo Juliano. Ĉu Sokrato ne estis bela ĉe la trinkfesteno? Kaj Platono kaj ĉiuj ĝojaj diboĉantaj fratoj! Kaj spite tio ili faris aferojn, kiujn jenaj kristanaj duon-porkoj jure neigus, se iu akuzus ilin pro tio. Kaj pensu plue pri Eŭdipuso, Medea, Leda —.

Basilios de Cezarea. Fikcio, fikcio; — vi kunmiksas fikcion kaj veron.

Princo Juliano. Ĉu la fikcia senco kaj la energio ne havas la estadon de la realaj? Kaj rigardu niajn sanktajn skribaĵojn, la novajn kaj la malnovajn. Ĉu la peko estis bela en Sodom kaj Gomora? Ĉu ne venĝis la fajro de Jehova tion, de kio Sokrato sin ne detiris. — Ho, kiam mi vivas tiun ĉi vivadon lukse kaj festene, mi ofte meditas pri tio, ĉu la vero reale devus esti la amiko de la beleco.

Basilios de Cezarea. Kaj en tia momento vi povas sopiri al beleco? Ĉu vi tiel facile forgesis, kion vi ĵus aŭdis —?

Princo Juliano. (*ŝingre ŝtopas siajn orelojn*) Ne plu unu vorton pri tiuj abomenaĵoj! Ĉion, kio okazis en Antioĥia, ni volas forŝuti de ni —, Diru al mi, kion Makrina skribis plue? Estis io alia; ŝajnas al mi, ke vi diris —; kiel vi nomis la aliajn novaĵojn?

Basilios de Cezarea. Strangaj.

Princo Juliano. Jes, jes, kio okazis?

Basilios de Cezarea. Ŝi kribis pri Maksimos en Efeso —.

Princo Juliano. (*vive*) La mistikisto?

Basilios de Cezarea. Jes, tiu enigmo-plena viro. Nun li subite reaperis; tiun ĉi fojon en Efeso. Ĉiuj ĉirkaŭe kuŝantaj regionoj estas en afekcio. Maksimos estas nomata de ĉiuj lipoj. Aŭ li estas jonglisto, aŭ li interrilatas malbonsigne kun spiritoj. Eĉ kristanoj estas mirakle kaptataj de liaj kalumniantaj signoj kaj faroj.

Princo Juliano. Daŭrigu, mi petas vin!

Basilios de Cezarea. Pli multe ne estis skribita pri li. Makrina skribis nur, ke ŝi vidas en la reapero de Maksimos signon pri tio, ke ni estas sub la kolero de Dio. Ŝi kredas, ke nin atendas grandaj malfeliĉaĵoj pro niaj pekoj.

Princo Juliano. Jes, jes, jes! — Aŭskultu, Basilios, ŝi estas sendube malofta virino, via fratino.

Basilios de Cezarea. Vere, ŝi estas.

Princo Juliano. Kiam vi rakontis al mi pri ŝia letero, ŝajnis al mi kvazaŭ mi eksciis ion, kion mi jam longe sopiris. Diru al mi, ĉu ŝi intencas ankoraŭ retiriĝi de la mondo kaj vivi en izolita regiono.

Basilios de Cezarea. Tiu intenco ĉiam regas ŝin.

Princo Juliano. Ĉu vere? Ŝi, sur kiun ŝajnas esti ŝutitaj ĉiuj talentoj? Ŝi, kiu laŭdire estas tiel juna kaj bela? Ŝi, kiu povus atendi riĉecon kaj kiu, kvankam virino, posedas plej neordinaran sciencon. Ĉu vi scias, Basilios, ke mi arde sopiras konatiĝi kun ŝi? — Kion ŝi volas en la soleco?

Basilios de Cezarea. Mi rakontis vin, ke ŝia fianĉo mortis. Ŝi konsideras lin kiel atendantan edzon, al kiu ŝi dediĉas ĉiujn siajn pensojn kaj ŝi promesis renkonti lin pura.

Princo Juliano. Strange, ke tiom multe da homoj nuntempe sentas la deziron retiriĝi en solecon. — Kiam vi skribos al Makrina, sciigu al ŝi ke ankaŭ mi —

Basilios de Cezarea. Tion ŝi scias, Juliano; sed ŝi ne kredas tion.

Princo Juliano. Kial ne kredi? Kion ŝi skribis?

Basilios de Cezarea. Mi petas vin, indulgu min. —

Princo Juliano. Se vi amas min, ne kaŝu por mi unu vorton de tio, kion ŝi skribis!

Basilios de Cezarea. (*donas al li la leteron*) Vi volas — jen legul Komenciĝas tie.

Princo Juliano (*legas*). „Ĉiufoje, kiam vi skribas pri via amiko la juna parenco de la imperiestro, mia animo pleniĝas je granda, brilanta ĝojo —” Ho, Basilios, estu mia okulo; legu plue al mi.

Basilios de Cezarea (*legas*). Via rakonto pri la fidoplena certeco, kun kiu li venis en Atenon, estis al mi kiel bildo el la tempo de la malnovaj skribaĵoj. Jes, mi kredas ke li estas la renaskiĝinta Davido, kiu teren batos la batalantojn de la idolanoj. La spirito de Dio estu super li dum la batalo, kaj dum ĉiuj tagoj.”

Princo Juliano (*kaptas lian brakon*). Tio sufiĉu! Si ankaŭ? Kio estas tio, kion vi ĉiuj, kvazaŭ unubuŝe, postulas de mi? Ĉu mi subskribis promeso-skribon por batali kontraŭ la leonoj de la potenco?

Basilios de Cezarea. Kial ĉiuj kredantoj en senspira atendo direktas sian rigardon al vi?

Princo Juliano (*iras kelkajn fojojn tien kaj returne en la kolonaro, ekhaltas kaj etendas la manon al la letero*). Donu ĝin, lasu min legi (*legas*). La spirito de Dio estu super li dum la batalo kaj dum ĉiuj tagoj.” — Ho, Basilios, se mi povus —! Sed mi sentas min kiel tiu Dedalo inter ĉielo kaj maro. Kapturniganta altaĵo kaj senfunda profundaĵo. — Kiu signifo estas en tiuj voĉoj, kiuj vokas al mi de oriento al okcidento, ke mi liberigu la kristanecan? Kie estas tiu liberigota kristaneco? Ĉu ĝi estas ĉe la imperiestro aŭ ĉe Cezaro? Mi pensas, ke iliaj faroj krias: ne, ne! Ĉu ĝi estas ĉe la potenculoj kaj altranguloj, — ĉe tiuj diboĉemaj duonhomoj de la kortego, kiuj kunplektas la manojn sur la grasigita ventro kaj flustraĉas: „Ĉu la filo de Dio estas kreita el nenio? Aŭ ĉe la kleraj, ĉe tiuj, kiuj kiel vi kaj mi trinkis belecon kaj saĝecon el la idolanaj fontoj? Ĉu la plej multaj el niaj fratoj sin ne klinas al la ariana herezo, kiun la imperiestro mem tiel favoras? Kaj rigardu la tutan ĉifon-vestitan aron en la regno, — ĉiujn tiujn, kiuj insult-krias kontraŭ la temploj kaj murdas la idolanojn kaj ilian genton! Ĉu tio okazas pro Kristo? Ha-ha! poste ili interbatalos pro la postlasitaj proprajoj de la murditoj. — Vi povas demandi al Makrina, ĉu la kristaneco estas serĉebla en la soleco, — aŭ sur la kolono, kie la protekt-

anĝelo staras sur unu piedo. Aŭ en la urboj? Eble ĉe tiuj bakistoj en Konstantinopolo, kiuj antaŭ nelonge batalis per la pugnoj por klarigi la demandon ĉu la triunuo konsistas el tri personoj aŭ el tri substancoj! — Kiu el tiuj volus konfesi Kriston, se li refoje malsuprenirus sur la teron? Antaŭen kun la lanterno de Diogeno, Basilios! Lumigu en ĉi tiu nokta mallumo! — Kie estas la Kristaneco?

Basilios de Cezarea. Serĉu la respondon tie, kie ĝi estas trovebla en ĉiuj senfortaj tempoj.

Princo Juliano. Ne ŝtopu la fonton de via saĝeco! Kvietigu mian soifon, se vi povas. Kie mi serĉos kaj trovos?

Basilios de Cezarea. En la skribaĵoj de la sanktaj viroj.

Princo Juliano. Jen la sama malesperiga respondo. Libroj, — ĉiam libroj! Se mi venas al Libanios, li diras: libroj, libroj! Se mi venas al vi, — libroj, libroj, libroj! Ŝtonoj anstataŭ pano! Mi ne povas uzi librojn; — estas vivo, al kio mi sopiras, estas kunvivado vizaĝon je vizaĝo kun la spirito. Ĉu Saul estiĝis vidanta per libro? Ĉu ĝi ne estis lumradio, kiu renkonte-trafis lin, aperaĵo, voĉo —!?

Basilios de Cezarea. Ĉu vi forgesas pri la aperaĵo kaj la voĉo, kiujn tiu Agaton el Makelo —?

Princo Juliano. Enigmoplena sciigo. Oraklo-respondo, kiun mi ne povas klarigi. Ĉu mi estis la elektito? La heredonto de la regno, oni diris. Kaj de kiu regno —? Mil duboj ŝvebas super la afero. Mi scias nur tion: en Ateno ne estas la kaverno de la leono. Sed kie, kie? Ho, mi palpserĉas kiel Saul en la nokto. Se Kristo deziras ion de mi; tiam li parolu klare kun la fingro en la unĝovundo —.

Basilios de Cezarea. Kaj tamen estas skribite —

Princo Juliano (*kun neanta gesto per ambaŭ manoj*). Mi scias ĉion, kio estas skribita, tio ne estas vero por la karno. Ĉu vi ne sentas naŭzon, kiel surŝipe dum veter-trankvilo, kaj disjetata inter vivo, skribaĵo, idolanaj saĝeco kaj beleco? Apokalipso nova devas veni. Aŭ apokalipso de io nova. Ĝi devas veni, mi diras; — la tempo por tio alproksimiĝis. — Jes, apokalipso! Ho Basilios, se vi povus malsupren-preĝi ĝin sur min! La pormartiran morton, se ĝi devas esti —! La pormartiran morton —, ha, min kaptas

kapturino ĉe la sento de ĝia dolĉeco; la dornokrono sur mia frunto!
*(li ambaŭmane ĉirkaŭ prenas sian kapon, sentas la vozo-girlandon,
 kiun li forŝiras, longe pripensas kaj mallaŭte diras)* tiun ĉi, pri
 ĝi mi forĝesis *(li forŝetas la girlandon)*. Nur unu aferon mi lernis
 en Ateno.

Basilios de Cezarea. Kiun, Juliano?

Princo Juliano. La malnova beleco ne estas plu bela kaj la nova
 vereco ne estas vera.

*(La saĝec-instruisto Libanios rapide venas de maldekstre tra la
 kolonaro.)*

Filozofo Libanios *(ankoraŭ malproksime)*. Nun ni havas lin; nun
 ni havas lin!

Princo Juliano. Lin? Mi pensis ke vi havas ambaŭ.

Filozofo Libanios. Kiujn ambaŭ?

Princo Juliano. La filojn de Milon.

Filozofo Libanios. Ha, ilin mi havas ankaŭ. Sed ni havas lin,
 mia Juliano!

Princo Juliano. Kiun, kara frato?

Filozofo Libanios. Li kaptiĝis en sian propran kaptilon!

Princo Juliano. Ha, — sekve saĝulon?

Filozofo Libanios. La kontraŭ-ulon de ĉiu saĝeco.

Princo Juliano. Kiun, kiun, mi demandas?

Filozofo Libanios. Ĉu vi vere ne scias tion? Ĉu vi ne aŭdis la
 novaĵon pri Maksimos?

Princo Juliano. Pri Maksimos? Ho, faru al mi la komplezon —.

Filozofo Libanios. Jen, tien fine alvenis la malkvieta revulo, —
 paŝon post paŝo en la frenezecon —.

Princo Juliano. Alivorte: en la plej altan saĝecon.

Filozofo Libanios. Jes, tia ni povus nomi ĝin. Sed nun estas
 necese agi kaj uzi la momenton. Vi, nia plej ŝatata Juliano, vi
 estas la viro, kiu povos fari tion. Vi estas plej parenca al la
 imperiestro. La espero de ĉiuj veraj saĝec-amikoj direktiĝas al
 vi, ne nur tie ĉi sed ankaŭ en Nikomedia.

Princo Juliano. Aŭskultu, ho tre bona Libanios — ĉar mi ne
 estas ĉionscianta —.

Filozofo Libanios. Tiam eksciuj, ke Maksimos antaŭ nelonge sin montris publike, kun tio, kio kuŝas en la kerno de lia doktrino.

Princo Juliano. Kaj tion vi riproĉas al li?

Filozofo Libanios. Li pretendis, ke li povas komandi spiritojn kaj ombrojn.

Princo Juliano (*ekkaptas lian mantelon*). Libanios!

Filozofo Libanios. Ĉiuj surŝipe rakontis la plej strangajn rakontojn, kaj (*li montras leteron*) mia frato skribis detale en tiu ĉi letero pri la afero.

Princo Juliano. Spiritoj kaj ombroj —.

Filozofo Libanios. En Efeso Maksimos antaŭ nelonge en granda kunveno de samideanoj kaj kontraŭuloj praktikis malpermesitajn artifikajojn pere de la statuo de Hekato. Tio okazis en la templo de la diino. Eŭsebios skribis, ke li mem ĉeestis kaj estis atestanto de ĉio, de la komenco ĝis la fino. Ĉirkaŭ ili estis nokte mallume. Maksimos eldiris strangajn prijuojn; poste li kantis himnon, kiun neniu komprenis. Subite la marmora torĉo en la mano de la statuo ekflamiĝis —.

Basilios de Cezarea. Malpia laboro!

Princo Juliano (*senspire*). Kaj poste?

Filozofo Libanios. Kaj en la forta blueta lumo ĉiuj vidis, ke la vizago de la statuo ekvivas kaj ridetas al li.

Princo Juliano. Kio plue?

Filozofo Libanios. Ektimo ekkaptis la animojn de la plej multaj. Ĉiuj tim-rapidis al la elirejo. Multaj kuŝis poste malsanaj aŭ frenezaj. Sed li mem, — ĉu vi kredus tion, Juliano? — spite la sorto, kiu trafis liajn du fratojn en Konstantinopolo, li iras pluen sur sia danĝera kaj senton-ofenda vojo.

Princo Juliano. Senton-ofenda? Ĉu vi nomas tiun vojon senton-ofenda vojo? Ĉu ĉiu celo de la saĝeco ne finiras tien? Interrilato inter spirito kaj spirito —.

Basilios de Cezarea. Ho, kara erariĝanta amiko —!

Filozofo Libanios. Pli ol senton-ofenda, mi diras! Kio estas Hekato? Kio fakte estas la dioj por la ekkono de la lumigitoj? Feliĉe

ni ne plu vivas en la tempo de tiu maljuna blinda kantisto. Maksimos devus havi pli bonajn opiniojn. Ĉu Platono — kaj post li ni aliaj — ne disjetis lumon de klarigo sur la tuton? Ĉu ne estas sent-ofende, en tiuj ĉi niaj propraj tagoj, refoje voli involvi en animojn kaj nebulajn sonĝojn tiun ĉi mirindan, palpeblan kaj mi kuraĝas diri, pene konstruitan strukturon de klarigo, kiun ni kiel saĝec-amikoj, kiel lernejo, kiel —

Princo Juliano (*entuziasme*). Adiaŭ, Basilios! Mi vidas lumon sur mia vojo!

Basilios de Cezarea (*ĉirkaŭbrakas lin*). Mi ne ellasos vin, mi firme tenos vin!

Princo Juliano (*liberigas sin*). Neniu tenos min; — ne piedbatu kontraŭ la sprono —.

Filozofo Libanios. Kia atako de frenezeco! Amiko, frato, kunulo, kien vi volas?

Princo Juliano. Tien, tien, kie torĉoj ekflamiĝas kaj statuoj ridetas!

Filozofo Libanios. Kaj tion vi povus! Vi, Juliano, vi, nia fiereco, nia lumo, nia espero, — vi volus iri al tiu blindiĝinta Efeso por doni vin en la povon de jonglistoj! Sciuj, ke samhore kiam vi tiel vin malaltigas, samhore vi senigis vin de la majesta gloro de la saĝeco kaj elokventeco, kiujn vi en la lastaj jaroj ne nur en Pergamo, sed ankaŭ en Nikomedio, kaj precipe tie ĉi en la alta lernejo de Ateno —.

Princo Juliano. Ho, lernejo, lernejo! Restu ĉe viaj libroj; — nun vi fingre-montris la viron, kiun mi serĉis. (*li foriras rapide maldekstre tra la kolonaro.*)

Filozofo Libanios (*postrigardas lin dum momento*). Tiu princa junulo estas danĝera por la sciencoj.

Basilios de Cezarea (*duone al si mem*). Princo Juliano estas danĝera por ankoraŭ pli multe.

AKTO TRIA

(En Efeso. Lumigita salono en la loĝejo de princo Juliano. La enirejo de la antaŭ-vestiblo estas ĉe la dekstra flanko; pli malproksime funden estas pli malgranda pordo, kovrita per kurteno. Ĉe la maldekstra flanko troviĝas pordo, kondukanta al la interno de la domo. La fundo en la salono estas prezentata per malfermaĵo en la muro, ekster kiu oni vidas malgrandan de muroj ĉirkaŭitan placon, ornamitan per statuoj.)

(Servistoj preparas vesper-festonon kaj kuŝigas kusenojn ĉirkaŭ la tablo. La dominspektoro Eŭterios staras ĉe la enirejo kaj invitas per multaj ĝentilaĵoj Gregoro'n de Nazianz kaj Basilios'on de Cezarea por eniri.)

Dominspektoro Eŭterios. Jes, jes; mi certigas ke ĉio estas en ordo.

Gregoro de Nazianz. Neeble! Ne moku nin.

Basilios de Cezarea. Vi ŝercas, amiko! Kiel via sinjoro povas atendi nin? Neniu sciis pri nia forvojaĝo el Ateno; nenia ekhalto retenis nin survoje; ni velŝip-veturis kvazaŭ en konkuro kun la nuboj kaj la sovaĝaj grupoj.

Dominspektoro Eŭterios. Rigardu ĉirkaŭen; rigardu la tablon tie. Ordinare li vivas per vegetaĵoj kaj pano.

Gregoro de Nazianz. Jes, estas nepridiskuteble; ĉiuj sent-organoj atestas por vi; — vinuoj ĉirkaŭvolvitaj per floroj kaj verdaĵo; lampoj kaj fruktoj, incensoj plenigantaj la salonon per sia odoro; flutistoj ekstere ĉe la pordo —.

Dominspektoro Eŭterios. Frumatene li venigis min. Li ŝajnis esti neordinare ĝoja; ĉar li iris tien kaj reen sur la planko kaj

frotis siajn manojn. „Pretigu sufiĉegan manĝon“, diris li,
 „ĉar antaŭ hodiaŭ vespere venos du amikoj el Ateno —“

(Interlime li ŝetas rigardon maldekstren al la nefermita pordo, eksilentas subite kaj retiras sin respekte.)

Basilios de Cezarea. Ĉu li estas tie?

Dominspektoro Eŭterios. *(kapjesas responde; poste li signodonas al la servistoj malproksimiĝi; ili foriras dekstren tra la granda pordo; li mem sekvas ilin.)*

(Tuj poste princo Juliano eniras de maldekstre. Li portas longan orientlandan vestaĵon; tuta lia konduto estas plenviva kaj montras fortan internan agitadon.)

Princo Juliano *(iras renkonte al ili kaj salutas ilin kun granda emocio)*. Mi vidas vin! Mi havas vin! Dankon, dankon, ke viaj animoj flugis antaŭen antaŭ ol viaj korpoj!

Gregoro de Nazianz. Juliano!

Basilios de Cezarea. Mia amiko kaj frato!

Princo Juliano. Mi estis kiel amanto, kiu sopiris vian manpremon. La korteganaraĉo celadante la aplaŭdon de iuj viroj nomis min simio; — ho, se mi havus la kvar manojn de simio por ke mi povu premi viajn samtempe!

Gregoro de Nazianz. Sed, klarigu do —; viaj servistoj renkontas nin per flutludo ĉe la dompordo, ili volas konduki nin al la bano, ili volas oleoŝmiri niajn harojn kaj ornami nin per rozoj —.

Princo Juliano. Mi vidis vin en la lasta nokto. Estis plenluno, kiel vi scias, — kaj tiam mia spirito estas ĉiam tiel laborema. Mi sidis ĉe table en mia librarejo kaj estis ekdorminta, laca, ho miaj amikoj, tiel laca pro esplorado kaj skribado. Jen la domo pleniĝis kvazaŭ je uragano; la kurteno flugetis supren, kaj mi rigardis eksteren en la nokton, malproksimen trans la maron. Mi aŭdis belan kantadon; sed tiuj, kiuj kantis, estis du grandaj birdoj kun virin-vizaĝoj. Ili oblikve flugrapidis al la marbordo; tie ili malrapide ŝvebis malsupren; la birdo-formoj disfandiĝis en blanketan nebulon kaj en maldensa krepuska lumo mi vidis vin ambaŭ.

Gregoro de Nazianz. Ĉu vi estas certa pri ĉio tio?

Princo Juliano. Ĉu vi pensis pri mi; ĉu vi parolis pri mi estintan nokton?

Basilios de Cezarea. Jes, jes, — en la antaŭaĵo de la ŝipo —

Princo Juliano. Je kiu tempo okazis tio?

Gregoro de Nazianz. En kiu tempo dum la nokto vi havis tiun vizion?

Princo Juliano. Unu horon post noktomezo.

Gregoro de Nazianz (*kun rigardo al Basilios.*) Mirinde.

Princo Juliano (*frotas siajn manojn; iras tien kaj reen sur la planko*). Ĉu vi vidas?! Ha — ha; ĉu vi vidas?

Basilios de Cezarea (*sekvas lin okule*). Ho, sekve estas tamen vere —

Princo Juliano. Kio? Kio estas vera?

Basilios de Cezarea. La famo pri la misterplenaj ceremonioj, kiujn vi praktikas.

Princo Juliano. Oj! kiel la famo povas troigi! — Sed kion la famo cetere diras pri mi? Oni rakontis al mi, ke multaj famoj diskuras pri mi. Se mi povus iom kredi iujn certigojn, mi devus kredi, ke troviĝas malmultaj viroj en la lando, pri kiuj oni tiom parolas, kiel pri mi.

Gregoro de Nazianz. Tion vi certe povas kredi.

Princo Juliano. Kaj kion do diras Libanios pri ĉio tio? Estis al li ĉiam malagrabla, ke oni sin pli multe okupis pri aliaj ol pri li. Kaj kion diras cetere la multaj neforgeseblaj amikoj en Ateno? Oni ja scias, ke mi estas en malfavoro je la imperiestro kaj je la tuta kortego.

Gregoro de Nazianz. Vi? Multfoje mi ekaŭdis novaĵojn el la kortega tendaro; sed pri tio mia frato Cezarios skribis nenion.

Princo Juliano. Mi ne povas klarigi tion alimaniere, bona Gregoro! Ĉiuloke oni opinias konsilinde, atente observadi min. Antaŭ nelonge Cezaro Galos irigis tien ĉi Aetios'on, sian dom-pastron por esplori, ĉu mi restas firme je la nefalsita kredo.

Basilios de Cezarea. Kaj poste —?

Princo Juliano. Mi preskaŭ ĉiam partoprenas la dum-matenajn diservojn en la preĝejo, kaj la martirojn mi konsideras eksterordinare bonaj homoj; ĉar vere ne estas bagatelo suferi tiajn grandajn dolorojn kaj eĉ morti pro siaj opinioj —. Entute mi do kredas ke Aetios estis kontenta pri mi, kiam li for-vojaĝis.

Basilios de Cezarea (*ekkaptas lian manon*). Juliano, — en la nomo de nia intima amikeco, — parolu malkaŝe pri via stato.

Princo Juliano. Mi estas la plej feliĉa filo de la mondo, miaj karaj amikoj! Kaj Maksimos, — jes, li rajte portas sian nomon — Maksimos estas la plej granda homo, kiu iam vivis.

Gregoro de Nazianz (*estas forironta*). Ni volis nur vidi vin, sinjoro!

Princo Juliano. Ĉu tio povus tiel fremdigi unu fraton je alia? Vi time forkuras de la misteraĵo. Ho, jes, mi ne miras pri tio. Tiel mi ankaŭ forkuris antaŭ ol mi estiĝis klarvidanta kaj antaŭ ol mi tion konjektis, kio estas la kerno de la vivo.

Basilios de Cezarea. Kion vi nomas la kerno de la vivo?

Princo Juliano. Maksimos scias tion. En li estas la nova apokalipso.

Basilios de Cezarea. Kaj ĝi estiĝos via propraĵo?

Princo Juliano. Preskaŭ. Mi tuj ekhavos ĝin. Jam en tiu ĉi nokto Maksimos promesis al mi —

Gregoro de Nazianz. Maksimos estas fanatikulo aŭ li trompis vin!

Princo Juliano. Kiel vi kuraĝas juĝi pri la kaŝitaj aferoj? Tio superas vian instruitecon, mia Gregoro! La vojo al la granda feliĉego estas terura. La revuloj en Eleŭziso preskaŭ trovis la ĝustan postsignon; Maksimos trovis ĝin, kaj mi poste — kondukita per lia mano. Mi vagis tra mallumaj fendegoj. Malhela marĉa akvo estis ĉe mia maldekstra flanko; — mi opiniis ke ĝi estas rivero, kiu ne plu povas flui. Akraj voĉoj parolis en la nokto, mistike, subite kaj kvazaŭ sen ĉiuj kaŭzoj. De tempo al tempo mi vidis bluetan lumon, teruraj figuroj preterkuris min; — mi iris kaj iris en morta angoro; sed mi eltenis la provon. — De post tiu tempo, — ho, miaj karaj — mi estis longe kun tiu ĉi mia anim-ŝanĝita korpo plej interne en la paradizo; anĝeloj kantis por mi siajn himnojn; mi vidis la plej mezan lumon —.

Gregoro de Nazianz. Ve al tiu malpia Maksimos! Ve al tiu diabla idolana ĵonglisto!

Princo Juliano. Blindeco, blindeco! Maksimos estimas sian antaŭulon; li estimas ambaŭ siajn grandajn fratojn, ne nur la leĝdoninton el Sinaj sed ankaŭ la antaŭvidanton el Nazaret — Ĉu vi scias kiel la spirito de ekkono venis super mi? — Tio okazis en nokto sub preĝado kaj fastado. Tiam estis al mi, kvazaŭ mi estus portata tre malproksimen en la spaco kaj ekster la tempon; ĉar ĉirkaŭ mi estis hele luma tago, kaj mi staris sola sur ŝipo kun malstreĉitaj veloj, en la mezo de la hele lumanta greka maro. Insuloj leviĝis unuj sur aliajn, kiel malpezaj nubtavoloj, malproksimen en la malproksimo kaj la ŝipo kuŝis peza kvazaŭ ĝi dormis sur la vin-blua akvo —. Sed jen tiu akvo estiĝis pli kaj pli travidebla, pli malpeza kaj klara; fine ĝi tute malaperis kaj mia ŝipo ŝvebpendis super malplena terura abismo. Sub ĝi estis nek verdaĵo, nek suno, sed nur morta, muka, nigra marfundo en tuta sia terureco. — Sed supre, en la senfina arkaĵo, kiu pli frue ŝajnis al mi malplena, — tie estis vivo, tie estiĝis nediferencigeblaj formoj kaj el la silento estiĝis sonoj. — Tiam mi komprenis la grandan liberigantan ekkonon.

Gregoro de Nazianz. Kiun ekkonon vi celas?

Princo Juliano. Kio estas, tio ne estas; kaj kio ne estas, tio estas.

Basilios de Cezarea. Ho, vi pereos en tiu ŝpinaĵo de lumo kaj nebulo!

Princo Juliano. Mi? Ĉu mirakloj ne okazas? Ĉu iuj signoj kaj strangaj okazintaĵoj inter la steloj ne antaŭdiras, ke la dia volo intencas pri mi ion ankoraŭ ne klarigitan?

Gregoro de Nazianz. Ne fidu tiajn signojn; vi ne povas scii, kies laboro ili estas.

Princo Juliano. Ĉu mi ne fidos feliĉ-anoncantajn signojn, kiuj jam veriĝis? (*Li tiras ilin al si pli proksimen kaj diras mallaŭte.*) Mi povas komuniki al vi, miaj amikoj, ke granda ŝanĝo estas komenciĝonta. Cezaro Galos kaj mi dividos post mallonga tempo la mond-superpotencon, — li kiel imperiestro, kaj mi kiel — jes, kiel mi nomos ĝin. La nenaskiĝinta ne povas esti nomata,

ĉar nomon ĝi ne havas. Ni do ne plu parolu pri tio ĝis kiam ĝi realiĝos. Sed pri la Cezaro mi certe kuraĝas paroli. — Ĉu vi scias ion pri tiu vizio, pro kiu oni malliberigis kaj turmentis la burĝon Apolinaris en Sidono?

Basilios de Cezarea. Ne, ne, kiel ni povus scii —?

Princo Juliano. Apolinaris rakontis, ke nokte li aŭdis kelfoje frapi iun sur lian pordon. Li ellitiĝis kaj eliris la domon, kaj jen — ekstere li vidis aperaĵon — viron aŭ virinon — tion li ne sciis. Kaj la aperaĵo parolis al li kaj ordonis ke li pretigu purpuran vestaĵon kiel ĝin portas nove elektita reganto. Sed ĉar tiam Apolinaris en teruro volis rifuzi tian danĝeran aferon, malaperis subite la aperaĵo kaj voĉo diris: iru, Apolinaris kaj pretigu baldaŭ la purpuran vestaĵon!

Gregoro de Nazianz. Ĉu estis tiu signo, pri kiu vi ĵus diris, ke ĝi estis realiĝinta?

Princo Juliano (*kapjesas malrapide*). Sep tagojn poste mortis la edzino de la Cezaro en Bitunia. Konstantina estis ĉiam lia malbona anĝelo; tial ŝi devis esti forigata, konforme al la ŝanĝo, kiu estiĝis en la dia volo. Tri semajnojn post la morto de Konstantina venis en Antioĥia'n sendito de la imperiestro, la tribunio Skudilo kun granda sekvantaro, faris al Cezaro Galos imperiestran honoron kaj en la nomo de la imperiestro invitis lin kiel gaston al la korteg-tendaro en Romo. — La vojaĝo de Cezaro estas nun kvazaŭ procesio de venkinto tra la landoj. En Konstantinopolo li aranĝis konkurs-kuron en la hipodromo, kaj la rigardantoj ĝojkriis laŭte, ĉar li, kvankam nur Cezaro laŭnome, sin prezentis laŭ la maniero de la antaŭaj imperiestroj kaj enmanigis la girlandon al tiu Koraks, la gajninto de la konkurs-kuro. Tiel mirinde Dio refoje altigas nian familianon, kiu degeneriĝis sub peko kaj persekuto.

Gregoro de Nazianz. Strange. En Ateno aliaj famoj diskuris.

Princo Juliano. Mi ricevis certan sciigon. La purpura vestaĵo urĝas, Gregoro! Kaj ĉu mi dubus ankoraŭ pri aferoj, kiujn Maksimos komunikis al mi kiel baldaŭajn okazontaĵojn por mi? Tiun ĉi nokton falos la lasta vualo. Tie ĉi la granda enigmo estos solvata. Ho, restu ĉe mi, miaj fratoj, — restu ĉe mi dum

tiuj ĉi nokthoroj, plenaj de timo kaj espero! Vi estos atestantoj kiam Maksimos venos —.

Basilios de Cezarea. Neniam.

Gregoro de Nazianz. Neeble; ni estas vojaĝantaj hejmen al Kapadokio.

Princo Juliano. Kio tiel subite pelis vin el Grekujo?

Basilios de Cezarea. Mia patrino estas vidvino, Juliano!

Gregoro de Nazianz. Mia patro estas malforta pri korpo kaj spirito, li bezonas helpon.

Princo Juliano. Ho restu — nur ĝis morgaŭ!

Gregoro de Nazianz. Neeble, niaj samvojaĝantoj ekvojaĝos je tagiĝo.

Princo Juliano. Je tagiĝo? Antaŭ noktomezo povas tagiĝi por vi.

Basilios de Cezarea. Juliano, ne lasu min foriri en tro granda timo. Diru al mi — kio okazos, kiam Maksimos estos solvinta ĉiujn enigmojn por vi?

Princo Juliano. Ĉu vi memoras la riveron pri kiu skribis Strabon, — tiu rivero kies fontoj estas sur la libia monto? Ĝi altiĝas dum sia irado, sed kiam ĝi estiĝas granda, ĝi eniras en la sablon de la dezerto kaj enterigas sin mem en la sinon de la tero, el kiu ĝi naskiĝis.

Basilios de Cezarea. Vi do ne aspiras la morton, Juliano?

Princo Juliano. Tion, kion vi sklave aspiras post la morto, tio estas ĝuste la granda misterplena celo, akirebla sur la ĉi-tiea tero por ĉiuj kunsiantoj; tio estas la renaskiĝo, kiun serĉas Maksimos kaj liaj lernantoj — tio estas la perdita simileco kun la dieco. Kial vi dubas, ho fratoj? Kial vi staras tie, kiel antaŭ io netransirebla? Mi scias, kion mi scias. En ĉiu el la ŝanĝigantaj familioj estas unu animo, en kiu renaskiĝis la pura Adam; ĝi estis forta en la legdonanta Moseo; en la macedona Aleksandro ĝi havas la potencon submeti la mondon; ĝi estis preskaŭ perfekta en Jesuo el Nazaret. Sed rigardu, Basilios, (*li kaptas lian brakon*) al ili ĉiuj mankis tio, kio estas promesita al mi, nome la pura virino!

Basilios de Cezarea (*liberigas sin*). Juliano, Juliano!

Gregoro de Nazianz. Mokanto — tien vin altiris la aroganteco de via koro!

Basilios de Cezarea. Ho, Gregoro, li estas malsana kaj freneza!

Princo Juliano. Kialtiu ĉi sarkasma dubo? Ĉu estas mia maldika staturo, kiu atestas kontraŭ mi? Ha, ha, mi diras vin, ke pereos tiu dika, karneca generacio. La naskiĝonta ricevos pli multe de la spirito ol de la korpo. En la unua Adam estis egalpezo kiel en tiuj statuoj de dio Apolono. Poste la egalpezo ne plu ekzistos. Ĉu Moseo ne havis balbutantan langon? Ĉu oni ne devis subteni liajn brakojn, kiam li levis ilin admonante tie ĉe la ruĝa maro? Ĉu la Macedono, por entuziasmiĝi, ne devis uzi alkoholaĵojn kaj aliajn artefaritajn rimedojn? Kaj Jesuo de Nazaret? Ĉu li ne havis malfortan korpon? Ĉu li ne ekdormis surŝipe dum la aliaj restis maldormaj? Ĉu li ne falis sub la kruco, kiun la judo Simon senpene portis? La du rabistoj ne falis teren —. Vi nomas vin kredantoj, kaj tamen tiel malmulte fidas pri la mirakla forto de apokalipso. Atendu, atendu, vi vidos; — la fianĉino sendube estos donita al mi, kaj tiam —, manon en mano ni iros orienten, tien, kie oni diras ke naskiĝis Helioso, — en la solecon, kaŝi nin kiel dioj sin kaŝas, serĉi la paradizon ĉe Eŭfrato, trovi ĝin, kaj de tie — ho glorego — de tie iros sur la tero nova generacio en beleco kaj egalpezo — tie, ho skribaĵ-ligitaj dubantoj, estos fondata la imperio de la spirito!

Basilios de Cezarea. Ho, mi devas malĝoje tordi miajn manojn pro vi! Ĉu vi estas la sama Juliano, kiu forlasis Konstantinopolon antaŭ tri jaroj?

Princo Juliano. Tiutempe mi estis blinda, kiel nun vi! Mi konis nur la vojon, kiu finiĝas ĉe la dogmaro.

Gregoro de Nazianz. Ĉu vi scias kie finiĝos via vojo?

Princo Juliano. Tie, kie vojo kaj celo estas unu. — Por la lasta fojo, Gregoro, Basilios, — mi petegas vin, restu ĉe mi. La vizio, kiu aperis antaŭ mi en la estinta nokto — tiu, kaj multaj aliaj — signifas misteran interligon inter ni. Al vi, mia Basilios, mi havis tiel multe por diri. Vi ja estas la estro de via parenco; kaj kiu scias, ĉu ne ĉio allogata, kio estas al mi permesata, — ĉu ne per vi kaj en via domo —.

Basilios de Cezarea. Neniam! Laŭ mia volo neniu estos tirata en vian frenezecon kaj sovaĝajn revojn.

Princo Juliano. Ho, kion vi parolas pri volo? Mi vidas skribantan manon sur la muro; baldaŭ mi klarigos ĝian skribaĵon.

Gregoro de Nazianz. Venu, Basilios!

Princo Juliano (*kun etenditaj brakoj*). Ho, amikoj, amikoj!

Gregoro de Nazianz. De tiu ĉi tempo ni estas disigitaj.

(Li tiras Basilion kun si; ambaŭ foriras dekstren.)

Princo Juliano (*postrigardas ilin dum momento*). Jes, iru! iru, iru! Kion vi instruitaj viroj scias! Kion vi kunportas de la urbo de saĝeco? Vi, mia forta obstina Gregoro, — kaj vi Basilios, *kiu estas pli multe knabino ol viro, — vi konas nur du stratojn en Ateno, la straton al la urbo kaj la straton al la lernejo kaj al la preĝejo; la trian straton, al Eleŭziso kaj pli malproksimen, tiun vi ne konas, kaj eĉ pli malmulte —. Ha!

(La kurteno dekstre estas ŝovata flanken. Du servistoj en orientlandaj vestoj enportas altan kovritan objekton, kiun ili starigas en angulo malantaŭ la tablo. Tuj poste eniras tra la sama porde Maksimos, la mistikisto. Li estas malgrasa, mezkreska viro kun bruna, akcipitron-similanta vizaĝo; liaj haroj kaj barbo estas tre grizaj, kun escepto de la tufaj brovoj kaj lipharoj, kiuj estas ankoraŭ peĉe nigraj. Li surhavas pintan ĉapon kaj longan nigran vestaĵon; en la mano li havas blankan bastonon.)

Mistikisto Maksimos (*ne atentante Juliano'n, iras al la kovrita objekto, ekhaltas kaj signodonas al la servistoj; ili foriras ambaŭ*).

Princo Juliano (*mallaŭte*) Fine!

Mistikisto Maksimos (*forprenas la kovrilon; oni vidas lampon el bronzo sur alta tripiedo; poste li aperigas etan arĝentan kruĉon kaj enverŝas oleon en la lampon, kiu ekflamiĝas per si mem kaj disŝetas fortan ruĝetan lumon*).

Princo Juliano (*en streĉita atendo*). Ĉu la horo venis?

Mistikisto Maksimos (*ne atentante lin*). Ĉu viaj animo kaj korpo estas puraj?

Princo Juliano. Mi fastis, kaj oleoŝmiris min.

Mistikisto Maksimos. Tiam povas komenciĝi la dumnokta solenaĵo! (*li donas signon; dancistinoj kaj flutistoj aperas en la antaŭ-korto. Muziko kaj danco okazas dum tio, kio sekvas.*)

Princo Juliano. Maksimos, — kio estas tio?

Mistikisto Maksimos. Rozoj sur la haroj! Ŝaŭmanta vino!
Rigardu, rigardu tie la belajn korpojn dum la dancado!

Princo Juliano. Kaj meze de tiu ekbulo de la sentoj vi volas —?

Mistikisto Maksimos. Via peko estas nur en via rigardo al la peko.

Princo Juliano. Rozoj sur la haroj! Ŝaŭmanta vino! (*li sin fetas sur kusenon apud la tablo, malplenigas plenan pokalon, formetas ĝin rapide kaj demandas.*) Ha, kio estis en la vino?

Mistikisto Maksimos. Fajrero de la fajro, kiun ŝtelis Prometeŭs.
(*Li ekkuŝas sur kusenon apud la alia flanko de la tablo.*)

Princo Juliano. Miaj sentoj ŝanĝas sian agadon: mi aŭdas la lumon kaj mi vidas la sonojn.

Mistikisto Maksimos. La vino estas la animo de la vinbero!
La liberigita, memvola kaptito! Logos in Pan!

La dancantaj knabinoj (*kantas en la antaŭ-korto*).

Vin liberigu
Sang'de Bahuso; —
Ritme luliĝu
Sur ond'ruliĝanta!

Princo Juliano (*trinkas*). Jes, jes, liberigo estas en ebriceco!
Ĉu vi povas klarigi tiun feliĉegecon?

Mistikisto Maksimos. La ebriceco estas via edziĝofesto kun la animo de la naturo,

Princo Juliano. Dolĉa enigmo! Tentanta, alloganta —! Kiu estas tio? Kial vi ridis?

Mistikisto Maksimos. Mi?

Princo Juliano. Io flustras ĉe mia maldekstra flanko! La silka kuseno kraketas —

(*Li ekpaliĝas kaj salletas.*)

Maksimos, ni ne estas solaj!

Mistikisto Maksimos (*vokas*). Ni estas kvinope ĉetable!

Princo Juliano. Festeno kun spiritoj!

Mistikisto Maksimos. Kun ombroj.

Princo Juliano. Nomu al mi la gastojn!

Mistikisto Maksimos. Ankoraŭ ne! Aŭskultu, aŭskultu!

Princo Juliano. Kio estas tio? Io kiel ventego muĝas tra la domo.

Mistikisto Maksimos (*ekkrias*). Juliano! Juliano! Juliano!

Princo Juliano. Parolu, parolu. Kio okazas al ni?

Mistikisto Maksimos. La horo de la promeso estas super vi!

Princo Juliano. (*salte leviĝas kaj retiriĝas de la tablo.*) Ha! (*la lampoj sur la tablo saĝnas estingiĝi; super la granda bronza lampo sin levas bluetaj lumcirkloj.*)

Mistikisto Maksimos (*sin ŝetas teren*). Direktu la okulojn al la lumo!

Princo Juliano. Tien?

Mistikisto Maksimos. Jes, jes!

Knabinoj (*kantas mallaŭte en la antaŭ-korto*)

Ŝpinas kaptilon

Nokto vidanta;

Kaj vin enlogas

Deziro ridanta.

Princo Juliano (*fikse rigardas la lumcirklojn*). Maksimos! Maksimos!

Mistikisto Maksimos (*mallaŭte*). Ĉu vi vidas ion?

Princo Juliano. Jes.

Mistikisto Maksimos. Kion vi vidas?

Princo Juliano. Mi vidas helan vizaĝon en la lumo.

Mistikisto Maksimos. Ĉu de viro aŭ de virino?

Princo Juliano. Mi ne scias.

Mistikisto Maksimos. Parolu al ĝi.

Princo Juliano. Ĉu mi kuraĝas?

Mistikisto Maksimos. Parolu; parolu!

Princo Juliano (*pli proksime*). Kial mi naskiĝis?

- La voĉo en la lumo. Por servi la spiriton.
 Mistikisto Maksimos. Ĉu ĝi respondas?
 Princo Juliano. Jes, jes.
 Mistikisto Maksimos. Demandu plue.
 Princo Juliano. Kio estas mia destino?
 La voĉo en la lumo. Vi fondos la regnon.
 Princo Juliano. Kiun regnon?
 La voĉo en la lumo. La regnon.
 Princo Juliano. Sur kiu vojo?
 La voĉo en la lumo. Sur la vojo de la libereco.
 Princo Juliano. Finparolu! Kio estas la vojo de la libereco?
 La voĉo en la lumo. La vojo de la neceso.
 Princo Juliano. Per kiu potenco?
 La voĉo en la lumo. Per tiu de la volo.
 Princo Juliano. Kion mi devos voli?
 La voĉo en la lumo. Tion, kion vi devas.
 Princo Juliano. Ĝi paliĝas; ĝi foriĝas; ĝi malaperis —! (*pli proksime*) Parolu, parolu! Kion mi devas?
 La voĉo en la lumo (*ve-kriante*). Juliano!
 (*La lumcirklo disfandiĝas; la lampoj sur la tablo lumas kiel antaŭe.*)
 Mistikisto Maksimos (*rigardas supren*). Ĝi malaperis?
 Princo Juliano. Jes.
 Mistikisto Maksimos. Ĉu vi estas nun scianta?
 Princo Juliano. Pli malmulte ol iam. Mi pendas super kapturniganta profundaĵo — meze de lumo kaj mallumo. (*li kuŝiĝas refoje*). Kio estas la regno?
 Mistikisto Maksimos. Ekzistas tri regnoj.
 Princo Juliano. Tri?
 Mistikisto Maksimos. Unue tiu regno, fondita sur la arbo de sciado; due tiu, kiu estas fondita sur la arbo de la kruco —

Princo Juliano. Kaj la tria?

Mistikisto Maksimos. La tria estas la granda regno, fondota sur la arbo de sciado kaj sur tiu de la kruco kune, ĉar ĝi amas kaj malamas ilin ambaŭ, kaj ĉar ĝi havas sian vivantan fonton en la ĝardeno de Adam kaj sub Golgota.

Princo Juliano. Kaj tiu regno venos —?

Mistikisto Maksimos. Ĝi estas venonta. Mi kalkulis kaj kalkulis.

Princo Juliano (*interrompas lin subite*). Io flustras refoje. Kiuj estas miaj gastoj?

Mistikisto Maksimos. La tri bazangulaj ŝtonoj sub la kolero de la neceso.

Princo Juliano. Kiuj, kiuj?

Mistikisto Maksimos. La tri grandaj helpantoj de la neigo.

Princo Juliano. Nomu ilin!

Mistikisto Maksimos. Tion mi ne povas; mi ne konas ilin; — sed mi povus montri ilin al vi —

Princo Juliano. Montru ilin al mi! Tuj, Maksimos —!

Mistikisto Maksimos. Singardu!

Princo Juliano. Tuj; tuj! Mi volas vidi ilin; mi parolos al ili, al unu post alia.

Mistikisto Maksimos. La kulpo estu super vi mem!

(*Li ŝvingas sian bastonon kaj vokas:*)

Ekprenu formon kaj aperu, ho unua oferota ŝafido de la elekto!

Princo Juliano. Ha!

Mistikisto Maksimos. (*kun kaŝita vizaĝo*) Kion vi vidas?

Princo Juliano. (*mallaŭte*) Jen li kuŝas, apud la angulo. — Li estas granda kiel Heraklo, kaj bela — sed ne, ne — — (*hezitante*) Parolu al mi, se vi povas!

Voĉo. Kion vi volas scii?

Princo Juliano. Kio estis via tasko en la vivo?

La voĉo. Mia kulpo.

Princo Juliano. Kiel vi estiĝis kulpa?

La voĉo. Kial mi ne estiĝis mia frato?

Princo Juliano. Nenia elturniĝo. Kiel vi estiĝis kulpa?

La voĉo. Kial mi restis mi mem?

Princo Juliano. Kaj kion vi volis, kiel vi mem?

La voĉo. Tion, kion mi devis.

Princo Juliano. Kaj kial vi devis?

La voĉo. Mi estis mi.

Princo Juliano. Vi estas ŝparema pri vortoj.

Mistikisto Maksimos. (*ne rigardante supren*). In vino veritas.

Princo Juliano. Vi ĝuste trafis, Maksimos! (*li elverŝas plenan pokalon antaŭ la neokupita sidloko*) Banu vin en vinaromo, mia pala gasto! Refreŝigu vin. Rigardu — ĝi ŝvebas supren kiel oferfumo.

La voĉo. Oferfumo ne ĉiam ŝvebas supren.

Princo Juliano. Kial tiu strio sur via frunto ruĝiĝas? Ne, ne — ne kaŝu ĝin per la haroj. Kio estas tio?

La voĉo. La signo.

Princo Juliano. Hm; ni ne plu parolu pri tio. Kaj kiun frukton portis via kulpo?

La voĉo. La plej ĉarman.

Princo Juliano. Kion vi nomas la plej ĉarma?

La voĉo. La vivo.

Princo Juliano. Kaj la kaŭzo de la vivo?

La voĉo. La morto.

Princo Juliano. Kaj tiu de la morto?

La voĉo. (*forperdiĝas kvazaŭ en ĝemon*) Jes, tio estas la enigmo!

Princo Juliano. Malaperinte!

Mistikisto Maksimos. (*rigardas supren*) Ĉu li estas for?

Princo Juliano. Jes.

Mistikisto Maksimos. Ĉu vi konis lin?

Princo Juliano. Jes.

Mistikisto Maksimos. Kiu li estis?

Princo Juliano. Kain.

Mistikisto Maksimos. Tiun vojon sekve! Ne esploru plue!

Princo Juliano (*faras geston per ambaŭ manoj*) La duan, Maksimos!

Mistikisto Maksimos. Ne, ne, ne, — mi ne faros tion!

Princo Juliano. La duan, diras mi! Vi jure promesis min, ke mi funde scios kelkajn aferojn. La duan, Maksimos! Mi volas vidi lin; mi volas koni miajn gastojn!

Mistikisto Maksimos. Vi volis, ne mi. (*li svingas la bastonon*) Aperu kaj montru vin, ho bonvolanta sklavo, vi, kiu helpis ĉe la estonta granda mondsanĝo!

Princo Juliano. (*streĉe rigardas momenton al la malplena spaco; subite li defend-etendas la manon al la sidloko apud si kaj diras mallaŭte.*) Ne pli proksimen!

Mistikisto Maksimos. (*deturnas sin.*) Ĉu vi lin vidas?

Princo Juliano. Mi vidis lin kiel ruĝbarban viron. Li havas ŝiritajn vestojn kaj ŝnuron ĉirkaŭ la kolo. — Parolu al li, Maksimos!

Mistikisto Maksimos. Vi parolu!

Princo Juliano. Kio vi estis en la vivo?

Voĉo. (*tre proksime ĉe li*). La dek-dua rado de la mondveturilo.

Princo Juliano. La dek-dua? La kvina jam estas sentaŭga.

La voĉo. Kien estis ruliĝinta la veturilo sen mi?

Princo Juliano. Kien ĝi ruliĝis per vi?

La voĉo. En la belegecon.

Princo Juliano. Kial vi helpis?

La voĉo. Ĉar mi volis.

Princo Juliano. Kion vi volis?

La voĉo. Tion, kion mi devis voli.

Princo Juliano. Kiu elektis vin?

La voĉo. La majstro.

Princo Juliano. Ĉu la majstro estis antaŭ-scianta kiam li elektis vin?

La voĉo. Jes, tio estas la enigmo! (*eta paŭzo*)

Mistikisto Maksimos. Ĉu vi silentas?

Princo Juliano. Li ne estas plu tie ĉi.

Mistikisto Maksimos (*rigardas supren*). Ĉu vi konis lin?

Princo Juliano. Jes.

- Mistikisto Maksimos. Kiel estis lia nomo en la vivo?
- Princo Juliano. Judas Iskariota.
- Mistikisto Maksimos (*salte leviĝas*). La abismo kreskigas florojn;
la nokto perfidas sin mem!
- Princo Juliano (*krias al li*). Aperigu la trian!
- Mistikisto Maksimos. Li venos! (*svingas la bastonon.*) Aperu, vi
tria bazangula ŝtono! Aperu, tria granda liberigito sub la neceso!
(*Li refoje fetas sin sur la kusenon kaj deturnas la vizaĝon.*)
Kion vi vidas?
- Princo Juliano. Mi vidas nenion.
- Mistikisto Maksimos. Kaj tamen li estas tie ĉi (*svingas la bastonon
refoje*). Je la sigelo de Salomono, je la okulo en la triangulo, —
mi prijuras vin, — aperu! — — Kion vi vidas nun?
- Princo Juliano. Nenion; nenion!
- Mistikisto Maksimos. (*svingas refoje la bastonon.*) Aperu, vi —!
— — (*ekhaltas subite, eligas ekkrion kaj saltas for de la tablo*).
Ha, lumo en la nokto! Mi vidas ĝin; — — Ĉiu arto estas vana.
- Princo Juliano (*ekstaras*). Kial? Parolu, parolu!
- Mistikisto Maksimos. La tria ne estas ankoraŭ inter la ombroj.
- Princo Juliano. Ĉu li vivas?
- Mistikisto Maksimos. Jes, li vivas.
- Princo Juliano. Kaj tie ĉi, vi diris —!
- Mistikisto Maksimos. Tie ĉi aŭ aliloke, aŭ inter la nenaskiĝintoj;
— tion mi ne scias —.
- Princo Juliano (*estas atakonta lin*). Vi mensogas! Vi trompas
min! Tie ĉi, tie ĉi, vi diris —!
- Mistikisto Maksimos. Ellasu mian mantelon!
- Princo Juliano. Sekve vi aŭ mi! Kiu el ni?
- Mistikisto Maksimos. Ellasu la mantelon, Juliano!
- Princo Juliano. Kiu el ni? Kiu? Ĉio dependas de tio!
- Mistikisto Maksimos. Vi scias pli multe ol mi. Kion sciigis
la voĉo en la lumo?
- Princo Juliano. La voĉo en la lumo —? (*kun ekkrio*) La regno!
la regno? fondi firme la regnon —!

Mistikisto Maksimos. La trian regnon!

Princo Juliano. Ne; kaj milfoje ne! For de mi, ruiniganto!

Mi liberigas min de vi kaj de tuta via laboro —

Mistikisto Maksimos. De la neceso?

Princo Juliano. Mi kontraŭstaras la neceson! Ĝin mi ne volas servi. Mi estas libera, libera, libera!

(Bruo eksterdome: dancistoj kaj flutistoj forkuras.)

Mistikisto Maksimos *(aŭskultas dekstren)*. Kiaj teruro kaj ekkrioj —?

Princo Juliano. Fremduloj perforte penetras en la domon —

Mistikisto Maksimos. Oni batofendas viajn servistojn; oni volas murdi nin!

Princo Juliano. Estu kvieta; neniu povas tuŝi nin.

Dominspektoro Eŭterios *(rapide enirante el la antaŭkorto)*.
Sinjoro, sinjoro!

Princo Juliano. Kiu kaŭzas tiun bruadon ekstere?

Dominspektoro Eŭterios. Fremduloj ĉirkaŭis la domon; ili starigis gardistojn ĉe ĉiuj elirejoj; ili perforte eniras. — Jen ili venas, sinjoro! Jen ili estas!

(Kvestoro Leontes kun granda belega sekvantaro eniras de dekstre.)

Kvestoro Leontes. Centfoje mi petas pardonon, mia plej indulga sinjoro —.

Princo Juliano *(malantaŭiras unu paŝon)*. Kion mi vidas!

Kvestoro Leontes. Viaj servistoj volis rifuzi al mi la eniron; kaj ĉar estis al mi plej grave —

Princo Juliano. Ĉu tie ĉi en Efeso, mia brava Leontes!

Kvestoro Leontes. Multajn tagojn kaj noktojn mi vojaĝis kiel sendito de la imperiestro.

Princo Juliano *(pala)*. Al mi? Kion la imperiestro volas de mi? Mi vere konscias nenian krimon. Mi estas malsana, Leontes! Tiu viro *(li fingre montras Mistikiston Maksimos)* estas ĉe mi kiel kuracisto.

Kvestoro Leontes. Permesu al mi, plej indulga sinjoro —!

Princo Juliano. Kial oni perforte eniras mian domon? Kio estas la volo de la imperiestro?

Kvestoro Leontes. Li volas ĝojigi vin, sinjoro, per granda kaj grava sciigo.

Princo Juliano. Mi petas vin, diru al mi kiun sciigon vi alportas.

Kvestoro Leontes (*genufleksas*). Mia plej eminenta sinjoro, — laŭdante mian kaj vian feliĉon, mi salutas vin kiel Cezaron.

La sekvantaro de la Kvestoro. Longe vivu Cezaro Juliano!

Mistikisto Maksimos. Cezaro! .

Princo Juliano (*postenpaŝas kun ekkrio*). Cezaro! — Ekstaru Leontes! Kian frenezaĵon vi parolas!

Kvestoro Leontes. Mi alportas la sciigon de la imperiestro.

Princo Juliano. Mi — mi Cezaro! — Ha, kie estas Galos?

Kvestoro Leontes. Ho, ne demandu.

Princo Juliano. Kie estas Galos? Mi prijuras vin, — kie estas Galos?

Kvestoro Leontes (*ekstaras*). Cezaro Galos estas ĉe sia amata edzino.

Princo Juliano. Mortinta!

Kvestoro Leontes. Feliĉege ĉe sia edzino.

Princo Juliano. Mortinta; mortinta! Galos mortinta! Mortis meze de sia triumf-procesio! Sed kiam, — kie, kie?

Kvestoro Leontes. Ho, kara sinjoro, indulgu min —

Gregoro de Nazianz (*luktas kontraŭ la gardisto ĉe la enirejo*). Mi devas eniri al li! Flanken, diras mi. — Juliano!

Princo Juliano. Gregoro, frato. — Jen vi revenis!

Gregoro de Nazianz. Ĉu estas tio vera, kion la famo kiel sago-pluvo diskonigis tra la urbo?

Princo Juliano. Mi mem estas kvazaŭ trafita de la famsago. Ĉu mi povas kredi tiun mikson de feliĉo kaj malfeliĉo?

Gregoro de Nazianz. Pro Kristo, repuŝu de vi la tentanton!

Princo Juliano. La ordono de la imperiestro, Gregoro!

Gregoro de Nazianz. Vi volas ekpaŝi sur la sangkovritan korpon de via frato —

Princo Juliano. Sangkovrita —?

Gregoro de Nazianz. Ĉu vi ne scias tion? Cezaro Galos estas murdita.

Princo Juliano (*kunfrapas la manojn*) Murdita!

Kvestoro Leontes. Ha, kiu estas tiu trokuragulo — ?

Princo Juliano. Murdita; murdita! (*al Leontes*) Li ja mensogas?

Kvestoro Leontes. Cezaro Galos falis pro siaj faroj.

Princo Juliano. Murdita! — Kiu murdis lin?

Kvestoro Leontes. Kio okazis, estis necesajo, alta sinjoro! Cezaro Galos malbon-uzis la povon kiel furiozulo tie ĉi en la orientaj landoj. Lia pozicio kiel Cezaro ne plu sufiĉis al li. Lia konduto en Konstantinopolo kaj aliloke survoje klare montris, kion li intencis.

Princo Juliano. Mi ne demandas pri lia kulpo; tion alian mi volas scii.

Kvestoro Leontes. Ho, lasu min indulgi viajn fratajn orelojn.

Princo Juliano. Miaj frataj oreloj povas suferi, kion suferis miaj filaj oreloj. Kiu murdis lin?

Kvestoro Leontes. La tribuno Skudio, kiu akompanis lin, opiniis konsilinde ekzekutigi lin.

Princo Juliano. Kie? Do ne en Romo?

Kvestoro Leontes. Ne, sinjoro, ĝi okazis mezvoje tien, — en la urbo Pola en Ilirujo.

Princo Juliano (*klinas sin*). La imperiestro estas granda kaj justa. — La lasta de la familio, Gregoro! Imperiestro Konstantios estas granda.

Kvestoro Leontes (*prenas purpuran mantelon de unu el la sekvantaro*). Alta Cezaro, permesu al mi vesti vin per —

Princo Juliano. Ruĝa! Fortiun veston! Ĉu li portis ĝin en Pola — ?

Kveston Leontes. Nova ĝi venis el Sidono.

Princo Juliano (*kun rigardo al Maksimos*). El Sidono! La purpura vestaĵo —!

Mistikisto Maksimos. La vizio de Apolinaris!

Gregoro de Nazianz. Juliano; Juliano!

Kvestoro Leontes. Rigardu, ĝi estas sendata al vi de via parenco, la imperiestro. Li sciigas al vi, ke li, seninfana, esperas, ke vi volus sanigi tiun plej profundan vundon de lia vivo. Li deziras vidi vin en Romo. Plue estas lia volo, ke vi kiel Cezaro iru al Gaŭlujo. La alemana lim-popolo transiris la Rejnjon kaj faris danĝeran invadon en la imperion. Li fidas pri viaj feliĉo kaj sukceso kontraŭ la barbaroj. En sonĝo iuj aferoj sin malkovris al li, kaj lia lasta vorto al mi dum mia forvojaĝo estis, ke vi certe sukcesos fondi la regnon.

Princo Juliano. Fondi la regnon! La voĉo en la lumo, Maksimos! Mistikisto Maksimos. Signo kontraŭ signo.

Kvestoro Leontes. Kiel, alta Cezaro?

Princo Juliano. Ankaŭ al mi estas malkovritaj iuj aferoj; sed — Gregoro de Nazianz. Diru „ne”, Juliano! Ĝi estas la flugiloj de la perejo, kiujn oni volas ligi sur viajn ŝultrojn.

Kvestoro Leontes. Kiu vi estas, kiu kontraŭstaras la imperiestron? Gregoro de Nazianz. Mia nomo estas Gregoro, mi estas filo de la episkopo en Nazianz; — faru kun mi, kion vi volas.

Princo Juliano. Li estas mia amiko kaj frato; neniu tuŝu lin!
(*Granda aro da homoj intertempe plenigis la antaŭ-korton.*)

Basilios de Cezarea (*trabuŝas sin tra la homamaso*).

Ne prenu la purpuron, Juliano!

Princo Juliano. Vi ankaŭ, mia fidela Basilios!

Basilios de Cezarea. Ne prenu ĝin. Pro Dio—

Princo Juliano. Kio timigas vin en tio?

Basilios de Cezarea. La teruraĵoj, kiuj venos.

Princo Juliano. Per mi la regno estos fondata.

Basilios de Cezarea. La regno de Kristo?

Princo Juliano. La granda bela regno de la imperiestro.

Basilios de Cezarea. Ĉu estis la regno de la imperiestro, kiu staris en lumo antaŭ vi, kiam vi, kiel infano, anoncis la kredon sur la tomboj de la kapadociaj martiroj? Ĉu vi foriris de Konstantinopolo por fondi la regnon de la imperiestro sur la tero? Ĉu ĝi estis la regno de la imperiestro —?

Princo Juliano. Nebuloj, nebuloj; — ĉio tio kuŝas post mi, kiel sovaĝa sonĝo.

Basilios de Cezarea. Estus por vi pli bone, se vi mem, kun muellilŝtono ĉirkaŭ la kolo, kuŝus sur la fundo de la maro, ol ke tiu sonĝo kuŝus post vi. — Ĉu vi ne vidas la laboron de la tentulo? Ĉiu belegajo de la tero kuŝas antaŭ viaj piedoj.

Mistikisto Maksimos. Signo kontraŭ signo, Cezaro!

Princo Juliano. Unu vorton, Leontes! (*kaptas lian manon kaj kondukas lin flanken*). Kien vi kondukos min?

Kvestoro Leontes. Al Romo, sinjoro!

Princo Juliano. Pri tio mi ne demandas. Kien vi kondukos min, al feliĉo kaj potenco, — aŭ al la buĉejo?

Kvesotro Leontes. Ho, sinjoro, tia sarkasma malfido —

Princo Juliano. La korpo de Galos ankoraŭ apenaŭ putris.

Kvestoro Leontes. Mi povas forigi ĉiun dubon. (*aperigas leteron*) Tiu letero de la imperiestro, kiun plej volonte mi enmanigus al vi sekrete. —

Princo Juliano. Letero? Kion li skribis? — (*li malfermas la leteron kaj legas*) Ha, Helena! — Ho, Leontes! Helena, — Helena la mia!

Kvestoro Leontes. La imperiestro donas ŝin al vi, sinjoro! Li donas al vi tiun sian amatan fratinton, kiun Cezaro Galos vane petis de li.

Princo Juliano. Helena la mia? La neatingeblan mi akiris! — Sed ŝi, Leontes —?

Kvestoro Leontes. Ĉe mia adiaŭo li prenis la manon de la princo kaj kondukis ŝin al mi. Fluo da virgulina sango ruĝigis ŝiajn belajn vangojn, ŝi mallevis la okulojn kaj diris: Salutu por mi mian amatan kuzon kaj sciigu al li, ke li ĉiam estis la viro, kiun — —

Princo Juliano. Plue, Leontes!

Kvestoro Leontes. Post tiuj vortoj ŝi eksilentis, la ĉasta pura virino.

Princo Juliano. La pura virino! — Mirakle ĉio realiĝas! (*li vokas laŭte*) Surmetu sur min la purpuran mantelon!

Mistikisto Maksimos. Ĉu vi elektis?

Princo Juliano. Mi elektis, Maksimos!

Mistikisto Maksimos. Ĉu vi elektis spite al signo kontraŭ signo?

Princo Juliano. Ĉi tie signo ne staras kontraŭ signo. Maksimos, Maksimos, vi estas blinda, vi vidanto! — Surmetu sur min la purpuran mantelon!

(Kvestoro Leontes vestas lin per la mantelo.)

Basilios de Cezarea. Okazis!

Mistikisto Maksimos. *(murmuretas al si mem kun levitaj manoj)*
Venko kaj lumo super la volanto!

Kvestoro Leontes. Kaj nun al la domo de la guberniestro; la popolo volas saluti Cezaron.

Princo Juliano. Cezaro restas en sia plialtigo tiu sama, kiu li estis, — la malriĉa saĝec-amanto, kiu prenis ĉion de la imperiestra indulgo. — Al la domo de la guberniestro, ho bonaj sinjoroj!

Voĉoj inter la sekvantaro de Leontes. Flankenigu, flankenigu por Cezaro Juliano!

(Ĉiuj foriras tra la antaŭkorto sub aplaŭdo de la aro; nur Gregoro de Nazianz kaj Basilios de Cezarea restas starantaj.)

Basilios de Cezarea. Gregoro! Kio ajn okazos, — ni tenu nin kune.

Gregoro de Nazianz. Jen mia mano!

AKTO KVARA.

(Ĉe Lutecia en Gaŭlujo. Salono en la palaco de Cezaro, nomata „La varmaj banoj”, ekster la urbo. Enirejoj en la fundo; dekstre alia pordego, sur la antaŭscenejo maldekstre estas fenestro kun kurteno.)

Princino Helena, riĉe vestita, kun perloj en la haroj, sidas en brakseĝo kaj rigardas tra la fenestro. Sklavino Mira staras antaŭ ŝi kaj tenas flanken la kurtenon.)

Princino Helena. Kia svarmado! La tuta urbo iras renkonte al ili. — Ŝt, Mira, — ĉu vi ne aŭdas la flutojn kaj la tamburojn?

Sklavino Mira. Jes, ŝajnas al mi ke jes —

Princino Helena. Vi mensogas! La bruado estas tro granda; vi povas aŭdi nenion (*salte levigas.*) Ho, tiu turmenta necerteco! Ne scii ĉu li venas kiel venkinto aŭ kiel forkuranto.

Sklavino Mira. Ne timu, mia regantino; la Cezaro venis ja ĉiam kiel venkinto.

Princino Helena. Jes, pli frue; post ĉiuj malgrandaj bataletoj; sed tiun ĉi fojon, Mira! Tiu ĉi granda, terura batalego. Ĉiuj tiuj kruciĝantaj famoj. Se la Cezaro estus veninta kiel venkinto, kial do li estus sendinta leteron al la urbestro kaj malpermesinta iri renkonte al li kun oracioj ekster la pordego?

Sklavino Mira. Ho, vi ja scias, regantino, kiel malmulte via alta edzo ŝatas tiajn aferojn.

Princino Helena. Jes, jes, estas vere. Kaj se li estus malvenkinta ian batalon — en Romo oni ja devus tion scii — ĉu la imperiestro tiam estus iriginta al ni senditon, kiu devos esti tie ĉi hodiaŭ, kaj tiun kuriston, kiu portis al mi ĉiujn tiujn multekostajn ornamaĵojn kaj donacojn? Ha, Eŭterios! Nu, nu?

Dominspektoro Eüterios (*venas tra la meza pordo*). Princino, estas absolute neeble sciigi ion certan —

Princino Helena. Ĉu neeble? Vi trompas min! La soldatoj do devas mem scii —

Dominspektoro Eüterios. Estas nur barbaraj subten-trupoj, kiuj enmarŝas, — Batavoj kaj aliaj, — kaj tiuj scias nenion.

Princino Helena (*tordas siajn manojn*). Ho, ĉu mi meritas tian turmentadon! Dolĉa, sankta Kristo, ĉu mi ne alvokis vin nokte kaj tage — (*aŭskultas kaj ekkrias*). Ha, mia Juliano! Mi aŭdas lin! — Juliano; mia amata!

Cezaro Juliano (*en polvo-kovrita armaĵo, venas rapide tra la fundo*). Helena!

Dominspektoro Eüterios. Mia alta Cezaro!

Cezaro Juliano (*ĉirkaŭbrakas ŝin pasie*) Helena! — Fermu ĉiujn pordojn, Eüterios!

Princino Helena. Malvenkita! Persekutita!

Dominspektoro Eüterios. Sinjoro!

Cezaro Juliano. Du gardistojn ĉe ĉiu pordo; neniu enŝteliĝu. Ĉu ne venis ankoraŭ sendito de la imperiestro?

Dominspektoro Eüterios. Ne, sinjoro; sed sendito estas atendata.

Cezaro Juliano. Iru for! (*al la sklavino*) Foriĝu! (*Dominspektoro Eüterios kaj Mira foriras tra la fundo.*)

Princino Helena (*falas en brakseĝon*). Jen ĉio finiĝis je ni!

Cezaro Juliano (*kuntiras la kurtenojn*). Kiu scias? Se ni estos singardaj, la uragano eble povos —

Princino Helena. Post tia malvenko —?

Cezaro Juliano. Ĉu malvenko? Pri kio vi parolas, mia amata?

Princino Helena. Ĉu la alemanoj ne venkobatis vin?

Cezaro Juliano. Vi ne estus revidinta min vivan, se ili estis venkobatintaj min.

Princino Helena (*salte leviĝas*). Sed; ho ĉiela Dio, kio do okazis?

Cezaro Juliano (*mallaŭte*). La plej malbona, Helena; — grandega venko.

Princino Helena. Venko, vi diras! Grandega venko. Vi venkis, kaj tamen —?

Cezaro Juliano. Vi ne povas kompreni, kiel estas mia stato. Vi konas nur la orajn eksteraĵojn de la mizero de Cezaro.

Princino Helena. Juliano!

Cezaro Juliano. Ĉu vi povas malaprobi, ke mi kaŝis ion tian por vi? Ĉu devo kaj honto ne ordonis ke —? Ha, — kio estas tio? Kia ŝanĝo —!

Princino Helena. Kio? kio?

Cezaro Juliano. Kia ŝanĝo je vi en tiuj monatoj! Helena, ĉu vi estas malsana?

Princino Helena. Ne, ne; sed diru al mi —!

Cezaro Juliano. Jes, vi estis malsana! Verŝajne vi estas ankoraŭ malsana; tiuj febraj tempioj, tiuj blue-brunaj arkoj sub la okuloj —

Princino Helena. Ho, estas nenio, mia amata! Ne rigardu min, Juliano! Nur angoro kaj sendormaj noktoj pro vi; ardaĵ preĝoj al la plej alte benita sur la kruco —

Cezaro Juliano. Indulgu vin, karulino; estas ja tre necerte ĉu tiu favoro estas tiel fruktedona.

Princino Helena. Fi; via animo ne estas pia. — Sed parolu pri viaj propraj aferoj, Juliano! Mi petas vin, kaŝu por mi nenion.

Cezaro Juliano. Nenio povas plu esti kaŝata. Post la morto de la imperiestrino mi ne povis fari unu paŝon tie ĉi en Gaŭlujo, kiu ne estis malbone klarigata ĉe la kortego. Kiam mi kondukis singarde kontraŭ la alemanoj, oni diris, ke mi estas timema kaj senlabora. Oni mokis pri la saĝec-amiko, kiu ne bone povis kutimiĝi porti la armaĵon. Kiam mi havis sukceson kontraŭ la barbaroj, mi devis aŭdi, ke la sukceso devus esti pli granda.

Princino Helena. Sed ĉiuj viaj amikoj en la armeo —

Cezaro Juliano. Kiuj laŭ via opinio estas miaj amikoj en la armeo? Ne unu, mia amata Helena! Jes, unu sola, — tiu perusia kavaliro Salusto, al kiu mi devis rifuzi justan peton dum nia edziĝofesto en Mediolanum. Grandanime li venis al mi en la tendaron, memorigis min pri nia iama amikeco en Ateno kaj petis sekvi

min en ĉiuj miaj danĝeroj. Sed kion influas Salusto ĉe la imperiestra kortego? Li estas ja unu el tiuj, kiujn oni tie nomas idolanoj. Li ne povas esti utila al mi. Kaj la aliaj! Militestro Arbetio, kiu forlasis min, kiam mi estis ĉirkaŭita de malamikoj en Senones! La maljuna Severus, kiu suferas sub la sento de sia propra netaŭgeco kaj tamen ne povas samopinii pri mia nova strategio! Aŭ ĉu vi kredas, ke mi povas min apogi al Florentius — la pretorianestro? Mi diras al vi, tiu malkvieta viro aspiras la plej altajn aferojn!

Princino Helena. Ha, Juliano!

Cezaro Juliano (*iras tien kaj reen*). Se mi nur povus malkaŝi iliajn intrigojn! Ĉiusemajne sekretaj leteroj estas sendataj el la tendaro al Romo. Ĉio, kion mi entreprenas, estas raportata kaj malbone klarigata. Nenia sklavo en la imperio estas tiel katenita, kiel mi. Ĉu vi scias, Helena, la mangajolisto, laŭ kiu mia kuiristo devas prepari la mangajon, estas sendata al li de la imperiestro, kaj mi ne rajtas fari ian ŝanĝon en ĝi, nek per aldonoj nek per forigoj!

Princino Helena. Kaj ĉion tion vi sekrete suferis —!

Cezaro Juliano. Ĉiuj scias tion, nur ne vi. Ĉiuj mokas pri la senpotenceco de Cezaro. Mi ne eltenos tion pli longe! Mi ne volas elteni tion!

Princino Helena. Sed la batalego. — Rakontu al mi do, — ĉu la famo troigis?

Cezaro Juliano. La famo ne povas troigi. — Aŭskultu; kio estis tio? (*li aŭskultas ĉe la pordo*) Ne, ne; ŝajnis nur al mi —. Mi kuraĝas diri, ke mi faris ĉion en tiuj ĉi monatoj, kion homa povo kapablas fari. Paŝon post paŝo, kaj spite al ĉiuj kontraŭstaroj en mia armeo, mi returnen-puŝis la barbarojn al la orientaj limoj. Antaŭ Argentoratum, kun la Rejno ĉe la dorso, reĝo Knodomar kunigis siajn batalistojn. Kvin reĝoj kaj dek malpli grandaj reĝoj subtenis lin. Sed antaŭ ol li povis kolekti la necesajn boatojn por la eventuala transiro, mi igis antaŭen-marŝi mian armeon por ataki.

Princino Helena. Mia heroo, mia Juliano!

Cezaro Juliano. Lupicino kun la lancistoj kaj la malpeze armitaj ĉirkaŭiris norde la malamikon; la maljunaj legioj sub Severus pelis la barbarojn pli kaj pli orienten al la rivero; la batavoj, niaj liganoj, sub la fidela Bainabaŭdo, honeste subtenis la legiojn, kaj kiam Knodomar ekvidis, ke lin minacas danĝero, li klopodis forkuri suden por atingi la transe kuŝantajn insulojn. Sed antaŭ kiam tio povis okazi, mi lin atakis per Florentius kun la preto-rianoj kaj la kavalerio. Helena, mi ne volas certigi tion, sed estas sendube, ke perfido kaj ĵaluzo preskaŭ rabis al mi la fruktojn de la venko. La romanaj rajdistoj cedis fojon post fojo al la barbaroj, kiuj sin ĵetis teren kaj trapikis la ventrojn de la ĉevaloj. Mi antaŭvidis mian malvenkon. —

Princino Helena. Sed la Dio de la armeoj estis kun vi!

Cezaro Juliano. Mi kaptis standardon, ekscitis la imperiestrajn korpogardistojn per mia alvoko, rapide faris paroladon al ili, paroladon, kiu verŝajne ne estus malinda por pli klerigitaj aŭskultantoj, kaj poste, antaŭ ol la aplaŭd-krioj de la soldatoj estis rekompencintaj min, mi ĵetis min en la plej densan batal-tumulton.

Princino Helena. Juliano! Ho, vi min ne amas.

Cezaro Juliano. Tiu-momente mi ne pensis pri vi. Mi volis morti; mi ne sciis alian elirejon. Sed ĝi venis, mia amata. Estis kvazaŭ fulme trafanta teruro elbrilis el niaj lancpintoj. Mi vidis Knodomar'on, tiun timindan militiston — jes, vi ja mem vidis lin — mi vidis lin forkuri piede for de la batalejo, kaj kun li forkuris lia frato Vestralp kaj la reĝoj Hortar kaj Suomar kaj ĉiuj, kiuj ne estis falintaj sub niaj glavoj.

Princino Helena. Ho, mi vidas tion; mi vidas tion! Benata Savinto; estis vi, kiu refoje sendis viajn mortanĝelojn de la mulviska ponto!

Cezaro Juliano. Neniam mi aŭdis tiajn ve-kriojn; neniam mi vidis tiajn terurajn vundojn, kiel tiuj, en kiujn ni metis la piedojn, kiam ni iris trans la falintojn. La rivero faris la ceteron; la dronantoj batalis unuj kontraŭ aliaj ĝis ili turniĝante subakviĝis funden. La plej multaj el la reĝoj falis vivaj en niajn manojn; Knodomar mem serĉis rifuĝejon en kan-densejon; unu el lia

sekvantaro perfidis lin; niaj pafistoj sendis sagopluvon en lian kaŝejon, sed lin ne trafis. Tiam li eliris memvole kaj kapitulaciis.

Princino Helena. Kaj post tia venko vi ne sentas vin ekster danĝero?

Cezaro Juliano. (*hezitante*). Post la venko, ankoraŭ la saman vesperon, estiĝis okazo, io negrava —

Princino Helena. Okazo?

Cezaro Juliano. Prefere mi nomas ĝin tia. En Ateno ni cerbumis tiel multe pri Nemesiso. — Mia venko estis tiel grandega, Helena; mia situacio estis perdinta sian egalpezon; mi ne scias —

Princino Helena. Ho, parolu do; vi timigas min!

Cezaro Juliano. Estis bagatelo, mi diras al vi. Mi kondukigis antaŭ min la kaptitan Knodomar'on en ĉesto de la armeo. Antaŭ la batalo li estis minacinta, ke mi estus senhaŭtigata, se mi falus en liajn manojn. Nun li iris renkonte al mi kun ŝanceliĝantaj paŝoj, tremante je la tuta korpo; rompita pro malfeliĉo li sin jetis antaŭ min laŭ kutimo de la barbaroj, ĉirkaŭbrakis miajn genuojn, elverŝis larmojn kaj petegis por la vivo.

Princino Helena. Kun la tremo de teruro en la fortaj membroj. Mi vidas la kuŝantan Knodomar'on. — Ĉu vi mortigis lin, mia amata?

Cezaro Juliano. Mi ne povis mortigi tiun viron. Mi promesis al li la vivon kaj ke mi sendos lin kiel kaptiton al Romo.

Princino Helena. Ne turmentinte lin?

Cezaro Juliano. Prudenteco ordonis al mi agi milde. Sed jen, — mi ne komprenas kiel tio okazis, — en abundo de la feliĉo, kaj kun kriego sur la lipoj, la barbaro salte levigis, levis la ligitajn manojn, kaj malmulte sciante nian lingvon, li vokis laŭtvoĉe: laŭdata vi estu, Juliano, vi potenca imperiestro!

Princino Helena. Ha!

Cezaro Juliano. Miaj akompanantoj volis ridi pri tio; sed la voko de la barbaro trafis kiel eksplodanta fulmo inter la soldatoj; „Vivu imperiestro Juliano“, ekkriis la ĉirkaŭstarantoj, kaj

la ekkrio rapidis pluen kaj pluen ĝis la plej granda malproksimo; — estis kvazaŭ Titano estis ĵetinta monton en la oceanon; — ho, mia amata, pardonu al mi tiun idolanan komparon, sed —

Princino Helena. Imperiestro Juliano! Li diris: imperiestro Juliano!

Cezaro Juliano. Kion tiu sovaĝa alemano sciis pri Konstantios, kiun li neniam vidis? Mi, lia venkinto, estis por li la plej granda.

Princino Helena. Jes, jes; sed la soldatoj —?

Cezaro Juliano. Mi riproĉis ilin severe; ĉar mi estis rimarkinta, ke Florentius, Severus kaj kelkaj aliaj staras senmove ĉirkaŭe, palaj pro teruro kaj kolero.

Princino Helena. Jes, jes, — sed la soldatoj.

Cezaro Juliano. Apenaŭ pasis unu nokto, antaŭ ol miaj sekretaj malamikoj estis false klarigintaj la aferon. Ili sciigis, ke Cezaro igis Knodomar'on proklami lin imperiestro kaj ke rekompence li lasis la vivon al la barbara reĝo. — Tiamaniere tiu inversigita sciigo estis ankaŭ sendata al Romo.

Princino Helena. Ĉu vi estas certa pri tio? Kaj de kiu?

Cezaro Juliano. Jes, de kiu? de kiu? Mi mem skribis rapide al la imperiestro kaj rakontis ĉion al li, sed —

Princino Helena. Nu, — kaj kion li respondis?

Cezaro Juliano. Kiel ordinare. Vi konas la malfeliĉ-anoncantan silenton, se li volas trafi iun.

Princino Helena. Mi kiedas tamen, ke vi malbone komprenis ĉion tion. Estas neeble alie. Kredu min, la sendito baldaŭ venos por alporti al vi certecon, por ke —

Cezaro Juliano. Certecon mi havas, Helena! Tie ĉi sur mia brusto mi kaŝas ŝtel-kaptitajn leterojn, kiuj —

Princino Helena. Ho, Sinjoro mia Dio, montru ilin!

Cezaro Juliano. Pli malfrue, pli malfrue. (*li iras tien kaj reen*). Kaj ĉio tio post la servoj, kiujn mi faris al li! Mi malprosperigis la atakon de la alemanoj por longa tempo, dum li mem suferis malvenkon post malvenko ĉe la Danubo, kaj dum la armeo en Azio ne povas antaŭeniri unu paŝon kontraŭ la Persoj. Malhonoro kaj malfeliĉo ĉie, escepte tie ĉi, kie oni metis ĉe la fronto de la

armeo kontraŭvolan saĝec-amikon. Kaj tamen mi estas plue mokegata ĉe la kortego. Jes, eĉ post la lasta granda venko oni faris mokpoemon pri mi kaj nomis min Viktorinus! Tio devas finiĝi.

Princino Helena. Jes, mi samopinias.

Cezaro Juliano. Kion valoras la alt-ofico de Cezaro sub tiaj cirkonstancoj!

Princino Helena. Ne, vi estas prava, Juliano; tion ni ne povas toleri.

Cezaro Juliano (*ekhaltas*). Helena, ĉu vi povus sekvi min?

Princino Helena (*mallaŭte*). Ne dubu pri mi; mi ne perdos la kuraĝon.

Cezaro Juliano. Sekve, for de tiuj maldankaj penoj; for, al la tiel longe dezirita soleco —!

Princino Helena. Kion vi diras? Soleco!

Cezaro Juliano. Kun vi, mia amata; kaj kun miaj karaj libroj, kiujn mi nur tiel malofte povis malfermi, kaj al kiuj mi povis dediĉi min nur en la sendormaj noktoj.

Princino Helena (*rigardas malsupren al li*). Ha, tiel!

Cezaro Juliano. Kiel alie?

Princino Helena. Nu jes; kiel alie?

Cezaro Juliano. Jes, jes; — mi demandas, kiel alie?

Princino Helena (*pli proksime*). Juliano, — kiel salutis vin la barbara reĝo?

Cezaro Juliano (*paŝas malantaŭen*) Helena!

Princino Helena (*ankoraŭ pli proksime*). Kia estis la nomo, kiu resonis en la vicoj de la soldatoj?

Cezaro Juliano. Nesingardemulino, eble aŭskultanto staras malantaŭ la pordo.

Princino Helena. Kial timigus vin la aŭskultantoj? Ĉu la favoro de Dio ne estas super vi? Ĉu vi ne estis la plej feliĉa en ĉiuj bataloj? — Mi vidis la admonantan Savinton; mi vidis la anĝelon kun la fajra glavo, kiu ebenigis la vojon por mia patro, kiam li ĵetis Maksentius'on en la Tiberon!

Cezaro Juliano. Mi leviĝus kontraŭ la regnestro de la imperio!

Princino Helena. Nur kontraŭ tiuj, kiuj staras inter vi. Ho, iru; batu ilin per la fulmo de via kolerio; faru finon je tiu min konsumanta kaj senĝoja vivo! Gaŭlujo estas dezerto. Al mi malvarmiĝas tie ĉi, Juliano! Mi volas reveni al mia hejmo, al Romo kaj al Grekujo.

Cezaro Juliano. Hejmen al via frato?

Princino Helena (*mallaŭte*). Konstantios estas kaduka.

Cezaro Juliano. Helena!

Princino Helena. Mi ne eltenos pli longe tie ĉi, mi diras. La tempo pasas. Eŭsebia mortis; ŝia neokupita seĝo staras tie invitante al honoro kaj beleĝeco, dume mi maljuniĝas —

Cezaro Juliano. Vi ne maljuniĝas; vi estas juna kaj bela!

Princino Helena. Ne, ne, ne! La tempo pasas; mi ne povas suferi tion pacience; la vivo foriras de mi!

Cezaro Juliano (*rigardas ŝin*). Kiel allogante bela, kiel dia vi estas!

Princino Helena (*ŝin premas al li*). Ĉu mi estas tia, Juliano?

Cezaro Juliano (*ĉirkaŭbrakas ŝin*). Vi estas la sola virino, kiun mi amis, — la sola, kiu amas min.

Princino Helena. Mi estas pli aĝa, ol vi. Mi ne volas aĝiĝi pli multe. Kiam ĉio finiĝis, tiam —

Cezaro Juliano (*liberigas ŝin de ŝia ĉirkaŭbrako*). Eksilentu! Mi volas aŭdi nenion plu.

Princino Helena (*postiras lin*). Konstantios mortas iom post iom kaj tagon post tago; li pendas per unu haro super la tombo. Ho, mia amata Juliano, vi ja havas la soldatojn por vi —

Cezaro Juliano. Eksilentu!

Princino Helena. Li povas elteni nenian anim-emocion. Kial do heziti? Mi ja ne intencas ion sangan. Fi, kiel vi povus pensi tion? La ektimo sufiĉas; tiu lin ĉirkaŭbrakas kaj ame finos liajn dolorojn.

Cezaro Juliano. Ĉu vi forĝesis pri la nevideblaj korpogardistoj ĉe la sanktoleito?

Princino Helena. Kristo estas bona. Ho, estu pia, Juliano, tiam li pardonos multe. Mi helpos. Mi suprensendos preĝojn por vi. Laŭdataj estu la sanktuloj! Laŭdataj estu la viktimoj! Kredu min, poste ni pentofaros ĉion. Donacu al mi la alemanojn por konverti; mi volas dissendi pastrojn inter ili, ili sin klinos sub la indulgo de la kruco.

Cezaro Juliano. La alemanoj sin ne kurbos sub ĝi.

Princino Helena. Tiam ili mortu! Kiel dolĉa fumo la sango supreniros al Li, la alte benita. Ni plimultigos Lian belegecon; Lian gloron ni diskonigos. Mi mem ĉeestos. La alemanaj virinoj estos miaj! Se ili sin ne kurbos, ili estos oferataj! Kaj poste, mia Juliano, — se vi poste revidos min —; plijuniĝinta, plijuniĝinta! Donacu al mi la alemanajn virinojn, ho amata! Sango —, tio ja ne estas murdo, kaj la rimedo estos ne-erarebla —, bano en juna virgulin-sango —

Cezaro Juliano. Helena, vi pekas!

Princino Helena. Ĉu estas krimo, peki pro vi!

Cezaro Juliano. Vi bela, vi ununura!

Princino Helena (*sin klinas antaŭ liaj manoj*). Mia sinjoro antaŭ Dio kaj homoj! — Ne cedu tiun ĉi fojon, Juliano! Mia heroo, mia imperiestro! Mi vidas la ĉielon malfermita. La pastroj gloros Kriston; miaj virinoj kunariĝos en preĝo. (*kun levitaj brakoj*.) Ho, vi, benita! Ho vi, reganta Dio, — vi, kiu havas la favoron kaj la venkon en via mano —

Cezaro Juliano (*kun rigardo al la pordo*). Helena!

Princino Helena. Ha!

Dominspektoro Eŭterios (*en la fundo*). Sinjoro, la sendito de la imperiestro —

Cezaro Juliano. Ĉu li venis?

Dominspektoro Eŭterios. Jes, sinjoro!

Cezaro Juliano. Lia nomo? Kiu li estas?

Dominspektoro Eŭterios. La tribunano Decentius.

Princino Helena. Ĉu vere? La pia Decentius!

Cezaro Juliano. Kun kiu li parolis?

Dominspektoro Eŭterios. Kun neniu, sinjoro; li ĵus alvenis.

Cezaro Juliano. Mi volas vidi lin tuj. Kaj aŭskultu; la armeestro kaj la militestro devos ankaŭ alveni tien ĉi.

Dominspektoro Eŭterios. Bone, plej indulga sinjoro! (*li foriras tra la fundo*).

Cezaro Juliano. Nu, mia Helena, nun montriĝos —

Princino Helena (*mallaŭte*). Kio ajn montriĝos, ne forgesu, ke vi povas fidi al la soldatoj.

Cezaro Juliano. Ha, fidi al —; mi ne scias, ĉu mi povas fidi al iu ajn.

(*La tribuno Decentius venas de la fundo.*)

Princino Helena (*iras renkonte al li*). Estu bonvena, nobla Decentius! Romana vizaĝo, — kaj precipe tiu vizaĝo; — ho, tio ĵetas vivantan sunradion super nian malmildan Gaŭlujon.

Tribuno Decentius. La imperiestro duonvoje iras renkonte al viaj deziro kaj espero, alta princino! Ni povas kredi, ke Gaŭlujo ne plue retenos vin.

Princino Helena. Ĉu vi diras tion, vi ĝojalportanto? La imperiestro do ĉiam pensis pri mi kun amo? Kiel estas la stato de lia sano?

Cezaro Juliano. Iru, iru, mia amata Helena!

Tribuno Decentius. La sano de la imperiestro neniel fariĝis pli malbona.

Princino Helena. Ne, ĉu ne vere? Tion mi sciis. Ĉiuj tiuj malĝojigaj famoj —; Dio estu glorata, ke estis nur malkvietigantaj famoj! Danku lin kore, ho pia Decentius! Kaj ricevu mem mian dankon. Per kiuj multekostaj donacoj vi do anoncis vian alvenon! Imperiestraj donacoj —; vere, frataj donacoj! Du brilantaj nigraj Nubianoj, — vi devus vidi ilin, mia Juliano! — kaj perloj! Tiujn mi jam portas. Kaj fruktoj, — dolĉaj, ŝvelantaj; ha! persikoj el Damasko, persikoj en oraj tasoj! Kiel ili refreŝigos min; — fruktoj, fruktoj; mi marasmiĝas tie ĉi en Gaŭlujo.

Cezaro Juliano. La tago finiĝos kun ĝojmanĝo; sed unue la aferoj. Iru, mia kara edzino!

Princino Helena. Mi iras preĝejon, — por preĝi por mia frato kaj ĉiuj esperoj. (*Ŝi foriras dekstren.*)

- Cezaro Juliano (*post mallonga pripenso*). Sciigo aŭ letero?
- Tribuno Decentius. Leteroj. (*li donas al li paperrulaĵon.*)
- Cezaro Juliano (*legas, subpremas rideton kaj etendas la manon.*)
Pli multaj!
- Tribuno Decentius. Alta Cezaro, tio estas proksimume ĉio.
- Cezaro Juliano. Vere? Ĉu la imperiestro irigis sian amikon sur tian longan vojon nur por —? (*li eksplodas en mallongan ridon, poste li iras tien kaj reen*). Ĉu la alemana reĝo Knodomar alvenis Romon antaŭ via forvojaĝo?
- Tribuno Decentius. Jes, alta Cezaro!
- Cezaro Juliano. Kaj kiel li helpas sin en la fremda lando, kies lingvon li ne scias? Jes, li estas plej nescianta, Decentius! Li estis kiel ridindaĵo por miaj soldatoj. Imagu, ke li miksis tre ordinaraĵojn kiel imperiestro kaj Cezaro.
- Tribuno Decentius (*levas la ŝultrojn*). Barbaro. Kion oni diru pri tio?
- Cezaro Juliano. Jes, kion oni diru? Sed la imperiestro do estas favora al li?
- Tribuno Decentius. Knodomar estas mortinta, sinjoro!
- Cezaro Juliano (*mirigita*). Ĉu Knodomar estas mortinta?
- Tribuno Decentius. En la tendaro de la fremduloj sur la Keŭla monto.
- Cezaro Juliano. Mortinta? — Jes, la aero en Romo estas mal-saniga.
- Tribuno Decentius. La alemana reĝo mortis pro nostalgio, sinjoro!
Dezirego al familio kaj libereco —
- Cezaro Juliano. — tio marasmigas, Decentius, jes, mi scias tion. —
— Mi ne devus sendi lin viva al Romo; mi devus mortigi lin tie ĉi.
- Tribuno Decentius. La koro de Cezaro estas milda.
- Cezaro Juliano. Hm —! Nostalgio? Jes, jes! (*al la ĉevalestro Sintula, kiu venas de la fundo*) Ĉu vi estas tie, maljuna faŭno. Ne tentu min plu. (*al Decentius*) Post la batalo de Argentoratum li ĉiam parolas al mi pri triumfaro kaj la blankaj ĉevaloj. (*al Sintula*). Tio estus la veturo de Fajtono kun la libiaj sun-ĉevaloj: Kiel ĝi finiĝis? Ĉu vi forgesis pri tio — mi preskaŭ

dirus — ĉu vi forgesis pri via idolaneco? — Pardonon, Decentius, se mi vundis vian pian orejon.

Tribuno Decentius. Cezaro tiklas la orelojn de sia servisto; sed ne vundas ilin.

Cezaro Juliano. Jes, jes; estu indulga je Cezaro, kiam li ŝercas. Mi vere ne povas kompreni ĝin alimaniere. Jen ili venas.

(Armekondukisto Severus, la ĉefo de la pretorianoj Florentius, kaj multaj militestroj kaj sinjoroj de la kortego de Cezaro Juliano venas el la fundo.)

Cezaro Juliano (*iras renkonte al ili*). Bonan matenon, ho sammilitistoj kaj amikoj! Ne ofendiĝu, ĉar mi envokis vin rekte el la vojkoto kaj penado; mi certe devus havigi al vi kelkajn horojn da ripozo, sed —

Florentius. Ĉu okazis io grava, sinjoro?

Cezaro Juliano. Jes, vere, tiel estas. Ĉu vi povas diri al mi, — kio mankas al la feliĉo de Cezaro?

Florentius. Kio do mankas al la feliĉo de Cezaro?

Cezaro Juliano. Nenio plu (*al Decentius*). La armeo estas postulinta, ke mi triumf-procesie eniru la urbon. Ili deziras, ke mi ĉe la fronto de la legioj eniru tra la pordegoj de Lutecia. La kaptitaj reĝoj de la barbaroj marŝu kun katenitaj manoj flanke de la ĉaroradoj, virinoj kaj sklavoj de dudek venkitaj triboj sekvu; premkune, kapon ĉe kapo — (*eksilentas subite*). Ĝoju, miaj kuraĝaj kumbatalantoj; jen vi vidas tribunon Decentius, la intiman amikon kaj konsilanton de la imperiestro. Li venis hodiaŭ matene kun donacoj kaj salutoj el Romo.

Florentius. Ha, tiam mankas tre certe nenio al la feliĉo de Cezaro. Armekondukisto Severus (*mallaŭte al Florentius*). Nekomprenible! Sekve refoje en la favoro de la imperiestro!

Florentius (*mallaŭte*). Ho, tiu ŝanganima imperiestro!

Cezaro Juliano. Ŝajnas, kvazaŭ mirinda muteco ekprenis vin ĉiujn. — Oni opinias, ke la imperiestro faris tro multe, bona Decentius!

Florentius. Kiel Cezaro povas ekpensi tion?

Armekondukisto Severus. Ĉu tro multe, alta Cezaro? Neniel.

Ĉu la imperiestro ne povus elekti la ĝustajn limojn por sia favoro?
Florentius. Tio tre certe estas granda kaj eksterordinara disting-
aĵo —

Armekondukisto Severus. Mi volas nomi ĝin supermezure
granda kaj eksterordinara.

Florentius. Kaj precipe ĝi montras brilantan pruvon pri tio, ke
la koro de nia majesta imperiestro estas libera de ĉiu envio.

Armekondukisto Severus. Pruvo sen ekzemplo; tion mi povas
diri.

Florentius. Sed kiel multe Cezaro efektivigis dum tiuj malmultaj
jaroj en Gaŭlujo!

Cezaro Juliano. Jarlonga sonĝo, ho karaj amikoj! Mi nenion
efektivigis. Nenion, nenion!

Florentius. Kaj tion via modesteco konsideras nenio? Kio estis
la armeo kiam vi ĝin transprenis? Senorda bando —

Armekondukisto Severus. — sen unueco, sen obeemo, sen
gvido —

Cezaro Juliano. Trograndigo, Severus.

Florentius. Kaj ĉu ne estis kun tiuj senbridaj bandoj, ke vi marŝis
kontraŭ la alemanoj; ĉu vi ne batis ilin per tiuj bandoj, kiujn
vi per la prospero de la venko transformis en armeon de venkintoj;
ĉu vi ne returne-venkis Kolonia Agripina —?

Cezaro Juliano. Oj, oj, vi rigardas per okuloj de amikeco, mia
Florentius! — Aŭ ĉu estas vere vera? Ĉu estas vere, ke mi forpelis
la barbarojn for de la rejnaj insuloj? Ĉu estas vere, ke mi faris
la dezertigitan Tres Taberne defendebla, tiel ke ĝi estiĝis ŝirmo
kaj utilo de la regno? Ĉu tio vere estas vera?

Florentius. Kiel, sinjoro, ĉu vi povas dubi pri tiaj grandaj faroj?

Cezaro Juliano. Vere, ŝajnas al mi. — Kaj la batalo ĉe Argento-
ratum? Ĉu mi ankaŭ ne estis tie? Estas al mi, kvazaŭ mi venko-
batis Knodomar'on. Kaj post la venko —; Florentius, ĉu mi
sonĝis aŭ rekonstruis la kastelon de Trojano, kiam mi enmarŝis
en la germanan regionon?

Florentius. Alta Cezaro, ĉu ekzistas frenezulo, kiu volus pridisputi
kontraŭ vi tiun honoron?

Armekondukisto Severus (*al Decentius*). Mi laŭdas la sorton, kiu permesis al mi en mia maljuna aĝo sekvi tian feliĉan kondukiston.

Florentius (*ankaŭ al la tribuno*). Mi ne kuraĝas pripensi, kiun ŝanĝon tiu alemana ekatako povus efektiviĝi sen la kuraĝo kaj saĝeco de Cezaro.

Multaj soldatestroj (*prempuŝiĝas antaŭen*). Jes, sinjoro, Cezaro estas granda!

Aliaj sinjoroj (*frapetas siajn manojn*). Cezaro estas senkomparebla!

Cezaro Juliano (*rigardas momenton ĵen al Decentius, ĵen al la aliaj; poste li eksplodas en laŭtan mallongan ridon*). Tiel blinda estas la amikeco, Decentius! Tiel blinda, blinda! (*li turnas sin al la ceteraj kaj frapas sur la paper-rulaĵon, kiun li tenas en la mano*) Ĉi tie staras tute aliaj aferoj! Aŭskultu, kion mi diras kiel refreŝigantan roson de ekono. Jen la sciigo de la imperiestro al ĉiuj guberniestroj ĉie en la regno; — nia bonega Decentius alportis kopiaĵon. Ĉi tie estas skribite: mi efektivigis nenion en Gaŭlujo. Estis nur sonĝo, kiel mi ĵus diris, estis sonĝo. Jen ni havas la proprajn vortojn de la imperiestro: estis sub la feliĉaj patroneco de la imperiestro, ke la regno estis liberigata de la danĝero, kiu minacis ĝin.

Florentius. Ĉiuj aferoj de la regno prosperas sub la patroneco de la imperiestro.

Cezaro Juliano. Pli multe, pli multe! Ĉi tie estas skribite, ke estas la imperiestro, kiu batalis kaj venkis ĉe la Rejno; ke estas la imperiestro, kiu ordonis la humile petantan reĝon de la alemanoj ekstari, kiu estis ĵetinta sin surgenue antaŭ li. Mi neniel en la skribaĵo povas trovi mian nomon, — nek ankaŭ la vian, Severus! Kaj tie ĉi en la priskribo pri la batalo ĉe Argentoratum —; kie mi vidis tion? jes, tie ĉi; tie ĉi estas skribite, ke estis la imperiestro, kiu aranĝis la batal-ordon; estis la imperiestro, kiu kun vivodanĝero batis sian glavon malakra, batalante en la unuaj vicoj; estis la imperiestro, kiu, per la teruro de sia ĉeesto, rapidege forkurigis la barbarojn —; legu, legu, mi diras!

Armekondukisto Severus. Alta Cezaro, viaj vortoj sufiĉas.

Cezaro Juliano. Kion vi do celas per viaj malsaĝaj vortoj, miaj amikoj? Ĉu vi volas per via trograndiganta amo al mi fari el mi paraziton, kaj grasigi min per la abundo, kiun vi rabis de la tablo de mia kuzo? Kion vi opinias, Decentius; kion vi diras pri tio? Vi vidas, ke en mia propra tendaro mi devas atenti pri miaj anoj, kiuj kelkfoje en sia blindeco, estas devojirante transirontaj la limojn de la ribelo.

Florentius (*rapide al la tribunano*). Vere, miaj vortoj estas malbone komprenitaj, se —

Armekondukisto Severus (*ankaŭ al la tribunano*). Neniam mi povus ekpensi tiel —

Cezaro Juliano. Tiel estu, miaj sambatalantoj; ni ĉiuj englutu nian arogantecon. Mi demandis antaŭe, kio mankas al la feliĉo de Cezaro. Nun vi scias tion. Estis la ekkono de la saĝeco, kio mankas al la feliĉo de Cezaro. Via arĝenta kasko ne estos kovrita per la polvo de la triumf-procesio, ho kuraĝa Florentius! La imperiestro mem triumfe procesi-enmarŝis en Romon por ni. Li sekve opinias, ke ĉiuj solenaĵoj tie ĉi estos superfluaĵoj. Iru, Sintula kaj prizorgu, ke la pripensita procesio estu malordonata. La imperiestro deziras, ke liaj soldatoj ĝnus sanigan ripozon. Estas lia volo, ke ili restu en la tendaro antaŭ la muregoj.

(*Sintula foriras tra la fundo.*)

Cezaro Juliano. Ĉu mi iam ne estis saĝec-amiko? Tion almenaŭ oni diris en Ateno kaj en Efeso. Tiel malforta estas la homa animo en la feliĉo. Mi preskaŭ fariĝis malfidela al la saĝeco. La imperiestro memorigis min pri tio. Danku lin humile, Decentius. Ĉu vi havas pli multe por anonci?

Tribuno Decentius. Ankoraŭ tion ĉi. Post ĉio, kion eksciis la imperiestro, kaj laŭ la letero, kiun vi skribis al li el Argentoratum la granda paclaboro tie ĉi en Gaŭlujo finiĝis.

Cezaro Juliano. Certe; la imperiestro, parte per sia kuraĝo, parte per sia grandanima bonfaremo —

Tribuno Decentius. La limoj de la regno ĉe la Rejna flanko estas en sendanĝereco.

Cezaro Juliano. Dank'al la imperiestro, dank'al la imperiestro.

Tribuno Decentius. Kontraŭe en la regionoj ĉirkaŭ la Danubo, la aferoj staras malbone, kaj ankoraŭ pli malbone en Azio; reĝo Sapores ĉiam pli kaj pli marŝas antaŭen.

Cezaro Juliano. La trokuraĝulo! Oni diras, ke ankoraŭ ne plaĉis al la imperiestro, neniigi lin per siaj armecondukistoj.

Tribuno Decentius. La imperiestro mem intencas neniigi lin en la estonta printempo. (*Aperigas paperrulaĵon.*) Jen lia volo, alta Cezaro!

Cezaro Juliano. Montru, montru! (*legas, poste li rigardas antaŭ si, dirante*) Estas do la volo de la imperiestro, ke —? Bone, bone, nobla Decentius! La volo de la imperiestro estos plenumata.

Tribuno Decentius. Estas necese, ke tio jam hodiaŭ okazos.

Cezaro Juliano. Jam hodiaŭ; kompreneble. Venu ĉi tien, Sintula! Nu, kie li estas? Ha! Revenigu Sintula'n! (*Kortegano foriras tra la fundo; Cezaro Juliano iras al la fenestro kaj tralegas la paperojn ankoraŭfoje.*)

Florentius (*mallaŭte al la tribuno*). Mi petas humile, ne malbone komprenu, kion mi ĵus diris. Kiam mi montris honoron al la Cezaro, mi kompreneble ne intencis —

Armecondukisto Severus. (*mallaŭte*) Neniam mi ekpensus, ke ne estus la saĝega konduko de la imperiestro, kiu kaŭzis —

Kortegano (*ĉe la alia flanko de la tribuno.*) Mi petas vin, nobla sinjoro, — parolu kelkajn vortojn je mia favoro ĉe la kortego kaj senigu min de tiu ĉi plej malagrabla ofico ĉe Cezaro, kiu —; jes, li estas la alta parenco de la imperiestro, sed —

Alia Kortegano. Bedaŭrinde mi povus rakonti al vi aferojn, kiuj tiel provas lian senliman vantecon, kiel liajn trokuraĝajn esperojn —

Cezaro Juliano. Jam hodiaŭ! Ankoraŭ unu vorton, Decentius! Estus mia plej granda deziro, ke mi povu formeti de mi tiun ĉi respondec-plenan altoficon.

Tribuno Decentius. Tion mi sciigos al la imperiestro.

Cezaro Juliano. Mi vokas la ĉielon kiel atestanton, ke mi neniam — ha, tie estas Sintula; ni do povas — (*al la tribuno*). Ĉu vi iras?

Tribuno Decentius. Mi havas la devon pritraktadi kun la armecondukistoj, alta Cezaro!

Cezaro Juliano. Sen mia pero?

Tribuno Decentius. La imperiestro ordonis al mi, indulgi lian karan parencon.

(Li foriras tra la fundo, sekvata de la ceteraj kun escepto de Sintula, kiu restas staranta ĉe la pordo.)

Cezaro Juliano *(rigardas lin dum momento)*. Sintula!

Ĉevalestro Sintula. Jes, alta sinjoro!

Cezaro Juliano. Alproksimiĝu pli multe. — Jes, vere, vi aspektas honesta. Pardonon. Neniam mi pensis pri tio, ke vi povus esti tiel sindona al mi.

Ĉevalestro Sintula. Kiel vi scias, sinjoro, ke mi estas sindona al vi?

Cezaro Juliano *(fingre montras la paper-rulaĵojn)*. Tie ĉi mi povas legi tion; jen estas skribite, ke vi devas forlasi min.

Ĉevalestro Sintula. Mi, sinjoro?

Cezaro Juliano. La imperiestro malvarbos la gaŭlan armeon, Sintula!

Ĉevalestro Sintula. Malvarbos —?

Cezaro Juliano. Jes, kio estas tio alie krom malvarbo? La imperiestro bezonas plifortigojn ĉe la Danubo kaj ankaŭ kontraŭ la persoj. Niaj batavaj kaj herulaskaj subten-soldatoj devas rapide ekmarŝi por veni en Azion jam en la printempo.

Ĉevalestro Sintula. Sed tio ja estas neebla, sinjoro! Ĉu vi ne solene jur-promesis al tiuj ĉi niaj liganoj, ke ili neniel estos uzataj ĉe la transa flanko de la Alpoj?

Cezaro Juliano. Ĝuste tiel, Sintula! La imperiestro skribis, ke mi jur-promesis tion senripense kaj sen lia konsento. Tion mi vere ne sciis, — sed tiel estas skribite. Oni volas devigi min rompi mian juron, malhonorigi min antaŭ la armeo, turni kontraŭ mi la sovaĝan koleron, eble la mort-kaŭzantajn armilojn de la barbaroj.

Ĉevalestro Sintula. Tio malsukcesos, sinjoro! La romanaj legioj oferos al vi sian bruston kiel ŝildon.

Cezaro Juliano. La romanaj legioj? Hm; — naiva amiko! El ĉiu romana legio estos elektataj tri cent soldatoj, kaj sendataj al la imperiestro laŭ la plej mallonga vojo.

Ĉevalestro Sintula. Ha, tio estas —!

Cezaro Juliano. Tio estas bone kalkulita, ĉu ne vere? Oni volas ribeligi kontraŭ mi ĉiujn arme-taĉmentojn por malarmi min.

Ĉevalestro Sintula. Kaj mi diras al vi, sinjoro, ke eĉ ne unu el viaj armekondukistoj volas kunhelpi en tio.

Cezaro Juliano. Miaj armekondukistoj ne estos tentataj. Vi estas la viro.

Ĉevalestro Sintula. Mi, mia Cezaro!

Cezaro Juliano. Jen estas skribite. La imperiestro ordonas al vi aranĝi ĉion necesan koncerne al tiu afero kaj sendi poste la elektitajn taĉmentojn al Romo.

Ĉevalestro Sintula. Kaj tio estas ordonata al mi? Tie ĉi, kie viroj kiel Florentius kaj la aĝa Severus —

Cezaro Juliano. Vi ne havas venkojn sur via pekolisto, Sintula!

Ĉevalestro Sintula. Ne, tio estas tre certe vera. Neniam oni volis havigi al mi la okazon pruvi —

Cezaro Juliano. Mi estis maljusta kontraŭ vi. Mi dankas pro via fideleco.

Ĉevalestro Sintula. Tia granda imperiestra favoro! Sinjoro, bonvolu montri al mi — —

Cezaro Juliano. Kion vi deziras vidi? Vi ja ne lasos uzi vin por tio?

Ĉevalestro Sintula. Dio malhelpu, ke mi rifuzus la ordonon de la imperiestro!

Cezaro Juliano. Sintula, — vi povus malarmi vian Cezaron!

Ĉevalestro Sintula. Cezaro ŝatis min ĉiam tre malmulte. Cezaro neniam povis pardoni al mi, ke li devis toleri ĉevalestron, kiun elektis la imperiestro.

Cezaro Juliano. La imperiestro estas granda kaj saĝa; li scias kiel li devas elekti.

Ĉevalestro Sintula. Sinjoro, — mi ardas fari mian devon; bonvolu transdoni al mi la ordonon de la imperiestro.

Cezaro Juliano (*donas al li unu el la paĉeroj*). Jen la ordono de la imperiestro. Iru kaj faru vian devon.

Sklavino Mira (*eniras rapide de dekstre*). Ho, kompatema Savinto!

Cezaro Juliano. Mira! kio estas?

Sklavino Mira. Ho, indulgema ĉielo, mia regantino —

Cezaro Juliano. Via regantino, — kio estas pri ŝi?

Sklavino Mira. Malsana aŭ freneza —; helpon, helpon!

Cezaro Juliano. Helena estas malsana!?! La kuracisto! Oribaces devas veni, Sintula! Venigu lin!

(Ĉevalestro Sintula foriras tra la fundo. Cezaro Juliano volas rapide foriri dekstren, sed venkontas en la pordo princinojn Helena'n, ĉirkaŭitan de sklavinoj. Ŝia vizaĝo estas pala kaj aspektas konfuzita. Ŝiaj haroj kaj vestoj estas senordaj.)

Princino Helena. Forigu la kombilon! For la kombilon, mi diras! Ĝi estas brulega. Fajro en la haroj; mi brulas, mi brulas!

Cezaro Juliano. Helena! Pro la volo de Dio —!

Princino Helena. Ĉu estas neniu, kiu volas helpi? Ili mortigas min per pingloj!

Cezaro Juliano. Mia Helena! Kio okazis al vi?

Princino Helena. Mira, Mira! Liberigu min de la knabinoj, Mira!

Kuracisto Oribaces (*venas el la fundo*). Kia teruraĵo estas anoncita —? Ĉu estas vere? Ha!

Cezaro Juliano. Helena! Mia amo, la lumo de mia vivo —!

Princino Helena. For de mi! Ho, dolĉa Jesuo, helpon! (*ŝi falas en la brakojn de la sklavinoj*).

Cezaro Juliano. Ŝi perdis la prudenton. Kio do estas tio, Oribaces? Rigardu ŝiajn okulojn, kiel grandaj —!

Kuracisto Oribaces. (*al Mira*.) Kion manĝis la princino. Kion ŝi manĝis aŭ trinkis?

Cezaro Juliano Ha, vi kredas —?

Kuracisto Oribaces. Respondu, virinoj, kion vi donis al la princino?

Sklavino Mira. Ni? Ho, nenion, kredu al ni; ŝi mem prenis —
Kuracisto Oribaces. Nu, nu!

Sklavino Mira. Kelkajn fruktojn; persikojn, mi kredas; — ho,
mi ne scias —

Cezaro Juliano. Fruktojn! persikojn? El tiuj, kiuj —?

Sklavino Mira. Jes — ne — ne; mi ne scias, sinjoro; — estis la
du nubianoj —

Cezaro Juliano. Helpon, helpon, Oribaces!

Kuracisto Oribaces. Ho ve, mi timas —

Cezaro Juliano. Ne, ne, ne!

Kuracisto Oribaces. Eksilentu, indulga sinjoro, ŝi rekonsciiĝas.
Princino Helena (*flustras*). Kiel subiris la suno? Ho, sankta
mistera mallumo!

Cezaro Juliano. Helena! Aŭskultu; koncentrigu viajn pensojn —

Kuracisto Oribaces. Mia alta princino —

Cezaro Juliano. Tio estas la kuracisto, Helena! (*kaptas ŝiajn
manojn*) Ne, tie ĉi, kie mi staras.

Princino Helena. (*retiras siajn manojn.*) Fi; jen li estas refoje!

Cezaro Juliano. Ŝi ne vidas min. Tie ĉi, tie ĉi, Helena!

Princino Helena. La abomenulo; — ĉiam li estas apud mi.

Cezaro Juliano. Kion ŝi celas?

Kuracisto Oribaces. Flanken, indulga sinjoro —!

Princino Helena. Dolĉa silento! Li ne supozas —; ho, mia Galos!

Cezaro Juliano. Galos?

Kuracisto Oribaces. Iru, alta Cezaro; ne estas utile —

Princino Helena. Kiel viaj mallongaj haroj bukliĝas obstine
ĉirkaŭ la nuko. Ho, tiu mallonga nuko —

Cezaro Juliano. Abismo de ĉiuj abismoj —!

Kuracisto Oribaces. La frenezeco pligraviĝas —

Cezaro Juliano. Mi ekvidas; mi ekvidas. Ni devas esplori, Ori-
baces!

Princino Helena. (*ridas mallaŭte.*) Jen li refoje volas esplori.
— Inko sur la fingroj; libropolvo sur la haroj, — nelavita;
fi, fi, kiel li malbonodoras.

Sklavino Mira. Sinjoro, ĉu vi ne ordonas, ke mi —?

Cezaro Juliano. Iru for, virino!

Princino Helena. Kiel vi povis lasi vin venki de li, ho bruna forta barbaro? Li ne povas venki virinojn. Kiel ĝi naŭzas al mi, tiu virto de senforteco.

Cezaro Juliano. Flanken, vi ĉiuj! Ne tiel proksime, Oribaces! mi mem volas observi la principinon!

Princino Helena. Ĉu vi koleras je mi, ho majesta? Galos estas ja mortinta. Senkapigita. Kia frapo ĝi devis esti! Ne estu jaluza, vi mia unua kaj lasta. Galos brulu en la fajro de la infero; — estas ja nur vi, vi, vi —!

Cezaro Juliano. Ne pli proksime, Oribases!

Princino Helena. Mortigu ankaŭ la pastron! Mi ne volas plu vidi lin. Vi ja scias pri nia dolĉa sekreto. Ho mia dumtaga sopiro! ho, mia dumnokta ravo! Estis ja vi mem, — en la formo de via servisto — en la preĝo-ĉambro; jes, jes, vi estis tie; estis vi — en la mallumo, en la aero, en vualitaj nuboj de la incenso, tiun nokton, kiam la ĝermanta Cezaro sub mia koro —

Cezaro Juliano (*paŝas malantaŭen kun ekkrio*). Ha!

Princino Helena (*kun etenditaj brakoj*). Mia amata kaj sinjoro! Mia, mia —! (*Ŝi ŝalas teren; la sklavinoj enkuras kaj ĉirkaŭas ŝin.*)

Cezaro Juliano. (*staras momenton senmove; poste li levas la kunigitajn manojn kaj ekkrias.*): Galileano!!

(*La sklavinoj portas la principinon dekstren, en la sama momento kavaliro Salusto rapide eniras tra la pordo de la fundo.*)

Kavaliro Salusto. La princino svenis! Ho, do estas vere!

Cezaro Juliano (*kaptas la kuraciston je la mano kaj kondukas lin flanken*). Diru la veron! Ĉu vi sciis antaŭ tiu ĉi tago, ke —; nu jes, vi mem komprenas; ĉu vi sciis antaŭ tiu ĉi tago ion — pri la stato de la princino?

Kuracisto Oribaces. Mi, kiel ĉiuj aliaj, sinjoro!

Cezaro Juliano. Kaj vi diris al mi nenion, Oribaces?

Kuracisto Oribaces. Kiel, mia Cezaro?

Cezaro Juliano. Kiel vi kuraĝis kaŝi al mi ion tian!

Kuracisto Oribaces. Sinjoro, estis unu afero pri kiu ni ĉiuj estis nesciantaj.

Cezaro Juliano. Kaj tio estis?

Kuracisto Oribaces. Ke Cezaro mem sciis nenion (*li volas foriri*).

Cezaro Juliano. Kien?

Kuracisto Oribaces. Klopodi ĉu la rimedoj de mia arto —

Cezaro Juliano. Mi kredas, ke via arto ne utilos.

Kuracisto Oribaces. Sinjoro, estus tamen eble, ke —

Cezaro Juliano. Ĝi ne utilos, diras mi!

Kuracisto Oribaces (*posteniĝas unu paŝon*). Alta Cezaro, estas mia devo malobei vin en tio.

Cezaro Juliano. Kiel vi klarigas al vi miajn vortojn? Iru, iru; klopodu tion, kion via arto —; savu la fratinton de la imperiestro; la imperiestro sentus sin senkonsola, se liaj karesaj antaŭzorgoj finiĝos en malfeliĉon. Jes, vi ja scias bone, ke tiuj fruktoj estis donaco de la imperiestro?

Kuracisto Oribaces. Ha!

Cezaro Juliano. Iru, iru, viro, — kaj klopodu tion, kion via arto—

Kuracisto Oribaces (*sin klinas respekte*). Mi kredas, ke mia arto estas senutila, sinjoro! (*Li foriras dekstren.*)

Cezaro Juliano. Ha, Salusto! Ĉu ne vere? La ondoj de la fatalo denove ekruliĝas minacante super nia familio.

Kavaliro Salusto. Ho, sed savo estas ankoraŭ ebla. Oribaces volas —

Cezaro Juliano (*rapide kaj kun certeco*). La princino mortas.

Kavaliro Salusto. Ho, se mi kuraĝus paroli! Se mi kuraĝus esplori la misteran fadenon en tiu infera ŝpinaĵo!

Cezaro Juliano. Estu konsolata, amiko; ĉiuj fadenoj montriĝos, kaj tiam —

Tribuno Decentius (*venas el la fundo*). Kiel mi alproksimiĝu al la vizaĝo de Cezaro? Kiel neesplorableblaj do estas la vojoj de Dio! Mi estas kvazaŭ frakasita —; se vi povus legi en mia koro! Mi, la sendito de la malfeliĉo kaj de la funebro —!

Cezaro Juliano. Jes tion vi devas diri refoje, nobla Decentius!
Kaj kiel mi trovos vortojn, sufiĉe malseverajn kaj indulgajn
por porti tion en suferebla maniero antaŭ la frata orelo de la
imperiestro!

Tribuno Decentius. Terure, ke io tia devas okazi samtempe
kun mia anonco! Kaj eĉ nun! Ho tiu fulmotondro el la sennuba
ĉielo de la esperoj!

Cezaro Juliano. Jes, tiu subite eksplodanta, ĉion englutanta
mar-uragano, ĝuste kiam la ŝipo ŝajnis esti albordiĝonta en
longe sopiratan havenon; tiu, tiu —; la doloro igas min elokventa,
Decentius, — vin, kaj min. Sed unue la aferoj: La du nubianoj
estos metataj en malliberejon kaj ekzamenataj.

Tribuno Decentius. La nubianoj, sinjoro? Ĉu vi kredas, ke mia
ekkolerigata fervoro povus toleri, ke la du senzorgaj servistoj
ankoraŭ unu momenton —?

Cezaro Juliano. Kiel? Vi do jam ne —?

Tribuno Decentius. Nomu min tro fervora viro, alta Cezaro;
sed mia amo al la imperiestro kaj al lia malfeliĉ-trafita familio,
vere devus esti tre malgranda, se ĝi en tiaj momentoj povus
kviete pripensi la aferon.

Cezaro Juliano. Vi ekzekutis ambaŭ sklavojn?

Tribuno Decentius. Ĉu ili ne sepfoje meritis la morton, la senzorg-
emuloj? Ili estis du idolanaj sovaĝuloj, sinjoro. Ilia atesto
estus senutila; estis al mi neeble ekscii pli multe de ili krom la
eldiro, ke ili estis lasintaj tiujn gravajn objektojn negarditaj
en la antaŭsalono, alirebla por ĉiuj —

Cezaro Juliano. Aha! Jes, tiel, Decentius!

Tribuno Decentius. Mi akuzas neniun. Sed, kara Cezaro, mi
avertas vin; vi estas ĉirkaŭita de malfidelaj servistoj. Via
kortego — kia fatala miskompreno! — oni kredis ekvidi
speĉon de malfavoro, aŭ kiel alie mi devas nomi ĝin — post
la instrukcioj, kiujn la imperiestro necesigite devis aranĝi,
per unu vorto —

Ĉevalestro Sintula (*venas el la fundo*). Sinjoro, vi donis al mi
ordonon, kiun mi neniel povas plenumi.

Cezaro Juliano. La imperiestro donis al vi tiun ordonon, bona Sintula!

Ĉevalestro Sintula, Reprenu ĝin de mi, sinjoro; mi vere estas tro malforta plenumi ĝin.

Cezaro Juliano. Kio okazis?

Ĉevalestro Sintula. La armeo ribelas. La legi-trupoj kaj la liganoj amasiĝis kune.

Tribuno Decentius. Spite al la volo de la imperiestro?

Ĉevalestro Sintula. La soldatoj krias, ke ili teniĝos ĉe la promesoj de la Cezaro.

Cezaro Juliano. Aŭskultu, aŭskultu; tiu blekado ekstere —!

Ĉevalestro Sintula. La amaso kuras tien ĉi —

Tribuno Decentius. Enirigu nenium!

Kavaliro Salusto (*apud la fenestro*). Estas tro malfrue; la tuta korto estas plena de minacantaj soldatoj.

Tribuno Decentius. La kara vivo de Cezaro estas en danĝero! Kie estas Florentius?

Ĉevalestro Sintula. Forkurinta.

Tribuno Decentius. La fanfaronema malkuraĝulo! Sed Severus?

Ĉevalestro Sintula. Severus diras, ke li estas malsana; li veturiĝis sin al sia bieno.

Cezaro Juliano. Mi mem volas paroli al la furioziĝantoj.

Tribuno Decentius. Ne iru de tiu ĉi loko, alta Cezaro!

Cezaro Juliano. Kial?

Tribuno Decentius. Estas mia devo, plej indulga sinjoro, estas la ordono de la imperiestro —; la vivo de lia kara parenco —; Cezaro estas mia kaptito.

Kavaliro Salusto. Ha!

Cezaro Juliano. Jen tio okazis!

Tribuno Decentius. La korpogardistoj, Sintula! Vi devas konduki la Cezaron al Romo.

Cezaro Juliano. Al Romo!

Ĉevalestro Sintula. Kion vi diras, sinjoro!

Tribuno Decentius. Al Romo, mi diras!

Cezaro Juliano. Same kiel Galos! (*vokas tra la fenestro.*) Helpon, helpon!!

Kavaliro Salusto. Forkuru, mia Cezaro! Forkuru, forkuru!

(Sovaĝaj krioj estas aŭdataj ekstere. Romanaj legi-soldatoj, batavaj subten-trupoj kaj aliaj liganoj eniras tra la fenestro. Samtempe alia amaso perforte eniras tra la fundo. Inter la antaŭaj estas la standardportisto Maŭros; virinoj, kelkaj kun infanoj sur la brakoj, sekvas la enirantojn.)

Krioj inter la soldatoj. Cezaro, Cezaro!

Aliaj voĉoj. Cezaro, kial vi perfidis nin?

Ankoraŭ aliaj. For la perfidan Cezaron!

Cezaro Juliano (*ŝetas sin kun etenditaj brakoj inter la soldatoj kaj ekkrias*). Sambatalantoj, sammilitistoj, — liberigu min de de miaj malamikoj!

Tribuno Decentius. Ha, kio estas tio —!

Sovaĝaj ekkrioj. For la Cezaron! Mortbatu Cezaron!

Cezaro Juliano. Ĉirkaŭu min, eltiru viajn glavojn!

Standardportisto Maŭros. Ili estas jam eltiritaj!

Virinoj. Frapu lin, mortbatu lin!

Cezaro Juliano. Dankon, ĉar vi venis! Maŭros! Honesta Maŭros!
Jes, jes, al vi mi povas fidi.

Batavaj soldatoj. Kiel vi kuraĝas sendi nin al la nordaj limoj?
Ĉu estas tio, kion vi ĵurpromesis al ni?

Aliaj liganoj. Ne trans la Alpojn! Al tio ni ne estas devigataj!

Cezaro Juliano. Ne al Romo! Mi ne iros tien; oni volas mortigi min, kiel oni mortigis mian fraton Galos!

Standardportisto Maŭros. Kion vi diras, sinjoro?

Tribuno Decentius. Ne kredu lin!

Cezaro Juliano. Ne tuŝu la noblan Decentius, li estas senkulpa.

Subkondukisto Laipso. Tio estas vera; Cezaro estas kulpa.

Cezaro Juliano. He, ĉu estas vi, Laipso? Kuraĝa amiko, ĉu estas vi? Vi batalis bone ĉe Argentoratum.

Subkondukisto Laipso. Ĉu Cezaro memoras tion?

Subkondukisto Varo. Liajn promesojn li ne memoras!

Cezaro Juliano. Ĉu tio ne estas la sentima voĉo de Varo, kiun mi aŭdis? Jen li venas! Via vundo resaniĝis, mi vidas. Ho, vi meritplena militisto, — ho, ke ne estus al mi permesite fari vin soldatestro!

Subkondukisto Varo. Ĉu vi vere volis tion?

Cezaro Juliano. Pardonu la imperiestron, ke li rifuzis mian peton. La imperiestro konas nenium el vi kiel mi konas vin.

Tribuno Decentius. Soldatoj; aŭskultu min —!

Multaj voĉoj. Ni havas nenium interrilaton kun la imperiestro.

Aliaj (*antaŭen prempuŝiĝas minacante*). Cezaro pravigu sin al ni!

Cezaro Juliano. Kiun povon do havas via malfeliĉa Cezaro, ho amikoj? Oni volas konduki min al Romo. Oni rifuzas al mi, ke mi ordigas miajn proprajn aferojn. Oni forprenas de mi mian parton de la militkaptitaĵo. Kvin orajn monerojn kaj funton da arĝento mi intencis donaci al ĉiu soldato, sed —

La soldatoj. Kion li diras?

Cezaro Juliano. Ne la imperiestro malpermesas tion; sed malbonaj enviemaj konsilantoj. La imperiestro estas bona, ho karaj amikoj! Ho, sed la imperiestro estas malsana; li povas efektiviĝi nenion —

Multaj soldatoj. Kvin orajn monerojn kaj funton da arĝento!

Aliaj soldatoj. Kaj tion oni rifuzas al ni!

Ankoraŭ aliaj. Kiu kuraĝas rifuzi ion al Cezaro!?

Standardportisto Maŭros. Tiel oni kondukas je Cezaro, la patro de la soldatoj!

Subkondukisto Laipso. Je Cezaro, kiu estis pli multe nia amiko ol estro! Aŭ ĉu li ne estis tia?

Multaj voĉoj. Jes, jes, tia li estis!

Subkondukisto Varo. Ĉu Cezaro, la venkinto ne rajtas elekti soldatestron, kiun li volas?

Subkondukisto Maŭros. Ĉu li ne rajtas disponi libere pri la militkaptitaĵo, kiu estas lia?

Laŭtaj ekkrioj. Jes, jes, jes!

Cezaro Juliano. Ho, kion tio utilis al vi! Kion povos utili al vi teraj posedaĵoj, vi kiuj estos forkondukataj al la plej malproksima lando por iri renkonte al necerta sorto —

La soldatoj. Ni ne iros!

Cezaro Juliano. Ne rigardu min; mi hontas, ĉar mi preskaŭ estas verŝonta larmojn kiam mi pensas pri tio, ke post malmultaj monatoj vi estos elmetataj al malsanoj, malsato kaj al la armiloj de sangavidaj malamikoj.

Multaj soldatoj (*aviĝas ĉirkaŭ li*). Cezaro! Bona Cezaro!

Cezaro Juliano. Kaj pensu pri viaj sendefendaj edzinoj kaj infanoj, kiujn ni devos postlasi en la izolitaj kabanoj! Kiu protektos tiujn kompatindajn, tiujn vidviniĝantajn kaj eble senpatrajn malfeliĉulinojn, kiuj baldaŭ falos en la manojn de sovaĝaj venĝavidaj alemanoj?

Virinoj (*plorante*). Cezaro, Cezaro, protektu nin!

Cezaro Juliano (*ploras ankau*). Kio estas Cezaro? Kion povas la falinta Cezaro?

Subkondukisto Laipso. Skribu al la imperiestro kaj sciigu lin —

Cezaro Juliano. Ve, kio estas la imperiestro? La imperiestro estas malsana pri korpo kaj animo; li kadukiĝis pro la zorgo de la regna bonstato. Ĉu ne vere, Decentius?

Tribuno Decentius. Jes, certege, sed —

Cezaro Juliano. Kiel tio vundis mian koron, kiam mi eksciis — (*li premas la manojn de la ĉirkaŭstarantaj*). Preĝu pro lia animo, vi, kiuj honoras la bonan Kriston! Oferu por lia resaniĝo, vi, kiuj restis fidelaj al la dioj de viaj patroj! — Ĉu vi scias, ke la imperiestro faris triumfenmarŝon en Romon?

Standardportisto Maŭros. Ĉu la imperiestro faris tion?

Subkondukisto Varo. Kion? Post kiam li revenis venkobatita de la Danubo?

Cezaro Juliano. Kiel li venis de la Danubo tiel li faris la triumfenmarŝon pro niaj venkoj —

Tribuno Decentius (*minace*). Alta Cezaro, pripensu —!

Cezaro Juliano. Jes, estas vere tio, kion la tribuno diras; pripensu kiel la animo de la imperiestro devas esti en-nebuliĝinta, se io tia povas okazi? Ho, mia malfeliĉa kuzo! Kiam li enrajdis en Romon tra la giganta arkaĵo de Konstantino, li kredis sin tiel granda, ke li kurbigis la dorson kaj klinis sian kapon ĝis la selobutono.

Standardportisto Maŭros. Kiel koko en pordarkajo!

(Ridado inter la soldatoj.)

Kelkaj voĉoj. Ĉu tio estas imperiestro!

Subkondukisto Varo. Kaj lin ni devas obei!?

Subkondukisto Laipso. For la imperiestron!

Standardportisto Maŭros. Cezaro, prenu la direktilon!

Tribuno Decentius. Ribelo—!

Multaj voĉoj. Prenu la direktilon; prenu la direktilon, Cezaro!

Cezaro Juliano. Frenezuloj! Ĉu tio estas paroli kiel romanoj?

Ĉu vi volas simili la alemanajn barbarojn? Kio estis tio, kion kriis Knodomar ĉe Argentoratum? Respondu min, bona Maŭros, — kion li vokis?

Standard portisto Maŭros. Li kriis: Vivu imperiestro Juliano!

Cezaro Juliano. Ha, eksilentu, eksilentu! Kion vi do diras?

Standardportisto Maŭros. Vivu imperiestro Juliano!

La malantaŭ-starantoj. Kio okazis?

Standardportisto Maŭros. Ili proklamas Cezaron Julianon imperiestro!

Laŭtaj ekkrioj. Vivu la imperiestro! Vivu imperiestro Juliano!

(La ekkrioj disvastiĝas eksteren pli kaj pli malproksimen; tiuj parolas samtempe. Cezaro Juliano volas paroli sed ne sukcesas en tio.)

Cezaro Juliano. Ho mi petegas vin —! Soldatoj, amikoj, sambatal-

intoj. — rigardu, mi etendas miajn tremantajn manojn—!

Ne ektimu, mia Decentius! — Ho, ke mi devus ĝisvivi tion!

Mi kulpigas vin pri nenio, ho miaj fidelaj; la malespero incitas

vin al tio! Vi celas la bonon! Bone! — mi submetas min al la

voĉo de la armeo. Sintula, mia militkonsilantaro kunvenu.

Vi, tribuno, povas atesti al Konstantios, ke mi nur devige —

(*Li turnas sin al Varo.*) Iru soldatestro, kaj disanoncu en la tendaro tiun ĉi neatenditan ŝanĝon de la aferoj. Mi mem volas senprokraste skribi al Romo.

Kavaliro Salusto. Sinjoro, la soldatoj volas vidi vin.

Standardportisto Maŭros. Oran ringon ĉirkaŭ via frunto, ho imperiestro!

Cezaro Juliano. Tiam ornamaĵon mi neniam posedis.

Standardportisto Maŭros. Tiu ĉi povas utili.

(*Li deprenas sian koltendon kaj metas ĝin kvaroble-volvitan ĉirkaŭ la frunto de Cezaro.*)

Ekkrioj ekstere. La imperiestro; la imperiestro! Ni volas vidi la imperiestron!

Soldatoj. Surŝildigu lin! Surŝildigu lin!

(*La ĉirkaŭstarantoj levas Julianon sur ŝildon kaj montras lin al la aroj sub longaj ekkrioj de aplaŭdo.*)

Cezaro Juliano. La volo de la armeo fariĝu! Mi kurbigas min antaŭ la ne-evitebla kaj jure ripetas ĉiujn miajn promesojn —

Legiosoldatoj. Kvin orajn monerojn kaj funton da argento!

La Batavoj. Ne trans la Alpoj!

Cezaro Juliano. Ni volas fortikigi nin en Vieno. Tiu urbo estas la plej fortika en Gaŭlujo, kaj krom tio, riĉa pri ĉiaj provizoj.

Mia intenco estas atendi tie ĝis ni ekscios, ĉu mia kurbiganta parenco trovas tion justa, kion ni entreprenis tie ĉi pro la bono de la regno. —

Kavaliro Salusto. Tion li ne faros, sinjoro!

Cezaro Juliano. (*Kun supren etenditaj manoj.*) Dia saĝeco, lumigu

lian mallumiĝintan animon kaj konduku lin al la feliĉego!

Estu kun mi, ho feliĉo, kiu ĝis nun neniam estis al mi malfidela!

Sklavino Mira kaj la virinoj (*vekriante ekster la pordo*)

Mortinta, mortinta, mortinta!

AKTO KVINA.

(En Vieno. Arkforma loko en la katakomboj. Maldekstre supreniras torda ŝtuparo. Tra la montflanko sur la fundo estas skulptita ŝtuparo finiĝanta ĉe fermita pordo. Sur la antaŭscenejo dekstre kelkaj ŝtupoj kondukas malsupren al la pli malsupre kuŝantaj galerioj. La loko estas lumigita malhele per brulanta pendants lampo.)

(Cezaro Juliano, kun nerazita barbo kaj vestita per malpuraj vestoj, staras kliniĝinta aŭskultante ĉe malfermaĵo dekstre. Obtuzo psalmodiantado aŭdiĝas tra la pordo de la ekstere alkonstruita preĝejo.)

Cezaro Juliano (parolas malsupren) Ankoraŭ nenia signaĵo? Voĉo (profunde, malsupre). Nenia.

Cezaro Juliano. Nek nea, nek jesa? Nek por nek kontraŭ? La voĉo. Ambaŭ.

Cezaro Juliano. Tio estas la sama kiel nenio.

La voĉo. Atendu, atendu.

Cezaro Juliano. Mi atendis jam kvin tagojn; vi postulis nur tri. Mi diras al vi, — mi ne intencas — (aŭskultas refoje al la elirejo kaj vokas obtuzvoĉe.) Ne parolu!

Salusto de Perusia (venas malsupren de la galerio, maldekstre). Sinjoro; sinjoro!

Cezaro Juliano. Ĉu estas vi, Salusto? Kion vi volas ĉi malsupre?

Salusto de Perusia. Tiu densa mallumo —; ha, nun mi vidas vin.

Cezaro Juliano. Kion vi volas?

Salusto de Perusia. Servi vin, se mi povus, — rekonduki vin al la vivantoj.

Cezaro Juliano. Kio nova tie supre sur la tero?

Salusto de Perusia. La soldatoj estas malkvietaj; ni ekscias per ĉiaj signaĵoj, ke ilia pacienco baldaŭ elĉerpigos.

Cezaro Juliano. La suno brilas nun tie supre, ĉu ne?

Salusto de Perusia. Jes, sinjoro!

Cezaro Juliano. La ĉielo arkiĝas kiel maro de brilanta lumo. Estas eble meztage. Estas varme; la aero tremetas laŭlonge de la domo-muroj; la rivero bru-fluetas trans la ŝtonetojn. — Bela vivo; bela mondo!

Salusto de Perusia. Ho, venu, venu, sinjoro! La restado en la katakomboj estas klarigata kiel malfavora por vi.

Cezaro Juliano. Kiel oni klarigas tion?

Salusto de Perusia. Ĉu mi kuraĝas diri?

Cezaro Juliano. Vi kuraĝas kaj devas. Kiel estas klarigata tio?

Salusto de Perusia. Multaj kredas, ke estas malpli funebro ol pento, kio tiel strange pelis vin malsupren en la teron.

Cezaro Juliano. Ĉu oni kredas, ke mi mortigis ŝin?

Salusto de Perusia. La misteraĵo en la afero devas senkulpigi ilin, se—

Cezaro Juliano. Neniu mortigis ŝin, Salusto! Ŝi estis tro pura por tiu ĉi peka mondo; tial ĉiunokte malsupren-iris al ŝi en ŝian dormoĉambbron anĝelo de la ĉielo, kaj vokis ŝin. Vi pridubas tion? Ĉu vi ne scias, ke la pastroj en Lutecia klarigis tiel ŝian morton? Kaj la pastroj ja devas scii tion. Ĉu ŝia funebra procesio ĉi tien ne estis kiel triumf-procesio tra la lando? Ĉu ĉiuj virinoj de Vieno ne eliris la pordegojn renkonte al ŝia ĉerko, salutis ŝin per verdaj branĉoj en la mano, sternis tapiŝojn sur la vojon kaj kantis himnojn je honoro de la fianĉino de la ĉielo, kiu estis kondukata al la domo de la fianĉo? — Kial vi ridas?

Salusto de Perusia. Mi, sinjoro?

Cezaro Juliano. De post tiu tempo mi aŭdis nokte kaj tage edziĝokantojn. Aŭskultu, aŭskultu; glorige ŝi estas portata supren. Jes, ŝi estis vera kristanino. Akurate ŝi plenumis siajn devojn; —

ŝi donis tion al Cezaro, kio apartenas al Cezaro, kaj al la alia ŝi donis —; nu, pri tio ni ne parolu; vi ne konas la sekretojn de la kredo, Salusto! — Mi demandis al vi: Kio nova estas?

Salusto de Perusia. La plej grava, kion mi scias, estas, ke la imperiestro plej rapide forkuris al Antioĥia, kiam li ekaŭdis pri la okazintaĵo en Lutecio.

Cezaro Juliano. Tiun novaĵon mi konas. Konstantios eble jam image vidis min antaŭ la pordegoj de Romo.

Salusto de Perusia. La amikoj, kiuj trokuraĝe aliĝis al tiu danĝera afero, image vidis tion saman.

Cezaro Juliano. La tempo ne estas favora al ni, Salusto! Ĉu vi ne scias, ke dum la bataloludoj, antaŭ la forvojaĝo de Lutecio, mia ŝildo rompiĝis, tiel ke nur la tenilo restis en mia mano? Kaj ĉu vi ne scias, ke rulfalis teren tiu servisto sur kies kunplektitaj manoj mi estis surĉevaliĝonta?

Salusto de Perusia. Vi tamen surĉevaliĝis, sinjoro!

Cezaro Juliano. Sed la viro falis.

Salusto de Perusia. Pli bonaj viroj falos, se Cezaro hezitas.

Cezaro Juliano. La imperiestro estas kaduka. *

Salusto de Perusia. La imperiestro vivas. La leteroj, kiujn vi skribis al li pri via proklamo —

Cezaro Juliano. Pri mia deviga proklamo. Oni devigis min; restis al mi nenia elekto.

Salusto de Perusia. La imperiestro ne konsideros tion kiel valoran klarigon. Li intencas enmarŝi en Gaŭlujon tuj kiam li estos varbinta armeon en la orientaj regionoj.

Cezaro Juliano. Kiel vi scias —?

Salusto de Perusia. Per okazo, sinjoro! Mi petegas vin, kredu al mi —!

Cezaro Juliano. Bone, bone; mi iros renkonte al Konstantios, se tio okazos, — ne kun glavo en la mano —

Salusto de Perusia. Ne!? Kiel alie vi intencas renkonti lin?

Cezaro Juliano. Mi volas doni al la imperiestro tion, kio apartenas al la imperiestro.

Salusto de Perusia. Ĉu vi celas per tio, ke vi volas abdiki?

Cezaro Juliano. La imperiestro estas kaduka.

Salusto de Perusia. Ho, tiu vana espero! (*li genufleksas antaŭ li*)
Prenu mian vivon, sinjoro!

Cezaro Juliano. Kial?

Salusto de Perusia. Cezaro, prenu mian vivon; mi prefere mortos
laŭ via ordono ol laŭ tiu de la imperiestro.

Cezaro Juliano. Ekstaru, amiko!

Salusto de Perusia. Ne, lasu min kuŝi antaŭ la piedoj de mia
Cezaro kaj konfesi ĉion. Ho, mia kara sinjoro, — ke mi devas
diri tion al vi! — Kiam mi vizitis vin en la tendaro ĉe la Rejno,
— kiam mi memorigis vin pri nia iama amikeco dum nia kun-
estado en Grekujo, — kiam mi petegis vin partopreni en viaj
dummilitaj danĝeroj, — tiam; ho Cezaro, tiam mi venis kiel
sekreta spiono salajrita de la imperiestro —

Cezaro Juliano. Vi —!

Salusto de Perusia. Mia animo estis tiam plena de kolero kon-
traŭ vi; vi memoras tiun malgravan disputon en Mediolanum, —
sed ne malgrava por mi, kiu esperis ke Cezaro volis restarigi
mian falintan feliĉon. Oni profitis ĉion tion en Romo; oni konsi-
deradis min la plej taŭga viro por spionadi viajn farojn.

Cezaro Juliano. Kaj vi povis vendi vin tiel malnoble? Kia nigra
perfidio!

Salusto de Perusia. Mi estis ruinigita, sinjoro; kaj mi kredis
ke Cezaro retiris de mi sian protektantan manon. Jes, mia
Cezaro, mi perfidis vin — dum la unuaj monatoj; ne poste. Via
amikeco, via grandanimeco, ĉiu favoro, kiun vi montris al mi —;
mi restis tia, kia mi unue ŝajnis min, via fidela ano, — kaj
en miaj sekretaj leteroj al Romo mi erarigis tiujn, kies sendito
mi estis.

Cezaro Juliano. Tiuj leteroj estis de vi? Ho, Salusto!

Salusto de Perusia. Ili enhavis nenion, kio povis malutili al
vi, sinjoro! Mi ne scias, kion eble skribis aliuloj; mi scias nur,
kiel ofte min turmentis mia deviga kaj malamata silentado.
Mi riskis tion, kiom iel mi kuraĝis. Tiu letero, adresita al
nenomita viro en la tendaro, kaj en kiu estis skribite pri la
triumf-enmarŝo en Romon, kaj kiun vi iun matenon dum via

vojaĝo al Lutecio, trovis ŝovitan en vian tendon; vi ja trovis ĝin, sinjoro?

Cezaro Juliano. Jes, jes —

Salusto de Perusia. Ĝi estis adresita al mi, kaj okazo estis al mi favora, tiel ke ĝi venis en viajn manojn. Sed mi ja ne kuraĝis paroli. Mi volis paroli; sed mi ne povis; mi prokrastis de tago al tago por konfesi mian hontindaĵon. Ho, punu min, sinjoro; rigardu, jen mi kuŝas!

Cezaro Juliano. Ekstaru; des pli multe mi ŝatas vin, — vi estiĝis mia ano malgraŭ mia kaj malgraŭ via propra volo. Ekstaru, amiko de mia animo; neniu tuŝu eĉ unu haron de via kapo.

Salusto de Perusia. Prefere prenu mian vivon, kiun vi ja ne povos pli longe ŝirmi. Vi diras, ke la imperiestro estas kaduka (*ekstaras*). Mia Cezaro, mi nun tion malkaŝas, kion mi ĵuris prisilenti. La kadukeco de la imperiestro ne enhavas por vi esperon. La imperiestro estas edziĝonta.

Cezaro Juliano. Ha, kia frenezajo! Kiel vi povas kredi —?

Salusto de Perusia. La imperiestro prenos novan edzinon, sinjoro! (*prezentas al li kelkajn paperojn.*) Legu, legu, alta Cezaro; tiuj ĉi leteroj forigos de vi ĉiujn dubojn.

Cezaro Juliano (*kaptas kaj legas la leterojn*). Jes, je la lumo kaj potenco de la suno —!

Salusto de Perusia. Ho, se mi kuraĝus paroli pli frue!

Cezaro Juliano (*legas plue*). Konstantios, tiu malaperanta ombro de homo prenas virinon kiel edzinon! Faŭstina'n —. Kio staras tie skribita? — juna, apenaŭ deknaŭ-jara —; filino el — ha! filino el tiu aroganta familio. Sekve fervora kristanino! (*kunfaldas la paperojn*). Vi pravas, Salusto! Lia kadukeco enhavas nenian esperon! Kion signifas tio, ke li estas kaduka, aŭ mortanta, — Ĉu Faŭstina ne estas pia? Promes-angelo montriĝos al ŝi; — aŭ eble —; ha — ha! iel — malgranda Cezaro aperos en la mondon, kaj tiam —

Salusto de Perusia. Heziti estos pere.

Cezaro Juliano. Tio jam longe kaj sekrete estis antaŭpreparita, Salusto! Jes, se estas tiel, ĉiuj enigmoj solviĝas! Helena — ne estis ŝia nesingardema lango, kiel mi pensis, kiu pereigis ŝin —

Salusto de Perusia. Ne, sinjoro!

Cezaro Juliano. — oni pensis, — oni kredis, ke —, neesplorebla, ordiganta justeco! Tial ŝi devis malaperi.

Salusto de Perusia. Jes, tial. Min oni unua kvazaŭ elektis por tio en Romo. Sinjoro, vi ja ne dubis pri tio, ke mi rifuzis? Mi pretendis, ke estus neeble trovi okazon. Oni certigis min, ke la krima intenco estis fordecidita, kaj jen —!

Cezaro Juliano. Ili ne ekhaltas — ĉe la duobla kadavro en la ĉerko tie supre. Konstantios edziĝos. Tial oni devus malarmi min en Lutecio.

Salusto de Perusia. Nur unu afero povas savi vin, mia Cezaro; vi devas agi — antaŭ ol la imperiestro reakiros siajn fortojn.

Cezaro Juliano. Se mi libervole retirigis en solecon, por dediĉi min al la saĝeco, kiun mi devas malzorgi tie ĉi, — ĉu la novaj potenculoj tolerus al mi tian ekzistadon? Ĉu la nura fakto de mia ekzistado ne pendus super mi kiel minacanta glavo?

Salusto de Perusia. La viroj, kiuj ĉirkaŭis Cezaron Galos en liaj lastaj vivohoroj, apartenis al la familio de la estonta imperiestro.

Cezaro Juliano. La tribunano Skudio. Kредu al mi, amiko, — mi ne forgesis tion. Kaj al tiu sangon verŝanta imperiestro mi cedos por morti per li! Ĉu mi indulgos lin, kiu dum jaroj iradis super la kadavroj de miaj plej proksimaj parencoj!

Salusto de Perusia. Se vi indulgos lin, li irados super la kadavroj de viaj anoj, antaŭ ol tri monatoj estos pasintaj.

Cezaro Juliano. Jes, jes — en tio vi vere pravas. Estas por mi deviga ordono, kontraŭstari lin. Se mi faros tion, mi ne faros tion pro mi. Ĉu tio ne estas la bono kaj malbono de miloj, kion rilatas tio? Ĉu la vivo de miloj ne dependas de tio? Aŭ, ĉu mi estus kapabla malhelpi tiujn perfortaĵojn? Vi estas pli kulpa ol mi, Salusto! Kial vi ne parolis pli frue?

Salusto de Perusia. En Romo oni ĵurigis min plej sanktan ĵuron, por ke mi silentadu.

Cezaro Juliano. Ĵuron. Ĉu je la dioj de viaj pragepatroj?

Salusto de Perusia. Jes, sinjoro, — je Zeŭso kaj Apolono.

Cezaro Juliano. Spite tio vi rompas tiun juron?

Salusto de Perusia. Mi deziras vivi.

Cezaro Juliano. Kaj la dioj?

Salusto de Perusia. La dioj — ili estas tre malproksime.

Cezaro Juliano. Jes, viaj dioj estas tre malproksime. Ili malhelpas neniun; ili estas ŝarĝo por neniun, ili ebligas la homojn agi! Ho, tiu greka feliĉo, senti sin libera! — Vi diris, ke la imperiestro volis verŝi la sangon de miaj fideluloj por kontentigi sian venĝon. Jes, kiu povas pridubi, ke tio okazos? Ĉu Knodomar estis indulgata? Ĉu tiu sendangera kaptito ne devis pagi sian parol-eraron per sia vivo? Ĉar mi scias, Salusto, ke oni mortigis lin. Tiu famo pri lia nostalgio estis mensogo. Kion do ni povos atendi? En kian malaman lumon la tribuno Decentius en Romo eble prezentis la aferojn!

Salusto de Perusia. Tion plej klare montras la rapida forkuro de la kortego al Antioĥia.

Cezaro Juliano. Kaj ĉu mi ne estas la patro de la armeo, Salusto?

Salusto de Perusia. Patro de la soldatoj — ŝildo kaj protekto de iliaj edzinoj kaj infanoj.

Cezaro Juliano. Kaj kio estos la sorto de la imperio, se mi nun hezitas? Kaduka imperiestro kaj post li ne-plenaĝa infano sur la trono; malpaco kaj ribelo; — ĉies mano kontraŭ ĉiu por kapti la potencon, — Antaŭ nelonge mi havis nokte vizion: aperajo kun glorkrono ĉirkaŭ la kapo subite staris antaŭ mi, ĝi rigardis min kolere kaj diris: Elektu! Kaj jen ĝi forigis kiel supren-iranta matena nebulo. Antaŭe mi klarigis tiun aperajon tute alie, — sed nun, ekaŭdinte pri la estonta edziĝo de la imperiestro, — vere, nun mi devas elekti antaŭ ol la ruiniĝo disfalos sur la imperion. Pri propra profito mi ne pensas, — sed ĉu mi darfus rifuzi la elekton, Salusto? Kaj ĉu ne estas mia devo kontraŭ la imperiestro defendi mian vivon? Ĉu mi havas la rajton atendi kun pendantaj brakoj la murdistojn, kiujn li en sia freneza angoro dungos por bati min teren? Ĉu mi havas la rajton, doni la okazon al la malfeliĉa Konstantios, ŝarĝi novan sangokulpon sur lian jam pekŝarĝitan kapon? Ĉu ne estas pli bone por li, —

kiel estas skribite en la sanktaj skribaĵoj, — ke li suferas maljustaĵon, ol ke li faras maljustaĵon? Se tio, kion mi faros al mia kuzo, estas nomata maljustaĵo, tiam mi opinias, ke tiu maljustaĵo estos egaligita per tio, ke ĝi malebligos al mia kuzo fari maljustaĵon al mi. Mi kredas, ke Platono same kiel Marko-Aŭrelo, la kronita fianĉo de Sofio, samopinios kiel mi. Ĉiaokaze ĝi ne estas malinda temo por la saĝecamikoj, mia kara Salusto! — Ho, se mi havus tie ĉi Libanioson!

Salusto de Perusia. Sinjoro, vi mem faris tiom da progresoj en la saĝeco, ke vi —

Cezaro Juliano. Vere, vere — sed mi dezirus aŭdi la opinion de aliuloj. Ne, ĉar mi hezitas. Ne kredu tion! Ankaŭ mi ne opinias, ke ni havas kaŭzon dubi pri feliĉa rezulto. Ĉar tiuj avertosignoj tute ne devas timigi nin. Mi ne ellasis la tenilon, kiam rompiĝis mia ŝildo dum la bataloludoj, sed tion mi povas kun rajto tiel klarigi, ke mi sukcesos tenadi tion, kion mia mano jam kaptis. Kaj se mi ĵetis teren la viron, kiu helpis min, kiam mi surĉevaliĝis; nu, ŝajnas al mi, ke tiu falo signifas la subitan falon de Konstantios, al kiu mi dankas mian altiĝon. Kiel ajn estu, Salusto, mi intencas verki skribaĵon, kiu plej klare pravigos, ke —

Salusto de Perusia. Tre bone, indulga sinjoro; — sed la soldatoj estas malpaciencaj. Ili deziras vidi vin kaj aŭdi pri sia sorto per via propra buŝo.

Cezaro Juliano. Iru, iru kaj kontentigu ilin; — diru al ili, ke la Cezaro sin prezentos baldaŭ.

Salusto de Perusia. Sinjoro, ne estas la Cezaro, sed la imperiestro mem, kiun ili volas vidi.

Cezaro Juliano. La imperiestro venos.

Salusto de Perusia. Tiam li venos — li mem malplenmana — kun la vivoj de miloj en sia mano.

Cezaro Juliano. Interŝanĝo, Salusto; la vivo de miloj kontraŭ la morto de miloj.

Salusto de Perusia. Ĉu viaj malamikoj havas la rajton vivi?

Cezaro Juliano. Feliĉa estas vi, kies dioj estas tre malproksime. Ho, tiu defendkapablo de la volo —!

Voĉo (*vokas profunde en la galerioj*). Juliano, Juliano!

Salusto de Perusia. Ha, kio estas tio?

Cezaro Juliano. Iru for, mia kara, iru for rapide!

La voĉo. Silentigu la preĝej-kantadon, Juliano!

Salusto de Perusia. Oni vokas refoje. Ho, estas do vera!

Cezaro Juliano. Kio estas vera?

Salusto de Perusia. Ke vi vivas tie sube kun mistera fremdulo,
kun antaŭdiristo aŭ sorĉisto, kiu dumnokte al vi venis.

Cezaro Juliano. Ha, ha! Oni diras tion? Iru, iru!

Salusto de Perusia. Mi prijuras vin, sinjoro — ne daŭrigu
tiujn pereigajn revaĵojn. Iru kun mi; iru supren en la taglumon!

La voĉo. (*pli proksime de malsupre.*) Ĉiu peno estas vana.

Cezaro Juliano. (*ĉe la malsupren-irejo dekstre*) Nenia signo,
mia frato?

La voĉo. Malpleneco kaj silentado!

Cezaro Juliano. Ho, Maksimos!

Salusto de Perusia. Maksimos!?

Cezaro Juliano. Iru, diras mi! Se mi elpaŝos el tiu ĉi domo de
putrado, tiam mi venos kiel imperiestro.

Salusto de Perusia. Mi petegas vin —; kion vi serĉas tie ĉi en
la mallumo?

Cezaro Juliano. Lumon! Iru, iru!

Salusto de Perusia. Se la Cezaro hezitas, mi timas ke li trovos
la vojon barita.

*(Li foriras tra la koridoro, maldekstren. Tuj poste la mistikisto
Maksimos supreniras la ŝtuparon; li portas blankan ofer-banderolon
ĉirkaŭ la frunto, en la mano li havas longan sangkovritan tranĉilon.)*

Cezaro Juliano. Parolu, mia Maksimos!

Mistikisto Maksimos. Ĉia peno estas vana, kiel vi aŭdis. Kial
vine povis finiĝi la preĝej-kantadon? Ĝi sufokis ĉiujn antaŭdirojn;
ili volis paroli, sed ne povis komenci.

Cezaro Juliano. Silentado, mallumo; — kaj mi ne povas atendi
pli longe. Kion vi konsilas al mi?

Mistikisto Maksimos. Iru blinde antaŭen, imperiestro Juliano!
La lumo serĉas vin.

Cezaro Juliano. Jes, jes, jes; tion mi ankaŭ kredas. Mi ne bezonis irigi vin laŭ la longa vojo. Ĉu vi scias, kion mi eksciis antaŭ nelonge —?

Mistikisto Maksimos. Mi ne volas scii, kion vi eksciis. Prenu vian sorton en vian propran manon.

Cezaro Juliano (*iras malkviete tien kaj reen*). En vero, kio fakte estas tiu Konstantios — tiu furio-vipata pekulo, tiu forpecetiĝanta ruino de iama homo?

Mistikisto Maksimos. Tio estu lia surtomba skribo, imperiestro Juliano.

Cezaro Juliano. Ĉu li ne estis en ĉiuj siaj faroj kiel ŝipruino sen direktilo kontraŭ mi — jen ŝipveturante maldekstren sur la ondoj de malkonfido, jen ĵetata dekstren de la uragana vento de l'pento? Ĉu li ne ŝanceliĝante supreniris la imperiestran tronon, timigita, en purpura mantelo gutetanta de la sango de mia patro? Eble ankaŭ de l'sango de mia patrino. — Ĉu tuta mia familio ne devis perei por ke li sendangere povu sidi sur la trono? Ne, ne la tuta familio — Galos kaj mi estis indulgataj. Ni ambaŭ devis resti vivantaj, per kio li povus aĉeti iom da pardono. Poste li refoje ŝipiris sur la ondoj de la malkonfido. La pentto devigis lin doni al Galos la Cezartitolon; poste la timo eldevigis de li kondamnon al morto. Kaj mi? Ĉu mi ŝuldas al li dankon pro la vivo, kiun li lasis al mi ĝis nun? — Unu post alia! Unue Galos kaj poste —. Nokton post nokto mi kuŝis timante, ke la pasinta tago povus esti mia lasta.

Mistikisto Maksimos. Ĉu Konstantios kaj la morto kaŭzis al vi la plej grandan timon? Pripensu! —

Cezaro Juliano. Vi estas prava, — jes. La pastroj —! Mia tuta juneco estis ĉiama timo pro la imperiestro kaj Kristo. Ho, li estas terura, tiu mistera — tiu senkompata dihomio! Ĉie, kie mi volis antaŭen, li staris sur mia vojo, granda kaj severa — kun sia senkondiĉa malindulga postulo.

Mistikisto Maksimos. Kaj tiu postulo — ĉu ĝi estis en vi?

Cezaro Juliano. Ĉiam ĝi estas ekstere. Mi *devis!* Se mia animo konvulsie ŝrumpis pro brulanta malamo kontraŭ la murdinto de mia familio, la ordono diris: amu viajn malamikojn! Se mia belecon-soifanta animo sopiris je la moroj kaj bildoj de la iama Grekujo, la kristana postulo entrudiĝis en min dirante: Serĉu la ununuran necesecon! Se mi sentis la dolĉan amdeziron al tio aŭ jeno, la princo de la rezigno timretenis min, dirante: formortu tie ĉi por vivi tie! — Ĉio homa estiĝis io nepermesita en la tago kiam la profeto de Galileo kaptis la mond-direktilon. Vivi signifas ĉe li morti. Ami kaj malami signifas peki. Ĉu li do ŝanĝis la homajn koron kaj sangon? Aŭ ĉu la terligita homo ne plu restis, kio li estis? Nia sana animo ribelas kontraŭ tio; — kaj tamen ni devas voli, eĉ kontraŭ nia propra volo! Ni devas, devas, devas!

Mistikisto Maksimos. Kaj vi ne iris pli malproksimen? Hontu!

Cezaro Juliano. Mi?

Mistikisto Maksimos. Jes vi, la viro de Ateno kaj Efeso.

Cezaro Juliano. Ho ve, tiuj tempoj, Maksimos! Tiam estis facile elekti. Kun kio ni okupis nin? Kun saĝeckonstruaĵo; nek pli nek malpli.

Mistikisto Maksimos. Ĉu ne staras ie en viaj skribaĵoj: Ĉu por ni aŭ kontraŭ ni?

Cezaro Juliano. Ĉu Libanios ne restis tiu sama, kiu li estis, ĉu starante ĉe la flanko de akuzito, ĉu ĉe la flanko de l'akuzinto? Ĉi tie la afero kuŝas pli profunde. Ĉi tie estas agado, kiun mi devas transiri. Donu tion al la imperiestro, kio apartenas al la imperiestro. Iam mi ŝercis pri tio en Ateno; — sed tio kuŝas pli profunde. Vi ne povas tion kompreni, vi, kiu neniam estis sub la potenco de tiu dihomino. Tio estis pli ol doktrinaro, kion li disvastigis sur la tero; tio estas sorĉo, kiu kaptas la animon. Kiu iam estis sub ĝi — mi kredas, tiu neniam liberigis de ĝi.

Mistikisto Maksimos. Ĉar vi ne tute *volas*.

Cezaro Juliano. Kiel mi povus voli la maleblon?

Mistikisto Maksimos. Ĉu penvaloras voli la eblon?

Cezaro Juliano. Babilaĵo el la instru-salonoj! Vi ne plu kontentigas min per tio. Kaj tamen — ho ne, ne, Maksimos! Sed vi ne povas kompreni kiel ni sentas tion. Ni estas kiel la vinberujoj, kiujn oni transplantis en fremdan al ni nekutiman grundon — transplantu nin returne kaj ni velkos, sed en la nova ni degeneras.

Mistikisto Maksimos. Ni? Kiujn vi nomas ni?

Cezaro Juliano. Ĉiujn, kiuj staras sub la timo de la manifestanto.

Mistikisto Maksimos. Timo pro fantomoj!

Cezaro Juliano. Ĝi estu kiel ĝi estas. Sed ĉu vi ne vidas, ke tiu paraliza teruro pli kaj pli densiĝis ĝis muro ĉirkaŭ la imperiestro? Ho, mi bone komprenas kial la granda Konstantios enkondukis en sian regnon tian vol-kunligantan doktrinon kondukantan al venko kaj potenco. Nenia korpogardisto kun lanco kaj ŝildo ĉirkaŭas tiel dense la imperiestran tronon kiel tiu ĉi subiganta religio, kiu ĉiam fingre-montras trans la surteran vivon. Ĉu vi fikse rigardis tiujn kristanojn? Kavokulaj, palvangaj, mallarg-brustaj ili estas ĉiuj; ili similas al la tol-teksistoj en Bisosa; al nenia ambicio estas permesate ekĝermi en ilia zorgoplena ekzistado; la suno lumas por ili, kaj ili ne vidas ĝin; la tero oferas al ili sian abundon kaj ili ne deziras ĝin; — ĉio, kion ili deziras estas rifuzi kaj suferi, por morti.

Mistikisto Maksimos. Tial uzu ilin kiel ili estas; sed tiam vi devas stari ekster ili. Imperiestro aŭ Galileano; — jen la elekto. Estu sklavo sub la teruro, aŭ reganto en la lando de l'tago kaj de la lumo kaj de la ĝojo! La absurdon vi ne povas voli; kaj tamen ĝi estas tio, kion vi volas. Vi volas kunigi la nekunigeblan — vi volas pacigi ambaŭ, kiuj tamen ne estas pacigeblaj; tial vi estas tie ĉi kaj forputras en mallumo.

Cezaro Juliano. Lumigu al mi se vi povas!

Mistikisto Maksimos. Ĉu vi estas Ahilo, pri kiu via patrino songis, kiun ŝi donos al la mondo? Vundebla kalkano faras Ahilo'n el nenia viro. Levu vin, sinjoro! Triumf-kuraĝe, kiel kavaliro sur sia sovaĝa ĉevalo, vi devas superi la Galileanon, kiam vi volas perforte venki la imperiestran tronon —

Cezaro Juliano. Maksimos!

Mistikisto Maksimos. Mia amata Juliano, rigardu do ĉirkaŭe en la mondo! Tiuj kristanoj kun la sopiro al morto, kiel vi nomis tion, ili ne estas multaj. Sed kiel estas la aliaj? Ĉu la animoj sin ne fortunigas de la majstro, unuj post aliaj? Jes, respondu min — kio restas de tiu stranga amdoctrino? Ĉu socio ne furiozas kontraŭ socio? Kaj la episkopoj, tiuj oro-ornamitaj sinjoroj, kiuj nomas sin ĉef-paŝtistoj de la eklezio! Ĉu ili ne konkuras pri avareco, tiraneco kaj flataĉo kun la eminentuloj ĉe la kortego?

Cezaro Juliano. Tiel ili ne estas ĉiuj; pensu pri tiu granda Atanasios en Aleksandrio —

Mistikisto Maksimos. Atanasios estis la unu-nura. Kaj kie estas nun Atanasios? Ĉu oni ne ekzilis lin, ĉar li rifuzis obei la imperiestran volon? Ĉu li ne devis forkuri en la Libian dezerton, kie lin disŝiris la leonoj? Kaj ĉu vi povas nomi al mi duan Atanasios'on? Pensu pri la episkopo Maris el Kalkedono, kiu jam trifoje ŝanĝis siajn opiniojn pri la Araniaj disputaĵoj. Pensu pri la multaĝa episkopo Markos en Aretusa; vi ja konas lin de post via juneco. Ĉu antaŭ nelonge kontraŭleĝe kaj kontraŭ la justeco de la burĝaro li ne forprenis ĉiujn komunumajn propraj-ojn por donaci al la eklezio? Kaj pensu plue pri la kaduka, senvola episkopo en Nazianz, kiu estas kiel mokindaĵo por sia propra paroĥanaro, ĉar li prirespondis la saman aferon per jes kaj per ne, ĉar li deziris plaĉi ĉiujn disputantojn.

Cezaro Juliano. Vere, vere, vere!

Mistikisto Maksimos. Tiaj estas viaj sambatalantoj, mia Juliano; pli bonajn vi ne trovas. Aŭ ĉu vi eble enkalkulas tiujn du atendotajn galileajn lumojn de Kapodokio? Ha, ha; la filo de l'episkopo Gregoro gvidas juĝaferojn en sia gepatra urbo kaj Basilios esploras en la oriento en sia bieno la skribaĵojn de mondaj scienculoj.

Cezaro Juliano. Jes, mi tion scias. Malaniĝo ĉe ĉiuj flankoj! Hekebolios, mia iama instruisto fariĝis riĉa viro per religifervoro kaj siaj klarigoj de la skribaĵoj; kaj de post tio —! Maksimos — ne plu daŭros longe, ke mi staros tute sola kun mia seriozeco.

Mistikisto Maksimos. Vi staras jam sola. Tuta via armeo forkuras, aŭ kuŝas venkobatita ĉirkaŭ vi. Blovu la atak-ordonon —

kaj neniu aŭdos vin; ekmarŝu — kaj neniu sekvos vin. Ne imagu, ke vi povas daŭrigi entreprenon, kiu mem malesperas. Vi estas venkobatita, mi diras al vi! Kaj kien vi do volas? En malfavoro ĉe Konstantios, ĉiuj teraj potencoj vin forlasos — ankaŭ tiuj super la tero. Aŭ ĉu vi volas serĉi rifuĝejon ĉe la brusto de la Galileano? Kiel estas la rilato inter vi kaj li? Ĉu vi mem ne diris, ke la teruro kaptis vin? Ĉu vi sentas en vi lian ordonon? Ĉu vi amas Konstantios, vian malamikon, ĉar vi ne mortigas lin? Ĉu vi malamas la karnan plezuron kaj la ĝojojn de la alloganta tero, nur ĉar vi ne subakvigas en ĝi kiel fervora naĝanto? Ĉu vi rezignas pri la mondo, nur ĉar vi ne havas la kuraĝon posedi ĝin? Kaj ĉu vi scias tiel certe, ke — mortante tie ĉi — vi vivos tie?

Cezaro Juliano (*iras tien kaj returnen*). Kion li faris por mi, tiu granda postulemo? Se li tenas la direktilojn de la mondveturilo en la manoj, li ja estus povinta — (*La psalm-kantado aŭdiĝas pli laŭte supre en la preĝejo.*) Aŭskultu, aŭskultu! Tion ili nomas servi lin; kaj tion li akceptas kiel dolĉan oferfumon. Himnoj al li — kaj himnoj al ŝi en la ĉerko! Se li estas la ĉionscianto, kiel li do povas —?

Dominspektoro Eŭterios (*venas rapide malsupren tra la galerio, maldekstre*). Mia Cezaro! Sinjoro; kie vi estas?

Cezaro Juliano. Tie ĉi, Eŭterios! Kion vi volas de mi?

Dominspektoro Eŭterios. Vi devas supreniri, sinjoro; vi devas vidi per viaj propraj okuloj, — la okazintan signon kaj la miraklon je la korpo de la princino.

Cezaro Juliano. Vi mensogas!

Dominspektoro Eŭterios. Mi ne mensogas, sinjoro! Mi ne estas ano de tiu ĉi fremda religio; sed mi ne povas pridubi, kion mi vidis.

Cezaro Juliano. Kion vi vidis?

Dominspektoro Eŭterios. La tuta urbo bolas. Malsanuloj kaj kripluloj estas kondukataj al la ĉerko de l'princino; laŭ ordono de la pastro ili ĝin tuŝas kaj resaniĝintaj ili foriras.

Cezaro Juliano. Kaj tion vi mem vidis?

Dominspektoro Eŭterios. Jes, sinjoro, mi vidis epilepsian virinon eliri la preĝejon resaniĝinta kaj aŭdis ŝin laŭdi la Dion de la Galileanoj.

Cezaro Juliano. Ha, Maksimos, Maksimos!

Dominspektoro Eŭterios. Aŭskultu, kiel ĝojegas la kristanoj; — jen okazas refoje nova miraklo.

Kuracisto Oribaces (*vokas supre en la galerio, maldekstre*). Eŭterios, — ĉu vi trovis lin? Eŭterios, Eŭterios, kie estas la Cezaro?

Cezaro Juliano (*iras renkonte al li*). Tie aŭ tie ĉi — ĉu estas vere Oribaces?

Kuracisto Oribaces (*aĝeras*). Nekredeble, neklarigeble, — kaj tamen vere; ili tuŝas la ĉerkon, la pastroj legas kaj preĝas super ŝi; kaj ili resaniĝas; voĉo anoncas de tempo al tempo: Sankta, sankta estas la pura virino!

Cezaro Juliano. Ĉu voĉo anoncas —?

Kuracisto Oribaces. Nevidebla voĉo, mia Cezaro; voĉo alte sub la arkajo de la preĝejo — neniu scias, de kie ĝi venas.

Cezaro Juliano (*staras momenton senmove; subite li turnas sin kaj ekkrias*). La vivo aŭ la mensogo!

Mistikisto Maksimos. Elektu!

Kuracisto Oribaces. Venu, venu, sinjoro; la teruregitaj soldatoj minacas, ke ili vin —

Cezaro Juliano. Ili minacu.

Kuracisto Oribaces. Ili kulpigas vin kaj min pri la morto de la miraklo-faranta princino —

Cezaro Juliano. Mi venos, mi kontentigos ilin —

Kuracisto Oribaces. Troviĝas nur unu rimedo; vi direktu iliajn pensojn aliloken, sinjoro; — ili ekflamiĝis je malespero pro la sorto, kiun ili atendas, se vi hezitas pli longe.

Mistikisto Maksimos. Supreniru ĉielen, ho malsaĝulo; vi mortas nun por via sinjoro kaj majstro!

Cezaro Juliano (*kaplas lian brakon*). La regno de la imperiestro estu por mi!

Mistikisto Maksimos. Ahilo!

Cezaro Juliano. Kio rompas la kontrakton?

Mistikisto Maksimos (*donas al li la ofer-tranĉilon*). Tio ĉi.

Cezaro Juliano. Kion la akvo forviŝas?

Mistikisto Maksimos. La sangon de la oferbesto. (*Li ŝiras la oferligafon de sia frunto kaj metas ĝin ĉirkaŭ la frunto de la Cezaro.*)

Kuracisto Oribaces (*alproksimiĝas*). Kion vi intencas fari, sinjoro?

Cezaro Juliano. Ne demandu.

Dominspektoro Eŭterios. Aŭskultu la bruadon! Supren, supren, mia Cezaro!

Cezaro Juliano. Unue malsupren — poste supren. (*Al Maksimos.*)
La sanktejo, mia kara frato —?

Mistikisto Maksimos. Sube en la alia arkaĵo.

Kuracisto Oribaces. Cezaro, Cezaro — kien vi iras?

Mistikisto Maksimos. Al la libereco!

Cezaro Juliano. Tra mallumo al lumo. Ha —! (*li malsupreniras al la galerio.*)

Mistikisto Maksimos (*mallaŭte, postrigardas lin*). Fine tamen okazis —!

Dominspektoro Eŭterios. Parolu, parolu; kion signifas tiuj misteraj artaĵoj?

Kuracisto Oribaces. Kaj eĉ en tempo, kiam ĉiu momento estas multvalora —

Mistikisto Maksimos (*ilustras malkviete dum li ŝanĝas lokon*).
Tiuj ŝvebantaj malsekaj ombroj. Fi; tiuj mukaj rampaĵoj ĉirkaŭ liaj piedoj —!

Kuracisto Oribaces (*aŭskultas*). La bruado plilaŭtiĝas, Eŭterios!
Estas la soldatoj, aŭskultu; aŭskultu!

Dominspektoro Eŭterios. Tio estas la kantado en la preĝejo —

Kuracisto Oribaces. Ne, tio estas la soldatoj; — jen ili venas!
(Kavaliro Salusto, ĉirkaŭita de granda aro da soldatoj sin montras supre en la koridoro. La standard-portisto Maŭros estas inter ili.)

Salusto de Perusia. Estu pripensaj; mi petegas vin — —.

La soldatoj. La Cezaro perfidis nin! La Cezaro devas morti!

Salusto de Perusia. Kaj kio poste, ho furiozantoj?

Standard-portisto Maŭros. Kio poste? Per la kapo de la Cezaro ni aĉetos nian pardonon —

La soldatoj. Venu, venu, Cezaro!

Salusto de Perusia. Cezaro — mia Cezaro, kie vi estas?

Cezaro Juliano *(vokas sube en la galeriojn)*. Helioso! Helioso!

Mistikisto Maksimos. Liberigita!

Horkanto *(en la preĝejo)*. Nia patro, kiu estas en la ĉielo!

Salusto de Perusia. Kie li estas? Eŭterios, Oribaces — kio okazas tie ĉi?

Horkanto *(en la preĝejo)* Sanktigita estu via nomo!

Cezaro Juliano. *(Supreniras la ŝtuparon; li havas sangon sur la frunto, sur la brusto kaj la manoj.)* Finiĝis!

La soldatoj. Cezaro!

Salusto de Perusia. Sang-makulita —, kion li faris?

Cezaro Juliano. Mi trahakis la nebulon de la timo.

Mistikisto Maksimos. La kreito estas en via mano.

Horkanto *(en la preĝejo)*. Via volo fariĝu, kiel en la ĉielo tiel ankaŭ sur la tero!

(La kanto aŭdiĝas plue dum tio, kio sekvas.)

Cezaro Juliano. Korpogardistoj ne plu staras ĉirkaŭ Konstantios.

Standard-portisto Maŭros. Kion vi diras, sinjoro!

Cezaro Juliano. Ha, miaj fideluloj! Supren al la taglumo. Al Romo kaj Grekuj!

La soldatoj. Vivu imperiestro Juliano!

Cezaro Juliano. Ni ne volas rigardi returne; ĉiuj vojoj kuŝas ebenaj antaŭ ni. Supren al la taglumo. Tra la preĝejo! La mensogantoj eksilentos —!

(Li rapidas supren sur la ŝtuparo en la fundo.)

Mia armeo, mia trezoro, mia imperiestra trono!

Horkanto *(en la preĝejo)*. Ne konduku nin en tenton, sed liberigu nin de la malbono!

(Juliano ŝetmalfermas la pordon. Oni vidas la hele lumigitan preĝejon. La pastroj staras antaŭ la ĉef-altaro; aroj da piuloj sube sidas genufleksante ĉirkaŭ la ĉerko de la princino.)

Cezaro Juliano. Libera, libera! La regno estas mia!

Salusto de Perugia *(vokas al li)*. Kaj la forteco kaj la belegeco —

Horkanto *(en la preĝejo)*. Via estu la regno kaj la forteco kaj la honoro.

Cezaro Juliano *(kvazaŭ blindigita de la lumo)*. Ha!

Mistikisto Maksimos. Venko!

Horkanto *(en la preĝejo)* — eterne Amen! —

II.

IMPERIESTRO JULIANO.

TEATRAJO EN KVIN AKTOJ.

THE UNIVERSITY OF CHICAGO
DEPARTMENT OF CHEMISTRY

REPORT OF THE COMMITTEE ON THE
PROGRESS OF CHEMISTRY IN
THE UNITED STATES

FOR THE YEAR 1900

PREPARED BY THE
COMMISSIONERS OF THE
BUREAU OF CHEMISTRY

AND PUBLISHED BY THE
GOVERNMENT PRINTING OFFICE

WASHINGTON, D. C., 1901

THE UNIVERSITY OF CHICAGO
DEPARTMENT OF CHEMISTRY

REPORT OF THE COMMITTEE ON THE
PROGRESS OF CHEMISTRY IN
THE UNITED STATES

FOR THE YEAR 1900

PREPARED BY THE
COMMISSIONERS OF THE
BUREAU OF CHEMISTRY

AND PUBLISHED BY THE
GOVERNMENT PRINTING OFFICE

WASHINGTON, D. C., 1901

AKTOROJ.

- Imperiestro Juliano.
Militestro Nevita.
Orajisto Potamon.
Imperiestra kuracisto Cezarios de Nazianz.
Oratoro Temisteos.
Oratoro Mamertinos.
Trezoristo Ursulos.
Hartondisto Eūnapios.
Virino Barbara.
Teologiisto Hekebolios.
Korteganoj kaj Ŝtat-oficistoj.
Burgoj en Konstantinopolo.
Partoprenantoj de la Dionizo-procesio, flutistoj,
dancistoj, jonglistoj kaj virinoj.
Senditoj de la Orientlandaj reĝoj.
Dominspektoro Eūterios.
Servistoj en la palaco.
Juĝistoj, oratoroj, instruistoj kaj burĝoj en Antiohia.
Grenkomercisto Medon.
Impostisto Malkos.
Gregoro de Nazianz, frato de Cezarios.
Kolorigisto Fokion.
La virino Publia.
Sia filo Hilarion.
Agaton de Kapadokio.
Episkopo Maris de Kalkedono.
Partoprenantoj de la Apolono-procesio, Ĉefpastroj, templo-
servistoj, harpistoj kaj urb-administrantoj.
La pli juna frato de Agaton.
La procesio de kristanaj malliberuloj.
La poeto Herakleos.

Imperiestra kuracisto Oribaces.
 Oratoro Libanios, urbestro en Antiohia.
 Psalm-poeto Apolinaris.
 Instruisto Kirilos.
 Aĝa pastro de la Kibele-sanktejo.
 Psalmkantistoj en Antiohia.
 Soldatestro Fromentinos.
 Militestro Jovian.
 Mistikisto Maksimos.
 Antaŭ-diristo Numa.
 Du aliaj Etruskaj antaŭ-diristoj.
 Princo Hormisdas, ekzilita Perso.
 Ĉefo de la korpogardistoj Anatolos.
 Filozofo Priskos.
 Filozofo Kitron.
 Soldatestro Amian.
 Basilios de Cezarea.
 Lia fratino Makrina.
 Persa transkurinto.
 Romaj kaj Grekaj soldatoj.
 Persaj militistoj.

La unua akto havas lokon en Konstantinopolo, la dua akto en Antiohia, la tria ankaŭ en Antiohia, la kvara akto en kaj en la ĉirkaŭaĵoj de orientaj regionoj de la imperio kaj la kvina akto sur la ebenaĵo transe de la rivero Tigriso. La tempo de la okazintaĵoj estas inter Decembro de la jaro 361a kaj la fino de Junio 363. —

AKTO UNUA.

(Ĉe la haveno en Konstantinopolo. Sur la antaŭscenejo dekstre estas belega albordega ponto, kovrita per tapiŝoj. Supre sur la marbordo, proksime de la ponto troviĝas kovrita ŝtono, ĉirkaŭita de gardistoj. Malproksime sur la Bosforo kuŝas la imperiestra ŝiparo, sur kiu pendas multaj funebraj flagoj.)

(Muldegaj homoj en boatoj kaj sur la marbordo. Sur la fino de la albordega ponto staras la imperiestro Juliano, vestita per purpuro kaj oraj ornamaĵoj. Lin ĉirkaŭas korteganoj kaj eminentaj ŝtat-oficistoj. Inter tiuj, kiuj staras plej proksime de li, estas la militestro Nevita, la imperiestra kuracisto Cezario, la oratoroj Temisteos kaj Mamertinos.)

Imperiestro Juliano *(rigardas malproksimen en la maron)*.

Kia renkonto! La mortinta imperiestro kaj la vivanta. — Ho, ke li devus elspiri sian lastan elspiron en tia malproksima regiono! Ho, ke mi, spite al mia rapideco, ne povis ĝui la feliĉon ĉirkaŭbraki lastfoje mian parencon! Malĝojiga sorto por ni ambaŭ! — — — Kie estas la ŝipo kun la mortinto?

Militestro Nevita. Jen ĝi alproksimiĝas.

Imperiestro Juliano. Tiu longa boato?

Militestro Nevita. Jes, plej indulga imperiestro!

Imperiestro Juliano. Kompatinda parenco! Tiel granda dum la vivo; kaj nun vi devas kontentiĝi je tia malalta tegmento. Nun vi ne puŝas vian frunton al la ĉerka kovrilo, vi, kiu klinis vian kapon, kiam vi rajdis tra la arko de Konstantino.

Burĝo inter la rigardantoj (*al oraĝisto Potamon*). Kiel juna li aspektas, nia nova imperiestro.

Oraĝisto Potamon. Liaj korpomembroj tamen dikiĝis. Kiam mi vidis lin lastfoje, li estis maldika kaj malgrasa; — tio okazis antaŭ naŭ — aŭ dek jaroj.

Alia burĝo. Jes, li plenumis grandajn farojn en tiuj jaroj.

Virino. Kaj pripensu la danĝerojn en kiuj li troviĝis de post sia infaneco.

Pastro. Mirinde li estis savita el ĉiuj, la protekto de Dio estis super li.

Oraĝisto Potamon. La famo diras, ke li en Gaŭlujo metis sin sub tute alian protekton.

La Pastro. Mensogo, mensogo; estu certaj pri tio.

Imperiestro Juliano. Jen li venas. La suno, kiun mi alvokas kaj la granda fulmo-ĵetanta dio scias, ke mi ne deziris la morton de Konstantios. Pri tio mi tute ne pensis. Mi supren direktis preĝojn por lia vivo. — Diru al mi, Cezarios, — vi ja devas scii tion plej bone, — ĉu oni survoje montris ĉiun decan honoron al la korpo de la imperiestro?

Kuracisto Cezarios. La funebra procesio estis kiel procesio de venkinto tra tuta malgranda Azio. En ĉiuj urboj, kiujn ni trairis, la kredantoj amasiĝis sur la stratoj; dum tutaj noktoj la preĝejoj resonis de preĝadoj kaj kantadoj; la mallumo estiĝis hela tago sub la brilo de miloj da brulantaj kandeloj —

Imperiestro Juliano. Bone, bone, bone! — Min kaptas neimagbla ektimo je la penso, ke mi devas preni la direktilon post tia granda, virtoplena kaj altamata imperiestro. Kial ne estis permesite al mi vivadi en izolita kvieteco!

Oratoro Mamertinos. Kaj kiu, krom vi, plene anstataŭus lin en tiu granda malfacila ofico, ho nekomparebla sinjoro? Kuraĝe mi alvokas al tiuj aliaj, kiuj aspiris la imperiestran altoficon: venu ĉi tien kaj ekprenu la direktilon de la imperio; sed prenu ĝin tiel, kiel ĝin prenas Juliano. Gardu tage kaj nokte la bonstaton de ĉiuj. Estu estroj laŭ la nomo, sed tamen servistoj de la burĝa libereco. Elektu vian lokon plej antaŭe en la vicoj de la batalantoj kaj ne ĉe la festenoj. Prenu nenion por vi mem, sed disdonu donacojn al ĉiuj. Via justeco estu tiel

malproksime de obeemeco kiel de krueleco. Vivu tiel, ke neniu virgulino sur la tero tordu siajn manojn pro vi. Kontraŭstaru ne nur la nepaseblecon de Gaŭlujo sed ankaŭ la malvarmon de Germanujo. Kion ili respondos? Teruregitaĵ de tiaj severaj postuloj, ili ŝtop-fermos siajn sentemajn orelojn kaj ekkrios: nur Juliano povas kontentige plenumi ĉion tian.

Imperiestro Juliano. La ĉion-reganto donu, ke tiaj grandaj esperoj ne estu trompataj. Sed kiel multe mankas al mi. Ektimo kaptas min. Mi estus komparata kun Marko Aŭrelo kaj kun multaj aliaj superaj homoj! Ĉu Plato ne diris ke nur „dio“ povas regi la homojn? Ho, preĝu por mi, por ke mi povu eviti la laĉojn de la ambicio kaj la allogojn de la potenco. Ateno, Ateno! Tien direktiĝas mia sopiro. Mi estis kiel viro, kiu pro sia saneco faris utilajn korpo-ekzercojn; — kaj nun oni venas al mi dirante: eliru sur la scenejon kaj venku en la olimpaj ludoj. — Ĉiuj grekoj ĉeestos kiel rigardantoj! Ĉu mia koro ne devas esti kaptata de ektimo jam antaŭ ol mi komencos la batalon?

Oratoro Temisteos. Kial tiu ektimo, ho imperiestro? Ĉu vi jam ne akiris la aplaŭdon de la grekoj antaŭ la batal-ludoj? Ĉu vi ne venis por restarigi ĉiujn virtojn en iliajn antaŭajn rajtojn? Ĉu ne unuigis en vi kvazaŭ en unu viro, ĉiu venkoforto, kiun Heraklo, kiun Dionizo, kiun Solon, kiun —?

Imperiestro Juliano. Eksilentu! Nur la laŭdado de la mortinto estu aŭdata hodiaŭ. Jen ili albordiĝas. Prenu la frunt-ringon kaj miajn ĉenojn; mi ne volas porti imperiestrajn ornamaĵojn en horo kiel la nuna.

(Li donas la ornamaĵojn al unu el la ĉirkaŭ-starantoj. La funebra procesio venas grandpompe trans la albordiĝ-ponto. Pastroj kun brulantaj torĉoj iras ĉe la fronto; la ĉerko estas veturigata sur veturilo kun malgrandaj radoj; preĝeĵ-flagoj estas portataj antaŭ kaj post la veturilo; ĥorejknaboj ŝvingas incensujojn; aroj da kristanaj burĝoj sekvas.)

Imperiestro Juliano. *(Metas la manojn sur la ĉerkon kaj ĝemas laŭte.)* Ve!

Rigardanto. Ĉu li faris antaŭ si la krucosignon?

Alia el la aro. Ne.

BULHUIS, Imperiestro kaj Galileano.

La unua rigardanto. Rigardu, rigardu!

Tria rigardanto. Li eĉ ne klinis sin antaŭ la sanktaĵo.

La unua rigardanto. Ĉu vi vidas? — Kion mi diris?

Imperiestro Juliano. Veturu hejmen kun pompo kaj honoro, ho senanimiĝinta korpo de mia parenco! Mi ne faras tiun polvon responda por tio, kion via animo krimis kontraŭ mi. Kion mi diras? Ĉu estis via animo, kiu agis tiel severe je mia familio, ke mi postrestas nur sola? Ĉu estis via animo, kiu ordonis, ke mia juneco estu malheligata de milo da angoroj? Ĉu estis via animo, kiu faligis la kapon de tiu nobla Cezaro? Ĉu tio estas vi, kiu lokis min, la nespertan junulon, en tian malfacilan pozicion en la malgastema Gaŭlujo, kaj kiu poste, kiam la malfeliĉo kaj la kontraŭaĵoj ne sukcesis subigi min, disputis kontraŭ mi pri la honoro de miaj venkoj? Ho, Konstantios, mia parenco, — ĉio tio ne devenis de via granda koro? Kial vi tordiĝis pro konscienciproĉoj kaj turmentoj? Kial vi vidadis sangokovritajn ombrojn ĉirkaŭ vi sur via lasta dolorplena lito? Malbonaj konsilantoj maldolĉigis vian vivon kaj la horon en kiu vi mortis. Mi konas ilin, tiujn konsilantojn; ili estis viroj, al kiuj malutilis, moviĝadi en la daŭra sunbrilado de via favoro. Mi konas ilin, tiujn virojn, kiuj tiel bonvole vestis sin per la vestoj de la konvinko, kiuj ŝajnis esti la plej ŝatindaj ĉe la kortego.

Idolanaĵ burĝoj (*meze de la ĉirkaŭstarantoj.*) Vivu la imperiestro Juliano!

Kuracisto Cezarios. Plej favora sinjoro, la procesio atendas —

Imperiestro Juliano. (*Al la pastroj.*) Ne eksilentigu vian pian kantadon pro mi. Antaŭen, miaj amikoj!

(*La procesio malrapide eliras maldekstren.*)

Sekvu, kiu volas; kaj restu, kiu volas. Sed vi ĉiuj eksciis hodiaŭ, ke mia loko estas tie ĉi. (*Malkvieteco en la aro kaj movado.*) Kio mi estas? La imperiestro. Sed ĉu mi diris ĉion per tio? Ĉu ne troviĝas unu imperiestra ofico, kiu ŝajnas esti moke forviŝita el la memoro dum la lastaj jaroj? Kio estis la kronita filozofiamanto Marko Aŭrelo? Imperiestro? Nur imperiestro? Preskaŭ mi demandis: ĉu li ne estis ankoraŭ io pli multe ol imperiestro? Ĉu li ne estis ĉefpastro samtempe?

Voĉo el la amaso. Kion diras la imperiestro? Kio estis tio, kion li diris?

Oratoro Temisteos. Ho sinjoro, ĉu vere vi intencos —?

Imperiestro Juliano. Eĉ mia granda onklo Konstantios ne kuraĝis formeti tiun altan oficon post kiam li cedis ekster-ordinarajn privilegiojn al ia nova religio. Li eĉ daŭrigis nomigi sin ĉefpastro de ĉiuj, kiuj firme dediĉadis sin al la pradioj de la greka popolo. Ke tiu ofico en la postaj jaroj estis insultege malzorgata, pri tio mi nun ne volas paroli, sed nur pri tio, ke neniu el miaj altrangaj antaŭuloj, eĉ ne tiu, kiun ni nun salutas lastfoje kun plor-malsekigita vizaĝo, kuraĝis formeti ĝin. Ĉu mi trokuraĝigus fari ion, kion tiaj saĝaj kaj justemaj imperiestroj ne opiniis justa kaj konsilinda? La intenco tion fari estas tre malproksime de mi!

Oratoro Temisteos. Ho, granda imperiestro, ĉu vi volas diri per tio —?

Imperiestro Juliano. Per tio mi volas diri, ke plena libereco estu por ĉiuj burĝoj. Tenu vin firme ĉe la dio de la Kristanoj, se via anim-trankvileco tion deziras. Rilate al mi, mi ne kuraĝas meti miajn esperojn en ia dio, kiu ĝis nun estis al mi malamika en ĉiuj miaj entreprenoj. Mi havas certajn signojn kaj antaŭdirojn, ke mi ŝuldas ĉiujn sukcesojn, kiujn mi ricevis interne de la gaŭlaj limoj, al tiuj aliaj dioj, kiuj favoris Aleksandron en samspeca maniero. Sub la ŝirmo de tiuj dioj mi feliĉe elŝteligis el ĉiuj danĝeroj, kaj precipe ili estis tiuj, kiuj kondukis min tien ĉi kun tia admirinda rapideco kaj prospero, ke mi aŭdis tie ĉi sur la stratoj alvokojn, kiuj antaŭ-anoncas, ke oni rigardas min kiel dian homon, — kio tamen estas ega trograndigo, ho amikoj! Sed estas certe, ke mi ne povas montri min sendanka pro tiaj daŭraj pruvoj de favoro.

Voĉo en la homamaso (*mallaŭte*). Kion li volas fari?

Imperiestro Juliano. Do, mi remetis la honorindajn diojn de viaj praavoj en iliajn iamajn rajtojn. Sed nenia insulto okazos al la dio de la Galileanoj nek al tiu de la Judoj. La templojn, kiujn en pasintaj tagoj konstruigis piaj regantoj kun tiom da lerteco, tiujn mi restarigos en junigata beleco kun altaroj kaj bildoj por ĉiu dio aparte, tiel ke deca adorado denove povu

okazi tie. Tamen mi ne toleros, ke la kristanaj preĝejoj spertu ian malaman pritrakton, nek ankaŭ suferos ian maljustaĵon pri iliaj enterigejoj nek aliaj lokoj, kiujn ili laŭ stranga eraro opinias sanktaj. Ni estos indulgemaĵe je eraroj de aliuloj; mi mem ja estis kaptata de eraroj; — sed sur tion mi jetas vualon. Mi ne volas priparoli tion, kion mi pensadis pri la diaj aferoj de post mia dudek-unua jaro. Mi volas nur diri, ke mi tiujn gratulas, kiuj sekvos min, — ke mi ridetas je tiuj, kiuj ne paŝos en miajn piedpostsignojn, — ke mi klopodos konvinki, sed ke mi volas neniun devigi.

(Li silentas momenton plenespere; oni aŭdas tie kaj tie ĉi en la homamaso kelkajn mallaŭtajn aprobojn.)

Imperiestro Juliano *(pli laŭte kaj per kolereta voĉo)*. Kun rajto mi atendis pli dankeman aklamon, kie mi nun rimarkas nur scivolan miron. Sed mi devus tion scii; — kompatinda indiferenco regas inter tiuj, kiuj pretendas firme sin tenadi ĉe la malnova religio. Subpremado kaj mokado forgesigis la honorindajn kutimojn de la praavoj. Mi dis-demandis antaŭe al altranguloj kaj al malaltranguloj; sed apenaŭ unu el ili povis respondi al mi kiel estas entreprenata ofero al Apolono aŭ al Fortuno detale aŭ entute. En tio kiel en ĉio alia mi sekve devos doni la ekzemplon. Multajn sendormajn noktojn mi pasigis esplorante en malnovaj libroj, kio dum pasintaj tempoj estis kutimo rilate al tiuj aferoj — — sed mi ne plendas pri tio, kiam mi pripensas, kian dankegon ni nepre ŝuldas al tiuj dioj; nek mi hontas ĉion entrepreni mem — — Kien, Cezarios?

Kuracisto Cezarios. Al la preĝejo, plej indulga imperiestro; mi volas preĝi por la animo de mia mortinta sinjoro.

Imperiestro Juliano. Iru, iru! Ĉiu estas libera en tiaj aferoj.

(Cezarios kaj multaj aliaj korteganoj kaj ŝtat-oficistoj eliras maldekstren.) Sed la liberecon, kiun mi konsentas al la plej maleminenta burĝo, mi rezervas ankaŭ por mi mem. Tial mi komunikas al vi, ho Grekoj kaj Romanoj, ke mi returne iras kun mia tuta koro al la religio kaj moroj, kiuj estis sanktaj ĉe niaj praavoj, — ke ili libere povas esti disvastigataj kaj konfesataj flanke de ĉiuj novaj kaj fremdaj religioj, — kaj.

ĉar mi estas infano de tiu ĉi urbo, kaj ĝin amas tutkore, mi komunikas tion en la nomo de ĝiaj protektantaj dioj.

(Li donas signon; kelkaj servistoj forprenas la kurtenon de la kovrita ŝtono; oni vidas altaron kaj ĉe ĝia piedo vinujon, oleujon, malgrandan amason da ligno kaj cetere. Forta sed senparola movado en la homamaso dum Juliano iras al la altaro kaj preparas la oferon.)

Oratoro Temisteos. Ho, kiel Greko mi dezirus forfandiĝi en larmojn ĉe la vidado de tiom da humileco kaj pia fervoro.

Burĝo. Rigardu, li rompas mem la lignon.

Alia burĝo. Sed sur la maldekstra femuro; ĉu ĝi devas esti rompata tiel?

La unua burĝo. Tio nepre devas okazi tiel.

Oratoro Mamertinos. En la fajro, kiun vi ekbruligas, ho granda imperiestro, lumos kaj renaskiĝos plijunigitaj la esploro kaj la scienco, same kiel tiu admirinda birdo —

Militestro Nevita. Tiu fajro hardos la grekajn armilojn. Mi ne scias multon pri la galileaj elpensajtoj, sed tion mi rimarkis, ke ĉiuj, kiuj sin dediĉas al tiu religio, estas senkuraĝaj kaj maluzebaj por grandaj aferoj.

Oratoro Temisteos. En tiu fajro, ho nekomparebla imperiestro, mi vidas purigita la saĝecon de ĉiuj akuzoj kaj kulpigoj. La vino, kiun vi elverŝas, estas kiel purpuro per kiu vi ornamas la veron kaj altigas ĝin sur reĝan sidejon.

Oratoro Mamertinos. Nun, kiam vi levos la manojn, ŝajnas kvazaŭ vi honoras la frunton de la scienco per ora krono; kaj la larmoj, kiujn vi elverŝas — —

Oratoro Temisteos (*alproksimiĝas*). Jes, jes, la larmoj, kiujn vi elverŝas, estas kiel multvaloraj perloj, per kiuj la elokventeco denove estos reĝe rekompencata. Ho, tiel estas refoje permesate al la Grekoj, levi siajn okulojn ĉielen kaj sekvi la iradon de la eternaj steloj! Kiom da tempo jam pasis, kiam tio estis al ni permesata! Ĉu ni ne estis devigataj kaj ne devis tremadi pro timo por la denuncantoj kaj klini nian vizaĝon teren kiel la bestoj? Kiu inter ni kuraĝis rigardi la leviĝon kaj subiron de la suno? (*Li sin turnas al la homamaso.*) Vi terkulturistoj, kiuj hodiaŭ alvenis tien ĉi tiel grandare, vi eĉ ne kuraĝis atenti la situacion

de la astroj, kvankam vi devas aranĝi tutan vian laboron laŭ ili —

Oratoro Mamertinos. Kaj vi maristoj, — ĉu vi aŭ viaj patroj kuraĝis elparoli la nomojn de la stelaroj, laŭ kiuj vi devas direkti viajn ŝipojn? Nun vi kuraĝas tion; nun estas malpermesate al neni —

Oratoro Temisteos. Nun nenia Greko bezonas plu vivi sur la tero aŭ sur la maro ne demandante konsilon al la neŝanĝiganta irado de la steloj; li ne plu bezonas, kiel kuglo, lasi sin ĵetadi tien kaj reen de la okazoj kaj subitaj akcidentoj; li —

Oratoro Mamertinos. Ho, kia viro estas tiu ĉi imperiestro, al kiu ni dankas tiom da boneco!

Imperiestro Juliano. *(Ĉe la altaro kaj kun etenditaj brakoj.)*
 Jen mi publike kaj humile elverŝis oleon kaj vinon por vi, ho bonfarantaj dioj, kiuj tiel longe devis malhavi tiujn por vi tiel plej decajn memoraĵojn. Mi suprensendis mian dankon al vi, ho Apolono, kiun kelkaj saĝuloj — kaj precipe tiuj el la orientaj landoj — ankaŭ nomas la sun-dio, ĉar vi alportas kaj rejunigas tiun lumon en kiu la vivo havas siajn naskiĝon kaj devenon. — Mi portis mian oferaĵon al vi, ho Dionizo, vi rava dio, kiu altigas la homan animon el la profundo kaj suprenportas ĝin al por animoj deca kunvivado kun pli altaj spiritoj. — Kaj, kvankam mi nomas vin laste, mi tamen ne pensis pli malmulte pri vi, ho Fortuno! Ĉu mi starus tie ĉi sen via helpo? Vere mi scias, ke vi ne plu montras vin kiel okazis en la ora epoko, pri kiu al ni rakontas tiu neforgesebla blinda kantisto. Sed tion mi tamen scias — kaj en tio ĉiuj saĝec-amikoj samopinias kiel mi, ke vi partoprenas en la elekto de tiu akompananta spirito, kiu sekvas ĉiun homon sur lia vivovojo. Mi havas nenian kaŭzon plendi pri vi, ho Fortuno! Multe pli multe mi sentas la plej altan instigon laŭdadi vin. Tiun, por mia koro tiel karan devon, mi entreprenis hodiaŭ. Eĉ la plej malgravan laboron mi ne evitis. Ĉi tie mi staras en la hela taglumo; ĉiuj okuloj de Grekoj estas fiksataj sur mi; mi atendas, ke la voĉoj de ĉiuj Grekoj unuiĝos kun mia por alvoki vin, ho senmortajn diojn!

(Dum la oferado la plej multaj kristanaj rigardantoj sinsekve foriris; nur areto restis. Kiam la imperiestro eksilentas, oni aŭdas malfortajn ekkriojn de aplaŭdo, interniksatajn kun mallaŭta ridado kaj flustrado de miro.)

Imperiestro Juliano (*rigardas ĉirkaŭe*). Ho, rigardu! Kiom da ili restas? Ĉu oni forŝteliĝis?

Oratoro Temisteos. Jes, kun hontruĝo pro tia multjara sendank-emeco.

Oratoro Mamertinos. Ne, estis ĝojruĝo. Ili foriris por diskonigi la grandan sciigon sur ĉiuj stratoj.

Imperiestro Juliano (*forlasas la altaron*). La malklera homamaso neniam povas submeti sin al la neatenditajo. Mi havos malfeliĉan laboron por fari; sed nenia peno ĉagrenos min. Kio estas pli deca al saĝec-amanto ol ekstermi erarojn? Por tiu celo mi fidas al vi, ho lumigitaj amikoj! Sed miaj pensoj devas flankeniĝi de tio dum mallonga tempo. Sekvu min; mi devas antaŭe plenumi aliajn devojn.

(Li foriras rapide dekstren, ne respondante la salutojn de la burĝoj; la korteganoj kaj la aliaj akompanantoj sekvas lin.)

(Salonego en la imperiestra palaco. Porĉoj ĉe ambaŭ flankoj kaj en la fundo; sur altaĵo ĉe la maldekstra endoma muro sur la antaŭ-scenejo staras la imperiestra trono.)

(Imperiestro Juliano, ĉirkaŭita de la korteganoj kaj de altaj ŝtat-oficistoj, inter kiuj la trezoristo Ursulos kaj la oratoroj Temisteos kaj Mamertinos.)

Imperiestro Juliano. Ĝis tie ĉi la dioj helpis. Nun la laboro ruliĝos antaŭen kiel la ondegoj de uragan-fluego. La senparola kontraŭstaro, kiun mi sentas el iaj flankoj, de kie mi plej mal-multe ĝin atendis, ne perdigos la egalpezon de mia animo. Estas ja la vera signo de saĝeco, montradi paciencon. Ni ĉiuj scias, ke ni povas sanigi la korpajn dolorojn per ĝustaj rimedoj; — sed ĉu oni povas ekstermi erarojn pri la diaj aferoj

per fajro kaj glavo? Kaj kio utilas al mi, ke viaj manoj oferos dum viaj animoj tion malbenos, kion faras viaj manoj? Tial ni volas vivi en harmonio unu kun alia. Mia kortego estos enirebla por ĉiuj bonaj viroj, kiajn opiniojn ajn ili havos. Ni donu al la mondo la neordinarajn spektaklojn de kortego sen hipokriteco — ĝi estos sendube la sola laŭ sia speco — spektaklon de kortego, kie flatistoj estos rigardataj kiel la plej danĝeraj malamikoj. Estonte ni volas kulpigi kaj mallaŭdi unu la alian se bezone, tamen ni ne amos unu la alian pli malmulte pro tio. (*Al la militestro Nevita, kiu venas de la fundo.*) Via vizaĝo ardas, Nevita; — kiujn bonajn sciigojn vi alportas?

Militestro Nevita. Vere la plej bonajn kaj ĝojigajn. Granda aro da senditoj de reĝoj el la malproksima Hindujo venis por alporti al vi donacojn kaj kun peto pri via amikeco.

Imperiestro Juliano. Ho, rakontu do al mi, — de kiuj popoloj?

Militestro Nevita. De la Armenoj kaj aliaj el la transa flanko de la Tigriso. Jes, inter la fremduloj estas kelkaj, kiuj pretendas, ke ili venas el la insuloj Diu kaj Serandib.

Imperiestro Juliano. Sekve el la plej malproksimaj limoj de la mondo, ho amikoj!

Oratoro Temisteos. Eĉ tien la famo portis viajn nomon kaj farojn!

Oratoro Mamertinos. Eĉ en tiuj nekonataj regionoj via glavo estas terurajo por reĝoj kaj popoloj!

Oratoro Temisteos. Diu kaj Serandib! Malproksime kaj oriente en la hinda oceano —

Oratoro Mamertinos. Mi ne hezitas diri: ekster la mond-regiono.

Imperiestro Juliano. La hartondisto venu!

(*Kortegano eliras dekstren.*)

Mi volas ricevi la senditojn dece, — sed sen pompo kaj ornamo. Tiel la majesta Marko Aŭrelo ricevus ilin; kaj pli volonte mi elektos lin kiel ekzemplon ol la imperiestron, kies foriro ĵus ĉagrenigis nin. Nenia ornamo plu kun pereemaj objektoj! Eĉ la barbaroj rimarkos, ke la saĝeco — en la formo de sia plej maleminenta servisto — ree trovis lokon sur la imperiestra seĝo.

(*La kortegano revenas kun la hartondisto Eŭnapios, kiu estas belege vestita.*)

Imperiestro Juliano (*rigardas lin kun surprizo, iras renkonte al li kaj salutas.*) Kion vi deziras tie ĉi, sinjoro?

Hartondisto Eŭnapios. Plej indulga imperiestro, vi ordonis ke mi venu —

Imperiestro Juliano. Vi eraras, amiko; mi ne deziris venigi unu el miaj konsilantoj.

Hartondisto Eŭnapios. Plej indulga imperiestro —

Trezoristo Ursulos. Pardonu, sinjoro; tiu ĉi viro estas la imperiestra hartondisto.

Imperiestro Juliano. Kion vi diras! Vere? Ĉu tiu viro — ho, vi mokas — tiu ĉi viro, vestita per silko kaj ore borderitaj botoj, li estus —? He, he! Ĉu vi estas la hartondisto! (*Li klinas sin antaŭ li.*) Neniam mi havus la kuraĝon, ke tiaj belaj manoj servus min.

Hartondisto Eŭnapios. Plej indulga imperiestro, — mi petegas en la nomo de Dio kaj de mia Savinto —

Imperiestro Juliano. He, he!! Galileano! Jes, mi jam supozis tion! Ĉu tio estas la abnegacio pri kiu vi fanfaronas? Sed mi konas vin bone! La templon de kiu dio vi prirabis, aŭ kiom vi ŝtelis el la imperiestra trezorejo por povi tiel ornami vin? — Vi povas foriri; mi ne bezonas vian helpon. (*Eŭnapios foriras dekstren.*) Diru al mi, Ursulos; kiom da salajro havas tiu viro?

Trezoristo Ursulos. Plej indulga imperiestro, laŭ la ordono de via majesta antaŭulo li ricevas ĉiutage la salajron de dudek viroj —

Imperiestro Juliano. He, he; ne pli multe?

Trezoristo Ursulos. Jes, sinjoro; en la lasta tempo li povas laŭplaĉe uzadi kelkajn ĉevalojn de la imperiestra ĉevalejo, kune kun jara monsumo kaj unu oran moneron ĉiufoje kiam li —

Imperiestro Juliano. Kaj ĉio tio por hartondisto! Kiom do la aliaj —? Tio finiĝu baldaŭ. — Enirigu la fremdajn senditojn!

(*La militestro Nevita foriras funden.*)

Mi volas kun ne-tonditaj haroj ricevi ilin. Tiel estos plej dece; ĉar kvankam mi bone scias, ke neordigitaj haroj kaj ŝirita mantelo ne faras veran filozofi-amanton, mi tamen opinias, ke la ekzemploj donitaj de Antisteno kaj Diogeno, povas esti atentitaj de viro, — eĉ sur la imperiestra seĝo — kiu volonte sekvos la pied-postsignojn de tiaj grandaj instruistoj.

(Li ŝupreniras la altaĵon, kie staras la trono. La korteganoj laŭrange lokas sin malsupre. La senditoj enkondukitaj de la militestro Nevita kaj la dominspektoro Eŭterios, eniras en pompa procesio, akompanataj de sklavoj, portantaj donacojn ĉiuspecajn.)

Militestro Nevita. Plej indulga imperiestro! Ne komprenante tiun noblan lingvon, kiun tiom da elokventaj viroj, kaj precipe vi mem, perfektigis antaŭ ĉiuj lingvoj, — kaj ne kuraĝante, ke barbaraj tonoj bruaĉados en viajn orelojn, — tiuj ĉi senditoj el la orientaj landoj elektis min sia tradukanto.

Imperiestro Juliano *(sidanta sur la tronseĝo)*. Mi estas preta aŭskulti vin.

Militestro Nevita. Unue la reĝo de Armenujo metigas antaŭ viaj piedoj tiun armaĵon, kiun li petas, ke vi portu en bataloj kontraŭ la imperiestraj malamikoj, kvankam li scias bone, ke vi, nevenkebla heroo, staras sub la protektantaj okuloj de la dioj, kiuj ne toleros, ke ia mortiga armilo vundos vin. — Ĉi tien estas portataj al vi multvaloraj tapiŝoj, tendoj kaj selaĵoj el la alia flanko de la rivero Tigriso. Per tio ili volas sciigi, ke, ĉar la dioj donacis al tiuj landoj eksterordinarajn riĉaĵojn, tio okazis por la celo profitigi la favoraton de la dioj. — La reĝo de Serendib, kaj same la reĝo de Diu, sendas al vi ĉi tiujn armilon, glavon kaj ŝildon, kun pafarkoj kaj sagoj; ĉar, diras ili, ni opinias tion konsilinda, stari senarmile antaŭ la venkinto, kiu, kiel ia dio, sin montris sufiĉe potenca, rompi ĉian kontraŭstaron. — Komence al tio, ili ĉiuj petas, kiel la plej altan favoron, vian amikecon kaj precipe ili petegas, ke vi, kiam vi, kiel jam anoncis al ili la famo, intencos neniigi la trokuragan persan reĝon en la venonta printempo, ke vi tiam indulgu iliajn landojn kontraŭ malamika invado.

Imperiestro Juliano. Tia komisio ne povis veni al mi tute neatendite. La kunportitaj donacoj devas esti metataj en mian

trezorejon, kaj per vi mi sciigos al viaj regantoj, ke mi intencas vivi en amikeco kun ĉiuj popoloj, kiuj — ĉu per armiloj ĉu per ruzeco — ne metos barilojn sur mian vojon por kontraŭstari miajn celojn. — Rilate al tio, ke oni en viaj malproksimaj landoj, delogitaj de miaj feliĉaj militvenkoj, lasis sin forlogi rigardi min kiel dion, nu, pri tio mi ne volas okupi min. Mi estimas la diojn tro alte, por ke mi arogus akcepti maldecan lokon inter ili, kvankam mi bone scias, ke pli ofte, kaj precipe en antikvaj tempoj, vivis herooj kaj regantoj, kiuj estis tiel distingataj de la favoro kaj indulgo de la dioj, ke estus malfacile diri, ĉu oni devos konsideri ilin kiel mortemajn aŭ senmortajn. Tamen estas dube juĝi pri tiaj aferoj, eĉ por ni, Grekoj. Kiel multe pli dube por vi! Sekve, sufiĉe pri tio. — Eŭterios, konduku la fremdulojn al ilia ripozejo kaj zorgu, ke al ili mankos nenio.

(La senditoj kaj ilia sekvantaro forlasas la salonon, akompanataj de la dominspektoro Eŭterios. Juliano malsupreniras la altaĵon, la korteganoj kaj la oratoroj ĉirkaŭas lin sub admirantaj bondeziroj.)

Oratoro Temisteos. Tiel juna, — kaj jam tiel honorata antaŭ ĉiuj imperiestroj!

Oratoro Mamertinos. Mi demandas, ĉu Famo havus sufiĉe da pulmoj por diskonigi vian gloron, se la dioj destinis por vi longan vivon, kion mi certe esperas.

Oratoro Temisteos. La terur-ekkrio, kiun eligis la forkurantaj Alemanoĵ ĉe la plej malproksimaj bordoj de la Rejno, ruliĝis orienten ĝis kiam ĝi resonis de la Taŭrido kaj la Kaŭkazo —

Oratoro Mamertinos. — nun ĝi aŭdiĝas kiel fulmotondra eĥo trans la tutan Azion.

Militestro Nevita. Kio tiel ektimigis la Hindojn, tio estas la simileco inter nia greka Juliano kaj la macedona Aleksandro —

Oratoro Mamertinos. Ho, sensencaĵo! Ĉu la reĝo Aleksandro havis sekretajn malamikojn en sia propra tendaro? Ĉu li havis envian kaj kalumnian kortegon por kontraŭbatali?

Militestro Nevita. Vere, vere, kaj tie ne estis sentaŭga armeestro, kiu malhelpis la sukcesojn de Aleksandro.

Imperiestro Juliano. Ursulos, estas mia volo, ke la alveno de tiuj ĉi senditoj estu diskonigata en la tuta urbo kaj en ĉiuj regionoj de la imperio. Ĉio estu precize rakontata, — de kiaj landoj ili venis kaj kiaj donacoj ili kunportis. Mi volas kaŝi nenion el ĉio, kio koncernas mian regadon. Vi povas samtempe aludi pri la stranga kredo de la Hindoj, ke Aleksandro estus reveninta.

Trezoristo Ursulos (*hezitante*). Pardonu, plej indulga imperiestro, sed —

Imperiestro Juliano. Nu?

Trezoristo Ursulos. Vi mem diris, ke flataĵo ĉe tiu ĉi kortego ne estos tolerata —

Imperiestro Juliano. Tre certe, amiko!

Trezoristo Ursulos. Mi tial diru honeste, ke tiuj senditoj venis tien ĉi por serĉi vian antaŭulon kaj ne vin.

Imperiestro Juliano. Kion vi kuraĝas kredigi al mi!

Oratoro Temisteos. Fi do, kia absurdaĵo!

Oratoro Mamertinos. Kiaj elpensajoj!

Trezoristo Ursulos. Estas vere. Mi scias jam longe, ke tiuj viroj venos — longe antaŭ ol la imperiestro Konstantios fermis siajn okulojn. Ho, mia indulga imperiestro, falsa vanteco ne enŝteligu en vian junan animon.

Imperiestro Juliano. Sufiĉe, sufiĉe! Vi sekve volas diri per tio, ke —?

Trezoristo Ursulos. Pripensu mem. Kiel viaj venkoj en Gaŭlujo, kiel ajn famaj ili estus, povus atingi tiel rapide la orelojn de tiuj malproksimaj popoloj? Kiam la senditoj parolis pri la heroaĵoj de l'imperiestro, ili pensis pri la milito kontraŭ la persa reĝo —

Militestro Nevita. Mi ne sciis, ke la milito kontraŭ la reĝo Saporo estis farata tiamaniere, ke ĝi disvastigus ektimon ĝis la mondlimo.

Trezoristo Ursulos. Estas vere, la feliĉo estis kontraŭ niaj armiloj en tiu regiono. Sed la famo pri la grandaj preparoj, kiujn en la printempo la imperiestro Konstantios pripensis, ektimigis la Armenojn kaj aliajn popolojn. — Ho, prikalkulu

mem la tempon, sinjoro, kalkulu la tagojn, se vi deziras, kaj diru poste ĉu estas eble alie. Via marŝado ĉi tien el Gaŭlujo okazis en mirinda rapideco; sed la vojaĝo de tiuj viroj el la hindaj insuloj —; estus ja dekfoje pli mirinde, se —; demandu ilin mem por ke vi eksci —

Imperiestro Juliano (*pala de kolero*). Kial vi diras ĉion tion al mi?

Trezoristo Ursulos. Ĉar tio estas vera, kaj ĉar mi ne povas toleri, ke via bela juna gloro estos malheligata de prunteprenita mantelo.

Oratoro Temisteos. Kia kuraĝega parolo!

Oratoro Mamertinos. Kia plej kuraĝega parolo!

Imperiestro Juliano. Tion vi ne povas toleri? Nu, ho, mi konas vin pli bone. Mi konas vin ĉiujn, ho maljunaj ĉe tiu ĉi kortego, vi volas plimalgrandigi la glorojn de la dioj. Ĉar ĉu ne estas la gloro de la dioj, ke ili povas plenumi grandajn aferojn pere de unu homo? Sed vi malamas tiujn diojn, kies templojn vi ruinigis, kies bildojn vi rompis kaj kies trezorojn vi alproprigis al vi. Vi eĉ ne toleris ilin, tiujn niajn plej bonfarantajn diojn. Vi eĉ ne toleris, ke la piuloj portis ilin sekrete en la koro. Nun vi volas ankaŭ renversi la templon de la dankemeco, kiun mi konstruis por ili en mia koro. Vi volas forpreni de mi la dankemajn pensojn, ke mi ŝuldas novan kaj tiel dezirindan bonfaron al la senmortuloj, — ĉar ĉu la gloro de tia bonfaro ne estas estiminda?

Trezoristo Ursulos. La unu-nura Dio en la ĉielo estas mia atestanto, ke —

Imperiestro Juliano. La unu-nura! Jen refoje la konata sensencajo! Tia vi estas ĉiam. Kia sentoleremeco! Speguliĝu do je ni! Ĉu ni diras, ke niaj dioj estas la unu-nuraj? Ĉu ni ne estimas la diojn de la Egiptoj kaj tiun judan Jehova'n, kiu tre certe plenumis grandajn farojn en sia popolo? Sed vi inverse, — kaj eĉ viro kiel vi, Ursulus —! Ĉu vi estas Romano, edukita de grekaj gepatroj? La unu-nura? Kia barbara malrespekto!

Trezoristo Ursulos. Vi promesis, ke vi ne volus malami iun pro lia kredo.

Imperiestro Juliano. Tion mi promesis; sed mi tamen ne toleras, ke vi tro multe alproksimiĝas al ni. La senditoj ne estus venintaj por —? Tio signifas alivorte, ke la granda dia Dionizo, kies potenco konsistas en tio, riveli al la homoj kaŝitajn aferojn, ke li nun ne estus plu tiel laborema kiel en pasintaj tempoj. Ĉu mi povas toleri tion? Ĉu tio ne estas senhonta impertinenteco? Ĉu mi ne estas devigata postuli de vi respondecon pri tio?

Trezoristo Ursulos. Tiam ĉiuj Kristanoj dirus, ke vi persekutas ilian religion.

Imperiestro Juliano. Neniu estos persekutata pro sia religio. Sed ĉu mi havas la rajton trastreki tion, pri kio vi estas kulpaj, nur tial, ĉar vi estas Kristanoj! Ĉu viaj eraroj eble protektos viajn krimetojn? Kion do vi, trokuraĝaj homoj jam longe faraciis ĉe tiu ĉi kortego kaj aliloke? Kiom do vi flatadis ĉiajn malvirtojn kaj kiom vi kurbiĝis pro ĉies kapriĉoj? Kaj kion vi mem toleris, Ursulos? Mi pensas pri tiu senhonta dande vestita barbiro, tiu pomade fetoranta malsaĝulo, kiu ĵus naŭzis min. Ĉu vi ne estas la trezoristo? Kiel vi povis cedi al liaj senhontaj postuloj?

Trezoristo Ursulos. Ĉu estas krimo, ke mi estis la servisto de mia mastro?

Imperiestro Juliano. Mi ne bezonas tiajn malŝparemajn servistojn. Ĉiuj tiaj duon-homoj estos pelataj el la kortego; kaj samtempe ĉiuj kuiristoj kaj sorĉistoj kaj dancistoj. Deca ŝparemo refoje estas enkondukata (*al Temisteos kaj Mamertinos*). Vi, miaj amikoj helpis min en tio. — kaj vi, Nevita, por ke vi povu ekagi aŭtoritate, mi donas al vi la ordonorajton de armeikondukisto, kaj vi ekzamenu kiel la ŝtataj oficoj estis plenumataj dum la vivo de mia antaŭulo kaj precipe dum la lastaj jaroj. Vi povas enoficigi kompetentajn virojn, kiujn vi deziras, por ke ili juĝu kun vi pri tiuj aferoj.

(*Al la plej aĝaj korteganoj kaj konsilistoj.*)

Mi ne bezonas vin. Kiam mia priplorata parenco sur sia mortlito nomis min sia heredanto, li ankaŭ heredigis al mi la justecon, kiun lia malforteco malebligis al li plenumi. Iru hejmen kaj post kiam vi estos ordigintaj viajn aferojn, vi povas iri kien ajn vi deziras.

Trezoristo Ursulos. Dio protektu kaj ŝimu vin, ho mia imperiestro!

(Li faras riverencon kaj eliras kun la aliaj laŭ la fundo. Nevita, Temisteos kaj Mamertinos kaj la junaj korteganoj amasiĝas ĉirkaŭ la imperiestro.)

Militestro Nevita. Mia majesta reganto, kiel mi plene dankos vin pro tiu signo de favoro, kiun vi ĵus —

Imperiestro Juliano. Ne danku. Dum tiuj ĉi malmultaj tagoj mi lernis ŝati vian fidelecon kaj juĝ-povon. Ankaŭ la publikigon pri la orientaj ambasadoroj mi komisias al vi plenumi. Skribu ĝin tiel, ke la bonfarantaj dioj ne trovos kaŭzon ekkoleri kontraŭ unu el ni.

Militestro Nevita. Rilate ambaŭ aferoj mi agos laŭ la volo de via imperiestra moŝto *(li eliras dekstren)*.

Imperiestro Juliano. Kaj nun, vi fideluloj, nun ni laŭdos la senmortajn potencojn, kiuj montris al ni la ĝustan vojon.

Oratoro Temisteos. La senmortulojn kaj ilian pli ol morteman favoraton! Kian ĝojegon ni aŭdos en la imperio, kiam disvastiĝos la sciigo, ke vi forpelis tiujn tiranajn egoistajn homojn!

Oratoro Mamertinos. Kun kiom da malpacienco kaj kun kiom da senpaciencaj esperoj oni atendas la elekton post iliaj posteuloj!

Oratoro Temisteos. Ĉiuj Grekoj ekkrios unuvoĉe: Plato mem kaptis la direktilon de la ŝtato!

Oratoro Mamertinos. Ne, ne, kara amiko; ĉiuj Grekoj ekkrios: La diro de Plato veriĝis, — nur „dio“ povas regi la homojn!

Oratoro Temisteos. Mi deziras nur, ke la bonvolo de la feliĉportantoj sekvu Nevita'n. Li akiris grandan kaj malfacilan taskon, mi ne konas lin funde, sed ni ĉiuj esperu, ke li pruvos esti la ĝusta —

Oratoro Mamertinos. Tre certe; kvankam eble aliaj viroj troviĝus, kiuj —

Oratoro Temisteos. Per tio mi ne intencis diri, ke la de vi farita elekto, ho senkomparebla imperiestro —

Oratoro Mamertinos. Ne, ne, tute ne!

Oratoro Temisteos. Sed se estas eraro, bruli pro fervoro por servi amatan reganton —

Oratoro Mamertinos. — tiam vere vi havos pli ol unu trompigantan amikon —

Oratoro Temisteos. — eĉ se vi ne estimis ilin tiom, kiom vi estimis la plej feliĉan Nevita'n —

Oratoro Mamertinos. — eĉ se ili devus malhavi ĉiun mankantan signon de via favoro —

Imperiestro Juliano. Ni volas lasi neniun kapablan viron senutila nek sen rekompenco. Rilate vin, Temisteos, al vi mi donas la regantecon tie ĉi en Konstantinopolo; kaj vi Mamertinos, vi povas prepari vin ekvojaĝi estontan jaron al Romo por ekpreni unu el la vakantaj oficoj de konsulo.

Oratoro Temisteos. Mia imperiestro! Min kaptas kapturino pro tiom da honoro —!

Oratoro Mamertinos. Tia honoro! Konsulo! Ĉu estis iam tia altestimata konsulo kiel mi! Eble Lucio? Eble Bruto? eble Publio Valerio? Kio estis ilia honoro komparata kun la mia? Ili estis elektitaj de la popolo, sed mi de Juliano!

Kortegano. Glorata estu la imperiestro, kiu igas regi la justecon!
Alia kortegano. Glorata estu tiu, kies nura nomo ektimigas la barbarojn.

Oratoro Temisteos. Glorataj estu ĉiuj majestaj dioj, kiuj en harmonio direktis siajn enamiĝintojn okulojn al unu sola viro, tiel ke ni devus diri pri tiu sola viro, se li la unuan fojon — kio malfrue okazu — volas malĝojigi nin, kaj foriri de ni; li superis en ĉio Sokrato'n kaj Marko Aŭrelo'n kaj Aleksandro'n!

Imperiestro Juliano. Jen vi trafis la koron de la afero, mia Temisteos! Al la dioj ni devas levi niajn manojn kaj korojn. Tion mi ne diras por instrui vin, sed por rememorigi al vi pri tio, kio estis ĉe ĉi tiu kortego preterlasita tiel longe. Devigi mi ja volas neniun. Sed ĉu mi estas mallaŭdinda se mi volonte sentigos al aliaj la dolĉan ravon, kiun mi spertas, kiam mi sentas min lulata en la senmorta komuneco! Glorata, glorata vi estas, ho vinlaŭbe kronita Dionizo! Ĉar estas antaŭ ĉio vi, kiu faras tiajn grandajn misterplenajn aferojn. Nun vi ĉiuj

komencu vian taskon. Rilate al mi, mi promesis fari ĝoj-procesion tra la stratoj de la urbo. Ĝi ne estos festo por miaj korteganoj, nek festeno inter kvar muroj. Libere la burĝoj povos aliĝi al mi aŭ malproksimiĝi, mi volas disigi la purajn de la malpuraj, la piajn de la erarantoj. — Ho sunreĝo, jetu lumon kaj belecon sur tiun ĉi tagon! Ho Dionizo, mallevu vian ŝvelantan belegecon sur la animojn; plenigu la animojn per via sankta venteg-muĝado, plenigu ilin ĝis ili rompiĝos kaj la liberigata ĝojego ekspiras en dancado kaj kantado! — Vivo, vivo, vivo en beleco!!

(Li eliras rapide dekstren. La korteganoj ariĝas en flustrantaj aretoj kaj malproksimiĝas iom post iom.)

(Mallarĝa strato en Konstantinopolo.)

(Granda homamaso; ĉiuj rigardas en la sama direkto al la strato. Bruado, kantado kaj muziko de fajfiloj kaj tamburoj aŭdiĝas je kelka distanco.)

Suisto *(en sia dompordo, laŭte diras trans la straton)*. Kio okazas, kara najbaro?

Butikisto *(en la kontraŭa domo)*. Oni diras, ke tio estas kelkaj siriaj sorĉistoj, kiuj envenas en la urbon.

Fruktvendisto *(sur la strato)*. Certe ne; tio estas egipta bando ĉirkaŭvagadanta kun simioj kaj dromedaroj.

Hartondisto Eŭnapios *(malriĉe vestita, penas vane trairi la homamason)*. Faru spacon, vi malsaĝuloj! Kiu, je la diablo povas tiel ŝerci kaj babilaĉi en tia malfeliĉa tago?

Virino *(antaŭ fenestro)*. Pŝ, pŝŝ! Eŭnapios! Bela sinjoro!

Hartondisto Eŭnapios. Ne parolu al mi publike sur la strato, ho kuplistino!

Virino *(antaŭ fenestro)*. Enŝteliĝu de malantaŭe, dolĉa amiko!

Hartondisto Eŭnapios. Fi al vi! Ĉu mi estas en humoro por ŝerci —

Virino *(antaŭ fenestro)*. Vi tamen estos en tiu humoro. Venu, bela Eŭnapios; antaŭ-hieraŭ mi ricevis sendaĵon da freŝaj kolomboj —.

Hartondisto Eŭnapios. Ho, vi peka mondo! (*Li volas preteriri*).
Faru spacon! en la nomo de Satano; lasu trairi min!

Teologiisto Hekebolios. (*en vojaĝ-vestaĵo kaj sekvata de kelkaj ŝarĝitaj sklavoj, venas de flanko strato*). Ĉu la urbo fariĝis frenezulejo? Ĉiuj krias samtempe kaj neniu povas respondi al mi. He, rigardu, — Eŭnapios, mia pia frato!

Hartondisto Eŭnapios. Mi salutas vin, estimata sinjoro! Ĉu vi revenis ankaŭ en la urbon?

Teologiisto Hekebolios. En tiu ĉi momento; — mi dediĉis la varmajn rikolt-monatojn al silenta preĝado en mia bieno en Kreta. Sed antaŭ ĉio diru al mi, kio okazas tie ĉi?

Hartondisto Eŭnapios. Malfeliĉo kaj konfuzo. La nova imperiestro —

Teologiisto Hekebolios. Jes, jes, mi ekaŭdis mirindajn famojn.

Hartondisto Eŭnapios. Dekoble pli malbonaj ol la famoj.
Ĉiuj fidelaj servistoj estas pelitaj el la palaco.

Teologiisto Hekebolios. Ĉu vi diras la veron?

Hartondisto Eŭnapios. Ve al mi; mi mem estis la unua —

Teologiisto Hekebolios. Terure! Sekve ankaŭ mi —?

Hartondisto Eŭnapios. Certe. Ĉiuj respondecoj estos esplorataj.

Ĉiuj donacoj devas esti redonataj. Ĉiuj neregulaj enspezoj —

Teologiisto Hekebolios (*paŝigante*). Dio protektu min!

Hartondisto Eŭnapios. Dio estu glorata, mi havas bonan konsciencon.

Teologiisto Hekebolios. Mi ankaŭ, mi ankaŭ; tamen —; verŝajne do estas vere, ke la imperiestro oferis al Apolono kaj Fortuno?

Hartondisto Eŭnapios. Jes, certe; sed kiun tuŝas tiaj bagateloj?

Teologiisto Hekebolios. Bagateloj? Ĉu vi ne komprenas, blindiĝinta amiko, ke estas la religio de ni, Kristanoj, kiun li persekutas?

Hartondisto Eŭnapios. Kion vi diras? Je la kruco de la Sinjoro, ĉu estus eble?

Virinoj (*en la interpuŝado*). Jen ili venas!

Viro (*sur la tegmento de domo*). Mi povas vidi lin!

Aliaj viroj. Kiu venas? Kiu, kiu?

La virino (*sur la tegmento*). La imperiestro Juliano. Li havas vinlaŭbon sur la haroj.

Popolo (*sur la strato*). La imperiestro!

Teologiisto Hekebolios. Venu, venu, pia frato!

Hartondisto Eŭnapios. Ellasu min; mi tute ne estas pia.

Teologiisto Hekebolios. Ĉu ne pia —?

Hartondisto Eŭnapios. Kiu kuraĝas diri tion —? Ĉu oni volas ruinigi min? Pia? Kiam mi estis pia? Mi estis iam Donatisto, tio estis antaŭ multaj jaroj. La diablo prenu la Donatistojn! (*Li frapas sur la fenestro.*) Ho, Barbara, Barbara; malfermu, maljuna prostitulino! (*Oni enlasas lin tra la dompordo.*)

La popolamaso. Jen li estas! Jen li venas!

Teologiisto Hekebolios. Ĉiuj neregulaj enspezoj —! Esploroj! Ho, terura fulmobato! (*Li forŝteliĝas kun ambaŭ sklavoj.*) (*La dioniza procesio iras pluen laŭ la strato. Flutistoj iras ĉe la fronto; ebriaj homoj, vestitaj kiel ŝaŭnoj aŭ satiroj dancas laŭtakte. En la mezo de la procesio oni vidas la imperiestron Juliano'n rajdantan sur azeno, kovrita per panterfelo; li estas vestita kiel la dio Dionizo, panterfelo kovras liajn ŝultrojn, vinber-girlando kovras lian frunton, en la mano li havas foliar-kovritan bastonon sur kies pinto estas pini-pomo. Duone nudaj kolorŝmiritaj virinoj kaj junuloj, dancistoj kaj ŝonglistoj ĉirkaŭas lin; kelkaj portas vinujon kaj pokalojn, aliaj tamburas kaj movas sin antaŭen sovaĝe saltetante kaj grimacante.*)

La dancistoj (*kantas*)

Fajra trinkaĵo el plenaj pokaloj,

Fajra trinkaĵo!

Lipoj trinkantaj

Okuloj brilantaj,

Kaprokruroj iretantaj,

Gloras Bakho'n kapturte!

Virinoj (*kantas*).

Ludon de am', kiun eĉ nokt'ne toleras,

Ludu ĝin, ho Bakhantinoj!

Ludu ĝin dum la brilado de l'suno!

Jen sur panter' li

Sidas majeste!

Nin kisu bakhantoj

Ĉar ni amegas vin, ho amindulojn;

Saltante, kantante, ŝanceligante,

Bakhantoj, nin kisu!

Imperiestro Juliano. Faru spacon! Estu decaj, ho burĝoj! Iru dece flanken; ne por ni, sed por tiu, kiun ni estimas!

Voĉo en la homamaso. La imperiestro en societo de malĉastulinoj kaj ŝonglistoj!

Imperiestro Juliano. Hontu, ke mi devas kontentiĝi kun io tia!
Ĉu vi ne hontas trovante pli da pieco kaj pli da fervoro ĉe tiuj ĉi homoj ol ĉe vi mem?

Maljuna viro. Kristo lumigu vin, ho sinjoro!

Imperiestro Juliano. Ha, vi estas Galileano! Kaj vi volas kunparoli? Ĉu via granda majstro ne sidis ĉetabele kun pekuloj? Ĉu li ne eniris kaj eliris domojn, kiuj ne estis konsiderataj kiel decaj? Respondu al mi pri tio.

Hartondisto Eŭnapios. (*Ĉirkaŭita de knabinoj en la pordo de la virino Barbara.*) Jes, respondu, respondu se vi povas, ho malsaĝulo!

Imperiestro Juliano. He, rigardu, — ĉu vi ne estas tiu hartondisto, kiu —?

Hartondisto Eŭnapios. Mi estas liberigita viro, plej indulga imperiestro! — Faru spacon, vi bakhantoj; spacon por frato!

(*Li kaj la knabinoj endancas en la procesion de Dionizo.*)

Imperiestro Juliano. Tio plaĉas al mi. Spegulu vin je tiu Greko, se postrestas ĉe vi ankoraŭ unu sprit-fajrero de la pragepatroj. Kaj tio ja estas necesa, ho burĝoj; ĉar nenia dio estas tiel malprave malŝatata — eĉ primokata — kiel tiu ravon kaŭzanta Dionizo, kiun la Romanoj nomas ankaŭ Bakho. Ĉu vi opinias, ke li estas dio de drinkuloj? Ho, vi plej nesciantaj, mi kompatas

vin, se vi opinias tiel. Al kiu, se ne al li, la poetoj kaj la antaŭvidistoj ŝuldas siajn mirindajn talentojn? Mi bone scias, ke kelkaj atribuas tiun efikadon al Apolono, kaj tre certe ne sen rajto; sed la interrilato de tio estas tute alie komprenebla, — kion mi povas pruvi al vi per diversaj skribaĵoj. Sed pri tio mi ne volas disputi kontraŭ vi sur la publika strato. Ankaŭ ne permesas tion la tempo. Ho, jam moku! Faru jam la signon de la kruco! Mi bone tion vidas. Volonte vi fajfus sur la fingroj; volonte vi ĵetus ŝtonojn al mi se vi kuraĝus. Ho, ĉu mi ne devus honti pri tiu ĉi urbo, kiu degeneris sub la barbaroj kaj kiu scias fari nenion pli bonan krom teniĝi je erarigantaj elpensoj de nescianta Judo! — Antaŭen! Flanken! — ne baru nian vojon!

Dancistoj (*kantas*). Jen sur panter' li
Sidas majeste!

Virinoj (*kantas*). Ĉar ni amegas vin, ho amindulojn.
Bakantoj, nin kisu!

(La procesio eniras flankstraton sub kantado, la homamaso rigardas dum muta admirado).

(Librarejo en la imperiestra palaco. Enirpordo ĉe la maldekstra flanko.)

(La dominspektoro Eŭterios eniras de maldekstre, lin sekvas du servistoj portantaj tapiŝojn).

Dominspektoro Eŭterios (*vokas dekstren tra la pordon*). Agilo, Agilo, varman roz-akvon! La imperiestro volas bani sin. (*Li foriras dekstren kun ambaŭ servistoj*).

Imperiestro Juliano. (*Eniras rapide de maldekstre. Li portas ankoraŭ la panterfelon kaj la vinber-girlandon. En la mano li havas la foliar-kovritan bastonon. Kelkajn ŝojojn li iras tien kaj reen sur la scenejo, poste li ĵetas la bastonon en angulon*).

Ĉu beleco estis en tio? — — Kie estis la maljunuloj kun blankaj barboj? Kie estis la puraj virgulinaj kun rubandoj ĉirkaŭ la frunto, kun decaj mangestoj, ĉastaj en la mezo de la ĝojo de l'danco? Fi do al vi, ho malĉastulinoj! — — (*Li forŝiras de si la panterfelon kaj ĵetas ĝin flanken*). Kie restis la beleco?

Ĉu la imperiestro ne povas ordoni: relevigu! kaj ĝi relevigos?
 Fi al tiu ĉi malbonodoranta malĉastajo! — — Kiaj vizaĝoj!
 Ĉiaj malvirtoj krias el tiuj tordiĝintaj trajtoj. Ulceroj de la
 korpo kaj de la animo — Fi, fi! — — Banon, Agilo! La malbon-
 odoro sufokas min.

Servisto Agilo (*en la enirejo dekstre*). La bano estas preta, plej
 indulga sinjoro!

Imperiestro Juliano. La bano? Mi jam ne bezonas ĝin. Kio
 estas la korpa malpuraĵo en komparo de la alia? Iru for! (*Agilo
 foriras*).

(*La imperiestro Juliano restas staranta kelkan momenton en
 profunda meditado*).

La antaŭvidanto de Nazaret sidis ĉetabele en la mezo de impost-
 istoj kaj pekuloj. — Kie kuŝas la abismo inter tio kaj tio ĉi?

(*Hekebolios eniras de maldekstre kaj ekhaltas kun timo ĉe
 la pordo*).

Imperiestro Juliano. Kion vi volas, viro?

Teologiisto Hekebolios (*surgenuante*). Sinjoro!

Imperiestro Juliano. He, kion mi vidas? Hekebolios; — ĉu
 vere estas vi?

Teologiisto Hekebolios. La sama kaj tamen alia.

Imperiestro Juliano. Mia iama instruisto. Kion vi volas? Ekstaru!

Teologiisto Hekebolios. Ne, ne; lasu min surgenua. Kaj ne koleru
 pro tio, ke mi uzas mian antaŭan rajton eliri kaj eniri ĉe vi.

Imperiestro Juliano (*indiferente*). Mi demandis, kion vi volas
 kun mi.

Teologiisto Hekebolios. Mia iama instruisto, vi diris. Ho, ke mi
 povu ĵeti forges-vualon sur tiujn tempojn!

Imperiestro Juliano (*kiel antaŭe*). Mi komprenas. Vi volas diri,
 ke —

Teologiisto Hekebolios. Ho, ke mi povu enteriĝi kaj kaŝi mian
 honton! Rigardu, rigardu, — jen mi kuŝas antaŭ vi, kiel viro
 kies haroj estas grizigontaj; — kiel viro, kiu esploradis kaj
 cerbumadis ĉiujn siajn tagojn kaj kiu nun devas konfesi, ke li
 eraris kaj ke li erarigis sian amatan lernanton!

Imperiestro Juliano. Kion vi volas diri per tio?

Teologiisto Hekebolios. Vi nomis min via iama instruisto. Vidu, jen mi kuŝas antaŭ viaj piedoj, rigardante al vi kun miro kaj nomante vin nun mia lernanto.

Imperiestro Juliano. Ekstaru, Hekebolios!

Teologiisto Hekebolios. Vi ekaŭdos ĉion, sinjoro, kaj juĝu mem laŭ via justeco. — Kiam vi estis for, fariĝis al mi preskaŭ netolereble vivi ĉe la kortego de via alta antaŭulo. Mi ne scias, ĉu vi ekaŭdis, ke mi estis nomita laŭtlegisto de la imperiestro kaj kiel disdonisto de almozoj. Ho, ve, ĉu honoroficoj povus anstataŭi je mi la perdon de mia Juliano? Mi preskaŭ ne povis plu elteni vidante kiel viroj, kiuj fanfarone dismontris sian virton, akceptis donacojn kaj subaĉetojn ĉiuspecajn. Mi malamis la kunvivon ĉe avaraj aventuristoj, kies propeto estis akirebla de ĉiu, kiu povis rekompenci sonantajn vortojn per sonanta oro. Ho, mia imperiestro, vi ne scias, kio fariĝis kutimo tie ĉi —!

Imperiestro Juliano. Mi scias tion, mi scias tion.

Teologiisto Hekebolios. Malriĉa vivo en soleco allogis min. Kiel eble plej baldaŭ mi retiris min en Kreta, en mian modestan Tuskulum — mian bieneton —, kie ne ĉia virto de la mondo ŝajnis esti malaperinta. Tie mi vivis tiun ĉi someron, primeditante la homajn aferojn kaj la ĉielajn veraĵojn.

Imperiestro Juliano. Feliĉa Hekebolios!

Teologiisto Hekebolios. Tiam la famo de ĉiuj viaj mirfaraĵoj atingis Kreta'n —

Imperiestro Juliano. Ha!

Teologiisto Hekebolios. Mi demandis al mi mem: ĉu li estas pli multe ol homo, tiu plej nekomprenebla junulo? Sub kies protekto li staras? Ĉu estas tiel, ke la kristana Dio kutimas manifestadi sian potencon —?

Imperiestro Juliano (*kun streĉita atento*). Nu; nu!

Teologiisto Hekebolios. Mi denove dediĉis min esplorante la malnovajn skribaĵojn. Lumo post lumo leviĝis antaŭ mi —; ho, ke mi devas konfesi tion!

Imperiestro Juliano. Parolu plue, — mi prijuras vin!

Teologiisto Hekebolios. (*sin ŝetas surgenue.*) Punu min laŭ via justeco, sinjoro, sed forlasu la erarojn de via juneco rilate la diaj aferoj! Jes, plej indulga imperiestro, vi perdiĝis en eraroj; kaj mi — ho, estas nekompreneble, ke la honto ne mortigas min, — mi, mi kunlaboris erarigi vin —

Imperiestro Juliano (*kun etenditaj brakoj*). Mi ĉirkaŭbraku vin!

Teologiisto Hekebolios. Ho, mi petegas vin, montru dankemecon al la senmortaj dioj, kies favorato vi estas! Kaj se tion vi ne povas, punu min, ĉar mi faras tion en via loko —

Imperiestro Juliano. Venu, venu en miajn brakojn, diras mi!
(*Li starigas, premas lin sur sian bruston kaj kisas lin.*) Mia Hekebolios! Kia granda kaj neatendita ĝojo!

Teologiisto Hekebolios. Sinjoro, kiel mi devas kompreni tion?

Imperiestro Juliano. Ho, vi ne scias? — Kiam vi alvenis en la urbon?

Teologiisto Hekebolios. Mi forlasis la ŝipon antaŭ unu horo.

Imperiestro Juliano. Kaj tuj rapidis tien ĉi?

Teologiisto Hekebolios. Per flugiloj de timo kaj pento, sinjoro!

Imperiestro Juliano. Ne parolinte kun iu?

Teologiisto Hekebolios. Parolinte kun neniu; sed —?

Imperiestro Juliano. Ho, vi ja ne povas scii (*li ĉirkaŭbrakas lin refoje*). Mia Hekebolios, eksciu tion nun! Mi, same kiel vi forĵetis la jugon de la eraro. La senmortan sun-dion, al kiu ni homoj dankas tiel multe, mi remetis en lian iaman rajton; Fortuno ricevis el miaj humilaj manoj sian oferon, kaj se vi revidas min en tiu ĉi momento laca kaj iom senfortigita, tiam tio okazas, ĉar mi ĵus festis feston je honoro de la dia Dionizo.

Teologiisto Hekebolios. Mi aŭdas kaj mi estas surprizita!

Imperiestro Juliano. Vidu, — la girlando kuŝas ankoraŭ sur miaj haroj. Sub la ĝojkriadoj de la homamaso —, jes sufiĉe multaj estis tie —

Teologiisto Hekebolios. Kaj mi, kiu ne antaŭsentis tiun grandan aferon!

Imperiestro Juliano. Nun ni volas kunigi ĉirkaŭ ni ĉiujn amikojn de la vero kaj saĝeco, ĉiujn, kiuj dece kaj respektive honoras la diojn; — — troviĝas ankoraŭ kelkaj — tamen ne multaj —

(La imperiestra kuracisto Cezarios, akompanata de kelkaj oficistoj kaj sinjoroj de la antaŭa kortego eniras de maldekstre.)

Imperiestro Juliano. He, jen venas la bona Cezarios, — kun granda sekvantaro kaj kun vizaĝo, kiu montras ion gravan.

Kuracisto Cezarios. Plej indulga imperiestro, ĉu vi volas permesi demandon al via servisto en lia nomo kaj en la nomo de tiuj ĉi afliktitaj homoj?

Imperiestro Juliano. Demandu, mia plej kara Cezarios! Ĉu vi ne estas la frato de mia amata Gregoro? Demandu, demandu!

Kuracisto Cezarios. Diru al mi, sinjoro — *(li ekvidas Hekebolioson)*. Kion mi vidas! Hekebolios estas tie ĉi!

Imperiestro Juliano. Li ĵus venis hejmen —

Kuracisto Cezarios *(volas retiri sin)*. Tiam mi petas, ke mi atendu—

Imperiestro Juliano. Neniel, mia Cezarios, tiu ĉi amiko aŭdu ĉion.

Kuracisto Cezarios. Amiko, diras vi? Ho, mia imperiestro, tiuj ĉi arestadoj do ne okazas laŭ via volo?

Imperiestro Juliano. Pri kio vi parolas?

Kuracisto Cezarios. Vi do ne scias tion? La militestro Nevita — la arme kondukisto, kiel li sin nomas nun — persekutas sub preteksto, ke tio okazas en via nomo, ĉiujn intimajn virojn de via antaŭulo.

Imperiestro Juliano. Tio estas esploradoj, tre necesaj esploradoj, mia Cezarios!

Kuracisto Cezarios. Ho sinjoro, malpermesu al li tamen, kondukti tiel severe. La administranton Pentadios'on serĉas la soldatoj ĉie, kaj same iun ĉefon de pretorianoj, kies nomon vi malpermesis nomi; vi scias, kiun mi aludas, sinjoro, — tiun malfeliĉan viron, kiu jam pro timo je vi, sin kaŝis kun sia tuta familio.

Imperiestro Juliano. Vi ne konas tiun viron, en Gaŭlujo li sin dediĉadis al plej kuraĝegaj pensoj.

Kuracisto Cezarios. Eble; sed nun li ja estas sendanĝera. Tamen ne li sola estas minacata de pereoj; same la trezoristo Ursulos estis jetata malliberejon. —

Imperiestro Juliano. He, Ursulos? Sekve tio estis necesa.

Kuracisto Cezarios. Necesa! Ĉu tio estis necesa, sinjoro? Pensu do pri Ursulos, pri tiu grizulo, kiu estas senmakula, — tiu viro pro kies vorto sin klinis respektate altrungulo kaj malaltrungulo —

Imperiestro Juliano. Tiu viro, sen ia juĝpovo, diras mi! Ursulos estas malŝparemulo, kiu sen kontraŭstaro kontentigis la avidecon de la korteganoj. Krom tio, li estas neuzebla viro en ŝtataj aferoj. Mi mem spertis tion. Neniam mi kuragus komisii al li ricevi ambasadorojn de fremdaj reĝoj.

Kuracisto Cezarios. Kaj tamen ni petas vin, sinjoro, ni ĉiuj starantaj antaŭ vi: estu grandanima, ne nur je Ursulos, sed ankaŭ je la ceteraj.

Imperiestro Juliano. Kiuj estas la ceteraj?

Kuracisto Cezarios. Tro multaj, mi timas. Mi volas nomi nur la subtrezoriston Eŭvagrios, la antaŭan dominspektoron Saturninos, la ĉef-juĝiston Kurenos kaj —

Imperiestro Juliano. Kial vi ekhaltas?

Kuracisto Cezarios (*hezitante*). Sinjoro, — inter la kulpigitoj estas ankaŭ la kortega laŭtleĝisto Hekebolios.

Imperiestro Juliano. Kion?

Teologiisto Hekebolios. Mi!?! Neeble!

Kuracisto Cezarios. Akuzita, ĉar li akceptis subaĉetojn de malindaj profesi-serĉantoj.

Imperiestro Juliano. Kaj tion farus Hekebolios —? Viro kiel Hekebolios —?

Teologiisto Hekebolios. Kia hontinda kalumnio! Ho, Kristo — mi volas diri: ho, vi ĉielaj dioj!

Kuracisto Cezarios. Ha!

Imperiestro Juliano. Kion vi volas diri?

Kuracisto Cezarios (*indiferente*). Nenion, mia plej indulga imperiestro!

Imperiestro Juliano. Cezarios!

Kuracisto Cezarios. Jes, mia alta sinjoro!

Imperiestro Juliano. Ne nomu min sinjoro, sed amiko.

Kuracisto Cezarios. Ĉu Kristano kuraĝus nomi vin tia?

Imperiestro Juliano. Mi petas vin, ne pensu tiel, Cezarios!

Vi ne kredu tion. Ĉu mi estas kulpa, ke ĉiuj tiuj viroj estas Kristanoj? Ĉu ne verigas el tio, ke la Kristanoj povis havigi al si ĉiujn profitajn oficojn? Sed ĉu la imperiestro povas toleri, ke la plej gravaj oficoj de la ŝtato estas malbone administrataj? (Al la aliaj) Vi tamen ne opinias, ke estas via religio, kiu ekscitis mian koleron kontraŭ la nefidinduloj? Mi alvokas ĉiujn diojn kiel atestantojn, ke mi ne volas, ke oni konduku je vi Kristanoj alie, kiel laŭ rajto kaj laŭ leĝo, nek ankaŭ, ke oni faru al vi malbonon. Vi, aŭ ĉiokaze multaj inter vi, estas ja piaj, ĉar vi preĝas al dio, kiu estas ĉiopova kaj kiu regas la tutan nevideblan mondon — Ho, mia Cezarios, ĉu ne estas al li, kiun ankaŭ mi alpreĝas, nur sub aliaj nomoj?

Kuracisto Cezarios. Permesu al mi, plej indulga sinjoro —

Imperiestro Juliano. Cetere, mi intencas montri mildecon, kie tio dece povas okazi. Rilate Hekebolios, liaj sekretaj malamikoj ne imagu, ke ili malutilos al li per kulpigoj aŭ per aliaj malnoblaj intrigoj.

Teologiisto Hekebolios. Mia imperiestro! Mia ŝildo kaj protekto!

Imperiestro Juliano. Nek ankaŭ mi volas, ke oni malkompateme forprenu la panon de ĉiuj malpli eminentaj korteganoj. Jen mi pensas pri tiu hartondisto, kiun mi forpelis. Tion mi bedaŭras. Tiu viro povas resti. Li aspektis kiel viro, kiu funde konas sian metion. Honoro al tiaj viroj! Tion mi povas fari, mia Cezarios, ne pli multe. Ursulos mem devas porti la sekvojn. Ni devas tiel agi, ke la blinda kaj tamen la tiel severa diino de la justeco ne havu kaŭzon sulkigi sian frunton pro viro en kies manojn ŝi metis tiel grandan respondecon.

Kuracisto Cezarios. Post tio mi havas plu nenian vorton por diri en favoro de la malfeliĉuloj. Mi petas nur permeson forlasi la kortegon kaj la urbon?

Imperiestro Juliano. Tion vi volas?

- Kuracisto Cezarios. Jes, plej indulga imperiestro!
- Imperiestro Juliano. Vi estas obstinulo, same kiel via frato.
- Kuracisto Cezarios. La novaj aferoj kaŭzas al mi multon por meditati.
- Imperiestro Juliano. Mi havis grandajn intencojn kun vi, Cezarios! Estus al mi tre agrable, se vi povus forlasi viajn erarojn. Ĉu vi ne povas tion?
- Kuracisto Cezarios. Dio scias, kion mi povus antaŭ monato; — nun mi ne povas tion.
- Imperiestro Juliano. Edziĝo kun unu el la plej potencaj familioj estus proponota al vi. Ĉu vi ne ŝanĝas vian intencon?
- Kuracisto Cezarios. Ne, plej indulga sinjoro!
- Imperiestro Juliano. Viro kiel vi povus supreniri de ofico al ofico, Cezarios, ĉu ne estus eble, ke vi kunlaborus kun mi por efektiviĝi la novajn aferojn?
- Kuracisto Cezarios. Ne, plej indulga sinjoro!
- Imperiestro Juliano. Mi ne celas tie ĉi, sed aliloke. Mi intencas foriri. Konstantinopolo tute malplaĉas al mi. Vi Galileanoj malbonigis ĝin por mi ĉiurilate. Mi iros al Antiohia; tie mi trovos pli bonan grundon. Vi devus akompani min. Ĉu vi volas tion, Cezarios?
- Kuracisto Cezarios. Plej indulga sinjoro, mi same volas iri al la orientaj regionoj; sed mi volas vojaĝi sola.
- Imperiestro Juliano. Kaj kion vi volas tie?
- Kuracisto Cezarios. Serĉi mian maljunan patron; helpi Gregoro'n, kuraĝigi lin por la batalo, kiu estas okazonta.
- Imperiestro Juliano. Iru!
- Kuracisto Cezarios. Vivu feliĉe, mia imperiestro!
- Imperiestro Juliano. Feliĉa patro, kiu havas tiajn malfeliĉajn filojn!
- (Li adiaŭas per la mano, Cezarios kaj liaj akompanantoj sin klinas profunde kaj eliras maldekstren.)*
- Teologiisto Hekebolios. Kia trokuraĝa kaj plej maldeca fiereco!
- Imperiestro Juliano. Mia koro estas vundita ĝis-sange pro tio kaj pro multe alia. Vi, mia Hekebolios, sekvos min. La tero

brulas sub mi en tiu ĉi venenita galileana urbo! Mi skribos al tiuj saĝec-amikoj Kitron kaj Priskos, kiuj akiris tiom da famo en la lastaj jaroj. Maksimos'on mi povas tie ĉi atendi ĉiun tagon; li iros kun ni — Mi diras vin, ke feliĉaj venkotagoj estas proksimiĝontaj al ni, Hekebolios! En Antiohia, amiko, — ni renkontos la nekompareblan Libanios'on, — kaj tie ni estos pli proksime al Helioso dum lia supreniro — Ho, tiu potenca sopiro al la Sundio —!

Teologiisto Hekebolios. Jes, jes, jes —!

Imperiestro Juliano (*ĉirkaŭbrakas lin*). Mia Hekebolios! — Saĝeco; lumo; beleco!

AKTO DUA.

(Granda antaŭ-ĉambro en la imperiestra palaco en Antiohia. Malfermita enirejo en la fundo; ĉe la maldekstra muro estas pordo, kondukanta al la internaj ĉambroj).

(Sur alta sidejo sur la antaŭ-scenejo sidas la imperiestro Juliano, ĉirkaŭita de sia kortegano. Juĝistoj, oratoroj, poetoj kaj filozofoj (inter la laste nomitaj estas Hekebolos) sur pli malaltaj seĝoj.

Apoganta sin kontraŭ la muro, apud la elirejo, staras viro, vestita kiel kristana pastro; li kaŝas sian vizaĝon per la manoj kaj ŝajnas esti enprofundiĝinta en preĝo.

(Granda aro de burĝoj de la urbo plenigas la ĉambron. Apud la elirejo kaj apud la pordo maldekstre staras gardistoj).

Imperiestro Juliano. *(Parolas al la aro de burĝoj).* Tiam grandan sukceson favore permesis al mi la dioj. Multajn urbojn mi aliris dum mia vojaĝo, sed apenaŭ unu estis inter ili, kies galileanaj burĝoj ne amase iris renkonte al mi sur la ŝoseo, ĝemplorante pro siaj eraroj kaj metante sin sub la protekton de la diaj povoj. Kio estas la konduto de la mokantoj kompare kun tio? Ĉu tiuj mokantaj homoj ne estas kompareblaj kun hundoj, kiuj promalsaĝeco bojas kontraŭ la lundisko? Tamen mi ne volas mal-konfesi: mi ekkoleris, kiam mi eksciis, ke kelkaj loĝantoj de tiu ĉi urbo eligis insultajn vortojn pri la viv-maniĝero, kiun mi por sekvigigi, severe admonis al la pastroj de la bona diino Kibeles. Ĉu la respekto por tiu alt-estimata diino ne malebligus, ke el pastroj estas farataj objektoj de moko? Laŭtvoĉe mi diras

al tiuj malsaĝe-trokuraĝaj homoj: ĉu vi estas barbaroj, ĉar vi ne scias, kiu estas Kibebe? Ĉu mi serioze estus devigata, memoriĝi al vi, kiel (kiam la roma estreco estis tiel severe minacata de tiu kartaga armeestro, kies tombon mi antaŭ nelonge vidis en Libusa) — la kumea antaŭ-diristino konsilis, forpreni la statuon de Kibebe el la templo de Pesinoso kaj transporti al Romo? Rilate al la viv-maniero de la pastroj, kelkaj protestis pri tio, ke estis malpermesate al ili, manĝi vegetaĵojn kaj ĉion kreskantan subtere, dum estas permesate al ili manĝi tiajn fruktojn, kreskantajn supren. Ho, vi plej nesciantaj, — mi kompatas vin, se vi ne komprenas tion! Ĉu la homa spirito povas nutri sin per tio, kio rampas sur la tero? Ĉu la animo ne vivas de ĉio, kio celadas la ĉielon kaj la sunon? Sed pri tio mi ne volas plu detale paroli hodiaŭ. Kio povas esti dirata pri tio, tion vi ekscios de skribaĵo, kiun mi nun kompilas en miaj sendormaj noktoj kaj pri kio mi esperas, ke ĝi estos baldaŭ laŭtleĝata en la lernejoj kaj sur la foirejoj. (*Li ekstaras*). Kaj nun, miaj amikoj, se neniu havas ion gravan por eldiri —

Burĝo (*perforte tra ŝoviĝante tra la amaso*). Ho, plej indulga imperiestro, ne lasu min foriri neaŭditan.

Imperiestro Juliano (*eksidis denove*). Tute ne, mia amiko! Kiu vi estas?

La burĝo. Mi estas la gren-komercisto Medon. Ho sinjoro, se ne mia amo al vi, ho majstra kaj dia —

Imperiestro Juliano. Eldiru vian aferon, homo!

Grenkomercisto Medon. Mi havas najbaron, Alites'on, kiu jam multajn jarojn malutilis al mi laŭ ĉiaj imageblaj manieroj; li ankaŭ komercas grenon kaj plej hontinde konkuras kontraŭ mi.

Imperiestro Juliano. Aha, mia bona Medon, vi tamen aspektas sufiĉe bone nutrita.

Grenkomercisto Medon. Pri tio mi ne plendas, plej indulga imperiestro! Ho, je la honorindaj dioj, kiujn mi ĉiam pli kaj pli amas kaj gloras — la ofendoj, kiujn li faras al mi, tiujn mi povus ne atenti; sed kion mi neeble povas toleri —

Imperiestro Juliano. Li do ne insultas la diojn?

Grenkomercisto Medon. Li faras ion ankoraŭ pli malbonan — ĉiukaze, ion tiel trokuraĝan; li — ho, la doloro apenaŭ ebligas al mi eldiri tion — li insultas vin mem, plej indulga imperiestro!

Imperiestro Juliano. Vere? Kian vorton li uzis?

Grenkomercisto Medon. Li uzis nenian vorton; li uzis ion pli malbonan.

Imperiestro Juliano. Kaj kio estas pli malbona?

Grenkomercisto Medon. Purpure kolorigita mantelo —

Imperiestro Juliano. Tiun li portas? Oj, oj, tio estas trokuraĝa.

Grenkomercisto Medon. Jes, vi granda flugil-pieda Merkurio, se mi pripensas kiel li estus punita pro tia mantelo en la tempo de via antaŭulo! Kaj tiun veston de fiereco mi havas ĉiutage antaŭ la okuloj —

Imperiestro Juliano. Tiu vesto, aĉetita per mono, kiu povus esti via —

Grenkomercisto Medon. Ho, plej indulga imperiestro, — punu tiun trokuraĝan viron; peligu lin el la urbo; mia amo al mia granda, glora reganto ne permesas al mi, esti atestanto de tia hontinda aroganteco.

Imperiestro Juliano. Diru al mi, bona Medon, kiujn vestojn portas Alites, krom la purpura mantelo?

Grenkomercisto Medon. Tion mi vere ne memoras, sinjoro; mi pensas: la ordinarajn; mi atentis nur la purpuran mantelon.

Imperiestro Juliano. Sekve: purpura mantelo kaj netanitaj botoj —

Grenkomercisto Medon. Jes, sinjoro, li aspektas tiel ridinda kaj senhonta —

Imperiestro Juliano. Tion mi devas korekti, Medon!

Grenkomercisto Medon (*felita*). Ha, plej indulga imperiestro —!

Imperiestro Juliano. Morgaŭ vi venu jam frue en la palacon —

Grenkomercisto Medon (*ankoraŭ pli felita*). Mi venos tre frue, plej indulga imperiestro!

Imperiestro Juliano. Vi anoncu vin al mia dominspektoro.

Grenkomercisto Medon. Jes, jes, mia plej glora imperiestro!

Imperiestro Juliano. De li vi ricevos paron da purpuraj ore broditaj botoj —

Grenkomercisto Medon. Ho! mia malavara sinjoro kaj imperiestro!

Imperiestro Juliano. Tiujn botojn vi alportu al Alites, vi surmetu ilin al li dirante, ke li ĉiufoje portu ilin, kiam li en hela tago sin montros en la purpura mantelo sur la strato —

Grenkomercisto Medon. Ho!

Imperiestro Juliano — kaj farinte tion, vi povas diri al li en mia nomo, ke li estas malsaĝulo, se li kredas sin honorata pro la purpura mantelo, ne posedante la potencon de la purpuro — Iru, kaj revenu morgaŭ pro la botoj!

(La grenkomercisto iras for konfuzita sub la ridado de la burĝoj; la korteganoj, oratoroj kaj ĉiuj aliaj frapadas siajn manojn kaj laŭte eldiras al la imperiestro sian aprobon.)

Alia burĝo (*eliras el la amaso*). La justeco de la imperiestro estu laŭdata! Ho, kiel tiu enviema grenkomercisto indas esti tiel punata! Ho, aŭdu min, kaj ke via indulgo —

Imperiestro Juliano. Aha, mi kredas rekoni vin. Ĉu vi ne estis unu el tiuj, kiuj vokis antaŭ mia veturilo, kiam mi eniris la urbon?

La burĝo. Mi estis unu el la plej diligentaj vokantoj, nekomparebla imperiestro! Mi estas la impostisto Malkos. Ho, helpu min! Mi havas proceson kontraŭ malica kaj avara viro.

Imperiestro Juliano. Kaj tial vi venas al mi? Ĉu ne estas juĝistoj tie ĉi?

Impostisto Malkos. La afero estas iom komplikita, alta imperiestro! La proceso rilatas kampon, kiun mi ludonis al tiu malica viro kaj kiun mi ekposedis antaŭ sep jaroj, kiam parto de la bieno de la apostola preĝejo estis vendata.

Imperiestro Juliano. Ho, ho — sekve proprajo de la preĝejo?

Impostisto Malkos. Leĝe akirita; sed nun tiu viro rifuzas pagi al mi la tributon, kaj ankaŭ li ne volas redoni al mi mian proprajon, pretendante ke tiu kampo iam apartenis al la templo de Apolono, kaj, diras li, ĉar ĝi estis forprenata kontraŭ-leĝe de tiu templo antaŭ multaj jaroj.

- Imperiestro Juliano. Aŭdu; diru al mi Malkos — vi sendube estas Galileano?
- Impostisto Malkos. Plej indulga imperiestro, estas malnova kutimo ĉe mia familio, kredi en Kristo.
- Imperiestro Juliano. Kaj tion vi diras tiel tute malkaŝe, sen timo?
- Impostisto Malkos. Mia kontraŭulo estas ankoraŭ pli sentima ol mi, ho sinjoro! Li eliras kaj eniras sian domon kiel antaŭe; li ne forkuris el la urbo kiam oni eksciis, ke vi venos.
- Imperiestro Juliano. Ne forkuris? Kial li farus tion, li, kiu inter-konsentas tiel bone kun la dioj.
- Impostisto Malkos. Plej indulga imperiestro, vi sendube ekaŭdis pri la librotenisto Talasios?
- Imperiestro Juliano. Kion! Tiu Talasios, kiu por enflatiĝi ĉe mia antaŭulo, dum mi estis kalumniata kaj minacata de danĝeroj en Gaŭlujo, proponis al la burĝoj tie ĉi en Antiohia, en la mezo de la foirejo, ke ili petu la imperiestron, sendi al ili la kapon de Cezaro Juliano!
- Impostisto Malkos. Sinjoro, estas via ĝismorta malamiko, kiu faras al mi maljustaĵon.
- Imperiestro Juliano. Vere, Malkos, kontraŭ tiu viro mi havas tiel grandan kaŭzon plendi, kiel vi.
- Impostisto Malkos. Dekoble pli grandan, mia plej indulga imperiestro!
- Imperiestro Juliano. Kaj nun vi kredas ke ni ambaŭ unuigu niajn aferojn kaj akuzu lin samtempe?
- Impostisto Malkos. Ho, kia neordinara indulgo! Mi dekoble feliĉa viro!
- Imperiestro Juliano. Vi dekobla malsaĝulo! Talasios el-kaj eniris sian domon kiel antaŭe, diris vi? Li ne forkuris el la urbo ĉe mia alveno? Talasios konas min pli bone ol vi. For de tie ĉi, homo! Se mi akuzos Talasios'on pro mia kapo, vi povos akuzi lin pro via kampo!
- Impostisto Malkos (*tordante siajn manojn*). Mi dekobla malfeliĉulo! (*Li ĵoviras laŭ la fundo; la anaso frapadas siajn manojn por aprobi la imperiestron.*)

Imperiestro Juliano. Bone, miaj amikoj; ĝoju, ĉar sukcesis al mi komenci ne tute malinde tiun ĉi tagon, kiu precipe estis dediĉata al festo por la brilanta Apolono. Ĉar, ĉu ne estas inde por amiko de la saĝeco, malatenti la insultojn, faritajn kontraŭ li mem, dum li severe punas la maljustaĵojn, faritajn al la senmortaj dioj? Mi ne memoras ĉu Marko-Aŭrelo, tiu kronita honoranto de la saĝeco, iam sin trovis en samspeca okazo; tamen se li sin trovus en ĝi, ni kuraĝas esperi, ke li ne estus aginta tute alie ol mi, kiu konsideras, ke estas honorinde sekvi humile liajn ekzemplojn. Tio estu por vi konsilo en ĉio, kion vi atentu en la estonteco. En la palaco, sur la foirejo, eĉ en la teatro — se mi ne eksentos naŭzon eniri tian lokon de malsaĝeco — povas deci, ke vi salutas min per alvoko kaj ĝoja manfrapado. Tia saluto, kiel mi scias, estis ankaŭ akceptata de la macedona Aleksandro kaj de Julio Cezaro, al kiuj viroj estis ankaŭ de l'diino de la feliĉo permesate lumi al aliaj mortemuloj. Tamen se vi vidos min eniri templon, estos io tute alie; tiam mi volas, ke vi silentu, kaj direktu viajn vokojn al la dioj kaj ne al mi, kiun vi vidos antaŭ-enirantan kun mallevitaj okuloj kaj klinita kapo. Kaj precipe mi esperas, ke vi observu tiun ĉi tagon, en kiu mi devas oferi al tiu tiel eksterordinara kaj potenca dio, kiun ni konas sub la nomo de sunreĝo, kaj kiu fariĝas ankoraŭ pli granda en niaj okuloj, kiam ni pripensas, ke li estas tiu sama de certaj orientaj popoloj nomata Mitra. Kaj per tio, — se neniu havas ion por diri —

La pastro ĉe la pordo (*sin levante*). En la nomo de Dio la Sinjoro!

Imperiestro Juliano. Kiu parolis tie?

La pastro. Servisto de Dio kaj de la imperiestro.

Imperiestro Juliano. Alproksimiĝu. Kion vi volas?

La pastro. Paroli al viaj koro kaj konscienco.

Imperiestro Juliano (*salte leviĝas*). Kia voĉo! Kion mi vidas! —
Spite barbo kaj vestoj —! Gregoro!

La pastro. Jes, mia alta sinjoro!

Imperiestro Juliano. Gregoro! Gregoro de Nazianz!

Gregoro de Nazianz. Jes, indulga imperiestro!

Imperiestro Juliano (*malsupren-iras, ekprenas liajn manojn kaj rigardas lin longan tempon.*). Iom pli maljuna, pli bruna kaj pli dika. Ne, tio ŝajnis nur en la unua momento; nun vi estas tio sama kiel antaŭe.

Gregoro de Nazianz. Ho, se estu tio sama je vi, sinjoro!

Imperiestro Juliano. Ateno. Tiun nokton en la arkado, nenia homo staris tiel proksime ĉe mia koro kiel vi.

Gregoro de Nazianz. Via koro? Ve, imperiestro, el via koro vi forpelis pli bonan amikon ol min.

Imperiestro Juliano. Vi celas Basilios'on?

Gregoro de Nazianz. Mi celas pli grandan ol Basilios'on.

Imperiestro Juliano (*malĝoja*). Ho, tiel! Ĉu estas tio, kion vi venas por diri al mi? Kaj en tiuj vestoj —

Gregoro de Nazianz. Mi ne elektis tiujn ĉi vestojn, sinjoro!

Imperiestro Juliano. Kiu do?

Gregoro de Nazianz. Tiu, kiu estas pli granda ol la imperiestro.

Imperiestro Juliano. Mi konas tiun galilean parol-manieron. Lasu ĝin flanke pro nia amikeco.

Gregoro de Nazianz. Mi komencu dirante al vi, kiel okazas, ke vi vidas min tie ĉi, dediĉita por servi kiel pastro de la preĝejo, kiun vi persekutas.

Imperiestro Juliano (*rigardas lin fikse*). Persekutas! —

(*Li refoje supreniras la altaĵon kaj eksidas.*) Nun vi povas paroli plue.

Gregoro de Nazianz. Vi scias, kion mi pensis pri la diaj aferoj dum nia ĝoja kunvivado en Ateno. Tiam tamen mi tute ne pensis pri tio, forlasi la ĝojojn de la mondo. Ambicio aŭ avido, tion mi kuraĝas diri, neniam allogis min; sed apenaŭ mi restus fidela al la vero, se mi volus nei, ke miaj okuloj kaj animo kun admiro amis ĉiun belegecon, kiu sin elmontris al mi en la malnovaj scienco kaj arto de la Grekoj. La disputadoj, ĉiuj tiuj etaj malpacoj en nia eklezio tre malĝojigis min; sed mi ne partoprenis en ili; mi servis miajn samlandanojn nur en mondaj aferoj. Tiam venis sciigoj de Konstantinopolo. Oni diris, ke

Konstantios estis mortinta kaŭze de ektimo pro tio, kion vi estis farinta kaj ke li estis nominta vin lia heredonto. Ricevita kiel supera homo, dum la famo de la venko flugis antaŭ vi, vi, la heroo de Gaŭlujo kaj Germanujo, estis suririnta la tronon de Konstantios sen unu ekbato de glavo. La mondo kuŝis antaŭ viaj piedoj. Sed denove venis sciigoj. La sinjoro de la mondo preparis sin je la milito kontraŭ la sinjoro de la ĉielo —

Imperiestro Juliano. Gregoro, kion vi kuraĝas —?

Gregoro de Nazianz. La sinjoro de la korpoj sin preparas por kontraŭbatali la Dion de la animoj. Tie ĉi mi staras antaŭ vi en karnaj timo kaj tremo; sed mi ne kuraĝas mensogi. Ĉu vi volas aŭdi la veron aŭ ĉu mi eksilentu?

Imperiestro Juliano. Vi devas paroli, Gregoro!

Gregoro de Nazianz. Kiom devis jam suferi miaj samreligianoj dum tiuj ĉi malmultaj monatoj! Kiom da kondamnoj al morto jam estis eldiritaj kaj kiel multaj estis jam ekzekutitaj en la plej kruela maniero! La ŝtata sekretario Gaŭdenzios, — Armetios, tiu iama guberniestro de Egiptujo, — la du tribunoj Romanos kaj Vincentios —

Imperiestro Juliano. Vi ne komprenas tion. Mi diras al vi, la diino de la justeco estus verŝinta larmojn, se la vivo de tiuj perfiduloj estus indulgata.

Gregoro de Nazianz. Eble, mia imperiestro; sed mi diras al vi, ke unu kondamno al morto estas plenumita tie, kiun la diino de la justeco neniam povos pardoni al vi. Ursulos! Tiu viro, kiu estis al vi amiko en la tagoj de premeĝo! Ursulos, kiu antaŭpago al vi monon je danĝero de sia vivo; Ursulos, kies tuta krimo estas la kredo en Kristo kaj lia sincereco —

Imperiestro Juliano. Ha, tion vi eksciis de via frato Cezarios!

Gregoro de Nazianz. Punu min, sinjoro; sed indulgu mian fraton.

Imperiestro Juliano. Vi scias tre bone, ke vi riskas nenion, Gregoro! Krom tio, mi volas pravigi vin, ke Nevita agis tro severe.

Gregoro de Nazianz. Jes, tiu barbaro, al kiu ne sukcesis malkonfesi sian devenon sub la greka masko!

Imperiestro Juliano. Nevita estas tro fervora en sia devo, kaj mi ne povas esti ĉie. Pri Ursulos mi sincere funebris kaj mi bedaŭregas kore, ke tempo kaj okazo ne permesis al mi ekzameni mem tiun aferon. Mi tre certe estus indulginta lin, Gregoro! Ankaŭ mi pripensis redoni al liaj heredantoj tion, kion li postlasis.

Gregoro de Nazianz. Alta imperiestro, vi ne estas responda al mi pri viaj agoj. Mi volis nur diri vin, ke ĉiuj tiuj sciigoj kiel fulmobato falis en Cezareo'n kaj en Nazianz'on kaj en la aliajn kapadociajn urbojn. Kiel mi klarigos al vi la efikon? Niaj reciprokaj disputoj eksilentis sub la komuna danĝero. Multaj malsanaj membroj de la eklezio defalis; sed en multaj seninteresaj koroj ekflamis la lumo de la Sinjoro en antaŭe neniam antaŭsentita klareco. Dum ĉio tio la premeĝo atakis la popolon de Dio. La idolanoj — jes, mia imperiestro, tiuj, kiujn mi nomas idolanoj — komencis minaci nin, malutili kaj persekuti —

Imperiestro Juliano. Gregoro! tio estas repago, — repago.

Gregoro de Nazianz. Mi estas tute malinklina voli defendi ĉion, kion miaj samreligiaj eble krimfaris en diĉoĉa fervoro por la afero de la eklezio. Sed vi, kiu estas alte lumigita kaj kiu regas ĉion, vi ne toleru, ke la vivantoj estas punataj pro la pekoj de la mortintoj. Tio tamen okazis en Kapadocio. La malamikoj de la Kristanoj, malmultaj en nombro, sed soifante profiton kaj brulante je fervoro por plaĉi la novajn oficistojn, kaŭzis malkvietecon kaj funebron en la urboj kaj sur la kamparo. Mi antaŭ ĉio ne pensas pri la mokeĝaĵoj, kiujn ni devis suferi, nek ankaŭ pri la atakoj, faritaj al niaj honeste akiritaj proprajoj, el kiuj ni estis ofte elpelitaj en la lasta tempo. Kio plej multe maltrankviligas min kaj mian seriozan fraton, tio estas la danĝero kiu per ĉio tio minacas la animojn. Multaj estas malfortaj pri la kredo kaj ne kapablas tute rezigni la mondajn aferojn. La severa pritrakto, kiun nun devas suferi ĉiuj, kiuj portas la nomon de Kristano, kaŭzis ĉiuloke pli ol unu apostatigon. Sinjoro, tio estas anim-rabado kontraŭ la regno de Dio.

Imperiestro Juliano. Ho, mia saĝa Gregoro, kiel vi povas tiel paroli? Mi estas surprizita! Ĉu vi, kiel fidela Galileano ne ĝojus pro tio, ke via socio estas senigita de tiaj homoj?

Gregoro de Nazianz. Indulga imperiestro, mi ne samopinias. Mi mem estis indiferenta pri la kredo, kaj mi konsideris ĉiun tian malsanulo, kiu portas en si la eblon de resaniĝo tiel longe ke li restas en la sino de la eklezio. Tiel ankaŭ opiniis nia malgranda socio en Nazianz. Ĉagreniĝante, la gefratoj kunvenis por konsiliĝi pri la helpo kontraŭ la mizero de la tempo. Kun ili kunigis senditoj el Cezarea kaj aliaj urboj. Mia patro estas kaduka kaj kiel li konfesas kun ĉagreno, li ne havas la fortan ne-erareblan kredon, kiu en tiuj ĉi tagoj de malfeliĉego estas postulata de tiu, kiu sidas sur la episkopa seĝo. Tiam la kunvenantoj decidis, ke estos elektata pli juna viro por helpi lin kaj kiu povos teni kune la anojn de la Sinjoro. La elektito estis mi.

Imperiestro Juliano Ha!

Gregoro de Nazianz. Tiutempe mi forestis, ĉar mi estis vojaĝanta. Sed dum mia malesto kaj ne petante mian konsilon, mia patro benis min pastro kaj sendis al mi la pastrajn vestojn. Tiu sciigo venis al mi en Tiberino en mia bieno, kie mi pasigis kelkajn tagojn kun mia frato kaj kun mia iama kunlernanto el Cezarea. Sinjoro, se mia kondamno al morto estus sciigata al mi, ĝi ne povus min ektimigi pli multe. Mi, pastro! Mi volis kaj mi ne volis. Mi devis, kaj mi ne kuraĝis. Mi luktis kontraŭ la Sinjoro, kiel la patriarko luktis kontraŭ Li en la tagoj de la malnova Testamento. Mi ne scias, kio okazis al mi en la nokto, kiu sekvis. Tion mi tamen scias, ke, antaŭ ol la koko kriis, mi parolis vizaĝon kontraŭ vizaĝo kun la Krucumito. — Tiam mi estis lia.

Imperiestro Juliano. Malsaĝajo malsaĝajo, mi konas tiajn sonĝojn.

Gregoro de Nazianz. Dum la vojaĝo hejmen mi iris tra Cezarea. Ho, kia senkonsola stato! Mi trovis la urbon plena de forkurantaj kampanoj, kiuj estis forlasintaj siajn hejmojn, ĉar tiu ĉi somera varmeĝo forbruligis ĉiujn grenojn kaj ruinigis ĉiujn vinberejojn kaj oleo-ĝardenojn. Por sin savi de malsatego, ili estis forkurintaj al la malsatantoj. Jen ili arope kuŝis — viroj.

virinoj kaj infanoj — laŭlonge de la domomuroj; la febro tremigis ilin, la malsato mordetis iliajn intestojn. Kion Cezarea havis por doni al ili — tiu malriĉiginta, malfeliĉa urbo, kiu post la terura tertremo antaŭ du jaroj, apenaŭ duone estis sin relevinta? Kaj meze de ĉio, sub la brulanta varmego kaj la oftaj tertremadoj, ni devis vidi, ke malpiaj oferfestoj okazis tage kaj nokte. La renversitaj altaroj estis rapide restarigitaj, la ofersango fluis torente; jonglistoj kaj fiknabinoj trairis kantante kaj dancante la urbstratojn. Sinjoro, — ĉu vi povas miri, ke miaj, de la malfeliĉo batitaj fratoj, kredis vidi ĉielan punon en la ilin trafantaj ĉagrenoj, ĉar ili estis tolerantaj inter si tiel longe la herezon kaj la kolerigajn signojn de la herezo?

Imperiestro Juliano. Kiajn signojn vi celas?

Gregoro de Nazianz. La krioj de la ektimigantoj kaj de la febro-malsanuloj estiĝis pli kaj pli laŭtaj; ili postulis, ke la urbestro eldiru por Kristo ateston senteble evidentan per tio, ke ĝi renversigu tion, kio staras ankoraŭ en Cezarea kiel memoraĵo al la iama potenco de la idolaneco.

Imperiestro Juliano. Vi do ne volas diri per tio, ke —

Gregoro de Nazianz. La urbestro okazigis kunvenon, kiun mi ankaŭ ĉeestis. Vi scias, plej indulga imperiestro, ke ĉiuj temploj estas propraĵo de la burĝaro. La burĝoj sekve povas disponi pri ili laŭ propra libera volo.

Imperiestro Juliano. Nu, nu? Kaj se tio estus?

Gregoro de Nazianz. Dum tia terura tertremo okazinta en Cezarea antaŭ du jaroj, ĉiuj temploj estis detruitaj escepte unu.

Imperiestro Juliano. Jes, jes, la templo de Fortuna.

Gregoro de Nazianz. Dum la kunveno, pri kiu mi parolis, la komunumo de Dio decidis fini la punantan laboron de Dio, kiel ateston pri tio, ke ĝi nur tenigu al Li, kaj ne plu volis toleri tiun abomenindaĵon en sia mezo.

Imperiestro Juliano (*raŭkvoĉe*). Gregoro —, junec-amiko — ĉu via vivo estas al vi kara?

Gregoro de Nazianz. La kunveno faris dekreton, kiun mi ne povis aprobi, sed kiu estis preskaŭ unuvoĉa. Timante tamen, ke la afero — se ĝi falsita estus raportata al vi, povus ekflamigi

vian koleron kontraŭ la urbo, oni decidis, ke viro iru tien ĉi por sciigi al vi, kion ni estis decidintaj kaj kio nun estas okazonta tie. Glora imperiestro — ne troviĝis alia homo, preta por preni sur sin tiun oficon. Sekve mi devis tion fari. Tial, sinjoro, mi mem staras humile antaŭ vi, kaj sciigas al vi, ke ni Kristanoj decidis renversi teren la templon, en kiu la Idolanoj siatempe honoris falsan diaĵon sub la nomo Fortuna.

Imperiestro Juliano (*salte levigante*). Kaj tion mi devas ekscii per miaj propraj oreloj! Tiajn ne-aŭditajn aferojn kuraĝas al mi diri unu sola viro!

La korteganoj, oratoroj kaj poetoj. Ho, pia imperiestro, ne toleru tion! Punu tiun ĉi trokuraĝulon!

Teologiisto Hekebolios. Li estas freneza, sinjoro! Lasu lin foriri. Rigardu, rigardu, — la frenezeco elardas el liaj okuloj.

Imperiestro Juliano. Jes, oni devas nomi tion frenezeco. Sed estas pli ol frenezeco renversi tiun eminentan templon de same eminenta diino! Kaj ĉu ne estas tiu diino, al kiu mi ŝuldas la aferojn, pri kiuj parolas eĉ la plej malproksimaj popoloj? Kiujn esperojn pri venko aŭ feliĉo mi povas ankoraŭ havi post tiu ĉi tago, se mi toleras ion tian? — Gregoro, mi ordonas vin returniri al Cezarea por sciigi al la burĝoj, ke mi malpermesas tiun trokuraĝan faron.

Gregoro de Nazianz. Tio ne estas plu ebla, sinjoro! La afero jam tiom prosperis, ke restis al ni nur la elekto inter timo antaŭ homoj kaj timo antaŭ Dio. Ni ne povas plu ŝanĝi nian decidon.

Imperiestro Juliano. Tiam mi sentigos al vi kiel malproksimen atingas la brako de la imperiestro!

Gregoro de Nazianz. La brako de la imperiestro estas potenca en mondaj aferoj; kaj mi same kiel aliaj tremas sub ĝi.

Imperiestro Juliano. Do montru tion per faro! Ha, vi Galileanoj, vi fidas al mia pacienco. Ne fidu al ĝi, ĉar vere —

(Bruo ĉe la enirejo. La hartondisto Eŭnapios, sekvata de multaj burĝoj, rapide eniras.)

Imperiestro Juliano. Kio estas tio? Kio okazis, Eŭnapios?

Hartondisto Eŭnapios. Ho, ke miaj okuloj devis esti atestantoj de tia vidaĵo.

Imperiestro Juliano. Kiun vidaĵon vi havis?

Hartondisto Eŭnapios. Rigardu, plej indulga imperiestro, mi venas al vi, sangante, batita kaj tamen feliĉa esti la unua, kiu alvokas vian punon —

Imperiestro Juliano. Parolu, viro; kiu batis vin?

Hartondisto Eŭnapios. Permesu al mi eldiri mian plendon, sinjoro. En la tagiĝo mi iris ekster la urbon por viziti la malgrandan Venus-templon, kiun vi fondigis antaŭ nelonge. Kiam mi eniris ĝin, sonis al mi renkonte kantado kaj flutludado. Virinoj plenumis belajn dancojn en la vestiblo, kaj interne mi trovis la tutan spacon plena de ĝojkrianta homamaso, dum la pastroj plenumis la oferadon antaŭ la altaro, kiel vi estis ordoninta ĝin.

Imperiestro Juliano. Jes, jes, kaj poste?

Hartondisto Eŭnapios. Apenaŭ mi havis tempon turni mian atenton mediteme al tiu rava diino, kiun mi tre estimas kaj admiras — kaj jen, aro da junaj viroj perforte penetris la templon.

Imperiestro Juliano. Sendube Galileanoj!

Hartondisto Eŭnapios. Jes, sinjoro, — Galileanoj.

Imperiestro Juliano. Ha!!

Hartondisto Eŭnapios. Kaj kia sceno sekvis! Plorante, sub insultoj kaj bastonbatoj de la perfortuloj, forkuris tiuj dancantaj knabinoj el la vestiblo al ni. La Galileanoj ekatakis, insultis kaj malbone traktis nin en la plej hontinda maniero.

Imperiestro Juliano (*malsupreniras la altaĵon*). Atendu, atendu, atendu!

Hartondisto Eŭnapios. Ho, se tiu ĝenaĵo estu trafinta nur nin! Sed la senkompatemuloj faris pli multe. Jes, plej indulga imperiestro — per unu vorto; la altaro estis renversata, la statuo de la diino dispecigata, la intestoj de la oferbestoj kiel manĝaĵo estis ĵetataj antaŭ la hundojn.

Imperiestro Juliano (*iras tien kaj returne*). Atendu, atendu, atendu!

Gregoro de Nazianz. Sinjoro, la vortoj de tiu sola viro ne sufiĉas.

Imperiestro Juliano. Eksilentu! (*Al Eŭnapios.*) Ĉu vi konas unu el tiuj templo-senhonorigantoj?

Hartondisto Eūnapios. Ne mi, sinjoro; sed tiuj ĉi burĝoj konas kelkajn el ili —

Imperiestro Juliano. Iru kun la korpogardistoj. Kaptu tiom el la kulpuloj, kiom vi povos. Jetu ilin en la malliberejon. La kaptitoj denuncu la nomojn de la aliaj, kaj post kiam mi havos ilin en mia potenco —

Gregoro de Nazianz. Kio okazos poste, sinjoro?

Imperiestro Juliano. Tion la ekzekutisto povos diri al vi. Vi kaj la burĝoj de Cezarea spertos tion, kio atendos vin, se vi kun galileana obstineco teniĝos je viaj intencoj.

(La imperiestro eliras kolerega maldekstren; Eūnapios kaj liaj atestantoj malproksimiĝas kun la gardistoj; la aliaj disiras.)

(Foirejo en Antiokia. Sur la antaŭ-scenejo, dekstre, estas strato kondukanta sur la foirejon; maldekstre sur la fundo oni vidas en mallarĝan, malrektan straton.)

(Granda aro da homoj plenigas la foirejon. Vendistoj laŭvoĉe rekomendas siajn komercaĵojn. Sur multaj lokoj oni vidas burĝojn, are parolantaj fervore.)

Burĝo. Sed vi kara Dio de la ĉielo, kiam okazis tiu malfeliĉo?

Dua burĝo. Hodiaŭ matene, diras mi; tre frue en tiu ĉi mateno.

Kolorigisto Fokion *(enirante en la straton, dekstre)*. Kara viro, ĉu vi trovis dece nomi tion malfeliĉo? Mi nomas tion krimo kaj eĉ plej impertinenta krimo.

Dua burĝo. Jes, jes; estas vere; ĝi estis farata plej impertinente.

Kolorigisto Fokion. Jam imagu — jes, ĉu ne estas pri la atako en la templo de Venuso, ke vi parolas? Jes, jam imagu, diras mi, kaj en tempo, kiam la imperiestro mem estas en la urbo —! Kaj ili elektis por tio tagon kiel la hodiaŭan, — tagon —

Tria burĝo *(alproksimiĝas al la parolantoj)*. Aŭdu, diru al mi, bonaj fremduloj, kio estas okazinta?

Kolorigisto Fokion. Mi diras, ili elektis por tio tagon kiel la hodiaŭan, kiam nia majesta imperiestro mem volas plenumi sian oficon ĉe la apolonfestoj.

Tria burĝo. Jes, certe, tion mi scias; sed kial oni arestas tiujn ĉi Kristanojn?

Kolorigisto Fokion. Kion? Ĉu oni arestas ilin? Ĉu vere oni malkovris ilin? (*Laŭtaj ekkrioj aŭdiĝas.*) Aŭskultu, kio estas tio? Jes, je la dioj, mi kredas, ke oni kaptis ilin!

(*Maljuna virino, konfuzita kaj kun libere pendantaj haroj trapuŝiĝas tra la homamason; ŝin ĉirkaŭas aliaj virinoj, kiuj vane klopodas reteni ŝin.*)

La maljuna virino. Ne retenu min! Li estas mia sola, li estas la infano de mia maljuneco! Ellasu min; ellasu min! Ĉu neniu povas diri al mi, kie mi trovas la imperiestron?

Kolorigisto Fokion. Kion vi volas de la imperiestro, maljuna patrino?

La maljuna virino. Mi volas rehavi mian filon. Helpu min! Mian filon Hilarion. Ho, imagu, ili forprenis lin de mi! Ili perforte eniris nian domon, — kaj tiam ili kaptis lin!

Unu el la burĝoj (*al Fokion*). Kiu estas tiu virino?

Kolorigisto Fokion. Kion? Ĉu vi ne konas la vidvinon Publia'n, — la kantistinon de psalmoj?

La burĝo. Ho jes, jes, jes!

La virino Publia. Hilarion! Mia infano! Kion ili volas fari kun li? Ho, vidu Fokion — ĉu vi estas tie? Feliĉe ke mi renkontas kristanan fraton.

Kolorigisto Fokion. Pŝ!! eksilentu, eksilentu; ne voku tiel laŭte; la imperiestro venas.

La virino Publia. Ho, la malpia imperiestro! La kolero de Dio trafas nin pro liaj pekoj; la malsatego ruinigas la landojn; la tero tremadas sub ni! (*Taĉmento da soldatoj venas de la strato, dekstre.*)

Taĉmentestro. Flanken; faru spacon tie ĉi!

La virino Publia. Ho, venu, bona Fokion; — helpu min pro niaj amikeco kaj frateco —

Kolorigisto Fokion. Ĉu vi freneziĝis, virino? Mi vin ne konas.

La virino Publia. Kion? Ĉu vi min ne konas? Ĉu vi ne estas la tinkturisto Fokion? Ĉu vi ne estas la filo de —?

Kolorigisto Fokion. Mi estas nenies filo. Iru for de mi, virino!
Vi estas frenezal! Mi ne konas vin; mi vidis vin neniam. (*Li enŝteliĝas en la homamason.*)

Subkondukisto (*kun soldatoj, venas de dekstre*). Faru spacon tie ĉi!
(*La soldatoj repuŝas la homamason al la domomuroj. La maljuna Publia ĵalas en la brakojn de la virinoj, maldekstre. Ĉiuj rigardas fikse kaj plenatente laŭlonge de la strato.*)

Kolorigisto Fokion (*en la homamaso post la soldatoj ĉe la dekstra flanko.*) Jes, je la sun-dio, ĉu li ne venas tie, la kara bona sinjoro!

Soldato. Ne puŝu tiel, tie malantaŭe!

Kolorigisto Fokion. Ĉu vi povas vidi lin? La viro kun la blanka rubando ĉirkaŭ la frunto estas la imperiestro.

Burĝo. La viro, tute blanke vestita?

Kolorigisto Fokion. Jes, jes, ĝuste tiu.

La burĝo. Sed kial li estas blanke vestita?

Kolorigisto Fokion. Verŝajne pro la varmego; — sed ne, atendu, mi pensas ke li kiel ofer-pastro —

Alia burĝo. Ĉu la imperiestro volas mem oferi?

Kolorigisto Fokion. Jes, la imperiestro Juliano faras ĉion mem.

Tria burĝo. Li ne aspektas tiel potenca kiel la imperiestro Konstantios!

Kolorigisto Fokion. Mi opinias ke jes. Li ne estas tiel altkreska kiel la antaŭa imperiestro; sed kontraŭe liaj brakoj estas pli longaj ol tiuj de Konstantios. Kaj li havas rigardon — ho vi amikoj! Jes, nun vi ne povas vidi tion; li honorinde mallevas la okulojn dum li iras. Jes, honorinda li estas, kredu tion. Virinojn li ne rigardas. Pri tio mi kuraĝas ĵuri, ke li post la morto de sia edzino ne ofte — —; mi volas diri al vi, li skribas la tutan nokton. Tial liaj fingroj estas ofte tiel nigraj, kiel tiuj de kolorigisto; jes, eĉ kiel la miaj. Mi estas ankaŭ kolorigisto. Vi povas kredi min, mi pli bone konas la imperiestron ol la plej multaj. Mi naskiĝis en tiu ĉi urbo; sed mi vivis kvin jarojn en Konstantinopolo ĝis antaŭ nelonge —

Burĝo. Ĉu la famo estas vera, ke la imperiestro intencas daŭre loĝadi tie ĉi?

Kolorigisto Fokion. Mi konas la hartondiston de la imperiestro, kaj li tion diras. Estus dezirinde, ke tiuj ĉikanajoj ne kaŭzas tro multe lian koleron.

Burĝo. Ho, tio estos skandalo.

Dua burĝo. Por ni ĉiuj defalos eble kelka profitaĵo, se la imperiestro restados tie ĉi.

Kolorigisto Fokion. Pri tio ankaŭ mi kalkulis; tial mi transloĝigis tien ĉi. Sed nun ni faru nian eblon, amikoj; kiam la imperiestro preteriros, ni eligos por li laŭtajn ĝojkriojn, por li kaj por Apolono.

Burĝo (*al alia*). Kiu estas tiu Apolono, pri kiu parolas ĉiam tiel multe la popolo?

La alia burĝo. Ho, tiu ja estas la pastro en Korinto — kiu akvumas tion, kion plantis la sankta Paŭlo.

La unua burĝo. Jes, tiel; jes; nun ŝajnas al mi, ke mi rememoras tion.

Kolorigisto Fokion. Oj, oj, oj! tio ne estas tiu Apolono; tio estas iu tute alia; tio estas la sunreĝo — la granda liut-ludanta Apolono.

La alia burĝo. Ho, tiu Apolono! — Ĉu li estas pli bona?

Kolorigisto Fokion. Jes, kompreneble! — Vidu, jen li venas. Ho, la plej laŭdata imperiestro!

(Imperiestro Juliano, vestita kiel ĉefpastro, ĉirkaŭita de oferpastroj kaj templo-servistoj, venas. Korteganoj kaj instruistuloj, inter kiuj la teologiisto Hekebolos aliĝis al la procesio; same burĝoj. Antaŭ la imperiestro iras flutistoj kaj harpistoj. Soldatoj kaj urb-oficistoj kun longaj bastonoj faras lokon antaŭ kaj ĉe la flankoj de la procesio.)

La popolamaso sur la foirejo (*traŝas siajn manojn*). Glorata estu la imperiestro! Laŭdata estu Juliano, la heroo kaj feliĉalportanto!

Kolorigisto Fokion. Salutata estu Juliano kaj la sunreĝo! Vivu Apolono!

La burĝoj. (*Sur la antaŭ-scenejo, dekstre.*) Imperiestro, imperiestro, restu longe ĉe ni!

(*Imperiestro Juliano donas signon per la mano, la procesio ekhaltas.*)

Imperiestro Juliano. Burĝoj de Antioĥia! Nenion mi povus nomi al vi, kio pli ĝojigus mian koron, ol tiu ĉi via kuraĝiganta alvoko. Ho, mia koro tre bezonas tiun refreŝigon. Kun premita animo mi komencis tiun ĉi promenadon, kiu estos irado de ĝojo kaj nobligado. Jes, mi ne volas kaŝi al vi, ke hodiaŭ matene mi preskaŭ perdis tiun egalpezon de la animo, kiun saĝec-amanto devas dece konservi sub ĉiuj batoj de la sorto. Sed ĉu pro tio iu kuraguŝo riproĉi min? Ĉiu pripensu, kiajn impertinentajn aferojn oni aliloke meditas kaj jam efektivigas.

La virino Publia. Sinjoro, sinjoro!

Kolorigisto Fokion. Ho, pia kaj justa imperiestro, punu tiujn trokuraĝulojn!

La virino Publia. Sinjoro, redonu al mi Hilariono'n!

Kolorigisto Fokion. Ĉiuj bonaj burĝoj alvokas vian indulgon por la urbo.

Imperiestro Juliano. Serĉu por trovi la indulgon de la dioj, kaj vi certe havos la mian. Ĉu ne estas juste, ke Antioĥia donu la ekzemplon en tio? Ĉu ne estas kvazaŭ la rigardo de la sun-dio ripozas kun speciala plezuro sur tiu ĉi urbo? Informigu ĉe multaj vojaĝintaj viroj kaj vi ekscios, en kia malĝoja troaĵo la eraro sukcesis ruinigi niajn sanktaĵojn en aliaj lokoj. Kio postrestis? Ruino tie ĉi kaj aliloke; kaj nenio vere bela. Sed ĉe vi, ho burĝoj de Antioĥia! Ho, miaj okuloj plenigis de ĝoj-larmoj, kiam mi unuafoje vidis tiun ĉi senkompareblan sanktaĵon, la propran domon de Apolono, pri kiu oni apenaŭ povas kredi, ke ĝi estas konstruita de homomanoj. Ĉu la belega statuo ne staras en ĝi kiel antaŭe kun serena beleco? Ne unu angulo de la altaro estis forbatita aŭ disrompita; ne unu fendo sin trovas en la longaj, portantaj kolonoj. Ho, se mi pripensas tion — se mi sentas la rubandon ĉirkaŭ mia frunto — se mi malsupren rigardas al miaj vestaĵoj, kiuj estas al mi pli karaj ol la purpura mantelo, tiam mi sentas la proksimecon de la dio en sankta tremado. Vidu, vidu; la lumo tremetadas ĉirkaŭ ni en belegeco! Sentu,

kiel la aero estas plena de la bonodoro de freŝaj girlandoj! Bela tero, hejmo de la lumo kaj de la vivo, hejmo de la ĝojo, de la feliĉo kaj de la beleco, — kio vi iam estis, tio vi fariĝis denove! — La sundio nin ĉirkaŭbraku! Mitra, Mitra! Antaŭen sur la vojo de nia venko!

(La procesio ekiras denove sub aplaŭdkrioj de la homamaso, sed la unuaj ekhaltas ĉe la enirejo de la mallarĝa strato, tra kiu malsupren-iras alia procesio, iranta foirejon.)

Imperiestro Juliano. Kio malhelpas nin?

Teologiisto Hekebolos. Plej indulga sinjoro, okazas io tie en la strato.

(Kantado tre malproksime aŭdiĝas.)

„Feliĉege suferi, feliĉege eĉ morti,
Feliĉege restariĝi post suferegado.”

Kolorigisto Fokion. La Galileanoj, sinjoro! Oni kaptis ilin! La virino Publia. Hilarion!

Kolorigisto Fokion. Oni kaptis ilin! Mi aŭdas katenojn —

Imperiestro Juliano. Ni preteriru ilin —!

Hartondisto Eŭnapios *(rapide kurante tra la amason.)* Sukcesis super-mezure, sinjoro!

Imperiestro Juliano. Kiu estas ili, tiuj senhontuloj?

Hartondisto Eŭnapios. Unuj el ili estas burĝoj de la urbo; sed la plej multaj estas laŭdire forkurintaj kamparanoj de Kapadocio.

Imperiestro Juliano. Mi ne volas vidi ilin. Antaŭen, antaŭen!

(Kantado de kaptitoj, pli proksime.)

„Feliĉege, la kronon martiran heredi,
Feliĉege, la sanktajn martirojn postsekvi!”

Imperiestro Juliano. Tiuj frenezuloj, Ne alproksimiĝu al mi! For, for! ! — — Gardistoj! — —

(La du procesioj intertempe interpuŝiĝas. La procesio de Apolono devas ekhalti, dum la procesio kun la kaptitoj, la viroj en katenoj, ĉirkaŭitaj de soldatoj kaj de granda amaso da homoj, preteriras.)

La virino Publia. Mia filo! Mia Hilarion!

Hilarion *(inter la kaptitoj.)* Ĝoju, mia patrino!

Imperiestro Juliano. Vi kompatindaj eraruloj! Aŭdante, ke tiel la frenezeco parolas el vi, mi preskaŭ dubas, ĉu mi rajtas puni vin!

Alia voĉo (*inter la kaptitoj*). Flanken! ne forprenu de ni la dornokronon.

Imperiestro Juliano. Nokto kaj teruro, — kies voĉo estas tio? La kondukisto de la gardistoj. Jen, sinjoro, tiu ĉi parolis.

(*Li antaŭen puŝas unu el la kaptitoj, junan viron, kiu tenas duone kreskitan junulon ĉe la mano.*)

Imperiestro Juliano (*kun ekhrio*). Agaton!

(*La kaptito rigardas lin kaj silentas.*)

Imperiestro Juliano. Agaton, Agaton! Respondu al mi, ĉu vi ne estas Agaton?

La kaptito. Jes.

Imperiestro Juliano. Vi inter tiuj ĉi! Parolu al mi.

Agaton. Mi ne konas vin.

Imperiestro Juliano. Ĉu vi ne konas min? Ĉu vi ne scias, kiu mi estas?

Agaton. Mi scias, ke vi estas la sinjoro de la tero; tial mi ne konas vin.

Imperiestro Juliano. Kaj tiu infano? Ĉu li estas via juna frato?

(*Al la kondukisto de la gardistoj.*) Tiu viro certe estas senkulpa.

Hartondisto Eŭnapios. Sinjoro, tiu ĉi viro ĝuste estas la kondukanto de ĉio. Li mem konfesis tion; jes, li eĉ laŭdas sin pro sia faro!

Imperiestro Juliano. Tiel strange malsato, malsano kaj malfeliĉo povas erarigi la prudenton de homo (*Al la kaptitoj.*) Diru al mi nur unu vorton, ke vi bedaŭras, kaj okazos al vi nenio malbona.

La virino Publia (*ekhrias*). Ne diru ĝin, Hilarion!

Agaton. Estu forta, kara frato.

La virino Publia. Iru, iru al tiu, kiu atendas vin, mia ununura!

Imperiestro Juliano. Aŭdu kaj pripensu, vi aliaj —

Agaton (*al la kaptitoj*). Elektu inter Kristo kaj la imperiestro!

La kaptitoj. Glorata estu Dio en la alta ĉielo!

Imperiestro Juliano. Terura estas la erariganta potenco de la Galileano. Ĝi devas esti rompata. For! for! ho obstinuloj! Ili jetas ombron sur nian ĝojon; kaj mallumigas nian tagon per sia kovanta sopiro al morto — Flutistoj — Viroj, virinoj — ekludu, ekkantu! Ekkantu la valoron de la vivo, feliĉo kaj lumo!

La apolono-procesio, (*kantas.*)

Belege, de rozogirland' malvarmiĝi;
Belege, en suna brilado baniĝi!

La procesio de la kaptitoj, (*kantas.*)

Beate, ekgliti en tombon sangplenan;
Kaj supren leviĝi ĝardenon ĉielan!

La apolono-procesio, (*kantas.*)

Belege, incenso-odoron enspiri.

La procesio de la kaptitoj, (*kantas.*)

Beate, en sango fumanta fordroni.

La apolono-procesio, (*kantas.*)

Malŝpare prezentu al ni, Apolono,
Pokalojn tro plenajn de ĝojo sovaĝa.

La procesio de la kaptitoj, (*kantas.*)

Brulantajn vundegojn kaj ostojn rompitaĵajn
Sanigas nur unu!

La apolono-procesio, (*kantas.*)

Belege, en sunaj radioj ĝojkanti.

La procesio de la kaptitoj, (*kantas.*)

Beate, sang-bapton de l'morto suferi.

(*Ambaŭ procesioj preteriras unu la alian kantante. La homamaso sur la foirejo postrigardas ilin sub obtuza silentado.*)

(La sankta arbareto ĉirkaŭ la templo de Apolono. Maldekstre sur la fundo inter arboj oni vidas la vestiblon, portatan de kolonoj, kaj al kiu suprenkondukas larĝa ŝtuparo.)

(Teruregita homamaso kuras ve-kriante tien kaj reen en la arbareto.)

(En la malproksimo oni aŭdas la muzikon de la fest-procesio.)

Virinoj. Kompaton! Jen la tero refoje tremis!

Forkuranta viro. Kiel terure! Fulmobatoj sub niaj piedoj —

Dua viro. Ĉu tio okazis vere? Ĉu estis la tero, kiu tremis?

Virino. Ĉu vi ne sentis? Tiu arbo tiel balanciĝis, ke ĝia foliario murmuris.

Multaj viroj. Aŭdu, aŭdu, aŭdu!!

Unuj. Estas veturiloj sur la stratpavimo.

Aliaj. Estas la tamburoj. Aŭdu la muzikon —; la imperiestro venas!

(Oni vidas, ke la procesio venas de dekstre tra la arbareto, kaj ke ĝi ekhaltas duoncirkle antaŭ la templo dum oni ludas sur flutoj kaj harpoj.)

Imperiestro Juliano. *(turniĝinta al la templo kun etenditaj brakoj.)* Mi akceptas la antaŭsignon! — Tiel proksime en interligo kun la senmortemaj dioj mi neniam sentis min. La pafarkstreĉisto estas en nia mezo. La tero tremas sub lia kalkano, kiel ĝi tremis pli frue, kiam li kolere piedfrapis la trojan marbordon. Sed ne al ni li turnas la sulkigitan frunton; ne, al tiuj malfeliĉuloj, kiuj malamas lin kaj lian sun-lumantan regnon. Jes, — tiel certe, ke la pleneco de feliĉo aŭ de malfeliĉo indikas la ĝustan mezuron de la favoro de l'dioj por la mortemuloj — tiel certe sin manifestas tie ĉi la diferenco inter ni kaj tiuj aliaj. Kie estas nun la Galileanoj? Unuj estas sub la manoj de la ekzekutisto, aliaj estas forkurantaj en la mallarĝajn stratojn, cindre palaj pro teruro, kun elorbitigitaj okuloj, — kun ekkrio en la duone malfermita buŝo — kun haroj ekstarantaj pro ektimo

aŭ elŝiritaj pro malespero. Kaj kie estas ni? Tie ĉi en la arbareto de Dafno, kiela bonodoranta bloveto de la driadoj malvarmetigas niajn tempiojn; — tie ĉi antaŭ la majesta templo de la majestulo, ĉirkaŭita de liut — kaj flutsonoj, — tie ĉi en lumo kaj feliĉo kaj ĝojo, dum la dio mem sin manifestas inter ni. Kie estas la dio de la Galileanoj? Kie estas la Judo, tiu krucumita ĉarpentist-filo? Li do sin manifestu! Sed li singardas! Kaj tial decas plenigi la sanktejon. Tie mi volas propramane plenumi la diservon; mi ja estas malproksime estimi ĝin tro malgrava aŭ maldeca, ke kontraŭe mi metas ĝin super ĉiujn aliajn servojn.

(Li iras antaŭ la procesio tra la homamaso al la templo.)

Voĉo *(vokas en la interpuŝado)*. Haltu, malpiulo!

Imperiestro Juliano. Galileano inter ni?

La sama voĉo. Ne pluen, ateisto!

Imperiestro Juliano. Kiu estas la viro, kiu parolas tie?

Alia voĉo en la homamaso. Galileana pastro. Blinda grizulo, jen li staras.

Ankoraŭ aliaj. For, for, la senhontulon!

(Blinda viro en pastraj vestoj kaj apoganta sin sur du pastre vestitaj, pli junaj viroj, estas puŝata antaŭen, tiel ke fine li staras malsupre ĉe la ŝtuparo, antaŭ la imperiestro.)

Imperiestro Juliano. Ha, kion mi devas vidi! Diru al mi, maljunulo, ĉu vi ne estas la episkopo Maris el Kalkedono?

La maljunulo. Jes, mi estas tiu malinda servisto de nia eklezio.

Imperiestro Juliano. Vi nomas vin malinda servisto kaj mi kredas, ke vi ne tute malpravas. Se mi ne eraras, vi estis unu el tiuj, kiuj plej fervore semis malkonkordon inter la Galileanoj.

Episkopo Maris. Mi faris ion, kio enprofundigas min en multe pli grandan penton. Kiam vi transprenis la estrecon kaj via kredo diskonĝis, mia koro estis premata de neesprimebla angoro. Malforta pro maljuneco kaj blinda, ne frapis min la ekpenso kontraŭstari la plej potencan sinjoron de la mondo. Jes — Dio indulgu min — mi forlasis la paroĥanaron, por kies protektado mi estis destinita, retiris min senkuraĝiginta de tio, kio minacante

kuniĝis ĉirkaŭ la komunumo de la Sinjoro, kaj serĉis tie ĉi en Sirujo en mia bieno — 1)

Imperiestro Juliano. Ho, ho, plej strange, kaj vi, tiu senkuraĝiĝinta viro, kiu pli frue tiel alte estimis la favoron de la imperiestro, vi ekpaŝas al mi, kiel vi ĵus faris kaj ĵetas al mi rekte en la vizaĝon ekkriion de insultego.

Episkopo Maris. Nun mi ne plu timas vin; ĉar nun Kristo tute posedas mian koron. En la tempo de malfeliĉego por la eklezio, supreniris por mi lia lumo kaj lia belegeco. Ĉiu sango, kiun vi elverŝigas, ĉiu perforto kaj ĉiu maljustaĵo, kiujn vi faras, krias al la ĉielo, resonas laŭte en miajn kulpajn orelojn kaj montras al mi en la nokto de mia blindeco, kiun vojon mi devas iri.

Imperiestro Juliano. Iru hejmen, maljuna viro!

Episkopo Maris. Ne antaŭ ol vi promesis forlasi viajn diablajn agadojn. Pri kio vi pensas? Ĉu la polvo volas leviĝi kontraŭ la spirito? Ĉu la sinjoro de la mondo volas faligi la Sinjoron de la ĉielo? Ĉu vi ne vidas, ke la tago de kolero estas super ni pro viaj pekoj? La fontoj sekiĝas, kiel okuloj, kiuj malpleniĝis plorante. La nuboj, kiuj estis lasontaj fali sur nin la manaon de fruktodoneco, preterglitas super niaj kapoj kaj ne elverŝiĝas. La tero, kiu estis malbenata de post la mateno de l'tagoj, ektemas sub la hom-mortiga krimo de l'imperiestro.

Imperiestro Juliano. Kian favoron vi atendas de via dio por tiu supermezura fervoro, ho malsaĝa grizulo? Ĉu vi esperas, ke via galilea majstro faros miraklon kiel antaŭe, kaj ke li redonos al vi la vid-kapablon?

Episkopo Maris. Mi posedas la vid-kapablon, kiun mi deziras; kaj mi dankas al la Sinjoro, ke li fermis miajn korpajn okulojn, ĉar mi estas indulgita vidi la viron, kiu iras en pli nigra nokto, ol mi.

Imperiestro Juliano. Faru spacon por mi!

Episkopo Maris. Kien?

Imperiestro Juliano. En la domon de la sundio.

1) . . . ŝirmon *Tradukinto.*

Episkopo Maris. Vi ĝin ne eniru! Mi malpermesas tion al vi en la nomo de la ununura Dio!

Imperiestro Juliano. Freneza grizulo! For! for lin!

Episkopo Maris. Jes, metu la manon sur min! Sed kiu kuraĝos tion, ties mano velkos. La Dio de la kolero sin manifestos en sia potenco —

Imperiestro Juliano. Via dio ne estas potenca dio. Mi pruvos al vi, ke la imperiestro estas pli potenca ol Li —

Episkopo Maris. Perдите! Tial mi anatemas vin, ho apostata filo de la eklezio!

Teologiisto Hekebolios (*pala*). Sinjoro kaj imperiestro ne toleru, ke tio okazos!

Episkopo Maris (*laŭtvoĉe*). Malbenita vi estu, Juliano apostata! Malbenita vi estu, imperiestro Juliano! Dio la sinjoro elkraĉis vin el sia buŝo! Malbenitaj estu viaj okuloj kaj viaj manoj! Malbenitaj estu via kapo kaj ĉiu via ekfaraĵo! Ve, ve, ve al la apostato! Ve, ve, ve —

(Obtuzo ruliĝanta bruego aŭdiĝas. La tegmento kaj la kolonoj de la templo ŝanceliĝas kaj ŝajnas enfali sub tondra bruego dum la tuta konstruaĵo estas envolvata en polvonubo. La homamaso eligas krion de teruro; multaj forkuras, aliaj falas teren. Dum momento estiĝas morta silento. Iom post iom la nubo foriĝas, kaj oni vidas la templon ruinigita.)

Episkopo Maris (*kies ambaŭ akompanantoj forkuris, staras sola kaj diras obtuzvoĉe*): Dio parolis.

Imperiestro Juliano (*pala kaj obtuzvoĉe*). Apolono parolis. Lia templo estis makulita, tial li ruinigis ĝin.

Episkopo Maris. Kaj mi diras al vi: tio estis tiu Sinjoro, kiu rube ruinigis la templon de Jerusalemo.

Imperiestro Juliano. Se tio estas, la preĝejoj de la Galileanoj estos fermataj, kaj iliaj pastroj rekonstruos tiun ĉi templon sub vipobatoj.

Episkopo Maris. Klopodu tion, senpotenculo! Kiu povis rekonstrui la templon de Jerusalemo, ĉar la reĝo de Golgota estis malbeninta ĝin?

Imperiestro Juliano. Mi povos! La imperiestro faros tion!
El via dio mi faros mensogulo. Ŝtonon post ŝtono mi rekonstruos
tiun templon de Jerusalemo, en la beleco kaj majesteco, kiel
ĝi estis en la tagoj de Salomono.

Episkopo Maris. Neniam sukcesos al vi meti unu ŝtonon sur la
alian, ĉar ĝi estas malbenita de la Sinjoro.

Imperiestro Juliano. Atendu, atendu; vi vidos ĝin — se vi
povos vidi — vi, kiu staras tie forlasita kaj sen helpo, serĉ-
palpetante en la nokto, ne sciante kien vi turnos viajn piedojn.

Episkopo Maris. Al mi lumos la fulmo, kiu iam frakasos vin
kaj la viajn.

*(Serĉ-palpante li foriras. Imperiestro Juliano postrestas,
ĉirkaŭita de pala, kaj timigita malgranda homamaso.)*

AKTO TRIA

(En Antiohia. Malfermita kolonaro, antaŭ kiu staras statuoj kaj ŝpruc-fontano. Maldekstre en la kolonaro ŝtuŝaro kondukas supren al la imperiestra palaco.)

(Aro da korteganoj, instruistoj, poetoj kaj oratoroj, inter kiuj la imperiestra kuracisto Oribaces kaj la poeto Herakleos, estas kunigintaj, parte en la kolonaro, parte sur la antaŭ-scenejo ĉirkaŭ la ŝpruc-fontano; la plej multaj el ili estas vestitaj per ŝiritaj manteloj kaj havas malordigintajn harojn kaj barbon.)

La poeto Herakleos. Tiun ĉi vivon mi ne eltenos pli longe. — Leviĝi kun la suno, eniri en malvarman banejon, promeni, kaj poste batali ĝis laciĝo. —

Imperiestra kuracisto Oribaces. Tio ĉi tamen estas tre saniga.

Poeto Herakleos. Ĉu estas ankaŭ sanige manĝi zosteron kaj nekuiritajn fiŝojn?

Kortegano. Ĉu estas sanige engluti la viandon je larĝaj pecoj, tute sangkovritan, kiel ĝi venas de la buĉisto?

Poeto Herakleos. Manĝaĵon mi ne multe vidis dum la lastaj semajnoj. La plej multe da ĝi estas uzata por la oferado. Mi kredas, ke oni en mallonga tempo povos diri pri la plej estimindaj dioj, ke ili estas la solaj manĝantoj de viando en Antiohia.

Imperiestra kuracisto Oribaces. Vi estas ankoraŭ la sama mokisto, Herakleos.

Poeto Herakleos. Oj! kion vi pensas, amiko? Mi estu malproksime primoki la saĝajn dekretojn de la imperiestro. Benata estu la imperiestro Juliano! Ĉu li ne marŝas en la piedaj postsignoj

de la senmortemuloj? Ĉar, diru al mi, ĉu ne ŝajnas, kvazaŭ ia ŝparemeco estas enkondukata ankaŭ en la dian mastrumadon?

Kortegano. Ha-ha-ha! jen vi ne estas tute malprava.

Poeto Herakleos. Jam rigardu al Kibele, tiu antaŭe tiel riĉa diino, kies statuon la imperiestro antaŭ nelonge retrovis en cindrejo. —

Alia kortegano. Estis en sterkejo —

Poeto Herakleos. Eble; Kibele ja celas al fruktodoneco. Sed rigardu do tiun diinon, diras mi; — spite la cent mamoj, elfluas el ŝi nek lakto nek mielo.

(Rondo da ridantaj aŭskultantoj kuniĝis ĉirkaŭ li. Dum li parolas, la imperiestro Juliano estas aperinta supre sur la ŝtuŝaron en la kolonaro, ne rimarkita de la sube starantoj. Li portas ŝiritan mantelon, kiu estas kuntenita per ŝnuro; haroj kaj barbo estas nekombitaj, la fingroj estas inke makulitaj; en ambaŭ manoj, sub la brakoj kaj en la zono li portas pakaĵojn el pergameno, kaj paperrulaĵojn. Li restas staranta kaj aŭdas la diraĵojn de Herakleos kun ĉiuj signoj de ekkolero.)

La poeto Herakleos (*parolas plue*). Jes, oni vere devas kredi, ke la nutristino de la mondo fariĝis senfrukta. Oni preskaŭ kredus, ke ŝi jam pasis la aĝon, en kiu la virinoj — —

Kortegano (*kriu ekvidis la imperiestron*). Fi, fi, Herakleos, — hontu do!

(Imperiestro Juliano per mangesto ordonas la korteganon eksilenti.)

Poeto Herakleos (*parolante plue*). Tial lasu ŝin kvieti. Sed ĉu tio sama ne okazas kun Cereso? Ĉu ŝi ne montras plej malĝojigan — mi povus nomi ĝin imperiestran — avarecon? Jes, kredu al mi, se ni nuntempe havus pli multan interrilaton kun la alta Olimpo, ni aŭdus pli multe da tiaj aferoj. Mi kuraĝas ĵuri pri tio, ke nektaro kaj ambrozio estas disdonataj kiel eble plej ŝpareme. Ho, Zeŭso, kiel vi devis fariĝi maldika kaj malgrasa! Ho, vi ŝercema Dionizo, kiel malmulte postrestis de viaj larĝaj lumboj? Ho, vi diboĉa tujruĝiganta Venuso, — ho, vi al ĉiuj edzoj tro proksimiĝanta Marso —!

Imperiestro Juliano. (*eksplozigas sian koleron.*) Ho, vi plej senhonta Herakleos! Ho, vi mizera gal-kraĉanta venenulo —.

Poeto Herakleos. He, mia indulga imperiestro!

Imperiestro Juliano. Ho, vi impertinenta mokegisto de ĉiuj majestaj aferoj! Tion mi devas sperti — ke mi devas aŭdi vian klaketantan langon en la sama tempo, kiam mi eliris el mia librejo en la freŝan aeron de l'mateno! (*Li venas pli proksimen.*) Ĉu vi scias, kion mi tenas tie ĉi sub mia maldekstra brako? Ne, tion vi ne scias. Ĝi estas polemiko kontraŭ vi, ho kalumnianta kaj malsaĝa Herakleos!

Poeto Herakleos. Kio, mia imperiestro, — kontraŭ mi?

Imperiestro Juliano. Jes, polemiko kontraŭ vi. Polemiko, kiun mi tiun ĉi nokton verkis en kolero. Ĉu mia kolero ne devas esti incitata pro via plej maldeca hieraŭa konduto? Kion vi permesas al vi en la legsalono dum mi kaj multaj aliaj seriozaj viroj ĉeestis? Ĉu ni ne devis toleri dum kelkaj sinsekvaj horoj tiujn hontindajn fablojn, kiujn vi mokrakontis pri la dioj? Kiel vi kuraĝis montri vin kun tiaj elpensajoj? Ĉu ĉio ĉi kune ne estas mensogaĵoj de la komenco ĝis la fino?

Poeto Herakleos. Mia imperiestro, se vi nomas tion mensogaĵoj, tiam mensogis Ovido kaj Luciano.

Imperiestro Juliano. Kio alie? Ho, mi tute ne povas esprimi, kiun indignon ĝi kaŭzis al mi, kiam mi eksciis, kion celis via senhonta parolado. Kiam mi aŭdis vin ekboji kiel brutaj farmistoj hundo, mi estis tentata ekkrii same kiel la komedi-verkisto:

„Homo, — lasu vin de nenio surprizi!” —

ne unu diro de dankemo, sed absurdaj fabeloj de nutristino, kiuj cetere estis malsaĝe redaktitaj. Ĉar viaj versoj estas malbonaj, Herakleos; tion mi pruvis en tiu ĉi skribaĵo. Kiel volonte mi ekstaras de mia seĝo kaj forirus, kiam mi vidis vin antaŭkonduki en la teatro ne nur Dionizon, sed ankaŭ tiun grandan senmortulon kies nomon vi portas. Sed, mi devigis min ne fari tion kaj restis sidanta, kaj mi povas certigi al vi, ke tio okazis malpli multe pro la poeto ol pro la aktoroj — se mi povas nomi ilin tiaj — sed plej multe pro mi mem. Ĉar ĉu mi ne devis timi, ke ŝajnus kvazaŭ mi forkurus kiel ektimigita kolombo? Jes, tial mi ŝajnigis

ekvidi nenion, sed kviete memorigis al mi tiun ĉi verson de Homero:

„Ho, mia kor', ĝin eltenu; ĉar pli malfacilajn aferojn vi venkis.

„Kiel antaŭe, toleru, ke hundo rabia insultas la diojn eternajn.”

Jes, ni devos elteni tion ĉi kaj pli multon. La tempo ne estas pli bona ol antaŭe. Montru al mi la feliĉulon, al kiu estas permesate dum tiu epoko de fero, gardi nemakulitaj siajn okulojn kaj orelojn!

Kuracisto Oribaces. Mi petas vin, mia alta sinjoro, ke vi ne ekflamiĝu. Estu al vi konsolo, ke ni ĉiuj kun indigno aŭskultis la malsaĝaĵojn de tiu ĉi viro.

Imperiestro Juliano. Tio tute ne estas vera! Mi ekvidis sur preskaŭ ĉiuj vizaĝoj ion tute alian krom indigno, ĉiufoje kiam tiu ĉi senhonta ĵonglisto elparolaĉis siajn sensencaĵojn kaj ĉirkaŭrigardis la ĉestantojn kun mokrido, kvazaŭ li faris ion, pro kio li povus esti fiera.

Poeto Herakleos. Ve, mia imperiestro, mi estas plej malfeliĉa —

Imperiestro Juliano. Jes, tia vi devas esti; ĉar vere tio ne estas bagatelo. Ĉar ĉu la rakontoj pri la dioj ne havas grandan signifon kaj gravan celon? Ĉu tiuj rakontoj ne estiĝis celante supren konduki la homan spiriton laŭ bona kaj facila vojo al la misterplenaj loĝejoj, kie regas la plej alta dio. — kaj fari la animojn taŭgaj por esti kunigataj kun li? Kio alie? Ĉu tio ne estas la motivo kial iamaj poetoj elpensis tiajn rakontojn, kaj kial ne nur Plato sed ankaŭ la aliaj ripetis ilin, aŭ eĉ plimultigis ilian nombron? Mi diras al vi; sen tiu intenco tiuj rakontoj estus uzeblaj nur por barbaroj kaj infanoj — jes, apenaŭ por ili. Sed ĉu estis infanoj kaj barbaroj, kiuj hieraŭ staris antaŭ vi? Kie vi prenas la kuraĝon, paroli al mi kvazaŭ mi estus infano? Ĉu vi opinias, ke vi fariĝis saĝulo, havanta la rajton de la paroladlibereco de l'saĝuloj, nur tial ĉar vi vestas vin per ŝirita mantelo kaj prenis la bastonon de almozulo en la manon?

Kortegano. Ho, kiel prave dirite, mia imperiestro! Ne, ne, por tio estas bezona pli multo.

Imperiestro Juliano. Vere? Ĉu estas bezona pli multo? Kaj kio? Eble lasi kreskadi la harojn kaj neniam purigi la ungojn?

Ho, vi hipokrita Kleon! Sed mi konas vin ĉiujn kune. En tiu ĉi skribaĵo mi donis al vi nomon, kiu —, vi tuj ĝin aŭdos —

(Li foliumas en la paper-rulaĵoj. En la sama momento venas de dekstre la oratoro Libanios, riĉe vestita kaj fiermiene.)

Kuracisto Oribaces (*obtuze*). Ha, kia feliĉo ke vi venas, plej estimata Libanios.

Imperiestro Juliano (*plue folumiante*). Kio do tio staras —?

Oratoro Libanios (*al Oribaces*). Pri kiu feliĉo vi parolas, amiko?

Kuracisto Oribaces. La imperiestro tre koleriĝis, via alveno mildigos lin.

Imperiestro Juliano. Ha, vidu, jen mi ĝin havas — (*ĉagreniĝante pro malpacienco*). Kion volas tiu homo?

Kuracisto Oribaces. Sinjoro, tio estas —

Imperiestro Juliano. Bone, bone, bone! Nun vi aŭdos, ĉu mi konas vin aŭ nel „Inter la malfeliĉaj Galileanoj troviĝas kelkaj furiozuloj, kiuj nomas sin pentemaj. Ili malestimas ĉiujn mondajn posedaĵojn, tamen ili deziras grandajn donacojn de ĉiuj malsaĝuloj, kiujn ili salutas kiel sanktulojn kaj preskaŭ kiel adorindulojn.” Vidu, vi similas tiujn homojn, kun la escepto, ke mi donacas al vi nenion. Ĉar mi ne estas tiel malsaĝa kiel tiuj. Jes, jes, se rilate tio mi ne estus konstanta, vi ĝenus baldaŭ la kortegon kun via senhonteco. Aŭ ĉu vi jam ne faras tion nun? Ĉu ne troviĝas inter vi multaj, kiuj revenus, eĉ se mi forpelus ilin? Ho, miaj karaj amikoj, kien tio kondukos? Ĉu vi estas saĝec-amikoj? Ĉu vi estas sekvantoj de Diogeno, kies vestaĵojn kaj kutimon vi surprenis? Vere, oni ne vidas vin tiel ofte en la lernasalonoj kiel ĉe mia trezoriŝto. Ho, kia mizera kaj malestiminda ofero fariĝis la saĝeco pro vi! Ho, vi hipokrituloj kaj tute nesciantaj oratoroj! Ho, vi — —, sed kion do volas tiu grasa viro?..

Kuracisto Oribaces. Sinjoro, tio estas la urbestro —

Imperiestro Juliano. La urbestro povas atendi. La tie ĉi rilatantaj aferoj estu pritraktataj antaŭ ĉiuj malpli gravaj. Sed, kion? Tiu viro havas tiel malpaciencan aspekton. Ĉu tio do estas tiel grava —?

Oratoro Libanios. Neniĉ, sinjoro; mi povas reveni alian tagon.

(Li volas foriri.)

Kuracisto Oribaces. Sinjoro, ĉu vi ne rekonas tiun eminentan viron? Li estas la orator-instruisto Libanios.

Imperiestro Juliano. Kio? Libanios? Neeble. Libanios — la senkomparebla Libanios — estas tie ĉi? Kiel tio estas imagebla?

Oratoro Libanios. Mi kredis la imperiestron scianta, ke la burĝoj de Antioĥia elektis min ĉefo de la urbestro.

Imperiestro Juliano. Certe, tion mi sciis. Sed kiam mi procesie eniris la urbon kaj kiam venis al mi renkonte la urbestro por saluti min per parolado, tiam mi vane ĉirkaŭrigardis al Libanios. Libanios ne estis inter ili.

Oratoro Libanios. La imperiestro ne eldiris deziron aŭdi paroladon de Libanios dum tiu okazo.

Imperiestro Juliano. La oratoro Libanios devis scii, kion la imperiestro deziras tiurilate.

Oratoro Libanios. Libanios ne sciis, kion estus efikinta tempo kaj disiĝo. Libanios tial opiniis plej dece loki sin inter la homamaso. Tie li staris sur ia neniĉ nerimarkebla loko; sed ne plaĉis al la imperiestro ekvidi lin.

Imperiestro Juliano. Mi tamen kredis, ke vi ricevis mian leteron en la sekvanta tago —?

Oratoro Libanios. Via nova amiko Priskos portis ĝin al mi.

Imperiestro Juliano. Kaj spite al tio — aŭ verŝajne ĝuste tial — vi restis malproksime?

Oratoro Libanios. Kapdoloro kaj gravaj laboroj —

Imperiestro Juliano. Ho! Libanios, antaŭe vi ne faris vin tiel grandvalora.

Oratoro Libanios. Mi venas, se oni invitas min. Ĉu mi devas esti trudema? Ĉu mi metos min en la vojon de Maksimos, tiel atestimata de la imperiestro?

Imperiestro Juliano. Maksimos neniam sin montras ĉe la kortego.

Oratoro Libanios. Kompreneble. Maksimos havas mem kortegon. La imperiestro donacis al li tutan palacon.

Imperiestro Juliano. Ho, mia Libanios, ĉu mi ne donis al vi mian koron? Kiel do vi povas envii Maksimos'on pro lia palaco?

Oratoro Libanios. Mi envias neniun. Mi eĉ ne envias miajn kunfratojn Temisteos'on kaj Maksimos'on, kvankam vi donacis al ili tiajn grandajn pruvojn de via favoro. Nek ankaŭ mi envias Hekebolios'on, kies proprajon vi plimultigis per tiaj konsiderindaj donacoj. Jes, mi eĉ ĝojas pro tio, ke mi estas la sola, al kiu vi donacis nenion. Ĉar mi bone komprenas la kaŭzon de tiu escepto. Vi volis, ke la imperiestraj urboj havu superfluan pri ĉio kaj precipe pri elokventeco, bone sciante, ke tio estas la diferenco, kiu disigas nin de la barbaroj. Vi tamen timis, ke mi — same kiel iuj aliaj — povus fariĝi nediligenta, se vi donacus al mi riĉaĵojn. Tial la imperiestro preferis, ke la instruisto de lia juneco restu malriĉa, por ke li des pli bone povu prizorgi sian taskon. Laŭ tiu maniero mi klarigas al mi konduton, kiu surprizis kelkajn, kies nomojn mi pli volonte prisilentas. Pro la honoro de la popolo kaj de la regno vi donacis al mi nenion. Vi volas, ke mi malhavu la riĉecon, por ke mi havu superfluan da elokventeco.

Imperiestro Juliano. Kaj mi, mia Libanios, komprenis ankaŭ la kaŭzon, kial la instruisto de mia juneco igis min dum multaj monatoj atendi tie ĉi en Antioĥia, ne prezentante sin al mi. Libanios verŝajne kredis, ke la servoj, kiujn lia iama lernanto faris al la dioj kaj al la regno aŭ al la scienco, ne estis sufiĉe grandaj, por meriti kun rajto la laŭdon de viro, kiu estas nomata la reĝo de la elokventeco. Libanios verŝajne kredis, ke pli eminentaj instruistoj kvalifikas pli bone en tiaj mezkvalitaj aferoj. Kaj plue Libanios eble preterlasis tion pro antaŭzorgo por la egalpezo de mia animo. Jes, vi certe timis, vidi la imperiestron ebria pro tromemfido, ŝanceligante kiel iu, kiu trinkis troavide el foliar-ornamita pokalo, se vi malŝparus al li iom de tiu arto, kiun ĉiuj Grekoj ĉe vi admiras, kaj kvazaŭ levi lin ĝis la alteco de la dioj, elverŝante por li tian multekostan oferon.

Oratoro Libanios. Ho, mia imperiestro, se mi povus kredi, ke mia elokventeco posedus tian grandan potencon.

Imperiestro Juliano. Kaj tion vi ne povus kredi, vi senkompar-

ebla amiko? Ho, iru for de mi, mi koleros vin Libanios! Sed estas la kolero de amanto al amato.

Oratoro Libanios. Ĉu estas vere tiel? Ho, mia kronita frato, permesu, ke mi diru al vi, ke de post la tago de via alveno, ne unu tago pasis, en kiu mi ne malbenis la persistemon, kiu ne permesis al mi fari la unuan paŝon. Miaj amikoj — ne sen ŝajno de praveco — igis min kredi, ke vi ekkomencis tiun longan vojaĝon preskaŭ tial por vidi kaj aŭdi min paroli. Sed Juliano mem ne donis sciigojn pri si. Kion mi farus? Ĉu mi flatus la imperiestron, kiun mi amas kiel homon?

Imperiestro Juliano (*ĉirkaŭbrakas kaj kisas lin*). Mia Libanios!

Oratoro Libanios. (*Kisas la imperiestron Juliano'n.*) Mia amiko kaj frato!

Kuracisto Oríbaces. Kiel honorinde por ambaŭ!

Korteganoj kaj Instruistoj (*traŝas siajn manojn*). Kiel bele! Kiel majeste!

Imperiestro Juliano. Ho, Libanios, vi malbona amiko — kiel via koro havis la kuraĝon, deteni de mi tiel longe tiun ĉi ĝojigan momenton? Dum tagoj kaj monatoj, kiam mi atendis vin, mia vizaĝo estis envolvita en Skita mallumo.

Oratoro Libanios. Ho, via situacio estis multe pli bona ol mia, ĉar vi havis iun, al kiu vi povis paroli pri via forestanta amiko.

Imperiestro Juliano. Ne diru tion. Mi havis nur la konsolon de malfeliĉa amanto; nome tiun, ripeti vian nomon kun malĝojo kaj ekkrii: Libanios, Libanios!

Oratoro Libanios. Dum vi tiel parolis al la malplena aero, mi parolis al la kvar muroj de mia ĉambro. La plej multajn horojn de la tago mi pasigis sur la lito pensante pri tio, kiu estas ĉe vi, — jen tiu ĉi, jen tiu. Antaŭe tio estis tute alia, mi diris al mi mem, tiam Juliano aŭskultis nur min.

Imperiestro Juliano. Kaj dume vi lasis min velki pro sopiro. Rigardu min, ĉu mi ne pli maljuniĝis centjaron?

Oratoro Libanios. Ho, ĉu ne okazis al mi sama granda ŝanĝo? Vi ja min ne rekonis.

Imperiestro Juliano. Tiu ĉi renkonto estas por ni ambaŭ bano el kiu ni levigas resanigitaj. (*Ili ĉirkaŭbrakas ĥaj kisas unu alian refoje.*) Kaj nun, mia kore amata instruisto, nun diru al mi, kio pelis vin tien ĉi hodiaŭ; ĉar mi ne povas dubi pri tio, ke vi venas pro grava komisio.

Oratoro Libanios. Tiel estas, krom mia sopiro — Se do aliulo estu sendata anstataŭ mi! Sed la honorinda loko, al kiu la fido de la burĝoj vokis min, devigas min porti tion same kiel la alian.

Imperiestro Juliano. Parolu, mia Libanios kaj diru per kio mi povas servi vin.

Oratoro Libanios. Mi komencu dirante, ke la loĝantoj de tiu ĉi urbo envenis en ĉagrenon; ĉar vi forprenis de ili vian favoron.

Imperiestro Juliano. Hm!

Oratoro Libanios. Kaj al tiu ĉagreno aliĝis angoro kaj malkvieteco de post kiam Aleksandros, la nova guberniestro enoficiĝis.

Imperiestro Juliano. Aha; vere!

Oratoro Libanios. La pligradiĝo de tia viro sendube okazis ne-atendite. Aleksandros servis ĝis nun en malaltaj oficoj, kaj eĉ en maniero, kiu ne povis havigi al li la estimon aŭ la amon de la burĝoj.

Imperiestro Juliano. Mi bone scias tion, Libanios.

Oratoro Libanios. Aleksandros estas perforta en ĉio, kion li entreprenas kaj la justeco ne valoras multe ĉe li —

Imperiestro Juliano. Mi scias tion; mi scias ĉion tion. Aleksandros estas kruda viro, sen moroj kaj sen elokventeco. Aleksandros pro tio ne indus tian grandan rangplialtiĝon. Sed vi povas diri al la burĝoj de Antioĥia, ke ili indas tian Aleksandros'on. Jes, versajne tiuj avaraj kaj ne lernigeblaj homoj indus eĉ pli krudan reganton.

Oratoro Libanios. Estas ĝuste tio, kion ni timis, estas puno: —

Imperiestro Juliano. Aŭdu min, Libanios! Kiel mi venis tien ĉi? Kun fido al la loĝantoj de tiu ĉi urbo. Antioĥia, kiun la sun-dio precipe elektis kiel sian loĝejon, helpus min rebonigi la maljustajn kaj la nedankemon, kiuj tiel longe estis faritaj al la senmortemulo. Sed kiel ili venis renkonte al mi? Unuj kun fiereco, aliaj kun indiferenteco. Kion mi ne devis sperti

tie ĉi? Ĉu tiu ĉi Kapadokia Gregoro de Nazianz ne ĉirkaŭ-vagadas en la urbo por inciti per siaj trokuraĝaj paroladoj la nesciantajn Galileanojn? Ĉu ne aperis inter ili poeto, — ia Apolinaris — kiu per siaj sovaĝaj kantoj pliiĝas ĝis frenezeco iliajn eraropiniojn. Kaj kion mi devas ekscii de alia loko? Ĉu oni ne seriozigas siajn minacojn en Cezarea! La templo de Fortuna estis renversata! Ho, malhonoro kaj honto! Kie estis dume la honorantoj de la diino? Ĉu ili malhelpis tion? Ne, ili lasis tion okazi, kvankam ili devus oferi sian vivon por defendi la sanktaĵon. Sed atendu, atendu! La Galileanoj en Cezarea pentos per sia sango kaj la tuta urbo pereos en fajro, tuj kiam mi havos tempon por tio.

Oratoro Libanios. Sinjoro kaj amiko — se vi volus permesi al mi —

Imperiestro Juliano. Antaŭe permesu al mi. Jes, diru mem, ĉu mi povus ion tian toleri? Diru mem, ĉu mia fervoro povas toleri tian mokegon al la dioj, kiuj sin lokas protektante post kaj super mi? Sed kiujn rimedojn mi devos kapti? Ĉu mi ne skribis dum longaj noktoj kontraŭ tiuj nedireblaj konfuzoj — skribadis, Libanios, tiel ke miaj okuloj estiĝis ruĝaj kaj miaj fingroj nigraj de inko? Kaj kion vi opinias, ke tio efikis? Mi akiris mokon kiel dankon, ne nur de la erarantoj, sed eĉ de tiuj, kiuj pretendis samopinii kiel mi. Jes, kaj kiel superfluo de tiu ĉagreno, mi devis sperti hodiaŭ vidi vin tie ĉi kiel advokaton de tiuj, kiuj plendas pri Aleksandros, pri kiu mi tamen devas diri, ke li faros sian eblon por estri la Galileanojn.

Oratoro Libanios. Ho, mia majesta amiko, — estas ĝuste nia motivo por plendi, ĉar tion li faras.

Imperiestro Juliano. Kion mi devas aŭdi de vi?

Oratoro Libanios. Ne estas kun mia bonvolo, ke mi plenumas la komision de la urbo. En la kunveno mi insiste proponis al ili, ke ili por tiu ĉi ofico devus elekti la plej bonegajn virojn de la urbo, per kio mi sciigis ilin, ke mi ne deziras esti elektata. Spite al tiu almonro, la elekto falus sur min, kiu certe ne —

Imperiestro Juliano. Bone, bone, bone! Sed ke mi devis aŭdi el via buŝo, ho Libanios —!

Oratoro Libanios. Mi petas, mia kronita frato, pripensu, ke mi parolas en la nomo de la urbo. Rilate al mi, mi ŝatas la senmortajn diojn tiel alte kiel iu ajn. Kio estus la arto de la elokventeco sen la rakontoj, kiujn la poetoj de la pasinta tempo postlasis al ni? Ĉu tiuj rakontoj ne estas kompareblaj kun multvalora minejo, el kiu klera oratoro povas forĝi ornamaĵojn, se li komprenas uzi la metalon prudente? Jes, kiel senspritaĵ kaj banalaj ne ŝajnas esti la reguloj de la saĝeco, se ili estus esprimataj sen alegorio kaj paraboloj, prenitaj el la superteraj regionoj? Sed diru, ho amiko, ĉu vi povas esperi trovi tiun opinion ĉe la vulgara homamaso, precipe en epoko, kiel la nia? Mi certigas vin, en Antioĥia tiu afero ne staras tiel bone. La burĝoj tie, — same la Galileanoj, kiel ankaŭ la pli bone lumigitaj — vivis kune la lastajn jarojn, ne multe atentante tiajn aferojn. Apenaŭ unu mastrumo troviĝas en la urbo, kie diferencaj opinioj ne regas pri la diaj aferoj. Sed tio ne malkvietigis la bonan interkonsenton ĝis antaŭ mallonga tempo. Nun tio aliĝis. Oni komencis kompari religion kun religio. Tiel malpaco venis inter la plej proksimaj parencoj. Jes, antaŭ nelonge, burĝo, kies nomon mi ne deziras eldiri, senheredigis sian filon, tial ĉar la junulo disiĝis de la komunumo de la Galileanoj. Komerco kaj interrilato suferas pro ĉio tio, duoble senteble nun, kiam multekosteco regas kaj malsatego staras antaŭ la pordoj.

Imperiestro Juliano. Sufiĉe — pli ol sufiĉe, Libanios! Vi plendas pri multekosteco. Sed diru al mi, ĉu la malŝparo regis antaŭe pli ol nun? Ĉu la teatro staras malplena unu tagon kiam la famo diskonigas, ke nova leono alvenis el Afriko? Kiam la lastan semajnon oni parolis pri tio, ke pro la multekosteco ĉiuj nenionfarantoj kaj kuŝemuloj estus pelitaj ekster-urben, ĉu la burĝoj tiam ne laŭtvoĉe postulis, ke estu esceptataj la gladiatoroj kaj dancistinoj? ĉar ili kredis ne povi vivi sen ili! Ho ve, la dioj en kolero devus depreni la manon de vi pro via malsaĝeco! Saĝec-instruistoj troviĝas sufiĉaj en tiu ĉi urbo; sed kie estas la saĝeco? Kial tiel malmultaj sekvas miajn pied-postsignojn? Kial oni ekhaltas ĉe Sokrato? Kial oni ne iras iom pluen kaj sekvas Diogeno'n aŭ min — se mi kuraĝas tion diri, tial ĉar ni kondukas vin al la feliĉo? Ĉar ĉu la feliĉo ne estas la celo de ĉiuj

saĝec-instruistoj? Kaj kio alie estas la feliĉo, ol esti en harmonio kun si mem? Ĉu la aglo postulas orajn plumojn? Ĉu la leono deziras ungegojn el arĝento? Aŭ ĉu la granatarbo klopodas porti fruktojn el brilantaj ŝtonoj? Mi diras al vi, ke neniu homo rajtas ĝui, antaŭ ol li montris sin sufiĉe hardita por elteni la malhavon de la ĝuado. Jes, li eĉ ne rajtas ektuŝi la ĝuon per la fingropinto antaŭ ol li estas kapable dispremi ĝin per la piedoj. Vere, de tio oni estas ankoraŭ tre malproksime. Sed mi volas meti ĉiujn miajn fortojn sur tion. Pro tiuj aferoj mi volas preterlasi aliajn, kiuj estas ankaŭ gravaj. La persa reĝo — timigita pro mia proksimiĝo — prezentis al mi pac-proponojn. Mi pripensas akcepti ilin, por esti pli kapabla lumigi kaj plibonigi vin, ho ne-lernigemaj! Kio koncernas la ceteron, ĝi restos kiel ĝi estas. Aleksandros'on vi tenos. Klopodu interkonsenti kun li. Sed, mia Libanios, mi ne volas, ke ŝajnos kvazaŭ mi lasus vin foriri de mi en malfavoro —

Oratoro Libanios. Ho, mia imperiestro —

Imperiestro Juliano. Vi parolis kun amareco pri tio, ke mi estis donacinta multon al Temisteos kaj Mamertinos. Sed ĉu mi ne forprenis ion de ili? Ĉu mi ne senigis ilin de mia ĉiutaga interrilato? Mi pripensas donaci al vi ankoraŭ pli multe ol al ili.

Oratoro Libanios. Ho, kion vi diras, mia majesta frato!

Imperiestro Juliano. Mi ne intencas donaci al vi oron kaj arĝenton. Tiel malsaĝa mi estis nur la unuan tempon, ĝis mi ekvidis, kiel oni sin interpuŝadis ĉirkaŭ mi, same kiel soifantaj falĉistoj ĉirkaŭ fonto, ĉiuj puŝante kaj frapante unuj aliajn, ĉiuj etendante la konkavigintan manon, por ekhavi ĝin unua tute plena ĝis la rando. De post tiu tempo mi estiĝis pli saĝa. Precipe mi kredas, ke oni devas diri, ke la diino de la saĝeco ne detenis de mi sian helpon ĉe la agadoj, kiujn mi entreprenis pro la bonfaro de tiu ĉi urbo.

Oratoro Libanios. Certe, certe!

Imperiestro Juliano. Tial mi komisias al vi, mia Libanios, la kompiladon de laŭdado pri mi.

Oratoro Libanios. Ho, kia honoro!

Imperiestro Juliano. Vi kompilu ĝin kun speciala konsidero de la bonfaroj, kiujn ŝuldas al mi la burĝoj de Antiohia. Mi esperas, ke vi verku ĝin tiamaniere, ke ĝi estu inda ne nur je la oratoro, sed ankaŭ je la subjekto. Tiu komisio, mia Libanios, estu mia donaco al vi. Al viro kiel vi, mi scias nenion pli bonan por doni.

Oratoro Libanios. Ho, mia kronita amiko, kia superflua favoro.

Imperiestro Juliano. Kaj nun ni iru al la batal-salono. Poste, miaj amikoj, ni promenu tra la stratoj, por doni utilan ekzemplon al la ridindaj urbaj dandoj pri ŝparemeco en vestaĵoj kaj simpleco pri moroj.

Kuracisto Oribaces. Tra la stratoj, sinjoro? Dum tiu ĉi meztaga varmego —

Kortegano. Ho, sinjoro, senkulpigu min, sed mi sentas min tre malbonfarta —

Poeto Herakleos. Mi ankaŭ, plej indulga sinjoro! La tutan matenon mi batalis kontraŭ naŭzeco —

Imperiestro Juliano. Uzu vomigilon, kaj klopodu samtempe elvomi kun ĝi vian nesciadon. Ho Diogeno, kiajn sekvantojn vi havas! Ili hontas porti vian mantelon sur la publika strato.

(Li rapide kaj kolere foriras tra la kolonaro.)

(Malgranda strato en malmulte vizitata urb-kvartalo. Meze de la stratoj maldekstre, staras preĝejo.)

Anaro da vekriantaj Kristanoj estas lumigita, la psalmo-poeto Apolinaris kaj la instruisto Kurilos estas inter ili. Virinoj kun infanoj sur la brako eligas laŭtajn ve-kriojn. Gregoro de Nazianz iras tra la strato.)

Virinoj *(iras al li kaj ekkapas lin ĉe liaj vestoj)*. Ve, Gregoro, Gregoro — parolu al ni! Konsolu nin en tiu ĉi mizero.

Gregoro de Nazianz. Nur unu povas konsoli tie ĉi. Tenu vin ĉe li. Tenu vin proksime ĉe via Sinjoro kaj kondukanto.

Unu virino. Ho, ĉu vi scias tion, vi viro de Dio, — la imperiestro ordonis, ke ĉiuj niaj sanktaj skribaĵoj estu forbruligataj!

Gregoro de Nazianz. Mi ekaŭdis pri tio; sed mi ne povas kredi tian malsaĝajon.

Psalmopoeto Apolinaris. Estas vero, Aleksandros la nova guberniestro, disirigis soldatojn por traserĉi la domojn de niaj fratoj. Eĉ virinoj kaj infanoj estas vipobatitaj ĝis-sange, se ili estas sub suspekto kaŝi librojn.

Instruisto Kurilos. La ordono de la imperiestro ne sole trafas Antiohia'n — ne sole Sirio'n; ĝi trafis la regnon kaj la tutan mondon. Ĉiu skribita titolo, pritraktanta Kristo'n, malaperos kaj estos forigata el la memoro de la kredantoj.

Psalmopoeto Apolinaris. Ho, vi patrinoj, ploru pro vi mem kaj pro viaj infanoj! La tempo venos, kiam vi batalos kontraŭ tiuj, kiujn vi nun portas sur la brako, pri tio, kio ĝuste-staris skribita en la perdita parolo de Dio: „La tempo venos, kiam viaj nepoj mokos vin kaj ne scios, kiu kaj kio estas Kristo. La tempo venos, kiam estos forviŝita el viaj koroj, ke la Savinto de l'mondo iam suferis kaj mortis. La lasta kredanto iros blinda en sian tombon kaj de tiu horo Golgota estos forblovita de sur la tersupraĵo, same kiel tiu loko, kie kuŝis la ĝardeno de la edeno. Ve, ve al la nova Pilato. Li ne kontentiĝas, kiel tiu alia, mortigante la korpon de la Savinto, li mortigas la vorton kaj la kredon!“

La virinoj (*elŝiras siajn harojn kaj disŝiras siajn vestojn*). Ve, ve, ve!

Gregoro de Nazianz. Kaj mi diras al vi, estu konsolataj! Dio ne mortos. La danĝero ne venas de Juliano. La danĝero jam estis longe antaŭ li, en la malforteco kaj malpaco de niaj koroj.

Instruisto Kurilos. Ho, Gregoro, kiel vi povas postuli, ke ni restu firmaj sub ĉiuj tiuj teruraĵoj? Fratoj kaj fratinoj — ĉu vi scias, kio okazis en Aretuzo? La nekredantoj traktis malbone la grizan episkopon, trenis lin per la haroj tra la stratoj, ĵetis lin en la kloakojn, retiris lin el ili, makulitan kaj sangantan, ŝmiris lin per mielo, pendigis lin sur arbo kaj elmetis lin al la pikadoj de vespoj kaj venenaj muŝoj.

Gregoro de Nazianz. Kaj ĉu la potenco de Dio sin ne manifestis belege en Marko? Kio estis Marko antaŭe? Viro de dubaŝanca kredo. Jes, kiam eksplodis la ribeloj en Aretuzo, li eĉ

forkuris el la urbo. Sed vidu — apenaŭ li eksciis en sia kaŝejo, ke la kolerantaj homoj venĝis la forkuron de la episkopo kontraŭ senkulpaj burĝoj, tuj li revenis rapide kaj libervole. Kaj tiel li elportis la turmentojn, kiuj eĉ ektimigis liajn ekzekutistojn, ke ili, por povi sin retiri iel honorinde, prezentis al li lasi forkuri lin kontraŭ pago de plej malgranda monsumo? Ĉu ne estis lia respondo: ne, ne, kaj milfoje ne? Dio, la Sinjoro estis kun li. Li ne mortis, nek cedis. Lia vizaĝo montris nek teruron nek malpaciencon. Sur la arbo, kie li pendis, li nomis sin feliĉa, ĉar li estis kelkajn paŝojn pli proksime de la ĉielo, dum la aliaj, kiel li diris, estis ĉirkaŭ-rampantaj sur la ebena tero.

Instruisto Kurilos. Sendube okazis miraklo kun tiu firma grizulo. Se vi, kiel mi, estus aŭdinta la kriojn de la kaptitoj en tiu somertago, kiam Hilarion kaj la aliaj estis turmentataj —! Ili ne similis al aliaj ekkrioj — senvole, hurlante ili miksiĝis en la siblantan sonon, ĉiufoje kiam la blanke-varmega fero penetris en la ŝiritan karnon.

Psalmopoeto Apolinaris. Ho Kurilos, ĉu vi forgesas la kantadon, kiu anstataŭis la ekkriojn? Ĉu Hilarion ne kantis ĝis la morto? Ĉu tiu heroo kapadokia junulo ne kantis ĝis li elspiris sian animon en la manoj de la turmentistoj? Ĉu Agaton ne kantis, la frato de tiu infano, ĝis lin atakis sveno kaj li vekigis freneza? Vere, mi diras al vi, tiel longe, ke la kantado superfortas nian mizeron, tiel longe Satano ne triumfos!

Gregoro de Nazianz. Estu konsolataj. Amu unuj aliajn kaj suferu unuj por aliaj, kiel Serapion en Doristoro antaŭ nelonge suferis por siaj fratoj, kaj pro ili lasis sin vipobati kaj ĵeti viva en la fand-fornon. Vidu, vidu, ĉu la venĝanta mano de Dio jam ne pugniĝis kontraŭ la malpiuloj? Aŭ, ĉu vi ne ekaŭdis pri la skriba sciigo de Heliopolo ĉe Libano?

Psalmopoeto Apolinaris. Mi scias tion. Dum la malĉastaĵoj de la Afrodit-festo, la idolanoj perforte eniris la domon de niaj fratinoj, senhonorigis la virinojn, mortigis ilin sub nedireblaj turmentadoj —

La virinoj. Ve, ve!

Psalmopoeto Apolinaris. — jes, inter la mizeruloj estis kelkaj, kiuj malfermis unu el la korpoj de la martiroj, elŝiris la intestojn kaj manĝis la krudan hepaton!

La virinoj. Ve, ve, ve!

Gregoro de Nazianz. La dio de la kolero spicumis la mangon. Kiel ĝi utilis al ili? Vojaĝu al Heliopolo kaj vi ekvidos tiujn virojn kun la veneno de la putrado en ĉiuj vejnoj, kun enfalintaj okuloj kaj dentoj, senigitaj de la parolkapablo kaj de la prudento. Teruro trafis la urbon. Multaj idolanoj konvertiĝis post tiu nokto. Tial mi ne timas tiun malfeliĉ-gravedan beston, kiu ribelis kontraŭ la eklezio; mi ne timas tiun kronitan senditon de la infero, kiu intencas fini la laboron de la ĉiutempa malamiko. Ke li surprizataku nin per fajro kaj glavo kaj per sovaĝaj bestoj en la teatro! Jes, se lia frenezeco puŝos lin ankoraŭ pli malproksimen, kiel ĝis nun okazis — kion tio malhelpos? Kontraŭ ĉio tio troviĝas sanigilo kaj vojo al venko!

La virinoj. Kristo, Kristo!

Aliaj voĉoj. Jen li estas! Jen li venas!

Ankoraŭ aliaj. Kiu?

Ankoraŭ aliaj. La imperiestro! La murdisto! La malamiko de Dio!

Gregoro de Nazianz. Eksilentu! Lasu lin preteriri kviete.

(Taĉmento da imperiestraj korpogardistoj venas tra la strato. Poste sekvas imperiestro Juliano, akompanata de soldatestroj kaj saĝec-amikoj, ĉiuj ĉirkaŭitaj de gardistoj. Alia taĉmento da palacsoldatoj, komandata de la ĉefo Fromentinos, malfermas la procesion)

Virino (mallaŭte al la aliaj). Vidu, vidu, li vestis sin per ĉifonoj, kiel almozulo.

Alia virino. Li eble perdis la prudenton.

Tria virino. Dio jam frapis lin.

Kvara virino. Kaŝu la infanojn sur via brusto, iliaj okuloj ne vidu la terurajon.

Imperiestro Juliano. Oj, oj, ĉu tio ne estas Galileanoj? Kion vi faras tie ĉi en la sunlumo sur la publika strato, ho vi kovitaro de mallumo?

Gregoro de Nazianz. Vi baris niajn preĝejojn; tial ni staras ekstere kaj gloras Dion, nian Sinjoron.

Imperiestro Juliano. Vidu, ĉu estas vi Gregoro? Kion, vi ankoraŭ ĉiam ĉirkaŭ-vagadas tie ĉi? Sed estu singarda, longe mi ne toleros tion.

Gregoro de Nazianz. Mi ne serĉas la martir-morton; mi eĉ ne esperas ĝin; tamen se ĝi estas al mi destinata, mi metos sur ĝin mian honoron, morti por Kristo.

Imperiestro Juliano. Via parolmaniero lacigas min. Mi ne volas vidi vin tie ĉi. Kial vi ne restadas en viaj malodoraj kavernoj? Iru hejmen, diras mi!

Virino. Ho, imperiestro, kie estas niaj hejmoj?

Alia virino. Kie estas niaj domoj? La idolanoj elrabis ilin kaj elpelis nin el ili.

Voĉoj en la amaso. Viaj soldatoj forprenis nian proprajon.

Aliaj voĉoj. Ho, imperiestro, imperiestro, kial vi prenis nian proprajon?

Imperiestro Juliano. Vi demandas: kial? Mi tion diros al vi, vi nesciantaj homoj! Se oni forprenis de vi vian proprajon, okazis antaŭzorge pro la bono de viaj animoj. Ĉu la Galileano ne diris, ke vi posedu nek arĝenton nek oron? Ĉu via majstro ne promesis al vi, ke vi supreniros ĉielon? Ĉu vi ne estus dankaj al mi, ĉar mi faras tiun supreniron kiel eble plej facila?

Saĝec-amiko. Nekompareble dirite!

Psalmopoeto Apolinaris. Sinjoro, vi forprenis al ni tion, kio estas pli valora ol arĝento kaj oro. Vi forprenis de ni la propran vorton de Dio. Vi forprenis de ni niajn sanktajn skribaĵojn.

Imperiestro Juliano. Mi jam konas vin, ho kav-okula psalmokantisto! Vi ja estas Apolinaris? Kaj mi kredas, ke, se mi forprenas de vi viajn absurdajn librojn, vi estos la viro, kiu baldaŭ verkos multe da tiaj absurdajoj. Sed mi diras al vi, vi estas mizera verkisto kaj rimfaristo! Je Apolono, nenia vera Greko prenos viajn versojn en la buŝon. Vian skribaĵon, kiun vi antaŭ nelonge sendis al mi kaj kiun vi trokuraĝe nomis: „la Veró“; eksciu, ke mi legis ĝin, komprenis kaj forbruligis.

Psalmopoeto Apolinaris. Estas eble, ke vi ĝin legis; sed vi ĝin ne komprenis, ĉar se vi estus kompreninta ĝin, vi ne estus forbruliginta ĝin.

Imperiestro Juliano. Ha, ha! la kontraŭ-skribajo, super kiu mi estas verkanta, montrós vin, ke mi ĝin komprenis — Sed rilate al tiuj libroj, pro kies perdo vi nun krias kaj plorĝemas, mi povas diri al vi, ke post mallonga tempo vi estimos ilin malpli multe, ĉar montriĝos, ke tiu Jesuo de Nazaret estis mensogisto kaj trompisto.

La virinoj. Ve al ni! ve al ni!

Instruisto Kurilos (*elpaŝas el la aro*). Imperiestro, — kion vi diris?

Imperiestro Juliano. Ĉu la krucumita Judo ne anoncis, ke la templo de Jerusalemo kuŝos ruine ĝis la fino de la tagoj?

Instruisto Kurilos Tiel okazos!

Imperiestro Juliano. Ho, vi malsaĝuloj! En tiu ĉi horo la armeestro Jovian kun du mil laboristoj staras en Jerusalemo kaj rekonstruas la templon en ĝia tuta belegeco. Atendu, atendu, vi malmolnukaj dubantoj — vi spertos, kiu estas la plej potenca, la imperiestro aŭ la Galileano.

Instruisto Kurilos. Sinjoro, tion vi spertos mem je via teruro. Mi silentis ĝis vi primokis la sanktulon kaj nomis lin mensogisto, sed nun mi volas diri al vi, ke kontraŭ la krucumito vi ne povas eĉ la plej malmulton!

Imperiestro Juliano (*regas sin*). Kiu vi estas, kaj kia vi nomiĝas?

Instruisto Kurilos (*pli proksime*). Tion vi ekaŭdos. Unue kaj antaŭ ĉio mi nomiĝas Kristano, kaj tio estas tre honorplena nomo, ĉar neniam ĝi estos forviŝata de sur la tero. Krom tio mi portas la nomon Kurilos, kaj sub tiu nomo mi estas konata inter fratoj kaj fratinoj. Sed se mi konservos la unuan nomon nemakulita, mi akiros rekompence eternan vivon.

Imperiestro Juliano. Vi eraras, Kurilos! Vi scias, ke mi ankaŭ konas iom la misterplenajn aferojn de via religio. Kredu al mi — tiu, al kiu vi metas vian fidon, ne estas tia, kia vi lin imagas. Li vere mortis en la tempo, kiam Pontio Pilato estis guberniestro en la lando de la Judoj.

Instruisto Kurilos. Mi ne eraras. Estas vi mem, ho imperiestro, kiu eraras. Estas vi, kiu forlasis Kriston en la momento, kiam li donacis al vi la regnon de la mondo. Tial mi anoncas al vi en lia nomo, ke li baldaŭ forprenos de vi regecon kaj vivon, kaj tiam vi ekscios tro malfrue, kiel potenca tiu estas, kiun vi males-timas en via blindeco. Jes, same kiel vi forgesis liajn bonfarojn, li ne cedos lokon al sia amo, kiam li leviĝos por puni vin. Vi ren-versis liajn altarojn — li renversos vin de la imperiestra sidloko. Vi trovis multan ĝojon piedpremante lian leĝon, la saman leĝon, kiun vi iam anoncis al la kredantoj. En tia sama maniero la Sinjoro premos vin sub sia kalkano. Via korpo disbloviĝos en ĉiujn ventojn, kaj via animo tien malsupreniros, kie estos ankoraŭ pli granda doloro, ol tiaj, kiajn vi povas elpensi por mi kaj la miaj!

(La virinoj ariĝas ĝemante kaj ĝemplorante ĉirkaŭ Kurilos.)

Imperiestro Juliano. Volonte mi indulgus vin, Kurilos! La dioj estas miaj atestantoj, ke mi ne malamas vin pro via kredo. Sed vi primokis mian imperiestran povon kaj mian aŭtoritatecon, kaj tion mi devas puni. *(Al ĉefo de la gardistoj.)* Fromentinos, konduku tiun viron al la malliberejo kaj la ekzekutisto Tidon donu al li tiom da vipobatoj, kiom estos necesaj por devigi lin eldiri, ke la imperiestro kaj ne la Galileano havas ĉiun potencon sur la tero.

Gregoro de Nazianz. Estu forta, mia frato Kurilos!

Instruisto Kurilos *(kun etenditaj brakoj)*. Mi feliĉegulo, kiu povas morti je honoro de la Sinjoro!

(La soldatoj kaptas kaj fortrenas lin.)

La virinoj *(plorante kaj ĝemplorante)*. Ve al ni! Ve al la kalumniantoj!

Imperiestro Juliano. Dispelu tiujn frenezulojn! Forpelu ilin eksterurben kiel ribelantojn. Mi ne plu toleras tiun obstinecon!

(La gardistoj pelas la ĝemplorantan amason en la flankstraton. Nur la imperiestro kaj lia sekvantaro postrestas. Poste oni ekvidas kuŝi antaŭ la preĝejo, ĝis nun kaŝitan viron, ĉifone vestitan kaj kies kapo estas surŝutita per cindro.)

Soldato (*puŝas lin per la lanc-trunko*). Ekstaru! Ekstaru! iru for!
La viro (*ekstaras*). Piedpremu tiun ĉi sengustan salon, malakceptitan
de la mano de Dio!

Imperiestro Juliano. Ho, eternaj dioj, — Hekebolios!

La korteganoj. He, vere — Hekebolios!

Teologiisto Hekebolios. Mi ne plu nomiĝas tia! Mi estas sennoma.
Mi trompis la bapton, kiu donis al mi tiun nomon!

Imperiestro Juliano. Ekstaru, amiko! Via menso estas malsana —

Teologiisto Hekebolios. La frato de Judas estas atakita de la
pesto. Iru for de mi —

Imperiestro Juliano. Ho, vi ŝanceliĝema viro —

Teologiisto Hekebolios. Iru for de mi, tentanto! Reprenu tiujn
ĉi tri dek monerojn el argento! Ĉu ne estas skribite: Vi forlasu
edzinon kaj infanojn pro la volo de Dio? Kaj mi —? Pro la volo
de la edzino kaj de la infanoj mi perfidis la Sinjoron, mian Dion!
Ve, ve, ve!

(Refoje li sin ŝetas survizaĝe teren.)

Imperiestro Juliano. Tian fajron de la frenezeco ekbruligas
tiuj skribaĵoj sur la tero. Kaj mi ne forbruligus ilin? Atendu!
Antaŭ ol unu jaro pasos, la templo de la Judoj estos restarigita
sur la monto de Siono — kaj lumos trans la landon per la belegeco
de sia ora tegmento atestante: Mensogisto, mensogisto, mensog-
isto!

(Rapide li foriras, sekvata de la saĝec-amikoj.)

(Soseo ekster la urbo. Dekstre de la vojo staras statuo de Kibeles inter dehakitaj arbtrunkoj. Iom pli malproksime, maldekstre estas fonto kun akvobaseno. Estas je sunsubiro.)

(Sur ŝtupo de la statu-piedestalo sidas maljuna pastro kun fermita korbo sur la genuoj. Ĉirkaŭ la baseno aro da viroj kaj virinoj prenas akvon. Sur la vojo oni vidas venantojn kaj forirantojn. De maldekstre venas la Kolorigisto Fokion, malbone vestita, kun pakaĵo sur la kapo. Li renkontas la hartondiston Eŭnapios'on, kiu venas de la urbo.)

Kolorigisto Fokion. He, jen — mia amiko Eŭnapios en plena kortegokostumo!

Hartondisto Eŭnapios. Fi al vi, ĉar vi mokas malriĉan viron.

Kolorigisto Fokion. Ĉu vi nomas tion mokado? Mi opinias, ke ĝi estas la plej granda honoro.

Hartondisto Eŭnapios. Vi povas tion diri. Estas nun honoro, iĉi en ĉifonoj, precipe se ili kuŝis longe en la defluilo.

Kolorigisto Fokion. Kiel, laŭ via opinio finiĝos tio ĉi?

Hartondisto Eŭnapios. Mi ne okupas min pri tiuj pensoj. Mi scias, kiel finiĝis kun mi, kaj tio sufiĉas.

Kolorigisto Fokion. Ĉu vi ne plu servas la imperiestron?

Hartondisto Eŭnapios. Kion farus imperiestro Juliano kun hartondisto? Ĉu li igas tondi siajn harojn? Aŭ ĉu vi kredas, ke li igas subtranĉi sian barbon? Li eĉ ne kombas ĝin. Sed kiel vi fartas? Vi ankaŭ ne plu aspektas tre feliĉa.

Kolorigisto Fokion. Ho ve, Eŭnapios, la tempo de la purpur-tinkturistoj pasis.

Hartondisto Eŭnapios. Jes, ĝuste; nuntempe nur la dorsoj de la kristanoj estas kolorigataj. Sed kion vi do tiel pene kunportas?

Kolorigisto Fokion. Pakaĵon de salikoŝelo. Mi volas kolorigi burleskul-ĉapojn por la saĝec-amikoj.

(Taĉmento da soldatoj venas de dekstre kaj ekstaras linie apud la kibeles-statuo.)

Kolorigisto Fokion (*al unu el la viroj ĉe la akvo-baseno*) Kion do signifas tio?

La viro. La ŝtona statuo estos refoje nutrata.

Kolorigisto Fokion. Ĉu la imperiestro oferos tie ĉi hodiaŭ vespere?

Alia viro. Ĉu li ne oferas vespere kaj matene, jen tie ĉi, jen aliloke?

Virino. Estas malfeliĉo por la malriĉuloj, ke la imperiestro tiel amas la diojn.

Alia virino. Oj, ne diru tion. Ĉu ni ĉiuj ne amas la diojn?

Unua virino. Jes, eble; sed estas tamen malfeliĉo —

Unu el la viroj. (*fingre montras dekstren*) Jen, rigardu, — tie li venas.

(Imperiestro Juliano venas pastre vestita kaj kun ofertranĉilo. Kelkaj saĝec-amikoj, templo-pastroj, servistoj kaj gardistoj ĉirkaŭas lin. Post ili sekvas arego da homoj, parte mokante, parte koler-incitataj.)

Unu el la venantoj. Jen staras la diino. Nun vi vidos burleskajon.

Maljuna viro. Ĉu vi nomas tion burleskaĵo? Kiom da malsataj buŝoj povus esti kontentigataj per tio, kio estas forfuŝata tie?

Imperiestro Juliano. (*iras al la statuo*) Ho, tiu vidaĵo! Ĝi pleningas mian koron je ravo kaj miajn okulojn je larmoj de melankolio. Jes, certe, mi devas plori, pensante, ke la statuo de tiu respektordonanta diino — renversita de malpiaj kaj trokuraĝaj manoj — pasigis tiom da tempo kvazaŭ en dormo de forgeso — kaj eĉ en loko, kiun mi nur naŭze povas priskribi.

(subpremataj ridoj aŭdiĝas inter la ĉirkaŭstaranta aro.)

Imperiestro Juliano. (*turnas sin abrupte*) Sed mi ne sentas malpli da ravo, pensante, ke estis mi, al kiu estis permesite, liberigi la dian patrinon el tia malinda stato. Kaj ĉu mi ne estus ravita ĉe tiuj pensoj? — Oni diras pri mi, ke mi gajnis kelkajn batalojn kontraŭ la barbaroj, kaj gloras min pro tio. Rilate al mi, mi estimas pli multe tion, kion mi faris por la bono de la dioj; ĉar al ili ni ŝuldas tutan nian forton kaj penson. (*Al tiuj ĉe la akvobaseno.*) Cetere, plaĉas al mi, ke troviĝas kelkaj en tiu ĉi obstina urbo, kiuj ne montras sin surdaj por miaj invitoj, sed ĉeestas konforme al alvoko de deca pieco —

kaj mi ne dubas pri tio, ke vi kunportis konvenajn oferdonacojn.
(Li iras al la maljuna pastro.) Kion mi vidas? Nur unu grizulon?
 Kie estas viaj templofratoj?

La maljuna pastro. Sinjoro, neniu el ili vivas, krom mi.

Imperiestro Juliano. Formortis. La ŝoseo estas konstruita en
 maldeca proksimeco de la sanktaĵo. La honorinda arbareto
 estas forhakita, — maljunulo, kie estas viaj oferdonacoj?

La maljuna pastro. *(Ĵingre montras la korbon)* Jen, sinjoro!

Imperiestro Juliano. Bone, bone. Sed la cetero?

La maljuna pastro. Jen ĉio. *(Li malfermas la korbon.)*

Imperiestro Juliano. Ansero! Tiu ansero estas ĉio?

La maljuna pastro. Jes, sinjoro.

Imperiestro Juliano. Kaj kiu estis la pia viro, kiu surprizis
 nin per tia malavara donaco?

La maljuna pastro. Mi mem kunportis ĝin. Ho, sinjoro, ne
 koleru, mi ne havis pli multe ol tiu unu.

(Ridadoj kaj murmurado inter la amaso.)

Obtuzaj voĉoj. Estas sufiĉe, unu ansero estas pli ol sufiĉe.

Imperiestro Juliano. Ho, Antiohia, — vi tre provas mian pa-
 ciencon!

Maljuna viro en la amaso. Unue pano, poste oferdonacoj!

Kolorigisto Fokion *(ekpuŝas lian flankon)* Bone dirite, bone
 dirite!

Alia viro. Donu mangaĵon al la burĝoj; la dioj sin helpu kie ili
 povos.

Tria burĝo. Ni vivis tie ĉi pli bone sub Ki kaj Kapa!

Imperiestro Juliano. Oj, vi malrespektaj kriantoj! Vi kun via
 Ki kaj Kapa! Vi eble kredas, ke mi ne scias, kion vi celas per
 Ki kaj Kapa? Oj, oj! mi tion scias tre bone. Tio ja estiĝis
 multuzata esprimo ĉe vi. Vi celas per tio Kriston kaj Konstantios
 'on. Sed la estreco de tiuj ambaŭ pasis kaj mi pripensas rimed-
 ojn, kurbigi la obstinecon kaj sendankemecon, kiujn vi montras
 al mi kaj al la dioj. Vi interparolas pri tio, ke mi alportas la
 ŝuldatajn aferojn al la dioj. Vi mokas, ĉar mi vestas min mal-
 riĉe kaj lasas kreski nesubtranĉita mian barbon. Jes, tiu ĉi

barbo vere estas dorno en viaj okuloj! Vi senrespekte nomas ĝin kaprobarbo. Sed mi diras al vi, tro malsaĝuloj, ĝi estas barbo de saĝulo. Jes, mi ne hontas sciigi al vi, ke tiu barbo gastigas fiinsektojn, same kiel la salikaro kaŝas ĉasaĵojn — kaj spite al tio mi ĝin portas, mian primokatan barbon, kun pli granda honoro, ol vi viajn glat-razitajn vizaĝojn!

Hartondisto Eŭnapios (*duonlaŭte*) Malsaĝe parolite, tute absurde.

Imperiestro Juliano. Sed ĉu vi kredas, ke mi lasis preteriri tiujn mokaĵojn, ne respondante ilin? Ne, ne, vi baldaŭ ekscios tion. Atendu nur; vi ekaŭdos pri mi pli baldaŭ ol vi pensas. Mi estas kompilanta skribaĵojn, nomitan: la barb-malamanto. Kaj ĉu vi scias, al kiu tiu skribaĵo estas direktata? Ĝi estas direktata al vi, ho burĝoj de Antioĥia, — jes, al vi, kiujn mi nomas en la skribaĵo „la nesciantaj hundoj“. En ĝi vi ekscios miajn motivojn por ĉio, kio ŝajnas al vi tiel stranga pri mia konduto.

Soldatestro Fromentinus (*venas de dekstre*) Alta imperiestro, mi havas ĝojigan komision por fari al vi. Kurilos jam submetis sin.

Imperiestro Juliano. Ha, tion mi jam pensis.

Soldatestro Fromentinus. Ankaŭ Tifon prosperas bonege en sia afero. La kaptito estis nuda ligata ĉe la manartikoj, tiel alte sub la tegmento, kaj liaj piedfingroj apenaŭ tuŝis la teron; poste Tifon batis lin de malantaŭe per skurĝo el bovo-tendenoj tiel ke la batoj trafis ĉirkaŭ la brusto.

Imperiestro Juliano. Ho, la malvirtuloj, kiuj devigas min uzi tiajn rimedojn!

Soldatestro Fromentinus. Por ne senigi de li la vivon, ni fine devis malligi lin, la malmolnukan viron. Dum momento li estis tute senparola kaj ŝajnis mediti; sed subite li deziris esti kondukata al la imperiestro.

Imperiestro Juliano. Tio estas al mi tre kara. Kaj nun vi kondukas lin tien ĉi?

Soldatestro Fromentinus. Jes, sinjoro, jen ili venas kun li.
(*Taĉmento da soldatoj kondukas kun si la instruiston Kurilos.*)

Imperiestro Juliano. Mia bona Kurilos, — vi ne estas plu tiel aroganta, kiel la lastan fojon, mi vidas.

Instruisto Kurilos. Eble vi legis en la intestoj de besto aŭ birdo, kion mi havas por diri al vi?

Imperiestro Juliano. Nu, mi pensas, ke mi sen antaŭ-diroj povas kredi, ke vi reakiris la prudenton, ke vi forlasis viajn erarojn rilate al la povo de la Galileano kaj nun konsideras la imperiestron kaj niajn diojn pli potencaj ol li.

Instruisto Kurilos. Ne imagu ion tian. Viaj dioj estas senpotencaj, kaj se vi tenados ĉe tiuj ŝtonaj statuoj, kiuj povas nek vidi nek aŭdi, tiam vi estos baldaŭ same senpotenca kiel ili.

Imperiestro Juliano. Kurilos, ĉu estas tio, kion vi havas por diri al mi?

Instruisto Kurilos. Ne, mi venas por danki vin. Antaŭe mi tremegis antaŭ vi kaj pro viaj turmentoj, sed en la horo de la turmentado mi akiris la venkon de la animo super la malforteco. Jes, imperiestro, kiam viaj soldatoj kredis, ke mi pendas en turmentoj sub la tegmento de la malliberejo — tiam mi kuŝis feliĉege, kiel infano, en la brakoj de mia Savinto, kaj kiam viaj ekzekutistoj kredis, ke ili batas rimenojn el mia korpo, la Sinjoro frotetis per sia dolĉiganta mano miajn vundojn, forprenis la dornokronon kaj metis sur mian kapon la kronon de la vivo. Pro tio mi vin dankas, ĉar neniu homo faris al mi tiel grandan bonfaron, kiel vi. Kaj por ke vi ne kredu, ke mi timas vin ankoraŭ, jen rigardu —

(Li ĵetrefaldas sian mantelon, disŝiras siajn vundojn, kaj ĵetas la karnopetojn antaŭ la piedojn de la imperiestro.)

— rigardu, rigardu! — Satiĝu per mia sango, kiun vi soifis! Sed pri mi vi sciu, ke mi satiĝas je Jesuo Kristo.

(Oni aŭdas ekrion de teruro en la homamaso.)

Kelkaj voĉoj. Tio kaŭzos malfeliĉon al ni ĉiuj!

Imperiestro Juliano. *(kiu paŝis malantaŭen)* Retenu tiun frenezulon, por ke li ne erare ataku min!

(La soldatoj ĉirkaŭas Kurilos'on kaj trenas lin al la akvobaseno. Samtempe oni aŭdas kantadon de virinoj ekstere, dekstre.)

Imperiestro Juliano. Rigardu tien, Fromentinus — kia stranga procesio estas tio —?

Soldatestro Fromentinus. Plej indulga imperiestro, tio estas la psalmo-kantistinoj —

Imperiestro Juliano. Ha, tiu bando de frenezaj virinoj —

Soldatestro Fromentinus. La guberniestro Aleksandros forprenis de ili kelkajn skribaĵojn, kiujn ili konsideras sanktaj. Nun ili elvagas el la urbo por plori sur la tomboj de la Kristanoj.

Imperiestro Juliano. (*Tordante siajn manojn.*) Obstineco; obstineco — de viroj kaj virinoj!

(*La maljuna Publia kaj arego da virinoj iras laŭ la ŝoseo.*)

Publia (*kantas*). Viaj dioj marmoraj
 Argentaj kaj oraj
 Turniĝos en polvon.

Horo de virinoj En polvon, en polvon.

Publia (*kantas*). Niajn fratojn kaj filojn
 Ili ĉiujn mortigis.
 Kolombo de l'kanto
 Ĉielen ekflugu!
 Kun preĝoj de venĝo!

Horo de virinoj. Kun preĝoj de venĝo!

Publia (*ekvidas la imperiestron*). Jen li staras! Ve al la malpiulo, kiu forbruligis la vorton de Dio! Ĉu vi kredas povi forbruligi la vorton de Dio? Mi diras al vi, kie la vorto brulas.

(*Ŝi kaptas tranĉilon de ĉefpastro, distranĉas sian bruston kaj tranĉetadas en la vundo.*) Ĉi tie brulas la vorto. Forbruligu niajn librojn, la vorto brulados en la koroj de la homoj ĝis la lasta tago! (*Ŝi ŝetas la tranĉilon antaŭ sin.*)

La virinoj (*kantas*). La korp'povas morti,
 Skribaĵoj forbruli,
 La vort'tamen restos; —
 La vort'tamen restos.

(*Ili daŭrigas sian vojon kun Publia en sia mezo.*)

La popolo ĉe la fonto. Ve al ni, la galileana dio estas la plej potenca!

Aliaj voĉoj. Kion ĉiuj dioj povos kontraŭ tiu sola?

Ankoraŭ aliaj. Nenia ofero! Nenia adorado! Tio ekscitos la terurulon kontraŭ ni.

Imperiestro Juliano. Ho, vi malsaĝuloj! Vi timas ekkolerigi iun, kiu jam antaŭ longe mortis — malveran profeton; — jes, vi mem vidos tion baldaŭ. Li estas mensogisto, diras mi! Havu paciencon dum ankoraŭ mallonga tempo. Ĉiun tagon, ĉiun sekundon mi povas atendi sciigon el Jerusalemo —

Armeestro Jovian. (*en polvo-kovritaj vestoj, venas kun kelkaj akompanantoj de dekstre.*) Plej glora imperiestro, pardonu, ke via servisto serĉas vin tie ĉi.

Imperiestro Juliano. (*kun ĝojkrio*) Jovian! Ho feliĉega sciigo —

Armeestro Jovian. Mi venas rekte el la jud-lando. En la palaco mi ekaŭdis, ke vi estas ekstere —

Imperiestro Juliano. Ho, vi glorindaj dioj — la subiranta suno do ne malleviĝos super la mensogo! Kiom ni atingis? Parolu, mia Jovian!

Armeestro Jovian. (*kun ekrigardo al la homamaso*) Sinjoro — ĉu mi rakontos ĉion?

Imperiestro Juliano. Ĉion, ĉion — de la komenco ĝis la fino!

Armeestro Jovian. Mi venis en Jerusalemon kun aro da arkitektoj, soldatoj kaj dumil laboristoj. Ni rapide laboris por ebenigi la teron. Gigantaj murorestaĵoj staris tie ankoraŭ. Ili falis sub niaj hakiloj kaj rompiloj kvazaŭ nevidebla potenco helpis nin por nenigi ilin —

Imperiestro Juliano. Ĉu vi aŭdas; ĉu vi aŭdas!?

Armeestro Jovian. Dum tio okazis, gigantaj amasoj da kalko estis alportataj por la nova konstruaĵo. Jen tute neatendite leviĝis ciklono, kiu disjetis la kalkon kiel nubon trans la tutan regionon.

Imperiestro Juliano. Parolu plue, plue!

Armeestro Jovian. La saman nokton la tero tremis ripete.

Voĉoj en la amaso. Ĉu vi aŭdas? La tero tremis.

Imperiestro Juliano. Plue, diras mi!

Armeestro Jovian. Tiu stranga akcidento tamen ne forprenis de ni la kuraĝon. Sed, post kiam ni estis penetrintaj pli profunden en la tero, kaj post kiam ni sukcesis malfermi la subterajn arkaĵojn kaj la ŝtonrompistoĵojn eniris por labori ĉe torĉlumo —

Imperiestro Juliano. Jovian — kio okazis tiam?

Armeestro Jovian. Sinjoro, tiam teruriga, monstra fajrofluaĵo levigis el la malfermaĵoj: Tondra bruego tremigis la tutan urbon. La arkaĵoj dissaltis, centoj da laboristoj pereis, kaj malmultaj, kiuj saviĝis, forkuris kun disŝiritaj membroj.

Flustrantaj voĉoj. La Dio de la Galileanoj!

Imperiestro Juliano. Ĉu mi povas kredi ĉion tion? Ĉu vi mem vidis tion?

Armeestro Jovian. Mi mem ĉeestis. Ni komencis denove, sinjoro, en ĉeestado de multaj miloj — terurigitoj, genuiĝintoj, ĝojkriantoj, preĝantoj — la sama miraklo ripetigis dufoje.

Imperiestro Juliano. (*pala kaj tremanta*) Kaj poste —? Unuvorte — kion la imperiestro efektivigis en Jerusalemo?

Armeestro Jovian. La imperiestro verigis la profetaĵojn de la Galileano —

Imperiestro Juliano. Verigis?

Armeestro Jovian. Pere de vi plene verigis la vortoj: ne ŝtono restu sur la alia.

La virinoj kaj viroj. La Galileano triumfis super la imperiestro!
La Galileano estas pli potenca ol Juliano!

Imperiestro Juliano. (*al la pastro de Kibeles*) Vi iru hejmen, maljuna viro! Kaj kunprenu vian anseron kun vi. Ni ne volas oferi tiun ĉi vesperon. (*Li sin turnas al la homamaso.*) Povus tiel ŝajni; sed mi diras al vi: estas eraro. Vi nesciantoj, vi malestimindaj stultuloj — vi povas kredi min: — ne daŭros longe antaŭ ol ĉio fariĝos alie, mi — mi —! Jes, jam atendu! Mi jam preparis min per skribaĵo kontraŭ la Galileano, ĝi estos kompilata en sep ĉapitroj; kaj kiam liaj anoj legos ĝin — kaj post kiam krom tio, la barbo-malamanto — subtenu min Fromentinus! Tiu ĉi kontraŭstaro lacigas min. (*Al la gardistoj, dum li preteriras la akvobasenon.*) Lasu Kurilos'on libera!

(*Li returnas sin al la urbo kun sia sekvantaro.*)

La amaso ĉe la fonto. (*postvokas al li mokridante*) Jen iras la ofer-buĉisto! — Jen iras la vila urso! — Jen iras la longbraka simio!

(*Nokto, lunlumo, ruinoj de la apolono-templo.*)
(*Imperiestro Juliano kaj mistikisto Maksimos, ambaŭ en longaj vestoj, venas el inter la renversitaj kolonoj sur la fundo.*)

Mistikisto Maksimos. Kien, mia frato?

Imperiestro Juliano. Tien, kie estas plej solece.

Mistikisto Maksimos. Sed tie ĉi — sur la abomeninda loko? Meze de la rubamaso —?

Imperiestro Juliano. Ĉu la tuta mondo ne estas rubamaso?

Mistikisto Maksimos. Vi tamen pruvis, ke la renversitaĵo povas esti rekonstruita.

Imperiestro Juliano. Mokisto! En Ateno mi vidis ŝuripariston, kiu estis konstruita por si malgrandan laborejon en la templo de Zeŭso. En Romo, mi ekaŭdis, ke angulo de la Juliana baziliko ŝanĝiĝis en bovostalon. Ĉu vi nomas tion ankaŭ rekonstruado!

Mistikisto Maksimos. Kial ne? Ĉu tio ne okazas popece? Kio estas la tutaĵo alie ol la plena sumo de la kolektitaj pecoj?

Imperiestro Juliano. Malsaga saĝeco. (*Li fingre montras la renversitan statuon de Apolono.*) Rigardu tiun sennazan kapon. Rigardu tiujn rompitaĵajn brakojn — tiujn dispecigitajn lumbojn. Ĉu la sumo de ĉiuj tiuj malbelaĵoj estas la tuta, plena dia iama belaĵo?

Mistikisto Maksimos. Kiel vi scias, ke tiuj iamaj belegaĵoj estis belaj — ĉiu aparte — escepte en la prezentado de la rigardantoj?

Imperiestro Juliano. Ho ve, Maksimos, tio ĝuste estas la kvin-tesenco. Kio estas: ĉiu aparte? Post la hodiaŭa tago mi ne plu scias ion diri. (*Li piedpuŝas la Apolonokapon.*) Ĉu vi estis iam pli potenca per vi mem? Strange, Maksimos, ke en eraro potenco povas kuŝi. Rigardu tiujn Galileanojn. Kaj rigardu

min kiel mi estis iam, kiam mi kredis, ke estas eble restarigi la falintan mondon de la beleco.

Mistikisto Maksimos. Amiko — se la eraro estas por vi necesajo, returnen iru al la Galileanoj. Ili akceptos vin kun etenditaj brakoj.

Imperiestro Juliano. Vi scias tre bone, ke tio estas neebila. Imperiestro kaj Galileano! Kiel unuigi la kontraŭdiraĵon? Jes, tiu Jesuo Kristo estas la plej granda ribelanto, kiu iam vivis. Kio estis Bruto — Kio estis Kasio kompare kun li? Ili mortigis nur Julion Cezaron, sed li mortigas Cezaron kaj Aŭguston generale. Aŭ ĉu mi povas pensi pri akordo inter la imperiestro kaj la Galileano? Ĉu estas sur la tero spaco por ili ambaŭ kune? Kaj li vivas sur la tero, Maksimos — la Galileano vivas, diras mi, kiel ajn certe la Judoj kaj la Romanoj imagas, ke ili mortigis lin; — li vivas en la ribela animo de la homoj; li vivas en iliaj obstineco kaj moko kontraŭ ĉiu videbla potenco. Donu tion al la imperiestro, kio apartenas al la imperiestro — kaj tion al Dio, kio apartenas al Dio! — Neniam homo eldiris pli ruze-malican vorton ol tiun ĉi. Kio sin kaŝas en tio? Kio kaj kiom apartenas al la imperiestro? Tiu ĉi vorto estas kvazaŭ bastonego, kiu forbatas la kronon de la imperiestra kapo.

Mistikisto Maksimos. Kaj tamen la granda Konstantino povis interkonsenti kun la Galileano — kaj via antaŭulo ankaŭ.

Imperiestro Juliano. Jes, kiu povus esti kontentigema, kiel ili. Sed ĉu vi nomas tion regi la mondregnon? Konstantino plivastigis la limojn de sia estreco. Sed ĉu li ne kuntiris la limojn ĉirkaŭ sia propra volo? Vi imagas tiun homon tro alta, nomante lin la granda. Pri mia antaŭulo mi tute ne volas paroli, li estis pli multe sklavo ol imperiestro, kaj mi ne povas ekhalti ĉe la nomo. Ne, ne, nenia alia akordo estas imagebla en tiuj aferoj. Kaj tamen — cedi! Ho, Maksimos, post tiu ĉi malvenko mi ne povas plu resti imperiestro — kaj ne ankaŭ mi povas rezigni tion; Maksimos, vi, kiu povas klarigi la antaŭsignojn, kies enigmoplena signifo estas kaŝita por ĉiu — vi, kiu legas en la libro de la eternaj steloj — ĉu vi povas diri al mi la rezulton de tiu ĉi batalo?

- Mistikisto Maksimos. Jes, mia frato, mi povas diri al vi la rezulton.
- Imperiestro Juliano. Vi povas tion? Tial diru ĝin. Kiu triumfos, la imperiestro aŭ la Galileano?
- Mistikisto Maksimos. Ambaŭ subiros, la imperiestro kaj la Galileano.
- Imperiestro Juliano. Ambaŭ subiros?
- Mistikisto Maksimos. Ambaŭ. Ĉu en nia tempo, ĉu post centoj da jaroj, tion mi ne scias; sed tio okazos kiam la ĝusta venos.
- Imperiestro Juliano. Kaj kiu estas la ĝusta?
- Mistikisto Maksimos. Tiu, kiu englutos tiel la imperiestron kiel la Galileanon.
- Imperiestro Juliano. Vi solvas la enigmon per eĉ pli mistera.
- Mistikisto Maksimos. Aŭskultu min, mia saĝec-amiko kaj frato! Mi diras, ili subiros ambaŭ, sed ne pereos. Ĉu la infano ne subiras en la junulo kaj la junulo refoje en la viro? Sed nek la junulo nek la viro pereos. Kaj vi, mia amata lernanto — ĉu vi forgesis niajn interparoladojn de Efeso pri la tri regnoj?
- Imperiestro Juliano. Ho ve, Maksimos, jaroj kuŝas inter tio, parolu!
- Mistikisto Maksimos. Vi scias, neniam mi aprobis kion vi, kiel imperiestro entreprenis. Vi volis aliformigi la junulon en infanon. La karna regno estas englutita de la spirita regno. Sed la spirita regno ne estas la tutfinanta, same kiel la junulo ne estas tia. Vi volis malhelpi la junulon plenkreski — volis malhelpi lin fariĝi viro. Ho, vi malsaĝulo, kiu eltiris la glavon kontraŭ la fariĝonta — kontraŭ la tria regno, kie regos la duflankulo!
- Imperiestro Juliano. Kaj tiu —?
- Mistikisto Maksimos. La juda popolo havas nomon por li. Ili nomas lin Mesio, kaj atendas lin.
- Imperiestro Juliano (*malrapide kaj meditante*). Mesio? — Nek imperiestro nek Savanto?

Mistikisto Maksimos. Ambaŭ en unu kaj unu en ambaŭ.

Imperiestro Juliano. Imperiestro-Dio; — Dio-imperiestro.
Imperiestro en la spirit-regno — kaj Dio en la karna regno.

Mistikisto Maksimos. En *tiu* regno la vorto de la estinta ribelanto veriĝos.

Imperiestro Juliano. Donu al la imperiestro tion, kio apartenas al la imperiestro, — kaj al Dio tion, kio apartenas al Dio, — jes, jes, tiam la imperiestro estos en Dio, kaj Dio en la imperiestro — Ho ve, sonĝoj, sonĝoj; — kiu rompos la potencon de la Galileano!

Mistikisto Maksimos. Kie kuŝas la potenco de la Galileano?

Imperiestro Juliano. Senfrukte mi cerbumadis pri tio.

Mistikisto Maksimos. Ie estas skribite, vi ne havu fremdajn diojn prefete al mi.

Imperiestro Juliano. Jes, jes, jes!

Mistikisto Maksimos. La antaŭvidanto de Nazaret ne anoncis tiun ĉi aŭ tiun dion; li diris: Dio mi estas — mi estas Dio.

Imperiestro Juliano. Jes, ekster — —! Tial la imperiestro estas senpotenca. La tria regno? Mesio? Ne la Mesio de la juda popolo, sed tiu de la spirito kaj mondregno —?

Mistikisto Maksimos. La Dio-imperiestro.

Imperiestro Juliano. La imperiestro-Dio.

Mistikisto Maksimos. *Logos in Pan — Pan in logos.*

Imperiestro Juliano. Maksimos — kiel li —

Mistikisto Maksimos. Li finos sin mem en tio.

Imperiestro Juliano. Mia amata instruisto, mi devas forlasi vin.

Mistikisto Maksimos. Kien vi iras?

Imperiestro Juliano. Urbon. La persa reĝo faris al mi pacproponon, kiun mi trofervore akceptis. Miaj senditoj jam estas survoje. Ili estos kuratingataj kaj returnen vokataj.

Mistikisto Maksimos. Vi volas denove komenci la militon kontraŭ la reĝo Sapiro ?

Imperiestro Juliano. Mi volas kion sonĝis Kiroj kaj kion klopodis Aleksandro —

Mistikisto Maksimos. Juliano!

Imperiestro Juliano. Mi volas posedi la mondon — Bonan nokton, mia Maksimos!

(Li mane adiaŭ-diras kaj foriras rapide. Maksimos postrigardas lin meditante.)

Horo de la psalmokantistinoj *(en granda malproksimo sur la tomboj de la martiroj)*.

Homaj dioj marmoraj

Arĝentaj kaj oraj

Turniĝos en polvon!

AKTO KVARA

(Ĉe la orientaj limoj de la imperio. Sovaga montarpejzaĝo. Profunda valravino apartigas la antaŭaĵon de la post ili kuŝantaj montoj.)

(Imperiestro Juliano, en milit-vestaro, staras tre apud la plej ekstrema montrando kaj rigardas malsupren en la profundajon. Je kelka distanco de li, maldekstre, staras la arme-kondukisto Nevita, kaj la persa princo Hormisdas, la militestro Jovian kaj kelkaj aliaj komandantoj. Dekstre, apud malbele konstruita altaro el ŝtono, kuŝas la antaŭdiristo Numa kaj du aliaj etruskaj antaŭdiristoj, serĉantaj antaŭdirojn el la intestaro de oferbesto. Pli antaŭe sidas la mistikisto Maksimos sur ŝtono, ĉirkaŭita de la saĝec-instruistoj Priskos, Kitron kaj multaj aliaj. De tempo al tempo taĉmentoj de malpeze-armitaj soldatoj marŝas trans la altaĵon de maldekstre dekstren.)

Imperiestro Juliano. *(fingre montras malsupren)* Rigardu, rigardu la legioj sin turnas kiel kirasita serpento tra la fendego.

Armekondukisto Nevita. Tiuj, ĝuste sub ni, en la kamizoloj el ŝafofelo, estas la Skitoj.

Imperiestro Juliano. Kia penetranta hurlado!

Armekondukisto Nevita. Tio estas la ordinara kantado de la Skitoj, sinjoro.

Imperiestro Juliano. Ĝi similas pli multe blekadon ol kantadon.

Armekondukisto Nevita. Nun venas la Armenoj. Arsakes kondukas ilin mem.

Imperiestro Juliano. La romanaj legioj sendube estas jam sur la ebenajo. Ĉiuj tie loĝantaj triboj rapidas tien ĉi por submeti sin. (*Li sin turnas al la militestroj.*) Sur Eŭfrato kuŝas kunigitaj la dekdu cent ŝipoj, kiuj entenas nian provizon kaj ĉion alian bezonon. Mi estas tute certa, ke la ŝiparo povas eniri la Tigrison tra tiu alta artefosa kanalo. La tuta armeo transpasas la riveron per la ŝipoj. Tiel ni marŝos antaŭen laŭlonge de la orienta bordo, tiel rapide, kiel la kontraŭfluado ebligos al la ŝiparo sekvi nin. Diru al mi, Hormisdas, kiajn fidojn vi havas rilate al tiuj arangoj.

Princo Hormisdas. Nevenkebla arme-kondukisto, mi scias, ke estos al mi permesate refoje eniri mian patrujon sub via triumfanta protekto.

Imperiestro Juliano. Kia feliĉega sento, troviĝi ekster la interrilato de tiuj malgrandanimaj burĝoj. Kun kiuj timigitaj rigardoj ili iris ĉirkaŭ mia veturilo, kiam mi forlasis la urbon. „Revenu baldaŭ kaj estu al ni pli indulga kiel nun”, ekkriis ili. Neniam mi returnos min al Antiohia. Mi ne volas plu vidi tiun sendankan urbon. Post kiam mi venkobatis, mi returnos min laŭvoje de Tarŝis. (*Li iras al la antaŭdiristoj.*) Numa, kiujn antaŭdirojn vi legas por nia militiro tiun ĉi matenon?

Antaŭdiristo Numa. La antaŭdiro malkonsilas al vi transiri dum tiu ĉi jaro la limojn de via regnolando.

Imperiestro Juliano. Hm! Kiel vi klarigas tiun antaŭdiron, Maksimos?

Mistikisto Maksimos. Mi klarigas ĝin jene: La antaŭdiro konsilas, vi povas submeti ĉiujn de vi trairantajn landojn, tiam vi ne transiros la limojn de via lando.

Imperiestro Juliano. Estas tiel. Ni devas precize atenti tiajn admirindajn antaŭdirojn; ĉar ofte duobla signifo estas en ili. Jes, ŝajnas kelkfoje, kvazaŭ misterplenaj potencoj amas erarigi la homojn, precipe ĉe grandaj entreprenoj. Ĉu ne estis kelkaj, kiuj volis klarigi kiel nian malsukceson, ke la kolonaro en Hierapolo ruiniĝis pereigante sub si duoncenton da soldatoj, ĝuste en la tempo, kiam ni trairis la urbon? Sed mi diras, tio anoncis duoblan feliĉon. Ĉar unue ĝi signifas, ke la persa regno ruiniĝos kaj due ĝi antaŭdiras al ni la pereon de la malfeliĉaj Galileanoj.

Ĉar tiuj soldatoj, kiuj pereis, — kiuj ili estis? Galileanoj, punsoldatoj, kiuj nur kontraŭvole militiris, pro kio la sorto destinis por ili tian teruran subitan kaj malhonorindan morton.

Militestro Jovian. Plej indulga imperiestro, jen venas soldatestro de la antaŭgardio.

Soldatestro Amian. (*venas de dekstre*) Sinjoro, vi ordonis min anonci al vi, se io eksterordinara okazus dum la ekmarŝo.

Imperiestro Juliano. Nu? Ĉu io eksterordinara okazis hodiaŭ matene?

Soldatestro Amian. Jes, sinjoro, duobla antaŭdiro!

Imperiestro Juliano He! rakontu do, Amian.

Soldatestro Amian. Unue, sinjoro, kiam ni alvenis je kelka distanco post la vilaĝo Zaita, subite giganta leono eliris el la arbareto kaj estis atakonta la soldatojn, kiuj mortigis ĝin per sagoj.

Imperiestro Juliano. He!

La Saĝec-instruistoj. Kia feliĉa antaŭsigno!

Princo Hormisdas. Reĝo Sapores sin nomas „la leono de la landoj“.

Antaŭdiristo Numa. (*ĉe la altaro.*) Reiru! reiru! Imperiestro Juliano.

Mistikisto Maksimos. Kuraĝe marŝu antaŭen, triumfe elektito.

Imperiestro Juliano. Reiri post tio? Kiel tiu leono falis antaŭ Zaita, tiel falos „la leono de la lando“ per miaj sagoj. Ĉu mi ne havas aŭspiciojn, sur kiuj mi povas apogi min, se mi klarigas ĉi tiun kiel mian profiton? Ĉu mi bezonas rememorigi tiajn lumigitajn virojn, ke, se imperiestro Maksimiliano triumfis super la persa reĝo Narseŭs, ankaŭ leono — kaj poste teruriga apro — estis faligita de la romanaj soldatoj (*al Amian*). Sed nun pri tio alia. Mi kredas, ke vi parolis pri du antaŭdiroj.

Soldatestro Amian. La alia estas pli duba sinjoro! Via milit-ĉevalviro Babilonio, kiel vi ordonis, estis antaŭkondukata tute selita por atendi vin por malsupren rajdi jenan monton. Sed pripensu, sammomente taĉmento da galileanaj punsoldatoj estis preterpelataj. Ĉar ili estis peze ŝarĝitaj kaj ne tre obeemaj, estiĝis

necese vipobati ilin. Spite al tio ili supren-levis la brakojn, kvazaŭ en ĝojo, kaj ekkantis laŭtan kanton en honoro de sia dio. Per tiu subitâ bruo, Babilonio ektimiĝis, kaj ekstaris sur la postaj piedoj, falis surdorse, kaj ruliĝante teren, la ore ornamita selaĵo makuliĝis kaj malpuriĝis de la stratkoto.

Antaŭdiristo Numa. (*ĉe la altaro*) Imperiestro Juliano, returnen iru!

Imperiestro Juliano. Tion la Galileanoj faris malic-intence — kaj tamen ili kontraŭvole aperigis antaŭsignon, kiun mi salutas ĝojege. Jes, kiel Babilonio falis, sammaniere falos Babilono, prirabita de pompo kaj beleĝaĵo.

Filozofo Priskos. Kia saĝeco en tiu klarigo!

Filozofo Kitron. Je la dioj, tiel ĝi estas!

La aliaj saĝec-amikoj. Tiel kaj ne alie!

Imperiestro Juliano (*al Nevita*). La armeo marŝu pli malproksim-men. Tamen mi volas oferi en tiu ĉi vespero por atingi eĉ pli grandan certecon kaj vidi, kion la antaŭdiro plicertigas. — Sed kio rilatas al vi, ho etruskaj jonglistoj, kiujn mi venigis tien ĉi je tiuj grandaj kostoj, vi sciu, ke mi ne plu toleros vin en la tendaro, kie vi nur kunlaboras senkuraĝigi la soldatojn. Mi diras, vi komprenas nenion de la malfacila laboro, kiun vi prenis sur vin. Kia impertinenteco! Kia abundo de trokuraĝeco! For ilin! Mi ne volas vidi ilin plu.

(*Kelkaj el la korpogardistoj forpelas la antaŭdiristojn maldokstren.*)

Imperiestro Juliano. Babilonio falis. La leono estis venkita de miaj soldatoj. Sed mi ne scias ankoraŭ pri kiu nevidebla helpo ni povos kalkuli. La dioj, kies esteco ne estas ankoraŭ sufiĉe bone esplorita, ŝajnas — se mi kuraĝus tion diri — dormetadi aŭ almenaŭ nur malmulte influadi la homajn aferojn. Ni troviĝas bedaŭrinde en tia tempo, miaj karaj amikoj. Jes, ni estis eĉ atestantoj, ke iaj dioj preterlasis, subteni bonintencajn klopodojn, kiuj celis iliajn proprajn utilojn kaj honoron. Ni tamen ne kuraĝas pli multe juĝi pri tio. Oni povus eble pensi, ke la mondregantaj senmortuloj multfoje metas sian povon en

la homajn manojn — per kio la dioj certe neniel estas malmaltigitaj; ĉar oni do dankas al ili, ke tiel eksterordinara favorato, se li vivu, povus aperi surtere.

Filozofo Priskos. Ho, senkomparebla imperiestro, ĉu viaj propraj faroj ne pruvas tion?

Imperiestro Juliano. Mi ne scias, ho Priskos, ĉu mi povas taksi tiel alte miajn farojn. Mi ne volas paroli pri tio, ke la Galileanoj atribuas tian elekton al la judo Jesuo de Galileo; ĉar tiuj homoj eraras, kion mi detale pruvos en mia skribaĵo kontraŭ ili. Sed mi volas nomi Prometon el la longe pasintaj tagoj; tiu bravega heroo akirigis al la homoj ankoraŭ pli grandajn bonaĵojn, ol la senmortaj dioj ŝajnas malenvii al ili — pro kiuj li tamen devis multe suferi, ne nur doloron, sed ankaŭ insulton, ĝis li fine estis akceptata en la socion de la dioj — al kiu li fakte apartenis jam la tutan tempon. Kaj ĉu oni ne povas diri tion saman, ne nur pri Heraklo sed ankaŭ pri Aĥilo, kaj fine pri la macedona Aleksandro, kun kies faroj unuj komparis, parte tion, kion mi efektivigis en Gaŭlujo, kaj parte kaj precipe, kion mi intencas fari per tiu ĉi militiro?

Armekondukisto Nevita. Mia imperiestro, — la post-armeo estas ĝuste ĉi sube; — estos eble tempo —

Imperiestro Juliano. Tuj, Nevita! Antaŭe mi volas komuniki al vi strangan songon, kiun mi songis en tiu nokto. Mi songis, ke mi vidas antaŭ miaj okuloj infanon, kiun persekutis riĉa viro. Tiu ĉi viro posedis sennombrajn brutarojn, sed li malmulte estimis la kulton de la dioj. Tiu malbona viro pereigis la tutan familion de la infano. Sed Zeŭso kompatis la infanon kaj tenis super ĝi sian manon. Poste mi vidis la infanon kreski ĝis junulo sub la protekto de Minerva kaj Apolono. Plue mi songis, ke la junulo ekdormis sur ŝtono sub la libera ĉielo. Tiam Hermeso, en formo de juna viro malsupreniris sur la kamparon, kaj diris: venu! mi volas montri al vi vojon kondukantan al la loĝejo de la ĉefa dio! Poste li kondukis la junulon al piedo de tre kruta monto. Tie li forlasis lin; la junulo eksplodis en ĝemkriojn kaj larmojn kaj vokis laŭte al Zeŭso. Vidu, tiam Minerva kaj la sundio, kiuj regas la teron, malsupreniris al li, levis lin sur la montopinton, fingre montris al li la tutan heredajon

de lia gento. Sed tiu heredaĵo estis la mondisko de maro al maro kaj trans la maron. Tiam ili anoncis al la junulo, ke ĉio tio apartenos al li, kaj donis al li tri admonojn: li ne dormu kiel estis farinta lia gento; li ne aŭskultu la konsilojn de hipokrituloj; kaj fine li honoru kiel diojn, tiujn, kiuj similis al li. Ne forgesu, diris ili, forlasante lin, ke vi havas senmortan animon, kaj ke tiu ĉi via animo estas de dia deveno. Kaj se vi sekvos nian konsilon, vi vidos nian patron kaj estiĝos dio, kiel ni.

Filozofa Priskos. Kion diros kontraŭ tio antaŭdiroj kaj aŭspicioj!

Filozofa Kitron. Mi kredas ne diri tro multe, atendante, ke la Parkoj pripensos dufoje se iliaj konsiloj ne akordiĝos kun viaj.

Imperiestro Juliano. Ni ne povas kun certeco kalkuli pri tiaj esceptoj. Sed certe mi ĉiurilate opinias tiun sonĝon tre kurioza, kvankam mia frato Maksimos — kontraŭ ĉiu justa atendo — per sia silentado ne ŝajnas ŝati la sonĝon nek la manieron, laŭ kiu mi ĝin priskribis — Ni tamen devas suferi tion! (*Li tiras kelkajn paperojn el siaj vestoj.*) Rigardu, Jovian, tie ĉi mi notis frue hodiaŭ-matene en mia tendo, kion mi sonĝis. Prenu ĝin, kaj igu laŭte legi multajn kopiaĵojn al la diferencaj arme-partoj. Mi opinias grave en tiu riskoplena militiro, ke la soldatoj meze de ĉiaj danĝeroj kaj malfacilaĵoj, povu kun certeco meti sian sorton en la manojn de kondukisto, kiun ili konsideras ne-erarebla en ĉiuj aferoj, kiuj decidas la finrezulton de la milito.

Militestro Jovian. Mi petas vin, mia imperiestro, liberigi min de tio.

Imperiestro Juliano. Kion vi volas diri per tio?

Militestro Jovian. Ke mi ne povas kunlabori en io, kio estas kontraŭ la vero. Ho, aŭdu min, plej glora imperiestro kaj sinjoro! Ĉu povus esti inter viaj soldatoj nur unu sola, kiu pridubas, ke li estas sendanĝera en viaj manoj? Ĉu vi ĉe la limoj de Gaŭlujo, spite al la supereco de la malamikoj, kaj multaj malfacilaĵoj, ne konkeri al vi pli grandajn milit-profitojn ol povas fieri iu ajn alia arme kondukisto en niaj tagoj.

Imperiestro Juliano. Oj, — vidu, vidu, kiaj novaĵoj!

Militestro Jovian. Ĉiuj scias, ke la feliĉo sekvis vin ĝis nun en mirinda maniero. Pri instruiteco vi staras super ĉiuj aliaj mortemuloj, kaj pri la bela arto de la elokventeco vi el la plej eminentaj staras plej alte. —

Imperiestro Juliano. Kaj plue? — Spite al ĉio tio?

Militestro Jovian. Spite al tio, mia imperiestro, vi estas nur homo. Sed dum vi sciigas al la armeo tiun sonĝon, vi volas diskonigi la kredon, ke vi estas diaĵo, — kaj en tio mi ne povas helpi vin.

Imperiestro Juliano. Miaj amikoj, kion vi diras pri tiuj paroloj?

Kitron. Ke ili estas almenaŭ tiel trokuraĝaj kiel ili montras mal-klerecon.

Imperiestro Juliano. Ŝajnas, veron-amanta Jovian, kvazaŭ vi forgesas, ke imperiestro Antonino, nomita „la pia“, estis honorata kiel senmorta dio en speciala templo sur la forumo de Romo. Kaj ne nur li, sed ankaŭ lia edzino Faŭstino kaj aliaj imperiestroj, antaŭ kaj post tiu tempo.

Militestro Jovian. Mi scias tion, sinjoro; sed ne estis favor-permesate al niaj praavoj, iri en la lumo de la vero.

Imperiestro Juliano. (*longe rigardante lin*) He, Jovian! — Diru al mi — hieraŭ vespere, kiam mi serĉis la antaŭdirojn por la venonta nokto, vi eniris portante al mi novajon, ĝuste kiam mi per puriganta akvo forigis la sangon de miaj manoj.

Militestro Jovian. Jes, mia imperiestro.

Imperiestro Juliano. Ĉar mi rapidis, okazis ke mi ŝprucigis kelkajn akverojn sur vian mantelon. Tiam vi subite postenpaŝis kaj sku-dejetis la akvon, kvazaŭ via mantelo estus malpurigita.

Militestro Jovian. Mia imperiestro, tio do kaptis vian atenton?

Imperiestro Juliano. Ĉu vi pensis, ke tio ne kaptis mian atenton?

Militestro Jovian. Jes, sinjoro; ĉar tio estis afero inter mi kaj la sola vera Dio.

Imperiestro Juliano. Galileano.

Militestro Jovian. Sinjoro, vi mem ordonis al mi iri Jerusalemon kaj de ĉio mi estis atestanto, kio okazis tie. Multe mi cerbumis de post tiu tempo; mi legis en la kristanaj skribaĵoj, mi parolis pri tio kun multaj — kaj tiam mi eksciis, ke en tiu kredo kuŝas la dia vero.

Imperiestro Juliano. Ĉu estas eble! Ĉu vere estas eble! Tiel tiu infekta frenezeco ĉirkaŭ-disvastiĝas! Mia plej proksima ĉirkaŭaĵo, miaj propraj armeestroj estiĝas al mi malfidelaj —

Militestro Jovian. Metu min je la unua linio kontraŭ viaj malamikoj, sinjoro, — kaj vi vidos, ke mi kun ĝojo donos tion al la imperiestro, kio apartenas al la imperiestro.

Imperiestro Juliano. Kiom?

Militestro Jovian. Korpon kaj sangon.

Imperiestro Juliano. Korpo kaj sango ne estas sufiĉaj. Kiu volas regi, tiu devas povi regi la volon kaj la animon de la homoj. Ĝuste en tio tiu Jesuo de Nazaret staras kontraŭ mi kaj faras al mi la potencon disputebla. Ne imagu, ke mi volas puni vin, Jovian! Tiuj, kies ano vi estas, sopiras tion kiel feliĉon. Kaj tiam oni nomas ilin poste martiroj. Aŭ kiel? Ĉu oni ne tiel laŭdis ilin, ke mi estas devigata, puni ilin pro ilia obstinemo? Iru al la antaŭgardio! Mi ne volonte vidos vin pli ofte. — Ho, tiu trompo kontraŭ mi, kiun vi envolvas per frazoj de duobla devo kaj de duobla regno! Sed estiĝos alie. Ankoraŭ aliaj krom la persa reĝo sentos mian piedon sur sia nuko. Al la antaŭgardio, Jovian!

Militestro Jovian. Mi faros mian devon! *(li foriras dekstren)*

Imperiestro Juliano. Ni ne volas, ke tiu ĉi matenhoru, kiu komenciĝis sub tiom da feliĉ-anoncantaj aŭspicioj, estu malmulgata por ni — Ni volas akcepti ĉi tion kaj alian kun trankvileco. Mia sonĝo tamen estos anoncata al la armeo. Vi, Kitron, vi mia Priskos, kaj vi aliaj amikoj, prizorgu, ke tio okazu laŭ inda maniero.

La saĝec-amikoj. Kun ĝojo, kun plej granda ĝojo, sinjoro!
(Ili frenas la paper-rulaĵojn kaj foriras dekstren.)

Imperiestro Juliano. Mi petas vin, Hormisdas, ne dubu pri mia potenco, eĉ se povus ŝajni, kvazaŭ regus tie ĉi ribelema volo. Iru! kaj ankaŭ vi, Nevita, ĉiu al la siaj; — mi sekvos, kiam la armeo estos kunigita tie sur la ebenaĵo. (*Ĉiuj, escepte la imperiestro kaj Maksimos foriras dekstren.*)

Mistikisto Maksimos. (*post momento, levigante de la ŝtono, sur kiu li sidis, kaj irante al la imperiestro.*) Mia malsana frato!

Imperiestro Juliano. Pli vundita ol malsana. La cervo, vundita de la sago de la paŝto, forkuras en la arbaretaĵon, kie la hundaro ne povas sekvi ĝin. Estis al mi netolereble, montri min pli longe sur la stratoj de Antioĥia; — nun ŝajnas, kvazaŭ mi ne povas montri min plu al la armeo.

Mistikisto Maksimos. Neniu vidos vin, amiko, ĉar ili palpas en blindeco. Sed vi estiĝos kuracisto de iliaj okuloj, kaj poste ili vidos vin en via belegeco.

Imperiestro Juliano. (*vidante malsupren en la roko-fendegon*) Kiel profunde sub ni! Kiel malgrandege ili serpentlinie kurbigas antaŭen inter dornoj kaj arbetoj, laŭlonge de ŝtoneca rivero. Kiam ni staris antaŭ tiu mont-faŭko, la gvidantoj samtempe puŝ-penetrus en ĝin; ili volis plimallongigi la vojon je unu horo kaj ŝpari iom da peno sur la vojo — al la morto. Kaj la aroj sekvis ilin tiel obeeme, neniu pensis pri tio ekmarŝi laŭ la supra vojo; neniu sopiris la liberan aerfluan ĉi supre, kiu plilarĝigas la bruston kaj ebligas al ni libere spiradi. Jen ili iras, iras kaj iradas, ne vidante, ke ili havas mallarĝan ĉielstrion super si, kaj ne sciante, ke troviĝas altaĵoj, kie estas pli multe da spaco. Ĉu ne estas, Maksimos, kvazaŭ tiuj homoj vivas nur por morti? La animo de la Galileano estas en tio. Se estas vere, kiel oni diras, ke lia patro kreis la mondon, tiam la filo malestimas la laboron de la patro. Kaj ĝuste pro tiu trokuraĝa frenezeco li estas laŭdata tiel alte. Kio estis Sokrato en komparo kun li! Ĉu Sokrato ne amis la ĝuon, la feliĉon kaj la belecon? Kaj tamen li rezignis ilin. Sed kia senfunda abismo estas inter tio: ne deziri unuflanke kaj deziri aliaflanke kaj tamen rezigni. Ho, tiun perditan trezoron de la saĝeco mi volas redoni al la homoj. Kiel iam Dionizo, mi venas renkonte al ili ĝoja kaj juna, kun foliaro ĉirkaŭ la frunto kaj

kun abundo da vinberoj sur miaj brakoj. Sed ili rifuzas miajn donacojn, kaj mi estas mokata kaj malamata, malamata kaj mokata de amikoj kaj malamikoj.

Mistikisto Maksimos. Kial? Mi volas diri al vi, kial. En la proksimo de urbo, kie mi vivis iam, estis vinbermonto, ĉie fama pro siaj vinberoj, kaj se la burĝoj de la urbo deziris por sia manĝotablo dolĉajn vinberojn, ili irigis siajn servistojn al tiu monto por preni tie vinberojn. Multajn jarojn poste mi venis en tiun urbon; sed tiam neniu sciis plu ion pri la iamaj tiel alte laŭditaj vinberoj. Tiam mi iris al la vinkulturisto de la vinbergardeno kaj demandis al li: diru al mi, ho amiko, ĉu viaj vinberujoj formortis, ĉar neniu konas plu viajn vinberojn? Ne, respondis la vinkulturisto, sed vi scias, ke junaj vinberujoj produktas bonajn vinberojn, sed malbonan vinon; maljunaj vinberujoj kontraŭe produktas malbonajn vinberojn, sed bonan vinon. Tial, ho, fremdulo, diris li plue, mi ĝojigas ankoraŭ nun la korojn de miaj samurbanoj per la superfluo de la vinbermonto, nur laŭ alia maniero, — per vino kaj ne per vinberoj.

Imperiestro Juliano. (*enprofundiĝinta en pensoj*) Jes, jes, jes!

Mistikisto Maksimos. Estas tio, kion vi ne atentis. La vinberujo de la mondo estiĝis maljuna, kaj tamen vi opinias, kiel antaŭe, povi prezenti viajn vinberojn al tiuj, kiuj soifas je nova vino.

Imperiestro Juliano. Ho, Maksimos, kiu soifas? Nomu al mi unu solan, krom nia frataro, kiun nova spirita bezono ekkaptis. — Malfeliĉa mi estas, ĉar mi naskiĝis en tia epoko.

Mistikisto Maksimos. Ne kalumniu la tempon. Se ĝi estus pli granda, vi estiĝus pli malgranda. La animo de la mondo estas kvazaŭ riĉa homo, havanta sennombrajn filojn. Se li dividus sian riĉaĵon inter ĉiuj filoj, ili ĉiuj estiĝus bonhavaj, sed neniu estiĝus riĉa. Se li senheredigis ĉiujn krom unu, donante ĉion al unu, tiu unu starus tie kiel riĉa viro en rondo de malriĉuloj.

Imperiestro Juliano. Neniu komparo estas malpli trafa ol tiu ĉi, aŭ ĉu eble mi staras tiel? Ĉu ne estas dividita en multajn manojn tio, kion la reganto de la mondo devus posedi en pli riĉa grado ol ĉiuj aliaj? jes, mi povus diri, kion li sola devus posedi! Ho, kiel dividiĝis la povo! Ĉi tiu Libanios ne posedas

en tia alta grado la povon de la elokvento, ke oni nomis lin la reĝo de la oratoroj? Kaj ĉu vi, mia Maksimos, ne havas la povon de la misterplena scienco? Ĉu tiu furiozanta Apolinaris ne posedas la povon de la kantado kaj de la entuziasmo en tia grado, ke mi povus envii ĝin al li? Kaj nun la kapodocia Gregoro! Ĉu li ne posedas la senbridan povon de la volo en tia abundo, ke kelkaj donas al li (por regato tamen ne decan) alnomon „Granda’’! Kio estas ankoraŭ pli stranga, tiu sama alnomo estas ankaŭ donita al Basilios, la amiko de Gregoro, al homo kun riĉa animo kaj knabin-okuloj. Kaj tamen li ne eniras la mondon. Ĉi tie li vivas, tiu Basilios, en tiuj ĉi malproksimaj regionoj, vestita per vestaĵo de ermito, en rilato nur kun siaj lernantoj kaj kun sia fratino kaj aliaj virinoj, kiuj estas nomataj piaj kaj sanktaj. Kaj kiel li kaj liaj fratinoj ne laboras per la leteroj, kiuj de tempo al tempo estas forsendataj de ili? Ĉio, eĉ rezigno kaj retirigo estiĝas potenco kontraŭ mia potenco. Sed la plej timinda el ili ĉiuj estas la krucumita Judo.

Mistikisto Maksimos. Batalu tial kontraŭ tiuj diversaj potencoj! Sed ne kredu, ke vi neniigos la ribelantojn, se vi venos super ili kiel militestro, sendita de reganto, kiun ili ne konas. En via propra nomo vi devas veni, Juliano! Ĉu Jesuo de Nazaret venis kiel sendito de aliulo? Ĉu li ne certigis, ke li estas mem tiu, kiu sendis lin? Vere, en vi estas la plenumado de la tempo, kaj vi ne montras tion. Ĉu ĉiuj signoj kaj antaŭdiroj montras vin per neerarema fingro? Ĉu mi devas memori al vi la sonĝon de via patrino?

Imperiestro Juliano. Ŝi sonĝis, ke ŝi naskos Ahilo'n.

Mistikisto Maksimos. Ĉu mi memorigos al vi la feliĉon, kiu kvazaŭ per fortaj flugiloj portis vin tra aventura danĝerplena vivo? Kiu vi estas, sinjoro? Ĉu vi estas la returnen venanta Aleksandro, tiutempe nepreta, nun matura kaj preparita fini la laboron?

Imperiestro Juliano. Maksimos!

Mistikisto Maksimos. Troviĝas unu, kiu ĉiam, en certaj interspacoj returnen venas en la korpon de la homgeneracio. Li estas kiel kavaliro, kiu volas malsovaĝigi sovaĝan ĉevalon en la rajdejo. Ĉiufoje la ĉevalo deĵetas lin. Sed tuj poste la

rajdanto refoje sidas sur la selo, ĉiufoje pli certa kaj pli sperta; sed ĉiufoje ĝis la hodiaŭna tago li devis esti dejetata en sia ŝanĝigantaj formoj. Dejetata li devis esti kiel la di-devenanta homo en la ĝardeno Edeno; dejetata kiel la fondinto de la mondregno; dejetata kiel la reĝo de la dioregno. Kiu scias, kiel ofte li vagadis en nia mezo dum neniu konis lin. Ĉu vi scias Juliano, ĉu vi jam ne estas en tiu, kiun vi nun persekutas?

Imperiestro Juliano. (*rigardas antaŭ sin*) Ho, senfunda enigmo —

Mistikisto Maksimos. Ĉu mi memorigos al vi la malnovan antaŭdiron, kiu denove nun ĉirkaŭiras? Estas anoncite, „tiom da jaroj, kiom *tagojn la jaro havas*, restos staranta la regno de la Galileano“. Ankoraŭ du jaroj kaj estos pasintaj tri cent ses-dek kvin jaroj, ke tiu viro naskiĝis en Bet-Leĥem.

Imperiestro Juliano. Ĉu vi kredas al tiu antaŭdiro?

Mistikisto Maksimos. Mi kredas al tio, kio venos.

Imperiestro Juliano. Ĉiam enigmoj!

Mistikisto Maksimos. Mi kredas en la libera neceseco!

Imperiestro Juliano. Eĉ pli enigme.

Mistikisto Maksimos. Vidu Juliano, kiam la ĥaoso ruliĝadis en la malplena teruriga dezertaĵo kaj Jehova estis sola, tiun tagon, kiam li laŭ malnovaj judaj skribaĵoj, etendis sian manon kaj apartigis la lumon de la mallumo, la akvon de la tero, en tiu tago la granda kreanta Dio staris sur la plej alta supro de sia potenco. Sed kun la homoj ekestis la voloj sur la tero. Kaj homoj, bestoj, arboj, kaj kreskaĵoj kreis sian specon laŭ eternaj leĝoj; kaj laŭ eternaj leĝoj ĉiuj steloj iradas en la ĉielpaco. Ĉu Jehova pentis tion? La malnovaj legendoj de ĉiuj popoloj rakontas legendojn pri pentanta kreinto. La leĝon de la konservado li metis en la kreitadon. Estas tro malfrue por penti! La kreito volas konserviĝadi — kaj ĝi konserviĝados. Sed ambaŭ regnoj de la unuflankeco batalas unu kontraŭ alia. Kie li estas, kie li estas, la pac-reĝo, kiu faros pacon inter ili?

Imperiestro Juliano. (*al si mem*) Du jarojn? Ĉiuj dioj sen potenco, nenia kapric-plena potenco post ili, kiu povos kontraŭbatali miajn intencojn — du jarojn? En du jaroj mi povos meti la teron sub mian povon.

Mistikisto Maksimos. Vi parolis, mia Juliano; — kion vi diris?

Imperiestro Juliano. Mi estas juna, forta kaj sana, Maksimos, estas mia volo longe vivi.

(Li foriras dekstren, Maksimos sekvas lin.)

(Monteta arbar-regiono kun rivereto inter arboj. Supre sur la altaĵo kuŝas bieneto. Estas je sunsubiro.)

(Arme-taĉmentoj marŝas supre de maldekstre dekstren laŭlonge de montetoj. Basilios de Cezarea kaj lia fratino Makrina, ambaŭ vestitaj en ermitvestaĵoj, staras malsupre sur la vojo kaj disdonas akvon kaj fruktojn al la laciĝintaj soldatoj.)

Makrina. Ho, Basilios, vidu, unuj estas pli palaj kaj pli malgrasigintaj ol la aliaj.

Basilios de Cezarea. Kaj tiom da sennombraj kristanaj fratoj estas inter ili! Ve al la imperiestro Juliano. Tio estas elpensita pli kruele ol ĉiuj turmentoj de la turmentejo. Kontraŭ kiu do li kondukas ĉiujn siajn legiojn? Pli malmulte kontraŭ la persa reĝo ol kontraŭ Kristo.

Makrina. Ĉu vi kredas pri li ion tiel terurigan?

Basilios de Cezarea. Jes, Makrina, fariĝas al mi pli kaj pli klare, ke la bato trafos nin. Ĉiujn malvenkojn, kiujn li suferis en Antiohia, ĉiujn kontraŭaĵojn, kiujn li renkontis, ĉiujn humilaĵojn kaj trompojn, kiujn li devis suferi pro siaj malpiaj faroj, ĉiujn kune li volas kovri per forgeso pere de venka militiro. Kaj li sukcesos. Granda venko estingos ĉion tion. La homoj estas tiaj, ili vidas la rajton en la feliĉo kaj sub la potenco kurbiĝas la plej multaj.

Makrina. *(fingre montras maldekstren)* Novaj soldataroj! Nekalkuleblaj, — sen fino —

(Taĉmento da soldatoj estas preter-kondukata; juna viro en la vico ŝalas pro trolaceco sur la vojo.)

Subkondukisto. (*batas lin per bastono*) Ekstaru, maldiligenta hundo!

Makrina. (*rapidas al ili*) Ho, ne batu lin!

La soldato. Lasu lin bati; — mi suferas tiel volonte.

Soldatestro Amian. (*alvenas*) Refoje prokrasto! Oj, jen li. Ĉu vere li ne povas marŝi pluen?

Subkondukisto. Mi ne scias kion diri, sinjoro, li falas ĉiumente.

Makrina. Ho, havu paciencon! Kiu estas tiu ĉi malfeliĉulo? — Jen, suĉu la sukcon el tiuj ĉi fruktoj. Kiu li estas, sinjoro?

Soldatestro Amian. Kapadociano, — unu el la erarantoj, kiuj ĉeestis la senhonorigadon de la Venus-templo en Antioĥia.

Makrina. Unu el tiuj martiroj! —

Soldatestro Amian. Klopodu ekstari, Agaton! Mi ekkompatas tiun homon. Ili punis lin pli severe ol li povis elteni. De tiu tempo li ne reakiris la prudenton.

Agaton. (*ekstaras*) Mi povas elteni tre bone. Kaj mi ne perdis la prudenton, sinjoro! Batu, batu, batu! — mi suferas tiel volonte.

Soldatestro Amian. (*al la subkondukisto*) Antaŭen! tie ĉi neniu tempo estu perdata.

Subkondukisto. (*al la soldatoj*) Antaŭen, antaŭen!

Agaton. Babilonio falis; — baldaŭ la babilona adultulo falos. Oni faligis la leonon de Zaita; — baldaŭ oni faligos la kronitan leonon de la mondo!

(*La soldatoj estas pelataj dekstren.*)

Soldatestro Amian. (*al Basilios kaj Makrina*) Vi strangaj homoj; vi estas erarantaj kaj tamen faras bonon. Ricevu mian dankon, ĉar vi refreŝigas la laciĝintojn; mi dezirus, ke mi povu agi kontraŭ via frato kiel mi volonte agus (*foriras dekstren*).

Basilios de Cezarea. Dio estu kun vi, nobla idolano!

Makrina. Kiu do estis tiu viro?

Basilios de Cezarea. Mi ne konas lin. (*ŝingre montras maldekstren*) Ho, vidu, vidu, jen li estas mem!

Makrina. La imperiestro? Ĉu tio estas la imperiestro?

Basilios de Cezarea. Jes, estas li.

(Imperiestro Juliano kun multaj militestroj, akompanata de la kondukisto de la korpogardistoj, Anatalos kun taĉmento da gardistoj, venas de maldekstre.)

Imperiestro Juliano. *(al siaj akompanantoj)* Laciĝinta? — Sensencaĵo! Ĉu falinta ĉevalo devigus min ekhalti? Aŭ ĉu decus pli malmulte iri piede ol supreniri bestaĉon? Laciĝinta! Mia praavo diris, ke imperiestro devas en tuta sia vivo, ne nur en sia mortohoro, montri imitindan persistecon; mi diras — ha, je la granda lumo de la ĉielo, ĉu mi ne vidas tie antaŭ miaj okuloj Basilios de Cezarea!?

Basilios de Cezarea. *(sin klinas profunde)* Via malalta servisto, ho potenca sinjoro!

Imperiestro Juliano. Jes, tion mi volas kredi! Vi vere servas min bone, Basilios! *(alproksimiĝas al li)* Tio do estas la kampo-domo, kiu estiĝis tiel fama per la leteroj, elirantaj de ĝi. Oni parolas en ĉiuj landoj pli multe pri tiu ĉi domo, ol pri la instru-salonoj, kvankam mi ŝparas nek penon nek diligentecon por reflorigi ilin denove. Ĉu ne vere, tiu ĉi virino estas via fratino Makrina?

Basilios de Cezarea. Estas tiel, sinjoro!

Imperiestro Juliano. Vi estas bela virino kaj krom tio juna, tamen vi rezignis pri la vivo, mi ekaŭdis.

Makrina. Jes, sinjoro, mi rezignis pri tiu ĉi vivo, por vivi vere en la estonteco.

Imperiestro Juliano. Ho, mi bone konas viajn erariĝojn. Vi sopiras tion, kio kuŝas transe kaj pri kio vi povas diri nenion kun certeco; vi pentofare turmentas vian karnon; vi subpremas ĉiujn homajn plezurojn. Kaj tamen mi diras al vi, ke ankaŭ tio povas esti vantaĵo, same kiel ĉio alia.

Basilios de Cezarea. Ne kredu, sinjoro, ke mi estas blinda por la danĝeroj, kuŝantaj en la rezigno. Mi bone scias, ke mia amiko Gregoro pravas, kiam li skribas, ke li sin konsolas per tio, esti ermito kun la koro, kaj ne kun la korpo, kaj mi scias ankaŭ ke tiu ĉi maldelikata vestaĵo malmulte utilas al mia animo se mi alkalkulas ĝin al mi kiel meriton, porti ĝin. Sed tiel

mi ne sentas; tiu ĉi izolita viro plenigas min per grandega feliĉo; jen ĉio. Tiuj batalegoj, kiujn la mondo travivas en tiu ĉi tempo, sin ne montras tie ĉi antaŭ miaj okuloj en sia nobeleco. Tie ĉi mi sentas mian korpon levita en preĝo kaj mian animon purigita de malriĉa viv-maniero.

Imperiestro Juliano. Ho, mia kontentigema Basilios, mi tamen kredas, ke vi aspiras pli multe. Se oni parolis vere, via fratino kunigas ĉirkaŭ si aron da junaj virinoj, kiujn ŝi instruas laŭ sia ekzemplo. Kaj vi mem elektis dek du junulojn, same kiel via galilea majstro. Kian intencon vi havas pri ili?

Basilios de Cezarea. Disirigi ilin en ĉiujn landojn, por plifortigi miajn fratojn en la bataloj.

Imperiestro Juliano. Oj! Provizitaj de ĉiuj bataliloj de la elokventeco, vi marŝigas vian armeon kontraŭ mi, kaj de kie vi prenis tiun belan grekan arton? Vi prenis ĝin el niaj instru-salonoj kaj kun kiu rajto vi posedas ĝin? Kiel spiono vi enŝteligis en nian tendaron por spionadi, kiel ni povas esti plej certe trafataj, kaj nun vi utiligas tiun sciigon je nia plej granda malprofito! Ĉu vi scias, Basilios; ne, mi ne volas plu toleri tiun nedecagon! Mi volas forbati tiun armilon el viaj manoj. Tenu vin ĉe Mateo kaj Marko kaj aliaj tiaj necivilizitaj verkistoj. Sed de nun vi ne havos la liberecon klarigi viajn iamajn poetojn aŭ saĝec-instruistojn; ĉar mi opinias, ke estas maljuste, ke vi suĉas el tiuj fontoj konon kaj profiton, en kies vereco vi eĉ ne kredas. Sammaniere estos malpermesate al ĉiuj galileaj lernantoj, eniri en niajn instru-salonojn; ĉar kion do ili volas fari tie? Steli de ni nian arton kaj uzi ĝin kontraŭ ni mem.

Basilios de Cezarea. Sinjoro, jam antaŭe mi aŭdis paroli pri tiu stranga intenco. Kaj mi devas pravigi Gregoron kiam li skribis, ke vi ne havas ion ekskluzivan rajton pri la greka religio aŭ pri greka elokventeĉo. Li pravas dirante ke ankaŭ vi uzas la skrib-literojn, kiujn ja eltrovis la Egiptoj, kaj ke vi vestas vin per la purpuro, kvankam ĝi unue estis uzata de la homoj en Tiro. Jes, sinjoro, — kaj mi diros plue: vi submetas al vi landojn kaj faras vin reganto de popoloj, kies lingvon vi ne komprenas kaj kies morojn vi ne konas. Kaj vi havas la rajton fari tion. Sed la rajton, kiun vi havas en la videbla mondo,

tiun saman rajton havas tiu, kiun vi nomas Galileano, en la nevidebla —

Imperiestro Juliano. Sufiĉe pri tio! Mi ne volas plu aŭdi tian sensencaĵon. Vi parolas, kvazaŭ ekzistus du mondregantoj kaj per tiu kontraŭstaro vi klopodas ĉie stari sur mia vojo. Vi ridinduloj! Vi metas mortinton kontraŭ vivanto. Sed vi spertos baldaŭ kiel tio staras. Vi tamen ne devas kredi, ke mi sub la zorgoj de la milito metis flanken la skribaĵojn kontraŭ vi, super kiu mi longe laboradis. Ĉu vi eble pensas, ke mi pasigas miajn noktojn dormante? Vi eraras! Por „la barb-malamanto“ mi rikoltis nur mokaĵojn, kaj eĉ de tiuj, kiuj povus havi specialan utilon el ĝi, alprenante al la koro certajn veraĵojn. Sed tio tute ne ektimigos min. Aŭ ĉu decus al viro kun la bastono en la mano, posteniĝi por aro da bojantaj hundoj? — Kial vi ridetas, virinaĉo? Kion ridindan mi diris?

Makrina. Kial, ho sinjoro, vi estas tiel ĵaluza pri unu, kiun vi nomas mortinta?

Imperiestro Juliano. Ha, mi komprenas! Per tio vi volas diri, ke li vivas.

Makrina. Mi volas diri per tio, ke vi, ho potenca sinjoro, sentas en via koro, ke li vere vivas.

Imperiestro Juliano. Mi!? Mi sentus —?

Makrina. Kion do vi malamas kaj persekutas? Ne lin, sed vian kredon al li. Kaj ĉu li ne vivas tiel multe en via malamo kaj en via persekuto kiel en nia amo?

Imperiestro Juliano. Mi konas viajn absurdajn parolmanierojn. Vi Galileanoj diras ion kaj celas per ĝi la malon. Kaj tion vi nomas elokventeco! Ho, vi mez-kvalitaj homoj! Kia malsaĝeco! Mi sentus, ke la krucumita Judo vivas? Ho, kia degenerita tempo, kiu lasas kontentigi sin per tio! Sed la homoj estas tiaj nuntempe. Malsaĝeco estas konsiderata kiel saĝeco. Kiel multege da noktoj mi maldormis kaj esploris por trovi la veran kaŭzon de la aferoj! Sed kie estas tiuj, kiuj imitas min? Multaj laŭdas mian paroladon; sed malmultaj aŭ neniu lasas konvinki sin. Sed vere, ni ne estas ankoraŭ ĉe la fino. Io stranga okazos al vi, — ia surprizaĵo. Vi ekscios, al kio celas tiu distritaĵo,

por unuigi en unuaĵo. Vi ekscios, ke ĉio tio, kion vi nun males-
timas, havas en si la belecon, — kaj la krucon, sur kiu vi pend-
igas vian konsolon, mi volas ŝanĝ-ĉarpenti en ŝtuparon por tiu,
kiun vi ne konas.

Makrina. Kaj mi diras al vi, imperiestro, ke vi estas nenio krom
skurĝo en la mano de Dio, — skurĝo, kiu devas bati nin pro
niaj pekoj. Ve al ni, ke devis fariĝi tiel! Ve al ni, ke vi deflank-
igis de la ĝusta vojo en malkonkordo kaj sename. Ne estis plu
reĝo en Izraelujo. Tial la sinjoro batis vin per frenezeco por ke
vi punadu nin. Kiun spiriton li do mallumigis por ke ĝi furiozu
kontraŭ nin! Kiun florantan arbon li do senbranĉetigis je vergo-
faskoj por niaj pekŝarĝitaj ŝultroj! Antaŭdiroj avertis vin
kaj vi ne atentis ilin. Voĉoj vokis vin, kaj vi ne aŭdis ilin.
Manoj skribis sian fajroskribaĵon sur la muro por vi, kaj vi
estingis la skribaĵon ne klarigante ĝin al vi.

Imperiestro Juliano. Basilios, mi deziras, ke mi jam pli frue
konus tiun ĉi virinon.

Basilios de Cezarea. Venu, Makrina.

Makrina. Ve al mi, ĉar mi ekvidis tiujn lumantajn okulojn! Anĝelo
kaj serpento unuigintaj en unuaĵon; la sopiro de la apostato
kaj la ruzo de la tentanto samtempe! Ho, kiel niaj fratroj kaj
fratinoj povis alte teni la esperon por venki en proksimeco de
tiu ĉi sendito. En li estas unu pli granda. Ĉu vi ne vidas, Basilios,
ke en li Dio, la Sinjoro volas batmortigi nin.

Imperiestro Juliano. Tion diris vi!

Makrina. Ne mi!

Imperiestro Juliano. La unua venkita animo!

Makrina. Iru for de mi!

Basilios de Cezarea. Venu, — venu!

Imperiestro Juliano. Restu tie ĉi! Anatolos, metu gardistojn
ĉirkaŭ ili! Estas mia volo, ke vi sekvu la armeon, ne nur vi,
sed ankaŭ viaj junuloj, viroj kaj virinoj.

Basilios de Cezarea. Sinjoro, tion vi ne povas voli.

Imperiestro Juliano. Ne estas saĝe, lasi fortikaĵon post sia dorso.
Vidu, mi etendas mian manon kaj estingas tiun ĉi brulantan
sagoplumon, kiun vi pluvigis el tiu malgranda kampodomo.

Basilios de Cezarea. Ne, ne, sinjoro, — tiu ĉi tiranfarajo — Makrina. Ve, Basilios, — ĉio perdiĝis — tie ĉi kaj tie!

Imperiestro Juliano. Ĉu ne estas skribite, vi donu al la imperiestro tion, kio apartenas al la imperiestro? Mi bezonas ĉiujn manojn en tiu ĉi militiro. Vi povas flegadi miajn malsanulojn kaj vunditojn. Per tio vi servas la Galileanon samtempe; kaj se vi konsideras tion kiel vian devon, mi konsilas al vi, utiligu la tempon. Li ne povas atendi pli longe.

(Kelkaj soldatoj ĉirkaŭas Basilios'on de Cezarea kaj Makrina'n; aliaj dise rapidas tra la arbeto al la kampodometo)

Makrina. Ho suno, subiranta super la hejmolando; subiranta espero kaj subiranta lumo de la mondo! Ho, Basilios, ke ni devus sperti vidi la nokton.

Basilios de Cezarea. La lumo ekzistas.

Imperiestro Juliano. Fariĝos lume! Turnu viajn dorsojn al la vespera ruĝo, Galileanoj! Vidu orienten, kie sonĝas Helioso. Vere mi diras al vi, vi rigardos la sunreĝon de la tero.

(Li foriras dekstren, ĉiuj sekvas lin.)

(La transa flanko de Eŭfrato kaj Tigriso. Larĝa ebenaĵo kun la imperiestra tendaro; arbaretaĵoj maldekstre kaj sur la fundo malebligas la vidon sur la kurbiĝo de Tigriso. Longa netraversebla aro da ŝipomastoj estas videbla super la arbaretaĵo. Estas nubhava vespero.)

(Soldatoj kaj militistoj ĉiuspecaj estas konstruantaj la tendaron sur la ebenaĵo. Ĉiaj provizoj estas portataj de la ŝipoj. Bivaka fajro en la malproksimo. La arme kondukisto Nevita, la militestro Jovian kaj pluaj soldatestroj venas de la ŝiparo.)

Armekondukisto Nevita. Nun vidu ĉu la imperiestro ne elektis la ĝustan. Ni staras tie ĉi sen unu glavobato sur la tero de la malamiko; neniuj kontraŭbatalis al ni la transiradon trans la riveron; eĉ ne unu persa rajdisto estas videbla.

Militestro Jovian. Ne, sinjoro, sur tiu ĉi vojo la malamiko tute ne atendis nin.

Armekondukisto Nevita. Vi diras tion, kvazaŭ vi ankoraŭ pretendus, ke la elekto de tiu vojo estis nesaga.

Militestro Jovian. Jes, sinjoro, estas ankaŭ mia opinio, ke ni pli oportune estus marŝintaj laŭ iom pli norda direkto. Tie ni povus apogi nian maldekstran alon kontraŭ Armenujo, kiu estas al ni amike inklina, kaj kiu prenas ĉian bezonan nutraĵon el tiu ĉi fruktodona regiono. Sed tie ĉi? La pezaj barkoj malhelpas nian antaŭen marŝadon. Ĉirkaŭ ni sin etendas dezerta ebenaĵo, preskaŭ dezerto — ho, la imperiestro venas. Mi volas foriri, en tiu ĉi tempo li ne estas al mi indulga.

(Li foriras dekstren. En la sama momento Juliano venas de la ŝipoj kun kelkaj akompanantaj. La kuracisto Oribaces, la saĝec-instruistoj Priskos kaj Kitron kun kelkaj aliaj venas de dekstre el inter la tendoj kaj iras renkonte al la imperiestro.)

Imperiestro Juliano. Tiel ni vidas kreskadi la imperion. Ĉiu paŝo, kiun mi faras orienten, plivastigas la limojn de la imperio. *(Li piedbatas la teron)* Tiu ĉi tero apartenas al mi! Mi estas en mia imperio, ne ekster ĝi — Nu, Priskos —?

Filozofa Priskos. Nekomparebla imperiestro, via ordono estas plenumita. Kion vi songis tiel mirakle, tion ni laŭte igis legi antaŭ ĉiuj taĉmentoj de la armeo.

Imperiestro Juliano. Bone, bone, kaj kiun efikon ŝajnis havi mia songo al la soldatoj?

Filozofa Kitron. Kelkaj laŭdis vin laŭtvoĉe kaj nomis vin la dia; aliaj tamen —

Filozofa Priskos. Tiuj aliaj estis Galileanoj!

Filozofa Kitron. La plej multaj el la aliaj estis Galileanoj, kaj ili batis sian bruston kaj eligis laŭtajn vekriojn.

Imperiestro Juliano. Mia laboro ne finiĝos per tio. La bustaj statuoj, kiujn mi farigis, por starigi en la de mi submetotaj urboj, estos dismetataj en la tendaro, ĉe ĉiuj tabloj, kie la trezoristo dividas la salajron al la soldatoj. Ĉe la flankoj de la statuoj estos bruligataj lampoj kaj antaŭ ili brulos karbujoj kun

bonodorantaj herbajoj, kaj ĉiu soldato jetos kelkajn incenserojn sur la fajron, kiam li alpaŝas por ricevi sian salajron.

Kuracisto Oribaces. Mia indulga imperiestro, pardonu min, sed — ĉu tio estas konsilinda?

Imperiestro Juliano. Kial ne konsilinda? Mi miras pri mia Oribaces.

Filozofo Priskos. Ho, sinjoro, vi devas ja miri! Ĉu ne estus konsilinde, ke —

Filozofo Kitron. Ĉu Juliano ne kuraĝus fari, kion malpli diaj viroj kuraĝis fari?

Imperiestro Juliano. Mi opinias, la plej riskeme estus tie ĉi, ŝtelkaŝi la konsiliojn de la misteraj potencoj. La tempo venis, ke la diajtoj metis sian potencon en homajn manojn — kion ni povas konkludi el multaj antaŭ-diroj — tial estus plej sendanke, ŝtelkaŝi tion. En la nunaj cirkonstancoj tiel plendangeraj, tute ne estas indiferece, ke la soldatoj montras sian estimegon al malĝusta potenco ĉar ili devas ja alvoki tute alian. Mi diras al vi Oribaces, kaj mi diras al la aliaj, — se mi trovus iun alian, kiu volus limigi la imperiestran potencon, — ĝuste tio estas vera malpiaĵo, kaj tial mi estu devigata kontraŭbatali tion. Ĉu Plato jam ne anoncis la veron, ke nur diaĵo povas regi la homojn? Kion li volas diri per tio? Respondu al mi, — kion li volis diri? Mi estas malproksime certigi, ke Plato, la neriproĉinda saĝulo, kvazaŭ en profetaĵo celis per tio unu solan homon, eĉ la plej bonegan. Sed mi pensas, ni ĉiuj estis atestantoj de la malhelpoj, kiuj estiĝas, kiam la plej alta potenco estas egale dividita inter pluraj manoj. — Sed sufiĉe pri tio. Mi jam ordonis, ke la imperiestraj statuoj estu dismetataj en la tendaro. He, kion vi serĉas tiel urĝe, Eŭterios?

(La dominspektoro Eŭterios, akompanata de viro kun supren falditaj vestoj, venas de la ŝipoj.)

Dominspektoro Eŭterios. Majesta imperiestro, tiu ĉi antioĥiano estas sendita de sia satrapo Aleksandro, kaj portas al vi leteron, kiu estas tre grava, kiel li diras.

Imperiestro Juliano. He, montru ĝin! Alportu lumon!

(Torĉo estas alportata; la imperiestro malfermas la leteron kaj legas.) Ĉu povas esti eble! Lumigu pli bone! Jes, tie ĝi estas skribita; — kaj tie ĉi —; kion do? — Tio superas ĉion, kion mi povis imagi!

Armekondukisto Nevita. Malbonaj sciigoj el la okcidentaj landoj, sinjoro?

Imperiestro Juliano. Nevita, diru al mi: kiom da tempo ni bezonos por atingi Ktesifon?

Armekondukisto Nevita. Ktesifo estos atingebla en ne pli malmulte ol tridek tagoj.

Imperiestro Juliano. Ni devos atingi ĝin en pli mallonga tempo! En tridek tagoj! Tuta monato! Kaj dum ni rampadas antaŭen tie ĉi, mi tolerus, ke tiuj frenezuloj —

Armekondukisto Nevita. Vi scias, sinjoro, ke ni pro la ŝipoj devas sekvi ĉiujn kurbigojn de la rivero. Ĝi estas rapidfluanta kaj krom tio, malprofunda kaj ŝtoneca; mi opinias, ke estas neeble antaŭeniri pli rapide.

Imperiestro Juliano. Tridek tagoj! Kaj poste la urbo devos esti ekposedita, la Persoj forkurintaj kaj la paco farita. Kiom da tempo do prenos ĉio tio? Kaj tamen kelkaj estis inter vi, kiuj fari sal mi la malsaĝan proponon laŭiri ankoraŭ pli malrektan vojon. Ha, ha, oni celas mian pereon!

Armekondukisto Nevita. Sinjoro, estu kvieta, la armeo antaŭeniru kiel eble plej rapide.

Imperiestro Juliano. Tio estas necesa. Ĉu vi povas imagi, kion sciigas Aleksandro? La frenezeco de la Galileanoj transiras ĉiujn limojn de post mia foriro. Kaj tiu malordo pligrandiĝas ĉiutage. Ili komprenas, ke mia venko en Persujo trenos post si ilia ruiniĝo; kaj kun tiu senhonta Gregoro kiel kondukanto ili nun staras kiel malamika armeo post mia dorso; en la frigiaj regionoj sekrete prepariĝas aferoj, kiujn neniu povas kompreni —

Armekondukisto Nevita. Kion signifas tio, sinjoro? Kion do ili entreprenas?

Imperiestro Juliano. Kion ili entreprenas? Preĝantoj, predikistoj kaj kantistoj anoncas la pereon de la mondo. Ho, se nur estus tio; — sed ili kuntrenas kun si niajn anojn kaj entiras ilin en sian ribelan ligan. En Cezarea la komunumo elektis la juĝiston Eŭsebioson sia episkopo — Eŭsebios, nebaptita viro, — kaj tiu eraranto akceptis tian oficon, kiu estas senvalora laŭ iliaj propraj eklezi-leĝoj. Sed tio ne estas ankoraŭ la plej malbona. Pli malbone, multfoje pli malbone estas, ke Atanasios revenis en Aleksandrio'n.

Armekondukisto Nevita. Atanasios?

Filozofo Priskos. Tiu enigma episkopo, kiu antaŭ ses jaroj malaperis en la dezerton?

Imperiestro Juliano. Eklezia unuiĝo forpelis lin pro lia nedeca fervoro. La Galileanoj estis obeemaj sub la regado de mia antaŭulo. Jen, imagu, nun tiu furiozanta fanatikulo revenis en Aleksandrio'n. Lia enmarŝo similis tiun de reĝo; la vojo estis kovrita per tapiŝoj kaj verdaj palmobranĉoj. Kaj kio okazis poste? Tiun saman nokton eksplodis ribelo de la Galileanoj. Georgio, ilia laŭleĝa episkopo, tiu honesta kaj bonvola viro, kiun ili akuzis pro malfervoreco pri kredo, estis mortigata, antaŭ ol li mortis, li estis deŝirata en la stratoj de la urbo.

Armekondukisto Nevita. Sed, sinjoro, kiel povis okazi ĉio tio? Kie do estis la guberniestro Artemios?

Imperiestro Juliano. Prave vi demandis, kie estis Artemios. Mi tion diros al vi. Artemios transiris al la Galileanoj! Artemios mem kun armiloj en la mano perforte eniris la Serapeon, tiun plej belegan templon de la mondo, li rompis la statuojn, prirabis la altarojn kaj neniigis tiun grandegan librotrezoron, kiun ni nepre bezonos dum tiu ĉi eraranta kaj malsaĝa tempo, kaj kiun mi povus priplori kiel amikon forŝiritan de la morto, se mia kolero permesus al mi elverŝi larmojn.

Filozofo Kitron. Vere, tio superas ĉion imageblan!

Imperiestro Juliano. Kaj ne esti kapabla atingi tiujn mizerulojn por punegi! Devi esti atestanto de tiaj ekscesoĵ disvastigantaj ĉiam pli malproksimen! — Tridek tagoj, diras vi! Kial oni hezitas? Kial oni starigas la tendaron? Kial oni dormas?

Ĉu miaj arme kondukistoj ne scias kiel multe ni riskas? Ni faru milit-konsiliĝon. Kiam mi pripensas, kion la macedona Aleksandro faris en tridek tagoj —

(La militestro Jovian, akompanata de perse vestita viro, sen armiloj, venas de la tendaro.)

Militestro Jovian. Ne koleru, sinjoro, ke mi venas antaŭ viaj okuloj; sed tiu ĉi fremdulo —

Imperiestro Juliano. Persa militisto!

La Perso (*fetas sin teren*) Ne militisto, ho potenculo!

Militestro Jovian. Li venis sen armiloj surĉevale trans la ebenaĵon kaj sin prezentis ĉe la antaŭposteno —

Imperiestro Juliano. Sekve viaj samlandanoj estas proksime?

La Perso. Ne, ne!

Imperiestro Juliano. Sed de kie vi do venas?

La Perso. (*ŝirmalfermas siajn vestojn*) Rigardu tiujn ĉi brakojn, reganto de la mondo, ili estas sangkovritaj pro la rustiĝintaj katenringoj. Palpu tiun ĉi vundkovritan ŝiritan dorson. Mi venas de la turmentejo.

Imperiestro Juliano. Ha, vi forkuris de la reĝo Saporo?

La Perso. Jes, ho potenculo, kiu scias ĉion! Ĝis nun mi estis en granda favoro ĉe la reĝo Saporo; ĉe via alproksimiĝo mi havis la kuraĝon antaŭdiri lin, ke tiu ĉi milito estos lia ruiniĝo. Ĉu vi scias, sinjoro, kiel li rekompencis min? Mian edzinon li donis al siaj pafarkistoj de la montoj; miajn infanojn li vendigis kiel sklavojn, tutan mian posedaĵon li igis dividi inter siaj servistoj; min mem li turmentigis dum naŭ tagoj. Poste li ordonis al mi forrajdi kaj morti kiel besto sur la stepo.

Imperiestro Juliano. Kaj kion vi deziras de mi?

La Perso. Kion mi deziras de vi post tia traktado? Mi volas helpi vin neniigi mian persekutinton.

Imperiestro Juliano. Ho, vi turmentita viro, kiel vi povos helpi?

La Perso. Mi povas pruntedoni flugilojn al la maleoloj de viaj militistoj.

Imperiestro Juliano. Kion vi volas diri per tio? Ekstaru kaj diru al mi, kion vi celas.

La Perso (*ekstaras.*) Estis neniu en Ktesifo, kiu pensis, ke vi elektos tiun ĉi vojon —

Imperiestro Juliano. Tion mi scias.

La Perso. Nun tio ne estas plu sekreto.

Imperiestro Juliano. Vi mensogas, viro, vi Persoj scias nenion pri miaj intencoj.

La Perso. Sinjoro, vi, kies saĝeco devenas de la fajro kaj de la suno, vi scias bone, ke miaj samlandanoj konas nun viajn intencojn. Vi transiris la riveron per viaj ŝipoj; tiuj ŝipoj, pli ol mil en nombro, kaj ŝarĝitaj kun ĉio, kion bezonas la armeo, estos tirataj kontraŭfluen sur la Tigriso, kaj la armeo marŝos antaŭen flanke de la ŝiparo.

Imperiestro Juliano. Nekredeble —!

La Perso. Kiam la ŝipoj estos venintaj kiel eble plej proksime de Ktesifo, — nome du dumtag-vojaĝojn de la urbo — vi ekmarŝos al ĝi, ĉirkaŭos ĝin kaj devigos la reĝon Saporo, kaptulaci.

Imperiestro Juliano. (*rigardas ĉirkaŭe.*) Kiu perfidis nin?

La Perso. Tiu intenco ne estas plu farebla. Miaj samlandanoj konstruis rapidege ŝton-digojn en la riverfluejo, kaj sur ili rompiĝos viaj ŝipoj.

Imperiestro Juliano. Homo, ĉu vi scias, kia estos via sorto, se vi ne parolas la veron?

La Perso. Mia korpo estas en viaj manoj, ho potenculo! Se mi ne parolas la veron, vi povos bruligi min viva.

Imperiestro Juliano (*al Nevita*). La rivero estas barita, semajnoj pasos antaŭ ol ni povos refari ĝin ŝipirebla.

Armekondukisto Nevita. Se tio povos esti farata, sinjoro!
La bezonaj iloj mankas —

Imperiestro Juliano. Kaj io tia okazos nun, — nun, kiam ni devas antaŭenmarŝi plej rapide!

La Perso. Ho, reganto de la mondo, mi diris al vi, ke mi povas pruntedoni flugilojn al via armeo.

Imperiestro Juliano. Parolu, ĉu vi scias pli mallongan vojon?

La Perso. Se vi promesas, rehavigi al mi post la venko, mian ŝtelitan proprajon kaj krom tio novan edzinon de alta naskiĝo, tiam mi povos —

Imperiestro Juliano. Mi promesas al vi ĉion; parolu — parolu!

La Perso. Ekiro la vojon rekte tra la ebenaĵoj kaj vi povos en tri tagoj stari antaŭ la pordegoj de Ktesifo.

Imperiestro Juliano. Ĉu vi ne forgesas la montodorson je la transa flanko de la ebenaĵo?

La Perso. Sinjoro, ĉu vi neniam aŭdis paroli pri la stranga fendego inter la montoj?

Imperiestro Juliano. Jes, jes, pri fendego; nomita „Arimana Strato“. Ĉu estas vere, ke ĝi ekzistas?

La Perso. Antaŭ du tagoj mi rajdis tra la „Arimana Strato“.

Imperiestro Juliano. Nevita!

Armekondukisto Nevita. Vere, sinjoro, se tio estas —

Imperiestro Juliano. Mirakla helpo en la mizero!

La Perso. Sed se vi volas ekmarŝi laŭ tiu vojo, ho potenculo, tiam ne tempo estu perdata. La persa armeo, kiu estis kunpremata en la nordaj regionoj, estas nun returnen marŝanta por bari la fendegon.

Imperiestro Juliano. Ĉu vi scias tion kun certeco?

La Perso. Se vi hezitas, vi spertos tion mem.

Imperiestro Juliano. Kiom da tagoj bezonos viaj samlandanoj por veni tien?

La Perso. Kvar tagojn, sinjoro!

Imperiestro Juliano. Nevita, en tri tagoj ni devos esti transe de la fendego.

Armekondukisto Nevita. (al la Perso.) Ĉu estos al ni eble atingi la fendegon en tri tagoj?

La Perso. Jes, granda militisto, estos eble, se vi uzos la noktojn.

Imperiestro Juliano. La tendaro estos malkonstruata! Ne dormon! Ne ripozon, nek halton ni ĝuos! En kvar aŭ ekstreme en kvin tagoj mi devas stari antaŭ Ktesifo. — Pri kio vi meditas? Ha, mi scias.

Armekondukisto Nevita. La ŝiparo, sinjoro!

Imperiestro Juliano. Jes, jes, la ŝiparo.

Armekondukisto Nevita. Se la persa armeo alvenos unu tagon pli malfrue ĉe la fendego ol ni, tiam ĝi sin turnos al la ŝipoj, se ĝi ne povas fari al vi alian malprofiton —

Imperiestro Juliano — kaj konkiri grandegan batalakiron, por plilongigi per ĝi la militon.

Armekondukisto Nevita. Se ni povus postlasi dudek mil soldatojn ĉe la ŝipoj, estus pli sekure —

Imperiestro Juliano. Kia ekpenso! Dudek mil? Preskaŭ triono de ĉiuj armitaj soldatoj. Kie estos tiam la batalfortoj per kiuj mi venkos? Disigita, dividita, apartigita. Ne unu viron mi povas malhavi en tia momento. Ne, ne, Nevita; sed eble troviĝas tria rimedo —

Armekondukisto Nevita (*posteniĝas*) Mia granda imperiestro —

Imperiestro Juliano. La ŝiparo devos nek enfali en la manojn de la Persoj, nek kaŭzi al ni la perdon de soldatoj. Troviĝas tria elturniĝo, diras mi! Kial vi hezitas? Kial vi ne eldiras vian opinionon?

Armekondukisto Nevita. (*al la Perso*) Ĉu vi scias ĉu la burĝoj de Ktesifo havas provizon da pano kaj oleo?

La Perso. En Ktesifo estas abundo da provizo ĉiuspeca.

Imperiestro Juliano. Kaj post kiam ni konkiris la urbon, la tuta riĉa regiono kuŝos antaŭ ni.

La Perso. La burĝoj volas malfermi por vi la pordegon, sinjoro! Mi ne estas la sola, kiu malamas la reĝon Saporo. Ili ribelas kontraŭ li kaj falos antaŭ viaj piedoj, kiam vi venos al ili neatendite per la potenco de la teruro, kaj kun via kunigitaj fortoj.

Imperiestro Juliano. Tre ĝuste; tre ĝuste!

La Perso. Forbruligi la ŝipojn, sinjoro!

Armekondukisto Nevita. Ha!

Imperiestro Juliano. Via malamo vidas dum via fideleco palpserĉas en la mallumo, Nevita!

Armekondukisto Nevita. Mia fideleco vidis, sinjoro; sed ĝi dolorploris pro tio, kion ĝi vidis.

- Imperiestro Juliano. Ĉu tiuj ŝipoj ne estas kvazaŭ katenoj sur niaj piedoj? En la tendaro ni havas provizon por kvar tagoj. Estas bone se la soldatoj ne estos ŝarĝataj tro multe, kaj al kio utilas la ŝipoj? Ni ne havas plu riveron por transiri.
- Armekondukisto Nevita. Sinjoro, se estas vere via volo —
- Imperiestro Juliano. Mia volo, — mia volo? Ho, en vespero kiel tiu ĉi — plena de uragano —; kial fulmo ne povus rapidi malsupren kaj —
- Mistikisto Maksimos (*venas rapide de maldekstre*). Favorata filo de la suno, aŭdu, aŭdu!
- Imperiestro Juliano. Ne nun, mia Maksimos!
- Mistikisto Maksimos. Nenio estas pli grava ol tio ĉi, vi devas aŭskulti al mi.
- Imperiestro Juliano. En la nomo de la feliĉo kaj de la saĝeco, parolu, mia frato!
- Mistikisto Maksimos (*kondukas lin flanken kaj parolas mallaŭte.*) Vi scias, ke mi serĉadis kaj esploradis en libroj kaj per antaŭdiroj, por ekscii la rezulton de tiu ĉi milito.
- Imperiestro Juliano. Mi scias, vi povis antaŭdiri al mi nenion.
- Mistikisto Maksimos. La aŭguroj parolis kaj la skribaĵoj samopiniis. Sed la respondo, kiun mi ĉiufoje ricevis, estis tiel stranga, ke mi devis kredi, ke mi malbone kalkulis.
- Imperiestro Juliano. Sed nun —?
- Mistikisto Maksimos. Kiam ni formarĝis de Antiohia, mi serĉis konsilon en la sibilnaj libroj —
- Imperiestro Juliano. Jes, jes —!
- Mistikisto Maksimos. En tiu ĉi momento la respondo venis al mi; leterportisto de la guberniestro el Antiohia alportis ĝin.
- Imperiestro Juliano. Ha, Maksimos, — kaj ĝi sciigas —?
- Mistikisto Maksimos. Ĝi sciigas same kiel antaŭdiroj kaj skribaĵoj diris al mi, kaj nun mi kuraĝas ĉion klarigi. *Goju*, mia frato, — vi estas nevundebla en tiu ĉi milito.
- Imperiestro Juliano. La sciigo — la sciigo — —

Mistikisto Maksimos. La sibilnaj libroj diras: „Juliano estu singarda je la frigiaj regionoj.”

Imperiestro Juliano (*posteniĝas*). La frigiaj —? Ha, Maksimos!

Mistikisto Maksimos. Kial vi paliĝas, mia frato?

Imperiestro Juliano. Diru min, kara instruisto, — kiel vi klarigas tiun respondon?

Mistikisto Maksimos. Ĉu pli ol unu klarigo estas pensebla? La frigiaj regionoj? Kion vi havas por fari en Frigio? En Frigio, — regiono, kuŝanta tute flanke, malproksime post vi; kaj kien vi neniam bezonas direkti la piedon? Neniu danĝero minacas vin, ho feliĉulo — tio estas la senco.

Imperiestro Juliano. Tiu misterplena respondo havas duoblan signifon. Neniaj danĝeroj minacas min en la batalo — sed de tiu malproksima regiono. — Nevita, Nevita!

Armekondukisto Nevita. Sinjoro —?

Imperiestro Juliano. Sekve en Frigio? Aleksandro skribis pri misterplenaj aferoj fariĝontaj en Frigio. Iam estis profetata ke la Galileano revenos. — Forbruligu la ŝiparon, Nevita!

Armekondukisto Nevita. Sinjoro, ĉu tio estas via firma, neŝanĝebla volo —?

Imperiestro Juliano. Forbruligu! Ne hezitu, kaŝitaj danĝeroj minacas nin post nia dorso. (*Al unu el la soldatestroj*). Atentu tiun fremdulon. Li utilos nin kiel gvidanto. Refreŝigu lin per manĝaĵo kaj trinkaĵo, kaj lasu lin bone ripozi.

Milistestro Jovian. Mia imperiestro, mi petegas vin, ne fidu tro multe la eldiron de tia transkurinto.

Imperiestro Juliano. Aha — vi ŝajnas ektimigita, mia galileana konsilanto. Ĉi tio ne estas laŭ via deziro. Eble vi scias pli multe ol vi kuraĝas diri. Iru, Nevita, kaj forbruligu la ŝipojn.

(*La armekondukisto Nevita sin klinas kaj foriras maldekstren, la soldatestro forkondukas la Person maldekstren.*)

Imperiestro Juliano. Perfidulo en mia propra tendaro! Atendu, atendu, — mi tamen malkovros tiun ruzegecon. La armeo ekmarŝu! Iru, Jovian kaj zorgu pri tio, ke la antaŭ-guardio

- ekmarŝu antaŭ la daŭro de unu horo. La Perso konas la vojon.
Iru!
- Militestro Jovian. Kiel vi ordonas, mia alta imperiestro! (*foriras dekstren.*)
- Mistikisto Maksimos. Vi forbruligas la ŝipojn? Sendube vi intencas ion grandan.
- Imperiestro Juliano. Mi dezirus scii, ĉu la macedona Aleksandro estus kuraĝinta tion.
- Mistikisto Maksimos. Ĉu Aleksandro sciis, kie minacis la danĝero?
- Imperiestro Juliano. Vere; vere! Mi scias tion. Ĉiuj triumportantaj potenculoj estas en interligo kun mi. Antaŭdiroj kaj aŭguroj malkaŝas sian misterplenan sciencan je profito de mia imperio. Ĉu oni ne diras pri la Galileano, ke la spiritoj venis kaj servis lin? — Kiun servas nun la spiritoj? Kion diras la Galileano, se li estus inter ni nevidebla?
- Mistikisto Maksimos. Li diras, la tria regno estas proksime.
- Imperiestro Juliano. La tria regno venis, Maksimos! Mi sentas ke la Mesio de la mondo vivas en mi. La spirito estiĝis karno, kaj la karno estiĝis spirito! Ĉio, kio estas kreita, kuŝas interne de miaj volo kaj potenco. Vidu, vidu — jen supreniras la unuaj fajreroj. La flamoj lekas la rigilaron kaj supren rampas en la densan mastaron (*Vokante al la fajro.*) Brulu! brulu!
- Mistikisto Maksimos. La vento antaŭsentas vian volon. Ĝi plifortiĝas kaj servas vin.
- Imperiestro Juliano (*kun ordonanta etendita mano.*) Fariĝu ŝtormo! Pli okcidenten! Mi ĝin volas.
- Soldatestro Fromentinos (*venante de dekstre.*) Permesu al mi, averti vin. Danĝera malkvieto eksplodis en la tendaro.
- Imperiestro Juliano. Mi ne toleras plu malkvieton, la armeo ekmarŝu!
- Soldatestro Fromentinos. Jes, jes, mia imperiestro, sed la obstinaj Galileanoj —
- Imperiestro Juliano. La Galileanoj? Kio okazas pri ili?

Soldatestro Fromentinos. Kiam la trezoristoj antaŭ nelonge volis pagi la salajron al la soldatoj, oni estis stariginta viajn statuojn antaŭ la pagotabloj —

Imperiestro Juliano. Tiel okazu ĉiam.

Soldatestro Fromentinos. Al ĉiu sin prezentanta soldato estis ordonite ĵeti incenson en la karbejon —

Imperiestro Juliano. Jes, jes.

Soldatestro Fromentinos. Multaj el la galileaj soldatoj obeis, ne pensante pri tio; sed aliaj rifuzis —

Imperiestro Juliano. Kion !? Ili rifuzis?

Soldatestro Fromentinos. Komence, sinjoro; sed kiam la trezoristoj diris al ili, ke tio estas malnova kutimo, kiu denove estos enkondukata, havanta nenion por fari kun la diaj aferoj —

Imperiestro Juliano. Aha; kio okazis poste?

Soldatestro Fromentinos. Ili obeis kaj faris, kion oni ordonis al ili.

Imperiestro Juliano. Ĉu vi vidas, ili obeis.

Soldatestro Fromentinos. Sed poste, sinjoro, niaj propraj soldatoj ridis pri ili kaj mokis dirante nepripense: ili farus plej bone forigi la krucon kaj la fiŝosignojn, kiujn ili kutimas skrapii sur siaj brakoj, ĉar ili estis adorintaj la dian imperiestron.

Imperiestro Juliano. Jes, jes! Kaj la Galileanoj?

Soldatestro Fromentinos. Ili laŭte eklendegis — —; aŭdu, sinjoro, aŭdu, estas neeble, priskribi tion.

(Oni aŭdas sovaĝajn ekkriojn ekstere inter la tendoj.)

Imperiestro Juliano. La furiozantoj! Obstineco ĝis la fino. Ili ne scias, ke la laboro de ilia majstro estas rompita.

(La kristanaj soldatoj venas ĵetigante sur la ebenaĵon. Unuj frapas siajn brustojn, aliaj disŝiras siajn vestojn, ĉio sub ve-kaj plendkrioj.)

Soldato. Kristo mortis por mi, kaj mi forlasis lin!

Alia Soldato. Ho vi punanta Sinjoro en la ĉielo, batu min, mi adoris falsajn diojn!

La Soldato Agaton. La diablo sur la imperiestra seĝo mortigis mian animon! Ve, ve, ve!

Aliaj soldatoj (*forŝirante la plumbajn signojn, kiujn ili portas ĉirkaŭ la kolo*). Ni ne volas servi idolojn!

Ankoraŭ aliaj soldatoj. La di-malestimanto ne estas nia reganto!
Ni volas hejmiri! hejmiri!

Imperiestro Juliano. Fromentinos, kaptu tiujn frenezulojn!
Batu ilin teren!

(Fromentinos kaj aliaj el la ĉirkaŭstarantoj estas ŝetontaj sin sur la kristanajn soldatojn. En la sama momento disvastiĝas lumanta brilo; la flamoj de la ŝipoj altiĝas en la aeron.)

La kondukantoj de la soldatoj. (*rigiditaj pro ektimego*.) La ŝiparo brulas!

Imperiestro Juliano. Jes, la ŝiparo brulas! Kaj brulas ankoraŭ io alia. Sur tiu ruĝa, fumanta ŝtiparo brulas la krucumita Galileano ĝis cindro; kaj la imperiestro forbrulas kun la Galileano. Sed el la cindro sin levas — kiel tiu mirinda birdo — la dio de la tero kaj la imperiestro de la animo en unu, en unu, en unu!

Pluraj voĉoj. Frenezeco ekkaptis lin!

Armekondukisto Nevita (*venas de maldekstre*.) Estas plenumite!

Militestro Jovian. (*venas rapide de la tendaro*.) Estingu, estingu, estingu!

Imperiestro Juliano. Brulu, brulu!

Soldatestro Amian (*venante de la tendaro*). Sinjoro, vi estas perfidita! Tiu persa transkurinto estis trompisto —

Imperiestro Juliano. Vi mensogas, homo! Kie li estas?

Soldatestro Amian. Li forkuris!

Militestro Jorian. Li malaperis kiel ombro —

Armekondukisto Nevita. Forkuris!

Militestro Jovian. Kiuj akompanis lin, diris, ke li kvazaŭ malaperis de sub iliaj manoj.

Soldatestro Amian. Lia ĉevalo ankaŭ malaperis el la ĉirkaŭbarila loko, kie ĝi staris, la fremdulo sendube forkuris trans la ebenajon.

Imperiestro Juliano. Estingu la fajron, Nevita!

Armekondukisto Nevita. Neeble, mia imperiestro!

Imperiestro Juliano. Estingu, estingu; tio devas esti ebla!

Armekondukisto Nevita. Nenio estas pli neebla. Ĉiuj albordigkordegoj estas tratranĉitaj; ĉiuj ŝipoj naĝas almaren kiel brulantaj ŝipruinoj.

Reĝo Hormisdas (*venas el inter la tendoj.*) Malbenindaj estu miaj samlandanoj! Ho, sinjoro, kiel vi povis aŭskulti tiun ruzulon.

Voĉo el la tendaro. La ŝiparo brulas! Ni estas apartigitaj de la patrujo! La morto estas antaŭ ni!

La Soldato Agaton. Idolo, idolo — ordonu al la ŝtormo silentiĝi; ordonu al la flamoj estingiĝi!

Militestro Jovian. La ŝtormo pligrandiĝas. La fajro ŝajnas esti ondiĝanta maro.

Mistikisto Maksimos. (*flustras*) Estu singardema je la frigiaj regionoj.

Imperiestro Juliano. (*krias al la tendaro*) Lasu la ŝiparon bruli! Antaŭ la daŭro de sep tagoj vi bruligos Ktesifon ĝis cindro!

AKTO KVINA.

(Sovaĝa ŝtonheca dezert-ebenaĵo sen arboj kaj sen herbo. Dekstre staras la tendo de la imperiestro. Estas posttagmeze.)

(Laciĝintaj soldatoj kuŝas are sur la ebenaĵo. Foje kaj foje arme-taĉmentoj pretermarŝas de maldekstre dekstren. Ekster la tendo iras tien kaj reen la filozofi-instruistoj Priskos kaj Kitron kun malmultaj aliaj akompanantoj de la imperiestro, atendantaj senpacience kaj malkviete. Anatos, la ĉefo de la korpogardistoj staras kun soldatoj antaŭ la malfermaĵo de la tendo.)

Filozofo Kitron. Ĉu ne estas nekompreneble, ke tiu militkonsiligo povas daŭri tiel longe?

Filozofo Priskos. Jes, vere, oni opinius, ke la elekto estus nur inter du aferoj: marŝadi antaŭen aŭ returnen.

Filozofo Kitron. Tion neniu komprenas. — Diru do, bona Anatos, kial, en la nomo de la dioj, ni ne marŝas antaŭen?

Filozofo Priskos. Kial oni timigis nin kaj ekhaltis tie ĉi en la mezo de la dezerto?

Korpogardistestro Anatos. Ĉu vi vidas la tremetantan aerstrion tie sub la ĉielrando en la nordo, okcidento kaj sudo?

Filozofo Kitron. Jes, jes, tio estas la varmego.

Korpogardistestro Anatos. Tio estas la stepo, kiu brulas.

Filozofo-Priskos. Kion vi diras? Ĉu la stepo brulas?

Filozofo Kitron. Ne moku do tiel malice, bona Anatos! Diru al ni, kio tio estas?

Korpogardistestro Anatolos. La stepo brulas, diras mi. Tie, kie finiĝas la dezerto, la Persoj ekbruligis la herbon. Ni povas nenien iri, antaŭ ol la tero malvarmetiĝis.

Filozofo Kitron. Ho, ĉu tio ne estas teruriga? Kiaj barbaroj! Uzi tiajn rimedojn —!

Filozofo Priskos. Sekve restas nenia elekto. Sen vivorimedoj, sen akvo —; kial ni ne iras returne?

Korpogardistestro Anatolos. Ĉu trans Tigrus kaj Eŭfrato?

Filozofo Kitron. Kaj la ŝiparo estas forbruligita! Kiel do oni faras tiun ĉi militon? Ho, kial la imperiestro ne pensis pli multe pri siaj amikoj! Kiel mi rehejmiĝos?

Korpogardistestro Anatolos. Vi same kiel ni aliaj, amiko!

Filozofo Kitron. Kiel vi aliaj? Kiel vi aliaj!? Jes, tion vi trafis diris. Tio estus tute alia afero rilate al vi. Vi estas militistoj. Tia estas via metio elteni maloportunaĵojn, al kiaj mi ne kutimiĝis. Mi ne sekvis la imperiestron por suferi tiom da malbono. Ĉi tie min turmentas kuloj kaj venenaj muŝoj; — rigardu, kiel aspektas miaj manoj!

Filozofo Priskos. Tre certe ne tial ni venis tien ĉi. Ni prenis sur nin, sekvi la armeon por verki laŭd-paroladojn pri la venkoj, kiujn la imperiestro celis fari. Kio estiĝis el tiuj venkoj? Kion oni efektivigis en la ses plenplenaj semajnoj post la bruligado de la ŝiparo? Oni ruinigis kelkajn forlasitajn vilaĝojn el la plej mizeraj specoj. Oni montris en la bivako kelkajn kaptitojn, kiujn la antaŭgvardio laŭdire kaptis. Mi vere ne scias en kiu batalo tio okazis! Kaj mi opinias, ke tiuj kaptitoj pli multe aspektas kiel kaptitaj paŝtistoj kaj kamparanoj —

Filozofo Kitron. Kial oni forbruligis la ŝiparon!? Ĉu mi jam ne tuj diris, ke tio estiĝos fonto de malfeliĉoj?

Korpogardistestro Anatolos. Tion mi tamen ne aŭdis —

Filozofo Kitron. Kion? Ĉu mi ne diris tion? Ĉu vi ne aŭdis, Priskos, ke mi tion diris?

Filozofo Priskos. Mi vere ne scias, amiko; sed mi scias, ke mi vane parolis kontraŭ tiu malfeliĉa entrepreno. Jes, mi povas diri, ke mi estis kontraŭ la tuta militiro en tiu ĉi sezono. Kia trorapideco! Kie do la imperiestro havis siajn okulojn? Ĉu

tio estas tiu sama heroo, kiu tiel feliĉe batalis ĉe la Rejno?
Ĉu oni ne devas kredi ke la blindeco aŭ alia malsano lin atakis?

Korpogardistestro Anatolos. Ŝs, ŝs; — kion vi diras?

Filozofo Kitron. Tio certe estis tre nedece dirita de nia Priskos. Sed mi mem devas konfesi, ke mi ekvidis ĉe nia kronita filozofiamanto kompatindan maleston pri saĝeco en multaj el liaj lastaj agadoj. Kia senpripensaĵo estis starigi sian statuon en la tendaro kaj honorigi sin kvazaŭ li estus diaĵo! Kiel malsaĝe estis mokinsulti publike tiun mirindan instruiston de Nazaret, pri kiu oni tamen devas diri, ke li posedas tian eksterordinaran potencon, kiu alie povus eble savi nin sub tiuj ĉi dangerplenaj okazoj. Ha, tie alvenas Nevita mem. Nun ni ekaŭdos.

(La armeestro Nevita venas el la tendo. En la malfermaĵo li sin turnas kaj faras mansignojn internen. Tuj poste eliras la kuracisto de la imperiestro.)

Armeestro Nevita. *(kondukas la kuraciston flanken.)* Diru al mi malkaŝe, Oribaces, — ĉu estas io je la prudento de la imperiestro?

Kuracisto Oribaces. Kiel tiu ekpenso trafis vin?

Armeestro Nevita. Kiel mi alie devas klarigi lian konduton?

Kuracisto Oribaces. Ho, mia amata imperiestro —!

Armeestro Nevita. Oribaces, vi devas kaŝi nenion por mi.

Filozofo Kitron. *(alproksimiĝas.)* Ho, kuraĝa armeestro, se tio ne estas altruda —

Armeestro Nevita. Poste, poste!

Kuracisto Oribaces. *(al Nevita)* Estu kvietaj, sinjoro! Ne okazos malfeliĉaĵo. Eŭterios kaj mi promesis unu la alian daŭre atenti lin.

Armeestro Nevita. Ha, vi do ne intencas diri per tio, ke—?

Kuracisto Oribaces. Estintan nokton li estis memmortigonta. Feliĉe Eŭterios ekvenis —; ho, parolu pri tio al neniu!

Armeestro Nevita. Ne perdu lin el la okuloj.

Filozofo Priskos. *(alproksimiĝas.)* Estus al mi granda konsolo ekscii, kion la milita konsiliĝo —

Armeestro Nevita. Pardonu; mi havas gravan aferon por plenumi.

(Li foriras post la tendon. La armeestro Jovian samtempe eliras el la malfermaĵo.)

Armeestro Jovian *(parolante internen.)* Okazos, mia indulga imperiestro!

Filozofo Kitron. Ha, plej bonega Jovian! Nu? Ĉu estas decidite komenci la returnen-marŝadon?

Armeestro Jovian. Mi volas konsili al neniu nomi tion returnen-marŝado. *(li foriras post la tendon.)*

Filozofo Kitron. Ho, tiuj militistoj! La anim-kvieteco de filozofi-amanto estas por ili nenio. Ha!

(Imperiestro Juliano eliras el la tendo; li estas pala kaj liaj vangoj estas kaviĝintaj. Kune kun la imperiestro venas la dominspektoro Eŭterios kaj kelkaj soldatestroj, la lastaj tuj foriras maldekstren trans la ebenaĵon.)

Imperiestro Juliano *(al la filozofi-instruistoj.)* Ĝoju nun, miaj amikoj! Ĉio baldaŭ estiĝos bona.

Filozofo Kitron. Ho, benita sinjoro. Ĉu vi trovis elirejon?

Imperiestro Juliano. Ni havas sufiĉajn elirejojn, Kitron; la ĉefa afero estas elekti la plej bonan. Nun ni volas ŝanĝi iom pri la antaŭen-marŝado de la armeo —

Filozofo Priskos. Ho, laŭdata estu via saĝeco!

Imperiestro Juliano. Tiu ĉi militiro orienten — ĝi kondukas al nenio.

Filozofo Kitron. Ne, ne, tio estas vera!

Imperiestro Juliano. Nun ni iros norden, Kitron!

Filozofo Kitron. Kion, sinjoro — norden?

Filozofo Priskos. Sekve ne okcidenten?

Imperiestro Juliano. Ne okcidenten. Tute ne okcidenten. Tio kondukos al malfeliĉaĵoj pro la riveroj. Kaj Ktesifon ni devas lasi kvieta ĝis pli malfrue. Sen ŝipoj ni ne povas pensi pri tio al militi la urbon. Estis la Galileanoj, kiuj kaŭzis la forbruligadon de la ŝipoj; mi eksciis tion kaj alion. Kiu kuraĝas nomi tion returnen-marŝado, ĉar mi iras laŭnorde? Kion vi scias pri miaj intencoj? La armeo de la Persoj sin trovas pli norde; pri tio mi

estas sufiĉe certa. Se unue mi venkobatus Saporo'n —; tio okazos per unu batalo —; en la tendaro de la Persoj mi trovos eksterordinaran kvanton da provizaĵo — Kiam mi kondukos la persan reĝon kiel kaptiton tra Antioĥia, kaj aliajn urbojn, tiam mi ja vidos ĉu la burĝoj ne falos antaŭ miaj piedoj.

(Kristanaj soldatoj marŝas kantante trans la ebenaĵon.)

Hakilo ĉe l'arboradikoj jen kuŝas;
 Por cedrojn de l'mondo faligi.
 Sur Golgota ĝermas el sango de Kristo
 La palmoj, por ne maljuniĝi.

Imperiestro Juliano. *(sekvas ilin okule.)* La Galileanoj kantas ĉiam. Kantojn pri morto kaj doloro. Tiuj virinoj, kiujn mi igis sekvi min kiel flegistinoj de malsanuloj, — ili faras al ni pli multe da malbono ol da bono. Ili instruis al la soldatoj strangajn kantojn, kiujn mi antaŭe neniam aŭdis. Tamen estonte mi volas puni nenium pro tio. Tio nur kaŭzas plej grandan sovaĝiĝon. Ĉu vi scias, Priskos, kio okazis al la plej obstinaj, kiuj antaŭ nelonge rifuzis montri la devigan respekton al la imperiestraj statuoj?

Filozofa Priskos. Antaŭ nelonge, sinjoro?

Imperiestro Juliano. Kiam, por inspirigi utilan ektimon al la samreligianoj, mi volis ekzekutigi kelkajn el tiuj homoj, tiam la plej aĝa antaŭen paŝis kaj petis kun laŭta ĝojkrio la permeson morti unua. — Aŭdu Priskos, — kiam mi eksciis tion hieraŭ —

Filozofa Priskos. Hieraŭ! Ho, sinjoro, vi eraras. Tio okazis antaŭ dek kvar tagoj.

Imperiestro Juliano. Tiel longe? Jes, jes! La Hebreoj devis migradi — kvardek jarojn en la dezerto. Ĉiuj maljunaj devis morti — nova generacio devis ekkreski, sed tiu — notu bone — tiu envenis en la landon, kiu estis promesita al ili ĉiuj.

Dominspektoro Eŭterios. Estas jam malfrue, sinjoro, — ĉu vi ne volas pensi pri manĝado?

Imperiestro Juliano. Ankoraŭ ne, mia Eŭterios! La karnoturmento estas utila por ĉiuj homoj. Jes, mi diras al vi, ni klopodu estiĝi nova generacio. Mi povas fari nenion kun vi, tia, kia vi

nun estas. Se vi deziras eliri el la dezerto, iru laŭ pura vivado. Rigardu la Galileanojn. Vi povas lerni multajn aferojn de tiuj homoj. Inter ili troviĝas neniam senhavaj nek senhelpaj; ili vivas kiel gefratoj, — precipe nun, kiam ilia obstineco devigis al mi puni ilin. Tiuj Galileanoj, sciu tion, havas en sia koro ion, al kio mi dezirus, ke vi dediĉu vin. Vi nomas vin anoj de Sokrato, de Plato, de Diogeno. Ĉu estas unu inter vi, kiu kun ĝojo mortus por Plato? Ĉu nia Priskos oferdonus sian maldekstran manon por Sokrato? Ĉu Kitron volus dehakigi siajn orelojn por Diogeno? Vere, vi ne farus tion! Mi konas vin, ho surkalkigitaj tomboj! Iru for de miaj okuloj; — mi vin ne bezonas!

(La filozofi-instruistoj foriras konsternitaj; la aliaj malproksimiĝas ĉagrene kaj flustrante. Nur la imperiestra kuracisto Oribaces kaj la dom-inspektoro Eŭterios restas ĉe la imperiestro. La ĉefo de la korpogardistoj Anatolos kun siaj soldatoj staras ankoraŭ ekster la tendo.)

Imperiestro Juliano. Kiel strange! Kiel tute nekomprenbla tio estas, ĉu ne vere Oribaces? — Ĉu vi povas klarigi al mi tiun enigmon?

Kuracisto Oribaces. Mia imperiestro, — kiun enigmon vi celas?

Imperiestro Juliano. Kun dek du maleminentaj viroj, fiŝkaptistoj, malkleraj homoj, li fondis tion.

Kuracisto Oribaces. Ho, sinjoro, tiuj pensoj senfortigas vin.

Imperiestro Juliano. Kaj kiuj tiuj estas, kiuj kuntenadis tion ĝis la hodiaŭa tago? Virinoj kaj malkleruloj plejparte —

Kuracisto Oribaces. Jes, jes, sinjoro; sed baldaŭ feliĉa ŝanĝo de la militiro —

Imperiestro Juliano. Tre vere, Oribaces; ĉio estiĝos refoje bona tuj kiam la feliĉo returnen iros. La regno de la ĉarpentist-filo falos en mallonga tempo; tion mi ja scias. Tiom da jaroj, kiom la jaro havas tagojn, tiom da tempo li regnos; kaj nun ni ja havas —

Dominspektoro Eŭterios. Mia amata sinjoro, ĉu bano ne faros al vi bonon?

Imperiestro Juliano. Ĉu vi opinias tion? — Vi povas foriri Eŭterios! Foriru! Mi havas ion por paroli kun Oribaces.

(Eŭterios foriras post la tendon. La imperiestro tirkondukas Oribaces al la alia flanko.)

Imperiestro Juliano. Ĉu Eŭterios rakontis ion al vi hodiaŭ matene?

Kuracisto Oribaces. Ne, sinjoro!

Imperiestro Juliano. Ĉu li rakontis al vi nenion pri tiu ĉi nokto —

Kuracisto Oribaces. Ne, mia imperiestro, — tute nenion. — Eŭterios estas tre silentema.

Imperiestro Juliano. Se li rakontis ion, ne kredu tion. Tute ne okazis tiel, kiel li diras. Estas li mem, kiu celas mian pereon.

Kuracisto Oribaces. Li, — via multaĝa fidela servisto!

Imperiestro Juliano. Mi gardos lin per la okuloj.

Kuracisto Oribaces. Mi ankaŭ.

Imperiestro Juliano. Ni ambaŭ gardos lin per la okuloj.

Kuracisto Oribaces. Sinjoro, mi kredas, ke vi ĝuis malmultan dormon en la pasinta nokto.

Imperiestro Juliano. Jes.

Kuracisto Oribaces. *(estas parolonta sed ekŝripensas.)*

Imperiestro Juliano. Ĉu vi scias kial mi ne dormis?

Kuracisto Oribaces. Ne, mia imperiestro!

Imperiestro Juliano. La venkinto de la mulviska ponto estis ĉe mi.

Kuracisto Oribaces. La granda Konstantino?

Imperiestro Juliano. Jes, en la lastaj noktoj mi ne ĝuis ripozon pro tiu ombro. Ĝi venas iom post meznokto kaj ne foriras antaŭ tagiĝo.

Kuracisto Oribaces. Sinjoro, tio estas la plenluno; ĝi kaŭzas ĉiam strangan efikon en via animo.

Imperiestro Juliano. Laŭ la kredo de la pratempuloj, tiaj aperaĵoj ordinare — — Kial do ne alvenas Maksimos? Sed iliaj kredoj tute ne estas fidindaj. Ni ja vidas, ke ili eraris en tiom da aferoj. Ni eĉ ne povas senkondiĉe kredi, kion ili rakontas

pri la dioj. Nek pri la ombroj kaj aliaj potencoj, regantaj la bonstaton de la homoj. Kion ni scias pri tiuj potencoj? Ni scias nenion, Oribaces, — krom iliaj kapricoj kaj malkonstanteco, pri kiuj ni havas certajn pruvojn. Mi deziras, ke Maksimos venu — (*al si mem.*) Tie ĉi? Ne estas tie ĉi, ke la danĝerminacanta uragano amasiĝas, estos en la frigiaj regionoj —

Kuracisto Oribaces. Kiuj regionoj, sinjoro, — kaj kiu uragano?

Imperiestro Juliano. Ho, nenio — nenio.

Armeestro Nevita (*venas el la dekstra flanko de la ebenaĵo.*)

Nu, mia imperiestro, la armeo ekmarŝas —

Imperiestro Juliano. Norden?

Armeestro Nevita. (*mirigita*) Kompreneble, sinjoro!

Imperiestro Juliano. Jes, sed ni atendu ĝis Maksimos —

Armeestro Nevita. Kion do signifas tio, mia imperiestro! Ne estas unu kialo por atendi. Ni troviĝas sen vivorimedoj; disigitajaroj da rajdistoj jam sin montras oriente kaj sude —

Imperiestro Juliano. Jes, jes, ni marŝu antaŭen, norden. Maksimos venos tuj. Mi venigis de la postgardio la etruskajn aŭguristojn; ili klopodu ankoraŭ unu fojon — Mi ankaŭ akiris kelkajn magiistojn, kaj ili pretendas esti tre lertaj en la haldea mistiko. Niaj propraj pastroj serĉos antaŭdirojn en dek diferencaj lokoj —

Armeestro Nevita. Sinjoro, kiel ajn estos la antaŭdiroj, mi tamen diras al vi, ke ni devas marŝadi antaŭen. La soldatoj ne estas plu fidindaj; ili bone scias, ke nia sola savo estos atingi la armenajn montojn.

Imperiestro Juliano. Ni volas tien, Nevita, — kiel ajn estos la antaŭdiroj. Sed estas granda certaĵo scii, ke oni agas laŭ la interkonsiliĝo de tiuj neesplorableblaj potencoj, kiuj, se ili volas, tiel eksterordinare povas influi la homan sorton.

Armeestro Nevita (*foriras de li kaj diras ordone.*) Anatolos, malkonstruu la tendon de la imperiestro! (*li flustras kelkajn vortojn al la korpogardist-estro kaj foriras dekstren.*)

Imperiestro Juliano. Ĉiuj aŭguraĵoj estas malfeliĉ-anoncantaj en tiuj ĉi dek kvar tagoj; kaj ĝuste tio montras, ke oni povas

havi fidon al ili; ĉar en tuta tiu tempo nia afero prosperis nur malmulte. Sed ĉu vi vidas, mia Oribaces, — ĉar mi nun havas tute novan intencon — Ha, Maksimos!

Mistikisto Maksimos. (*eniras de la ebenaĵo*). La armeo jam estas survoje, sinjoro; surĉevaliĝu!

Imperiestro Juliano. La aŭguraĵoj — la aŭguraĵoj?

Mistikisto Maksimos. He, kion — la aŭguraĵoj! Ne demandu pri aŭguraĵoj.

Imperiestro Juliano. Parolu! Mi volas scii, kion la aŭguroj respondis.

Mistikisto Maksimos. Ĉiuj aŭguroj silentas.

Imperiestro Juliano. Ĉu ili silentas?

Mistikisto Maksimos. Mi estis ĉe la pastroj; la internaĵoj de la oferbestoj montris nenian signon. Mi estis ĉe la etruskaj sorĉistoj; la flugado de la birdoj diris al ili nenion. Mi estis ankaŭ ĉe la magiistoj; iliaj skribaĵoj donis nenian respondon. Kaj mi mem —

Imperiestro Juliano. Vi mem, mia Maksimos?

Mistikisto Maksimos. Nun mi povas diri la jenon. En tiu ĉi punkto mi ekzamen-esploris la situacion de la steloj. Ili sciigis al mi nenion, Juliano.

Imperiestro Juliano. Nenion — Silentado — Silentado — Silentado, kvazaŭ la sundisko estus eklipsonta. Sola! Ne plu estas ponto inter mi kaj la spiritoj. Kie vi estas nun, ho blanka vel-brilanta ŝiparo, kiu venis kaj iris dum tagbrilo kaj portis sciigon inter tero kaj ĉielo? La militŝipoj forbrulis. Same tiu ĉi forbrulis. Ho, ĉiuj miaj brilantaj ŝipoj. Aŭ kion, Maksimos, — kion vi opinias pri tio?

Mistikisto Maksimos. Mi kredas al vi.

Imperiestro Juliano. Jes, jes, — faru tion!

Mistikisto Maksimos. La volo de la mondo metis sian potencon en vian manon! tial ĝi silentas.

Imperiestro Juliano. Tiel ni volas klarigi tion. Kaj ni agos laŭ tio, — kvankam ni prefere dezirus ke — — Ho, tiu silentado! Stari tiel tute sola. Sed troviĝas aliaj, pri kiuj oni devas ankaŭ

diri, ke ili staras preskaŭ solaj. La Galileanoj. Ili havas nur sian solan dion; kaj unu sola dio estas preskaŭ nenio. — Kiel do okazas, ke ni ĉiutage vidas, ke tiuj homoj — —?

Korpogardistestro Anatolos. (*kiu intertempe malkonstruis la tendon.*) Mia imperiestro, nun vi devas surĉevaliĝi; mi ne kuraĝas postlasi vin tie ĉi pli longe.

Imperiestro Juliano. Jes, nun mi volas surĉevaliĝi. Kie vi metis mian bonan Babilonion? Jen do; kun la glavo en la mano — Venu, vi karaj amikoj!

(*Ĉiuj foriras dekstren.*)

(*Marĉa arbar-regiono. Malluma, senmove staranta akvo inter la arboj. Bivak-fajro malproksima. Lunlumo kun preter-rapidiĝantaj nuboj.*)

(*Kelkaj soldatoj staras garde en la antaŭ-scenejo. Makrina kaj virinoj kantas post la scenejo, maldekstre.*)

Ve al ni!

Estas falinta sub potenc-koler'

Generaci'.

Morton vidos ni!

Unu el la soldatoj. (*aŭskultante.*) ŜŜ! Ĉu vi aŭdas? Jen, tie kantas la galileanaj virinoj.

Alia soldato. Ili kantas kiel strigoj kaj noktorkorvoj.

Tria soldato. Mi tamen volonte estus inter ili. Estas pli senzorge ĉe ili ol ĉe ni. La dio de la Galileanoj estas pli potenca ol nia.

La unua soldato. La imperiestro kolerigis la diojn. Tiel estas. Kiel li povis ekpensi pri tio meti sin en la lokon de la dioj?

La tria soldato. Estas pli grave, ke li kolerigis la diojn de la Galileanoj, ĉu vi ne scias, ke oni rakontas kiel ion veran, ke li kaj lia sorĉisto en unu el la lastaj noktoj tranĉ-malfermis la ventron de graveda virino por serĉi antaŭdiraĵojn en ŝia intesto.

La unua soldato. Jes, sed tion mi ne kredas. Ĉiuokaze tio ne estis greka virino, tio sendube estis barbara virino.

La tria soldato. Estas dirite, ke la dio de la Galileanoj akceptos ankaŭ barbarojn; kaj se tio estas, la konsekvencoj falos sur nin.

La dua soldato. Sensencaĵo, — la imperiestro estas granda militisto.

La unua soldato. Oni diras, ke la reĝo Saporo estas ankaŭ granda militisto.

La dua soldato. Ĉu vi kredas, ke estas la tuta persa armeo, kiun ni havas antaŭ ni?

La unua soldato. Kelkaj diras, ke estas nur la antaŭ-gvardio; neniuj scias tion precize.

La tria soldato. Mi dezirus esti tie transe ĉe la Galileanoj.

La unua soldato. Ĉu ankaŭ vi volas apostatiĝi?

La tria soldato. Tiel multaj ja apostatiĝas. Dum la lastaj tagoj —

La unua soldato. (*vokas en la mallumon.*) Haltu — haltu! Kiu alvenas tie?

Voĉo. Amikoj de la antaŭ-gvardio.

(*Kelkaj soldatoj kun Agaton la Kapadokiano inter si, aperas inter la arboj.*)

La dua soldato. Oho! unu, kiu volis forkuri.

Unu el la venantoj. Ne, lia prudento forkuris.

Soldato Agaton. Mia prudento ne forkuris. Ho, en la nomo de la granda Dio, — lasu min!

La soldato de la antaŭgardoj. Li diras, ke li volas mortigi la sepkapan beston.

La soldato Agaton. Jes, jes, jes, tion mi volas. Ho, lasu min do! Ĉu vi vidas tiun ĉi lancon? Ĉu vi scias kia lanco ĝi estas? Per tiu ĉi lanco mi volas mortigi sepkapan beston, kaj poste mi reakiros mian animon. Kristo tion promesis al mi, li estis ĉe mi la pasintan nokton.

La unua soldato. Estas la malsato kaj la laceco, kiuj tiel malkvietigas lin.

Unu el la venintoj. Konduku lin bivaken, tie li povas dorme ripozi.

La soldato Agaton. Lasu min! Ho, se vi scius kia lanco tio estas!

(La soldatoj forkondukas lin dekstren post la scenejon.)

La tria soldato. Kion li volis diri je tiu besto?

La unua soldato. Tio estas galileaj misteraĵoj. Tiajn ili havas multajn inter si.

(Dominspektoro Eŭterios kaj la imperiestra kuracisto Oribaces rapide kaj esplor-rigardante venas de dekstre.)

Dominspektoro Eŭterios. Ĉu vi ne vidas lin?

Kuracisto Oribaces. Ne — He, soldatoj! — diru al mi, bonaj amikoj, ĉu neniu preteriris?

La unua soldato. Jes, divizio da lancjetistoj.

Kuracisto Oribaces. Bone, bone! Sed neniu alia? Neniu el la eminentaj sinjoroj? Neniu el la estroj?

Soldatoj. Ne, neniu.

Kuracisto Oribaces. Sekve ne tie ĉi! Ho, Eŭterios, kiel vi povis —?

Dominspektoro Eŭterios. Jes, kion mi povis —? Kion mi povis? Miaj maljunaj okuloj ne fermiĝis dum tri noktoj —

Kuracisto Oribaces. *(al la soldatoj.)* Vi helpu nin serĉi. Mi postulas tion en la propra nomo de la armeestro. Disiĝu inter la arboj; kaj se vi trovas unu el la eminentaj sinjoroj, sciigu tion ĉe la bivakfajro.

La soldatoj. Tiel okazos, sinjoro!

(Ili foriras maldekstren laŭ diferencaj vojoj. Iom post iom aperas la imperiestro Juliano de post arbo. Li aŭskultas, rigardas ĉiuf flanken kaj signodonas posten.)

Imperiestro Juliano. Sŝ! Alproksimiĝu, Maksimos! Ili ne vidis nin.

Mistikisto Maksimos. *(venas el la sama flanko.)* Oribaces estis unu el ili.

Imperiestro Juliano. Jes, jes; ili ambaŭ, li kaj Eŭterios gardas nin per la okuloj. Ili imagas ke — — Ĉu neniu el ili diris al vi ion?

Mistikisto Maksimos. Ne, mia Juliano! Sed kial vi vekis min? Kaj kion vi volas tie ĉi dum la malluma nokto?

Imperiestro Juliano. Mi volas esti sola kun vi la lastan fojon, mia amata instruisto!

Mistikisto Maksimos. Ne la lastan fojon. Juliano!

Imperiestro Juliano. Rigardu tiun nigran akvon. Se mi senpostsigne malaperus de la tero, kaj se mia korpo neniam estus trovata, kaj se neniu eksciis, kien mi malaperus — ĉu vi kredas, ke la legendo disflugos ke Hermeso venis al mi kaj forkondukis min, kaj ke mi estas akceptita en la socio de la dioj?

Mistikisto Maksimos. La tempo alproksimiĝis en kiu la homoj ne bezonas morti por vivi kiel dioj sur la tero.

Imperiestro Juliano. Mi mortas pro hejmo-sopiro, Maksimos, pro sopiro al la lumo de la suno kaj al ĉiuj steloj.

Mistikisto Maksimos. Ho, mi vin petegas, — ne pensu pri tiaj malĝojaj aferoj. La persa armeo staras antaŭ vi. Morgaŭ komenciĝos la batalo. Vi venkos. —

Imperiestro Juliano. Mi — venkos? Vi ne scias, kiu estis ĉe mi antaŭ unu horo.

Mistikisto Maksimos. Kiu estis ĉe vi?

Imperiestro Juliano. Mi estis dormetanta sur mia lito en la tendo. Subite mi vekigis de forta ruĝeta lumstrio penetranta miajn fermitajn palpebrojn. Mi rigardis supren kaj ekvidis figuron starantan en la tendo. Ĝi havis sur la kapo longan veston ambaŭflanke pendantan ĝis la tero, tiel ke la vizaĝo estis videbla.

Mistikisto Maksimos. Ĉu vi konis tiun figuron?

Imperiestro Juliano. Ĝi estis tiu sama vizaĝo, kiun mi vidis en la lumo, tiun nokton en Efeso antaŭ multaj jaroj, — tiun nokton, kiam ni festenis kun la du aliaj.

Mistikisto Maksimos. La spirito de la imperio.

Imperiestro Juliano. De post tiu tempo ĝi aperis antaŭ mi unu fojon en Gaŭlujo, — dum okazo, pri kiu mi ne deziras pensi.

Mistikisto Maksimos. Ĉu ĝi parolis?

Imperiestro Juliano. Ne, ĝi faris kvazaŭ ĝi volus paroli; sed ĝi ne parolis. Ĝi staris senmove, rigardante min. Ĝia vizaĝo estis pala kaj distordiĝinta. Subite ĝi ambaŭmane kunfrapis la veston ĉirkaŭ la kapo, kovris sian vizaĝon kaj foriris tuj tra la tendvando.

Mistikisto Maksimos. La decido alproksimiĝas.

Imperiestro Juliano. Jes, ĝi alproksimiĝas.

Mistikisto Maksimos. Ne malesperu, Juliano. Kiu volas, tiu venkos.

Imperiestro Juliano. Kaj kion gajnas la venkinto? Ĉu tio valoras la penon venki? Kion gajnis la macedona Aleksandro, kion gajnis Julio Cezaro? La Grekoj kaj la Romanoj parolas pri ilia gloro kun indiferenta admiro, — dume, tiu alia, la filo de la ĉarpentisto sidas kiel amreĝo en varmaj fidantaj homkoroj. Kie li estas nun? Ĉu li estas laboranta aliloke de post la tempo, kiam li iris sian vojon sur Golgota? Antaŭ nelonge mi sonĝis pri li. Mi sonĝis, ke mi estis submetinta al mi la tutan mondon. Mi ordonis, ke la rememoro pri la Galileanoj estu ekstermata sur la tero, kaj tial ĝi estis ekstermata. — Jen venis animoj kaj servis min kaj ligis flugilojn sur miaj ŝultroj, kaj mi supren ŝvebis en la senfinan spacon, ĝis mi metis la piedon sur alian teron. Tio estis alispeca tero ol mia. Ĝia rondo estis pli granda, ĝi havis pli flavan lumbrilon, kaj pluraj lundiskoj turniĝis ĉirkaŭ ĝi. Tiam mi malsupren rigardis sur mian propran teron, la teron de la imperiestro, kiun mi faris sengalileana, — kaj mi trovis, ke ĉio, kion mi faris, estas tiel bona. Sed vidu, mia Maksimos, — jen preteriris min procesio sur la fremda tero, kie mi staris. Estis militistoj kaj juĝistoj kaj ekzekutistoj ĉe la komenco, kaj plorantaj virinoj sekvis la longan irantaron. Kaj vidu — en la mezo de la malrapide marŝanta aro iris la Galileano vere vivanta, kaj portis krucon sur la ŝultroj. Tiam mi vokis al li dirante: kien, Galileano? Sed li turnis sian vizaĝon al mi, ridetis, kaj kapklinis malrapide kaj diris: al la Kranioloko. Kie li estas nun? Ĉu tio sur Golgota apud Jerusalemo estis

nur faritajo plenumata kvazaŭ en vilaĝeto dum trairvojaĝo en libera horo? Ĉu li iras kaj iradas, kaj suferadas kaj mortas kaj venkas ĉiam refoje de unu mondo al alia? Ho, se mi povus neniigi la mondon! Maksimos, — ĉu troviĝas nenia veneno, nenia konsumanta fajro, kiu povas neniigi la kreitaĵon, kiel en tiu tago, kiam la soleca animo ŝvebpendis super la akvo?

Mistikisto Maksimos. Mi aŭdas bruadon de la gardistoj — venu Juliano —

Imperiestro Juliano. Pensi, ke sin sekvos jarcentoj post jarcentoj, kaj ke en ili ĉiuj vivos homoj, vidintaj ke estis mi, kiu subkuŝas kaj li, kiu venkis! Mi ne volas kurbiĝi! Mi estas juna; mi estas nevundebla; — la tria regno estas proksime — (*li ekkrias laŭte.*) Jen li staras!

Mistikisto Maksimos. Kiu! Kie?

Imperiestro Juliano. Ĉu vi vidas lin? Jen inter la arbotrunkoj, — kun krono kaj purpuraj vestaĵoj —

Mistikisto Maksimos. Tio estas la luno, speguliĝanta en la akvo. Venu — venu, mia Juliano!

Imperiestro Juliano (*iras kolere al la vidaĵo.*) Iru for de mi! Vi estas mortinta. Via regno finiĝis. Forprenu tiun sorĉistmantelon, ho filo de ĉarpentisto! Kion vi faras tie? Kio estas tio, kion vi ĉarpentas? — Ha!

Dominspektoro Eŭterios (*de maldekstre.*) Laŭdataj estu ĉiuj dioj! — Oribaces, — ĉi tien, ĉi tien!

Imperiestro Juliano. Kie li forestis?

Kuracisto Oribaces. (*de dekstre.*) Ĉu li estas tie?

Dominspektoro Eŭterios. Jes, — Ho, mia plej amata imperiestro!

Imperiestro Juliano. Kiu estis tiu, kiu diris: mi ĉarpentas la ĉerkon de la imperiestro?

Kuracisto Oribaces. Kion vi celas sinjoro?

Imperiestro Juliano. Kiu parolis, demandas mi! Kiu estis tiu, kiu diris: mi ĉarpentas la ĉerkon de la imperiestro?

Kuracisto Oribaces. Sekvu min al la tendo, mi petegas vin!
(*Bruado kaj kriadoj aŭdiĝas en la malproksimo.*)

Mistikisto Maksimos. Batalkrioj! La Persoj surpriz-atakas nin —
Dominspektoro Eüterios. La antaŭgardio estas jam batalanta.

Kuracisto Oribaces. La malamiko estas en la bivako! Ho,
sinjoro, vi estas sen armilo —

Imperiestro Juliano. Mi volas oferdoni al la dioj.

Mistikisto Maksimos. Al kiuj dioj, ho malsaĝulo? Kie ili estas —
kaj kio ili estas?

Imperiestro Juliano. Mi volas oferdoni al ĉi tiu aŭ al la alia.
Mi volas oferdoni al multaj. Unu aŭ alia ja aŭdos. Mi volas
alvoki ion ekster mi kaj super mi —

Kuracisto Oribaces. Ne unu momento estu perdata tie ĉi—!

Imperiestro Juliano. Ha, ĉu vi vidis la brulantan torĉon
post la nubo? Ĝi ekbruliĝis kaj estingiĝis en la sama momento.
Sciigo de la spiritoj! Brulanta ŝipo inter ĉielo kaj tero! — Mia
ŝildo; mia lanco!

(Li rapidas for dekstren. Oribaces kaj Eüterios sekvas lin.)

Mistikisto Maksimos. *(vokas)* Imperiestro, imperiestro, — ne
batalu en ĉi tiu nokto!

(Li eliras dekstren.)

(Malfermita ebenaĵo kun vilaĝo en la malproksimo. Tagiĝo kaj nebula aero.)

(Bataltumulto. Ekkrioj kaj armiltintado ekstere sur la ebenaĵo. Sur la antaŭ-scenejo romanaj lancportistoj sub la estro Amian batalas kontraŭ persaj paŝarkistoj. Ĉi tiuj estas puŝataj returnen maldekstren.)

Estro Amian. Bone! Ataku! Piku ilin teren! Ne lasu al ili tempon
por pafi!

Armeestro Nevita *(kun sekvantaro de dekstre venanta.)*

Bone batalinte, Amian!

Estro Amian. Ho, sinjoro, kial la rajdistoj ne venas por helpi?

Armeestro Nevita. Tió estas neebla. La Persoj havas elefantojn en la unua vico. La nura odoro timigas la ĉevalojn — pikadu! De malsupre, amikoj, — sub la brust-armaĵoj!

Filozofo Kitron. (*en noktovestaĵoj ŝarĝita per libroj, paperrulaĵoj, venante de dekstre.*) Ho, ke mi devis veni en la mezon de tiuj ĉi terurajoj!

Armeestro Nevita. Ĉu vi vidis la imperiestron, amiko?

Filozofo Kitron. Jes, sed li ne atentis pri mi. Ho, mi petas humile divizion da militistoj por protekti min!

Armeestro Nevita (*al sia akompananto.*) Ili cedas. La ŝildportistoj ekmarŝu antaŭen.

Filozofo Kitron. Vi ne aŭdas min, sinjoro! Estas plej grave, ke al mi ne okazos malbono; mia verkaĵo: Pri animkvieteco sub malfacilaj cirkonstancoj, ne finiĝis ankoraŭ —

Armeestro Nevita. (*kiel antaŭe*) La Persoj ricevas novan fortigon ĉe la dekstra flanko. Ili denove marŝas antaŭen.

Filozofo Kitron. Ĉu ili marŝas antaŭen? Ho, tiu sanga murdeziro! — ho, sago! Ĝi preskaŭ trafis min! Kiel senhonte ili pafas; ili tute ne atentis nek vivon nek korpomembrojn! (*li forkuras al la antaŭscenejo, maldekstre.*)

Armeestro Nevita. La batalo ekhaltis. Oni ne iras antaŭen nek malantaŭen. (*al soldatestro Fromentinos, venanta de dekstre kun nova divizio.*) He, soldatestro, — ĉu vi vidis la imperiestron?

Soldatestro Fromentinos. Jes, sinjoro; li batalas antaŭ la blanke vestitaj rajdistoj.

Armeestro Nevita. Nevundita?

Soldatestro Fromentinos. Li ŝajnas esti nevundebla. Sagoj kaj ĵetlancoj evitas lin kie ajn li sin montras.

Soldatestro Amian. (*vokas el la batalumulto.*) Helpon, ni ne povas elteni pli longe!

Armeestro Nevita. Antaŭen, mia kuraĝa Fromentinos!

Soldatestro Fromentinos. (*al la soldatoj.*) Dense amasiĝu kaj ataku ilin, Grekoj! (*li rapidas helpi Amian'on; la batalado iom plimalproksimiĝas.*)

Korpogardistestro Anatolos. (*kun kelkaj soldatoj, de dekstre.*)
Ĉu la imperiestro ne estas tie ĉi?

Armeestro Nevita. La imperiestro! Ĉu vi ne estas responda je la imperiestro?

Korpogardistestro Anatolos. Lia ĉevalo estas pafmortigita sub li — terura interpuŝigado estiĝis; estis neeble veni al li —

Armeestro Nevita. Nu, ĉu vi kredas, ke okazis al li malbono?

Korpogardistestro Anatolos. Ne, tion mi ne kredas. Oni vokis, ke li estas nevundita, sed —

Multaj el la sekvantaro de la armeestro. Jen li estas! Jen li estas!

(Imperiestro Juliano, sen kasko kaj sen armaĵo, kun glavo kaj ŝildo, akompanata de imperiestraj korpogardistoj, venas de dekstre.)

Imperiestro Juliano. Feliĉe ke mi trovis vin, Nevita!

Armeestro Nevita. Ho, sinjoro, — sen armaĵo; kiel nesingarde —!

Imperiestro Juliano. En tiu ĉi regiono nenia armilo trafas min. Sed iru, Nevita; prenu sur vin la komandon; la ĉevalo estas mortigita sub mi kaj —

Armeestro Nevita. Mia imperiestro, vi tamen estas vundita?

Imperiestro Juliano. Ne; nur frapo sur la kapon; malgranda kapturniĝo. Iru, iru — — Kio estas tio? Tiom da strangaj aroj sin ĵetas inter ni.

Armeestro Nevita. (*mallaŭte*) Anatolos, vi estas responda pri la imperiestro.

(Armeestro Nevita kun siaj sekvantoj foriras dekstren. Imperiestro Juliano, la korpogardistestro Anatolos kaj kelkaj el la imperiestraj korpogardistoj restas. La batalo sur la ebenaĵo malproksimiĝas pli kaj pli.)

Imperiestro Juliano. Kiom el la miaj falis laŭ via opinio?

Korpogardistestro Anatolos. Certe ne malmultaj, sinjoro! sed mi estas konvinkita ke pli multaj el la Persoj falis.

Imperiestro Juliano. Jes, jes, tamen multaj falis, tiel Grekoj kiel Romanoj. Ĉu vi ne kredas tion?

- Korpogardistestro Anatolos. Mia imperiestro, ĉu vi vere estas senvunda? Via vizaĝo estas tiel pala —
- Imperiestro Juliano. Ĉu vi vidas tiujn tie kuŝantojn? — Unuj kuŝas surdorse, aliaj surventre kun etenditaj brakoj. Ili ĉiuj do estas senvivaj.
- Korpogardistestro Anatolos. Jes, sinjoro, ne estas dubo pri tio.
- Imperiestro Juliano. Ili estas senvivaj, jes! Ili sekve scias nenion pri la malvenko en Jerusalemo, nek pri la aliaj malvenkoj. — Ĉu vi ne kredas, Anatolos, ke falos multaj aliaj Grekoj en tiu ĉi batalo?
- Korpogardistestro Anatolos. Sinjoro, ni esperas, ke la plej sanga laboro pasis.
- Imperiestro Juliano. Multaj falos, multe pli multaj, mi diras! Sed ne sufiĉos. Al kio utilos, ke multaj falas? La posteuloj tamen ekscios — Diru al mi, Anatolos, kiel do imagis Kaligulo tiun glavon?
- Korpogardistestro Anatolos. Kiun glavon, sinjoro?
- Imperiestro Juliano. Vi sciis, ke li deziris glavon per kiu li je unu bato povus —
- Korpogardistestro Anatolos. Aŭdu la batalekriojn, sinjoro! Nun mi estas certa pri tio, ke la Persoj cedas.
- Imperiestro Juliano. (*aŭskultas*) Kio estas tiu kantado en la aero?
- Korpogardistestro Anatolos. Sinjoro, konsentu, ke mi venigos Oribaces; aŭ pli bone, — venu, venu; vi estas malsana!
- Imperiestro Juliano. Kantado estas en la aero. Ĉu vi ne povas aŭdi tion?
- Korpogardistestro Anatolos. Se tio estas, tiam tio estas Galileanoj —
- Imperiestro Juliano. Jes, certe, estas Galileanoj. Ha — ha — ha, ili batalas en niaj vicoj kaj ne vidas, kiu staras tie ĉe la transa flanko. Ho, vi malsaĝuloj! Kie estas Nevita? Kial li marŝas kontraŭ la Persojn? Ĉu li ne vidas, ke la Persoj ne estas la plej danĝeraj? — Vi ĉiuj perfidas min.

Korpogardistestro Anatolos. (*mallaŭte al unu el la soldatoj.*)
 Rapide al la tendaro; venigu la kuraciston de la imperiestro!
 (*La soldato foriras dekstren.*)

Imperiestro Juliano. Kiom multe da aroj! Ĉu vi kredas, ke ili ekvidis nin, Anatolos?

Korpogardistestro Anatolos. Kiuj, sinjoro? Kie?

Imperiestro Juliano. Ĉu vi ne vidas ilin, — tie — tie alte kaj tre malproksime! Vi mensogas! Vi vidas ilin tre bone.

Korpogardistestro Anatolos. Je la eternaj dioj, tio estas nur la nuboj de la mateno, tio estas la tagiĝo.

Imperiestro Juliano. Tio estas la armeoj de la Galileanoj; mi diras al vi! Rigardu, — tiuj en la vestoj kun la ruĝaj randoj, — ili estas tiuj, kiuj suferis la martirmorton. Kantantaj virinoj ĉirkaŭas ilin kaj faras pafarkŝnurojn el siaj longaj disŝiritaj haroj. Infanoj sekvas ilin kaj vindas ŝtonjetilojn el siaj eltiritaj intestoj. Brulantaj torĉoj —! Kiom multe da miloj, — sen-nombraj! Ili rapidas tien ĉi! Ĉiuj rigardas min, ĉiuj iras rekte al mi!

Korpogardistestro Anatolos. Tie estas la Persoj, sinjoro! Viaj vicoj cedas —

Imperiestro Juliano. Ili ne cedas — Ne cedu! Staru forte, Grekoj! Staru forte, Romanoj! Hodiaŭ vi liberigos la mondon!
 (*La batalo intertempe refoje moviĝas al la antaŭa flanko de la ebenaĵo. Imperiestro Juliano sin ĵetas kun levita glavo en la tumulton de la batalo. Generala konfuŝiĝo.*)

Korpogardistestro Anatolos. (*vokas dekstren.*) Helpon! La imperiestro estas en la plej granda danĝero!

Imperiestro Juliano. (*inter la batalantoj.*) Mi vidas lin, mi vidas lin! Donu pli longan glavon! Kiu havas longan glavon por pruntedoni al mi?

Atakantaj Soldatoj (*de dekstre.*) Kun Kristo por la imperiestro!

La soldato Agaton. (*inter la venantoj.*) Kun Kristo por Kristo!
 (*li ĵetas sian lancon; ĝi tuŝetas la brakon de la imperiestro kaj sin boras en lian flankon.*)

Imperiestro Juliano. Ah!

(Li kaptas la lancon por elliri ĝin, sed vundas sian manon, li eligas laŭtan ekkrion kaj falas.)

La soldato Agaton. *(vokas en la interpuŝiĝadon.)* La lanco de l' romano de Golgota! *(li sin fetas sen armiloj inter la Persoj; oni vidas ke li estas batata teren.)*

Konfuzitaj krioj. La imperiestro! Ĉu li estas vundita?

Imperiestro Juliano. *(klopodas ekstari, sed reŝalas kriante.)*
Vi venkis, Galileano!

Multaj voĉoj. La imperiestro falis!

Korpogardistestro Anatolos. La imperiestro estas vundita!
Protektu lin — protektu lin, en la nomo de la dioj!

(Li defendas sin senespere kontraŭ la Persoj. La imperiestro estas forportata sveninta. Samtempe la armeestro Jovian aperas sur la ebenaĵon kun novaj aroj da militistoj.)

Armeestro Jovian. Antaŭen — antaŭen, kredantaj fratoj; donu al la imperiestro tion, kio apartenas al la imperiestro!

Cedantaj Soldatoj. *(vokas al li.)* Li falis! La imperiestro falis!

Armeestro Jovian. Falis! Ho, potenca Dio de l' venĝo! Antaŭen, antaŭen; la Sinjoro volas, ke lia popolo vivu! Antaŭen. Mi vidas la ĉielon malfermita; mi vidas anĝelojn kun flamantaj glavoj —!

La Soldatoj. *(marsante antaŭen)* Kristo estas en nia mezo!

La Soldatoj de Amian. La Dio de la Galileanoj estas en nia mezo! Ni lin ĉirkaŭ dense! Li estis la plej forta!

(Sovaĝa batalad-tumulto. La armeestro Jovian penetras en la malamikajn vicojn. Sunleviĝo, la Persoj forkuras ĉiuloken.)

(La tendo de la imperiestro kun fermita enirejo en la fundo. Hela tago.)

(La imperiestro Juliano kuŝas sveninta sur sia lito. La vundoj de lia dekstra flanko, brako kaj mano estas bandaĝitaj. Apud li staras la kuracisto Oribaces kaj Makrina kaj la dominŝpektoro Eŭterios. Iom pli malantaŭe staras Basilios kaj la filozofo-instruisto Priskos. Ĉe la fino de la lito staras la mistikisto Maksimos.)

Makrina. Li sangas refoje. Mi devas bandaĝi pli preme.

Kuracisto Oribaces. Ricevu nian dankon, ho milda virino, viaj singardaj manoj estas por ni tre utilaj.

Dominspektoro Eŭterios. Ĉu li vere vivas ankoraŭ?

Kuracisto Oribaces. Tre certe, li vivas.

Dominspektoro Eŭterios. Sed li ja ne spiras.

Kuracisto Oribaces. Jes, li spiras.

(La soldatestro Amian eniras mallaŭte kun la glavo kaj la ŝildo de la imperiestro, kiujn li metas for, kaj restas staranta ĉe la tendkurteno.)

Filozofo Priskos. Bona soldatestro, kiel staras la aferoj ekstertende?

Soldatestro Amian. Pli bone ol tie ĉi. Ĉu li jam —?

Filozofo Priskos. Ne, ne, — ankoraŭ ne. Sed ĉu estas certe, ke ni pelis la Persojn malantaŭen?

Soldatestro Amian. Jes, absolute certe. Estis la armeestro Jovian, kiu forkurigis ilin. Ĵus alvenis en la tendaron tri eminentaj senditoj de reĝo Saporo por peti batalhalton.

Filozofo Priskos. Kaj ĉu vi kredas, ke Nevita konsentos ĝin?

Soldatestro Amian. Nevita transdonis la gvidadon al Jovian. Ĉiuj amasiĝas ĉirkaŭ Jovian. Ĉiuj rigardas lin kiel la solan savanton —

Kuracisto Oribaces. Parolu mallaŭte; li sin movas.

Soldatestro Amian. Li sin movas? Eble el la vekigo estiĝos rekonscio? Ho, se li povus tion ĝisvivi!

Dominspektoro Eŭterios. Kion, Amian?

Soldatestro Amian. La soldatoj kaj la armeestroj konsiliĝas pri la elekto de nova imperiestro.

- Filozofi-instruisto Priskos. Kion vi diras!?
- Dominspektoro Eüterios. Ho, kia hontinda senpacienco!
- Soldatestro Amian. La danĝera situacio de la armeo senkulpigas tion parte, kaj tamen —
- Makrina. Li vekigas; — li malfermas la okulojn —
- Imperiestro Juliano. (*kuŝas momenton senmove kaj rigardas milde la ĉirkaŭstarantojn.*)
- Kuracisto Oribaces. Sinjoro, ĉu vi min konas?
- Imperiestro Juliano. Jes, perfekte, mia Oribaces.
- Kuracisto Oribaces. Kuŝu senmove.
- Imperiestro Juliano. Kuŝi senmove? Pri kio vi memorigas min? Mi devas leviĝi!
- Kuracisto Oribaces. Neeble, sinjoro; mi petegas vin —
- Imperiestro Juliano. Mi devas leviĝi, mi diras. Kiel mi nun povus kuŝadi senmove? Mi devas absolute venkobati Saporo'n.
- Dominspektoro Eüterios. Saporo estas batita, sinjoro! Li sendis ambasadorojn al la tendaro por peti batalhalton.
- Imperiestro Juliano. Ĉu vere? Tio tre ĝojigas min. — Mi do venkobatis lin. Sed ne batalhalto! Mi volas ĵeti lin tute teren. Ah, kie estas mia ŝildo? Ĉu mi perdis la ŝildon?
- Soldatestro Amian. Ne, mia imperiestro, — jen viaj ŝildo kaj glavo.
- Imperiestro Juliano. Tio vere estas al mi kara. Mia bona ŝildo. Mi ne dezirus, ke ĝi estu en la manoj de barbaroj. Metu ĝin sur mian brakon —
- Makrina. Ho, sinjoro, ĝi estas nun tro peza por vi!
- Imperiestro Juliano. Ah, — vi? Vi pravas, pia Makrina; ĝi estas iom tro peza. — Metu ĝin antaŭ mi, por ke mi povu vidi ĝin. — Kion? Ĉu estas vi, Amian? Ĉu vi gardas apud mi? Kie estas Anatolos?
- Soldatestro Amian. Sinjoro, li estas nun feliĉega.
- Imperiestro Juliano. Li falis? La fidela Anatolos falis por mi! — Feliĉega, diras vi? Hm! — Unu amiko pli malmulte. Ve, mia Maksimos — Mi ne volas ricevi hodiaŭ la senditojn de la persa reĝo. Ili pensas nur pri tio, gajni tempon. Sed mi konsentas

nenian aranĝon. Mi volas daŭrigi la venkon plejenergie. La armeo refoje turnu sin al Ktesifo.

Kuracisto Oribaces. Nefareble, sinjoro; pensu pri viaj vundoj.

Imperiestro Juliano. Miaj vundoj resaniĝos baldaŭ. Ĉu ne vere Oribaces, — ĉu vi ne promesis al mi —?

Kuracisto Oribaces. Antaŭ ĉio: ripozo, sinjoro!

Imperiestro Juliano. Kia malfeliĉa okazo! Kaj eĉ nun, kiam tiom da gravaj aferoj amasiĝas ĉirkaŭ mi. Tiujn aferojn mi ne povas meti en la manojn de Nevita. En io tia mi ne fidus lin nek iun alian, ĉion tian mi faru mem — Mi vere sentas min iom laca. Plej ĉagreniĝanta! — Diru al mi, Amian, kiel nomiĝas tiu malfeliĉ-plena regiono?

Soldatestro Amian. Kiu regiono, mia glora imperiestro?

Imperiestro Juliano. Jena regiono, kie tiu persa ĵetlanko trafis min?

Soldatestro Amian. Ĝi nomiĝas laŭ la vilaĝo Frigio.

Mistikisto Maksimos. Ah!

Imperiestro Juliano. Kiel ĝi nomiĝas? Kiel vi diris, ke la regiono nomiĝas?

Soldatestro Amian. Sinjoro, ĝi nomiĝas laŭ la jena vilaĝo, la frigia regiono.

Imperiestro Juliano. Ah, Maksimos — Maksimos!

Mistikisto Maksimos. Trompita!

(Li kovras sian vizaĝon kaj falas antaŭ la piedloko de la lito.)

Kuracisto Oribaces. Mia imperiestro, kio estas la kaŭzo de tiu angoro?

Imperiestro Juliano. Nenio, — nenio, — Frigio? Sekve? — Nevita kaj la aliaj do ekprenos la aferojn en la manojn. Iru, kaj diru al ili —

Soldatestro Amian. Sinjoro, ili jam en via nomo —

Imperiestro Juliano. Ĉu vere? Jes, jes, tiam estas bone. — La volo de la mondo kuŝis en embusko post mi, Maksimos!

Mistikisto Maksimos. Via vundo malfermiĝas, sinjoro.

Imperiestro Juliano. Ho, Oribaces, kial vi volis kaŝi tion al mi?

Kuracisto Oribaces. Kion mi volus kaŝi, mia imperiestro?

Imperiestro Juliano. Mi devas foriri. Kial vi ne diris tion al mi antaŭe?

Kuracisto Oribaces. Ho, mia imperiestro!

Basilios de Cezarea. Juliano — Juliano!

(*Li sin ŝetas plorante antaŭ la lito.*)

Imperiestro Juliano. Basilios, — amiko, frato, — ni ambaŭ travivis kune belajn tagojn. — Ne ploru, ĉar mi foriras de vi en tia juna aĝo. Ne estas ĉiam malplaĉa signo de la sortpotencoj, ke ili forŝiras homon en lia juna aĝo. Kio do estas morti? Ĉu tio estas io alia krom pagi sian ŝuldon al la ĉiam aliiganta regno de la polvo? Ni ne plendokriu! Ĉu ni ĉiuj ne amas la saĝecon? Kaj ĉu la saĝeco ne instruas al ni, ke la plej alta feliĉego estas kunligita al la vivo de la animo kaj ne al la korpo? En tio la Galileanoj pravas, kvankam, pri tio ni ne volas paroli. Se la potencoj de vivo kaj morto estis permesintaj al mi finverki ian skribajon, tiam mi kredas ke mi sukcesus —

Kuracisto Oribaces. Ho, mia imperiestro, ĉu tio ne trolacigos vin paroli tiel longe?

Imperiestro Juliano. Ne, ne, ne. Mi sentas min tre malpeza kaj libera.

Basilios de Cezarea. Juliano, mia amata frato — ĉu vi havas nenion por senoficigi? ¹⁾

Imperiestro Juliano. Mi vere ne scias, kion mi senoficigus.

Basilios de Cezarea. Ĉu vi pripentis nenion?

Imperiestro Juliano. Mi havas nenion por pripenti. La potencon, kiun la okazoj metis en miajn manojn, kaj kiu estas radiado de la dieco, tion mi scias, mi uzis laŭ miaj povoj. Neniam mi volis fari maljustaĵon al iu. Ĉi tiu militiro havis por si bonajn kaj pravigajn motivojn, kaj se kelkaj opinius, ke mi ne realigis ĉiujn esperojn, tiam ili tamen pripensu, ke ekzistas ekster ni misterplena potenco, kaj ke ĝi regas en alta grado pri la rezultoj de la homaj entreprenoj.

Makrina. (*mallaŭte al Oribaces.*) Ho, aŭskultu — aŭskultu, li spiris tiel pene.

Kuracisto Oribaces. La voĉo baldaŭ forlasos lin.

1) reenvoki.

Imperiestro Juliano. Rilate al la elektado de posteulo, mi ne kuraĝas doni konsilon — Vi, Eŭterios, vi disdividos miajn havaĵojn inter tiuj, kiuj estis al mi plej proksime. Mi ne post-lasas multon; ĉar mi ĉiam opiniis, ke vera amanto de filozofio —
— Kio estas tio? Ĉu la suno jam subiras?

Kuracisto Oribaces. Tute ne, mia imperiestro; estas ankoraŭ hela tago.

Imperiestro Juliano. Strange. Ŝajnas al mi, ke ĉio estiĝas tiel malluma antaŭ miaj okuloj — — Jes, saĝeco — saĝeco. Tenigu je la filozofio, bona Priskos! Sed ĉiam estu armita kontraŭ io neesplorablekstre, kio — — Ĉu Maksimos foriris?

Mistikisto Maksimos. Ne, mia frato!

Imperiestro Juliano. Mia faringo brulas. Ĉu vi ne povas kvietigi mian soifon?

Makrina. Ektrinko da akvo, sinjoro! (*Ŝi metas tason je liaj lipoj.*)

Kuracisto Oribaces. (*flustras al Makrina.*) Lia vundo sangas internen.

Imperiestro Juliano. Ne ploru. Neniu Greko ploru pro mi; mi supreniras al la steloj — — Belaj temploj. — Statuoj. — Sed tiel malproksime.

Makrina. Pri kio li parolas?

Kuracisto Oribaces. Mi ne scias; mi kredas, ke li deliras.

Imperiestro Juliano (*kun fermitaj okuloj.*) Aleksandro povis triumfmarŝi — en Babilonon. — Mi volas ankaŭ — —. Belaj foliar-kronitaj junuloj — dancantaj knabinoj — sed tiel malproksime. Bela mondo — bela mond vivo — (*li larĝe malfermas la okulojn.*) Ho, suno, suno, — kial vi trompis min? (*li refalas sur la kusenon.*)

La ĉirkaŭstarantoj. Mortinta — mortinta!

Kuracisto Oribaces. Jes, nun li estas mortinta.

(*Basilios kaj Makrina genuiĝas kaj ekpreĝas, Eŭterios kovras sian kapon. Tamburoj kaj kornoj aŭdiĝas tre malproksime.*)

Vokado el la tendaro. Vivu imperiestro Jovian!

Kuracisto Oribaces. Ho, ĉu vi aŭdas tiun vokadon?

Soldatestro Amian. La armeestro Jovian estas elektita imperiestro.

Mistikisto Maksimos. (*ridas*) La Galileano Jovian! Jes — jes — jes!

Kuracisto Oribaces. Hontinda trorapidiĝo! Jam antaŭ ol ili eksciis, ke —

Filozofa Priskos. Jovian, — tiu venkanta heroo, kiu savis nin ĉiujn! La imperiestro Jovian certe indas laŭdadon. Mi tamen ne esperas, ke tiu ruzaĉa Kitron jam — (*Li foriras rapide.*)

Basilios de Cezarea. Forgesita antaŭ ol via mano malvarmiĝis.

Kaj por tiu ŝanganima belegaĵo vi vendis vian senmortan animon!

Mistikisto Maksimos (*ekstaras.*) La mondvolo estos responda por la animo de Juliano.

Makrina. Ne moku; kvankam vi certe amis tiun mortinton —

Mistikisto Maksimos. (*alproksimiĝas al la mortinto.*) Ĉu mi amis kaj delogis lin? — Ho ne, ne mi! Delogita kiel Kain. Delogita kiel Judas — — Via dio estas malŝparema dio, ho Galileano! Li uzas multajn animojn. Ĉu vi ankaŭ nun ne estis la ĝusta, — ho viktimo de la neceso? Kion valoras vivi? Ĉu tio estas ludo kaj muziko. — — Voli estas devi voli. Ho, mia amata — ĉiuj antaŭdiroj trompis min, ĉiuj aŭguroj parolis per du langoj, tial mi opinias vin la paciganto inter la du regnoj. La tria regno venos! La homa spirito reprenos sian heredaĵon, kaj tiam estos ekbruligataj kulpoferoj por vi kaj por viaj du gastoj en la simposiono. (*Li foriras.*)

Makrina (*ekstaras, pala.*) Basilios, — ĉu vi komprenas la diraĵojn de tiu idolano?

Basilios de Cezarea. Ne, — sed majeste kaj brilante manifestiĝas al mi, ke tie kuŝas pompa, ruinigita ilo de la Sinjoro.

Makrina. Jes, vere; kara multvalora ilo.

Basilios de Cezarea. Kristo, Kristo, — kie estas via popolo, ne vidanta vian malkaŝan konsilon? La imperiestro Juliano estis al ni puneganta vergofasko, — ne por la morto, sed por plialtigo.

Makrina. La sekreto de la elekto estas terura. Kion ni scias?

Basilios de Cezarea. Ĉu ne estas skribite. Kruĉoj estas faritaj por malhonoro kaj vazoj estas faritaj por gloro?

Makrina. Ho, frato, ni ne imagu tiun abismon ĝis la fundo. (*Ŝi klinas sin super la mortinto kaj kovras lian vizaĝon.*) Homanimo, — se vi devus erari, tio estos bone alkalkulata al vi en tiu granda tago, kiam aperos sur la nuboj la altpotenculo por juĝi pri la vivantaj mortintoj kaj pri la mortintaj vivantoj — —

